


Sezonaj krimromanetoj de Sten Johansson

Enhavo

FALĈITA KIEL FOJNO	4
1. Libertempo komenciĝas	5
2. Vizito en butiko	10
3. Ĉu sufiĉas?	13
4. Idilio ĉe lago	15
5. Helpi sian kunhomon	19
6. Serĉu, kaj vi trovos!	22
7. Baltmara kunlaboro	25
8. Ŝafo, ĉu ne?	27
9. Sur la ĝustan vojon	32
10. Mankas disciplino	37
11. Mesaĝo de mortinto	42
12. Ni trovos ŝin!	47
13. Preskaŭ kiel homoj	51
14. Lama ĉeno	56
15. Ne plu bezonata	63
Glosoj	65
TRANS MARO KAJ MORTO	66
1. Doktoro venas malfrue	67
2. Paganoj kaj demonoj	70
3. Terura domo!	77
4. La plej naturaj aferoj	81
5. Jankéus malviŝas	85
6. Vojo de sekureco	91
7. Kazo solvita?	97
8. Makabra ekskurso	103
9. Atesto de poeto	105
10. Problemo kun la polico	114
11. Senkulpa	118
12. Honoro de mortintoj	126
Glosaro	128
NEĜO KAŜAS NUR...	130
1. Nigre-blanke	131
2. Ĉizu runŝtonon!	134
3. Ĉefo kun kravato	146
4. Nebulo kaj malmoralo	155
5. Filino de butikisto	161
6. Enketo fermita	167
7. Serĉado de enrompŝtelisto	171
8. Bileto al Svedio	178
9. Malmurdi murdinton	191

10. Veki suspektojn	198
Glosaro	206
MEMOR' MORTIGA	208
1. Ĝis la kato miaños	209
2. Trovi kokranton	210
3. Ne plu kolego	217
4. Diable kvieta loko	222
5. Vizito en knabina ĉambro	223
6. Kiel fekmemori?	230
7. Majpluvon donacu	237
8. Pli efika dormigilo	243
9. Elegio al muzo	244
10. Ĝui la vivon	254
11. Senpolvigi la pistolojn	262
12. Nek pli nek malpli	270
13. Nova nomtabulo	271
Glosoj	276

Sten Johansson

FALĈITA KIEL FOJNO

Krimromano

Al-fab-et-o

Skövde, Svedio, 1997

Dua reviziita eldono 2014

1. Libertempo komenciĝas

Se la infanoj Schulze ne estus tiel lacaj kaj varmaj, eble Brian Jespersen neniam estus murdita. Aŭ eble – pensas Renate Schulze, ilia patrino, kvankam ŝi nenion diras – eble ankaŭ la infanoj estus buĉitaj kiel kunikloj.

Vendrede la kvaran de julio la familio Schulze – same kiel dum la lastaj kvar jaroj – ekiras per plenpakita Mercedo el sia hejmo en *Neu Wulmstorf* apud Hamburgo. Komenciĝis la libertempo, kaj ili ekiras norden. Post vespera veturo prama trans *Fehmarn Belt* restas duhora veturo al ilia kutima tranoktejo, simpla gastejo en Elsinoro. La patro, diplominĝeniero Dieter Schulze, volonte pluirus por alveni eĉ nokte ĉe la somerdomo en Svedio, sed li devas cedi al siaj edzino kaj infanoj, kiuj preferas etapi.

Jam dum la sabata matenmanĝo en la gastejo oni rimarkas, ke estos varma tago. La okjara Franziska kun bulko en unu mano kaj taso da ĉokolado en la alia volas plonĝi enmaren de la gasteja strandeto sur la norda bordo de Selando. Glutinte la lastan pecon ŝi kaj ŝia frato Holger havas tempon por mallonga bano en la friska Sunda akvo, dum iliaj gepatroj pretiĝas por pluri. Poste ili ĉiuj devas enaŭtiĝi por prame transiri tiun akvon al la sveda Helsingborg.

Dum la aŭto senprobleme kuras plu orienten tra Skanio, la infanoj grumblas pli kaj pli laŭte pri naĝado (Franziska), fiŝado (Holger) kaj glaciaĵoj (ambaŭ). Post preskaŭ du horoj tiu ĥoro atingas *fortisimon*, kiam aperas tabulo montranta al Baltmara strando. Dieter Schulze preterveturas la tabulon, dirante ke ne eblas tiel subite halti kaj deflankiĝi. Post kilometro li bedaŭras tiun pretekston, kiam ili renkontas alian, bone videblan tabulon. Halto estas neevitebla. Dum ilia patrino sunbanas sin, la infanoj naĝas kaj poste elpetas glaciaĵojn. Sinjoro Schulze elfosas la unuan bierdoson el aro, kiu bedaŭrinde sufiĉos nur por la unua semajno de lia libertempo. Tiun saman semajnon li bezonos por forgesi la ĉiutagan urĝon de la laborjaro kaj adaptiĝi al feria ritmo. Ĉi-printempe li kromlaboris pli multe ol kutime, kaj nun li permesis al si komenci la libertempon unu semajnon pli frue ol normale. Dum kvin semajnoj li kaj lia familio ripozos en sia sveda somerdomo, ĝuos la kvieton, la silenton, la purecon. Estas vere, ke la infanoj kutime plendas, ke nenio okazas, ke nenio fareblas. Sed *tio stimulus ilin mem eltrovi kion fari, ne nur malfermi la faŭkon kiel malsata birdido*, kiel la patro plurfoje didaktike lekciadas. Por li la trankvilo ĉiuokaze estos balzamo, la senhomeco estos ripozo post jaro plena je devoj sociaj kaj profesiaj.

Unu horon pli malfrue la Mercedo ruliĝas sur grua vojeteto kondukanta al *Sandnäs*, ilia domo apud la lago *Törn*. Oni elaŭtiĝas, malŝlosas la domon,

sciivole rigardas ĉu ĉio aspektas same kiel antaŭ jaro. La patro iras por funkciigi la pumpilon kiu liveras akvon, kaj poste li komencas deŝraŭbi la fenestrumojn. La patrino endomigas kelkajn kunportitajn manĝaĵojn por ekprepari lunĉon. La infanoj kuras inspektante la kutimajn lokojn. Kiel kutime. Kiel rutine. La senstreĉa, trankvila rutino de libertempo.

Subite Dieter Schulze aŭdas krion de sia filo Holger, sed de malantaŭ la domo la knabo ne videblas. Lia edzino endome nenion aŭdas, sed ĵetante rigardon trafenestre ŝi ekvidas la infanojn alkuri. Dek-unujara Holger kvazaŭ ŝovas antaŭ si la fratineton.

Sur la ŝtuparo kolektiĝas la familio.

”Morta viro!” krias Holger. ”Oni mortigis viron!” La gepatroj nenion komprenas, sed laŭ la mieno de ilia filo vidiĝas, ke ne temas pri stulta ŝerco. ”Li kuŝas malantaŭ la remizo” sciigas la knabo kun time malfirma voĉo.

Schulze ekregas sin. ”Iru en la domon”, li diras al sia familio kaj enŝovas ilin, supren laŭ la ŝtuparo. Ferminte post ili la pordon li iras al la remizo, rigardante ĉirkaŭ si.

La viro estas ne nur morta, ne nur mortigita, kiel diris Holger, sed brutale buĉita. Li kuŝas surdorse en flako el sango. Ĉio impresas kvazaŭ ĵus okazinta. Larĝa tranĉo tra lia gorgo brilas kiel obscena ruĝa fendo. La surtera sango ankoraŭ ne sorbiĝis aŭ sekiĝis. Schulze denove suspekteme rigardas ĉirkaŭ si. Ĉio estas kvieta, silenta. Birdoj pepas. Muŝoj zumas. La vento susuras en tremola foliaro inter la domo kaj la lago. Malproksime aŭdiĝas motorboato. La kadavro impresas, kvazaŭ oni ĵus distranĉis lian gorgon kaj li falis dorsen. Liaj malfermitaj okuloj strabas, li havas rufajn lipharojn.



El la provinca urbo Kalmar alveturis por komenci la murdenketon Roger Svedberg, polikomisaro, kaj Tom Jankéus, policinspektoro. Svedberg estas kompakta 45-jarulo kun blondaj, mallonge tonditaj haroj, trankvila mieno kaj firma, penetra rigardo. Jankéus, preskaŭ jardekon pli juna, estas alta, fortika, duonkalva brunharulo kun metalframaj okulvitroj, vivoplena rigardo kaj ofta ironia rideto. La du kolegoj jam multfoje kune plenumis enketojn kaj konas la emojn kaj kutimojn unu de la alia.

Du policaj teknikistoj etendas plastajn bendojn por marki, ke la loko estas barita de la polico. Svedberg kaj Jankéus inspektas la ĉirkaŭaĵon sed evitas entrudi sin en la baritan murdlokon. Ne plaĉas al ili kvereli kun la teknikistoj, kiuj konsideras ĉiujn aliajn homojn elefantoj kiuj detruas spurojn. Svedberg sentas sin pli ol kutime senutila surloke. La teknikistoj zorge ekzamenas la teron ĉirkaŭ la kadavro kaj poste kovras ĝin per

malgranda tendo. Kiam alvenas la polica medicinisto, Svedberg kaj Jankéus veturas al najbara domo, de kie telefonis la germano, kaj kie li ankoraŭ restas kun sia familio.

”Ĉu vi scias la precizan horon, kiam vi trovis la kadavron?”

”Ne, sed mi pensas ke ni bezonis nur ok ĝis dek minutojn por veni ĉi tien, kaj kiam mi telefonis, estis kvarono post tagmezo...”

”Mi scias. Dek-dua kaj dek sep minutoj, laŭ la raporto. Kaj vi ĵus alvenis al la somerdomo, ĉu ne?”

”Jes, prave. Ni ĵus alvenis, nur komencis ĉion aranĝi, kaj...”

”Kiom da tempo pasis de via alveno, ĝis vi trovis la korpon?”

”Mi ne scias, eble... eble dudek minutoj nur.”

La demandado okazas anglalingve. Tio estas, Svedberg ĉefe sufloras svede al Jankéus, ĉar li preferas ne aŭdigi sian anglan. Lia kolego eble ne parolas pli bone ol li sed havas malpli delikatan memestimon. La germana inĝeniero ŝajnas sufiĉe kontenta pri sia angla, tamen li ne povas konkuri kun sia edzino. Montriĝas ke ŝi eĉ instruas la anglan en liceo.

”Mi rigardis horloĝon kiam ni elaŭtiĝis, kaj ĝi montris kvaronon antaŭ tagmezo”, sciigas Renate Schulze.

”Ĉu vi renkontis iun survoje al via domo?” demandas Svedberg, forgesante kaŝi sian neperfektan lingvoscion.

Dieter Schulze ŝajnas konfuzita. Survoje al lia domo, tio estas la vojo de Neu Wulmstorf al Långasjö kaj Sandnäs. Sendube ili dumvoje renkontis kelkajn... Sed lia edzino komprenas la demandon ĝuste:

”Sur la grua voĵeto neniun. Ni vidis neniun, kaj neniun aŭdis. Ĉio ŝajnis kvieta, kiel kutime.” Ŝi frostotremas pensante pri tio, kio atendis ilin en la kutima kvieto.

Svedberg suflore murmuris al Jankéus, ke ”mi supozas ke neniun el ili rekonis la murditan”. Je la demando de Jankéus, Dieter Schulze respondas seke: ”Ne.” Kaj sinjorino Schulze eĉ neniam rigardis la kadavron.

Roger Svedberg sentas etan embarason. Li imagas, ke la metodoj de la sveda provinca polico el Kalmar ne tro imponas al la germana paro.

”Do, kiel estis en la domo”, diras Tom Jankéus proprainciate, ”ĉu endome vi rimarkis ion nenormalan? Ĉu io mankis? Ĉu io estis difektita, malpurigita...?”

”Nenio”, diras Renate Schulze ne tiel seke kiel ŝia edzo. ”Ĉio estis tia, kia ni lasis ĝin lastjare. Ankaŭ eksterdome, mi pensas. Ĉu ne?” ŝi aldonas turnite al la edzo.

”Certe. Mi nenion nenormalan rimarkis”, certigas tiu. ”Nu... krom, kompreneble...”

”Bone”, interrompas Roger Svedberg, pensante pri alia embarasa neceso. Al sia kolego li atentigas, ke ili devas paroli ankaŭ kun la infanoj.

La patrino unue rifuzas, sed devas fine permesi interparolon almenaŭ kun Holger. Ja li estas la vera trovinto de la kadavro. Ŝi mem interpretas al kaj de la germana. Do Svedberg iniciatas demandon svede, kiun Jankéus precizigas angle kaj sinjorino Schulze – espereble fidele – paŭsas germane, kaj poste la germana respondo de Holger treniĝas reen laŭ la sama itinero al la polickomisaro. ”Tion ĉi oni ne instruis en la polica altlernejo”, pensas Roger Svedberg.

Holger rakontas kiel li trovis la viron. ”Mi kaj mia fratino volis iri padon kiu iras al la lago, preter tiuj densaj arboj, mi-ne-scias-la-nomon (– *tremoloj* – helpas la patrino). Kaj ĝi komenciĝas malantaŭ la remizo (Svedberg notas la vorton *shed* por poste elserĉi en vortaro). Kaj mi iris la unua, sed subite mi preskaŭ tretis sur tiun viron, kaj mi tuj vidis ke li estas murdita. Do mi tuj turnis min kaj kaptis Franziskan – ŝi venis eble dudek metrojn post mi – kaj kuris al la domo, ĉar mi pensis ke la murdisto ankoraŭ restas ie.”

”Kial vi pensis tion?” Svedberg sendas direkte al Holger, kaj facile komprenas ĉiujn versiojn de la respondo: *Weiss nicht – I don't know – Jag vet inte. Mi ne scias.*

”Ĉu vi ion aŭdis aŭ vidis?”

”Ne, ne. Nenion”, respondas la knabo. ”Ĉio estis silenta. Mi ne scias kial, sed ĉio ŝajnis, kvazaŭ oni ĵus pikus lin per tranĉilo aŭ io. Sed kompreneble mi nenion vidis kaj nenion aŭdis. Estis nur sento.”

”Mi aŭdis boaton”, flustras Franciska al sia patrino, sur kiun ŝi grimpas el la sofo, kie la infanoj sidas ambaŭflanke de Renate Schulze.

”Kion ŝi diris?” scivolas Svedberg. La patrino klarigas kaj devas permesi kelkajn demandojn.

”Kiam vi aŭdis boaton?”

”Antaŭe, kiam ni kuris al tiu pado, kiu iras al la lago.”

”Ĉu ne povis esti alia veturilo? Eble mopedo aŭ aŭto?” Svedberg hezite forlasas sian kutimon ne fari sugestajn demandojn.

”Ne. Tio sonas alie. Estis boato.”

Nun ankaŭ Holger memoras. ”Jes, fakte estis boato. Ni volis iri rigardi ĝin. Estis tia eksterpoba, dutakta motoro.” Svedberg notas la terminon *Zweitaktmotor*, kiun eĉ la instruistino ne scias angligi. Holger tamen aldonas: ”Sed ĝi ne estis tre proksima. Eble meze de la lago.” Kvazaŭ por malpliigi la valoron de tio, kion lia fratino kontribuis. Neniu el la infanoj tamen memoras, ĉu la boato aŭdiĝis pli malfrue, post la terura malkovro.

La policistoj el Kalmar por la momento ne trovas pli multe por demandi. La germana familio devas montri siajn pasportojn por identigi sin, kaj poste Roger Svedberg dankas ilin kaj bedaŭras la ĝenon.

Sinjoro Schulze akompanas ilin al la somerdomo, dum la familio provizore restas ĉe la najbaro. En la *loko de krimo* Svedberg havas la

nekutiman bonŝancon ricevi mallongan buŝan raporton pri la teknika esploro. Tiu tamen ne donas multon por lumigi la kazon. Nenio estas trovita kio povus identigi la murdilon. La supozeblan murdilon oni tamen trovis. Ĝi estas falĉilo, longa, makabre sangmakulita, kiu kuŝis inter la altaj herboj dudek metrojn for de la kadavro. Nun ĝi estas pakita en absurdan pakajon el plasta folio.

”En kiu direkto ĝi kuŝis?”

”Eee... norde, eble nordokcidente. Do nek direkte al la vojo, nek al la lago, nek al la domo.”

”Kvazaŭ li fuĝus arbaren?”

”Povus esti. Sed temas pri mallonga distanco. Eble li simple forĵetis ĝin.”

”Ĉu povas troviĝi fingrospuroj?”

”Ni neniun trovis. Sed ni esploras ĉion pli zorge laboratorie, kompreneble. Ankaŭ la malmultajn posedaĵojn de la viktimo. Monujon, kombilon, poŝtukon kaj simile.”

Roger Svedberg pruntas la pakitan falĉilon kaj montras ĝin al Dieter Schulze. Tiu kun naŭzo rigardas ĝin de proksime kaj kapjesas.

”Mi bedaŭras. Ĝi similas la mian. Ĝi devus pendi sur la maldekstra muro de la remizo.”

”Ekstere?”

”Jes, sed sub la elstaranta tegmento. Mi ne povis imagi... Tien ĉi venas neniun... tio estas – ĝis nun! Sed ĉu vere... ĉu entute eblas iun mortigi per tia ilo?”

Ĉu eblas mortigi per tranĉa klingo kiu mezuras metron? Svedberg levas la brovojn. Li volus diri al la germano ”demandu tiun, kiu kuŝas tie, ĉu eblas”, sed li glutas la ironion. Anstataŭe li diras: ”Ĝi ŝajnas sufiĉe akra. Ĉu vi kutime uzas ĝin?”

”Ne, sed... tio estas, mi intencis provi falĉi la herbejon tie, direkte al la lago. Iu bienulo montris al mi kaj helpis min akriĝi ĝin. Sed estis pli malfacile ol mi pensis, do poste mi lasis la aferon. La grundo tie ĉi ege plenas je ŝtonoj.”

”Mi scias. Do, nun oni fortransportos la korpon, kaj post mallonge ĉio estos preta. Vi povos reveni al via domo ĉi-vespere.”

La ŝokita Dieter Schulze senvorte kapjesas. Li nur esperas ke liaj familianoj akceptos dormi en la somerdomo ĉi-nokte. Ĉiuokaze, pri la falĉilo li nenion diros al ili. Kaj Franziska sendube dormos en la lito de panjo kaj paĉjo, meze.

2. Vizito en butiko

”Ĉu identigita?”

Roger Svedberg ne precizigas pri kiu li pensas. La polico de Kalmar ne estas tre granda administracio, kaj ĉiuj scias ke li okupiĝas pri la nekonata murdito ĉe Törn.

”Ne, troviĝas nenio kio povas servi al identigo”, respondas la teknikisto.

”Aĉe. Signifas ke oni forprenis ĉion kio distingus lin.”

”Aŭ li estis diskretulo, kiu preferis resti *inkognito*. Nu, ni kompreneble prenis liajn fingrospurojn kaj muldaĵon de la dentoj. Krome ni iom beligis lin kaj faris foton, kiun vi povos uzi por demandi en la ĉirkaŭaĵo. Ne forgesu demandi en la policejo.”

”Bone. Mi tuj sendos kelkajn. Se restas iu, kiu ne libertempas. Plue ni aperigos tiun foton en la nacia policbulteno. Eble iuloke la kolegoj konas lin. Alia afero: ĉu li havas iun objekton, sur kiu oni trovus fingrospurojn, aliajn ol la proprajn?”

”Eble sur iu bileto en la monujo... Vi povus kapti kelkajn kasistinojn de butikoj, ekzemple, se vi bezonas tiajn. Nu, ni serĉos, sed ne atendu tro multe.”

”Mi neniam atendas *tro* multe. Nur *sufiĉe*.”



Rondirado por demandi ĉe la publiko kutime estas ege temporaba, precipe en la kamparo. La homoj loĝas dise, dumtage malmultaj estas hejme, al ĉiu necesas komenci per trankviligaj vortoj, ke nenio okazis, pli precize, ke nenio okazis al iliaj proksimuloj. Sed ĉi-foje oni havas bonŝancon. Jam antaŭ lunĉo inspektoro Lars-Gunnar Frisk telefonas al Svedberg en la policejo.

”Saluton, ĉefo! Mi havas knabinon!”

”Gratulon.”

”Eh? Do, ĵen estas knabino, kiu rekonas lin!”

”Kaj?”

”Ŝi diras, ke ankaŭ ŝia amikino vidis lin.”

”Mi volis diri: *kaj kiu li estas?*”

”Ŝi ne scias, sed ŝi rekonas lin. Ŝi vidis lin en Emmaboda, en iu butiko.”

Svedberg suspiras, kaj interkonsentas pri renkontiĝo kun la knabino, ŝia amikino kaj inspektoro Frisk, tuj post lunĉo.



”Jes, estas li.”

La amikino, Cissi, konfirmas kion asertis Mia, la knabino trovita de Frisk.

”Li eniris la butikon *Ursino* kaj longe interparolis kun la danino. Estis evidente, ke ili konis unu la alian, sed ili ne ŝajnis amikaj. Eble li estas ŝia eks-amato aŭ io.”

”Kiu estas *la danino*?”

”Ŝi, kiu havas tiun butikon.”

”En Emmaboda?”

”Jes. Ŝi vendas ĉion: kristalojn, librojn, tarokojn, horoskopojn, biĵuterion, sonĝkaptilojn, ĉion...”

”Sonĝkaptilojn? Hm. Nu, pri kio ili parolis?”

”Ni nenion aŭdis, ĉar ni staris ekstere. Ni rigardis en la montrofenestron.”

La du gimnazianinoj ne havas mankon de imagpovo aŭ helpemo. Sed ĉu troviĝas reala bazo? Tamen ili ambaŭ rekonis la viron de la foto.



La butiketo *Ursino* vere ŝajnas vendi – se ne ĉion, tamen amason da strangaĵoj ligitaj al aŭgurado, astrologio, aromterapiio, metapsikaj fenomenoj, mistikismo kaj diversaj branĉoj de *Nova Epoko*. En la montrofenestro pendas la menciitaj sonĝkaptiloj, iaj indianaj talismanoj promesantaj kapti noktajn sonĝojn, kiam tiuj preterflugas la dormanton. Svedberg preferus, se eblus akiri murdistkaptilon.

La butikestrino, Mette Søbberg, rigardas la foton, kuntiras la brovojn, pripensas kaj skuetas la kapon.

”Ne, mi ne vidis lin.”

”Sed mi jam scias, ke vi bone konas lin. Kiam vi renkontis lin lastfoje?”

La virino ne plu rigardas al la foto, sed al Roger Svedberg. Sen palpebrumi ŝi ripetas, ke la viro de la foto estas al ŝi nekonata. Ŝi parolas svede kun forta dana akĉento, kaj al Svedberg ŝi impresas decidmiena kaj trankvila, tro trankvila. Laŭ lia sperto, homoj ĝenerale iomete ekscitiĝas kiam la polico pridemandas ilin. Ili volas scii, kio okazis. Kelkaj parolas tro multe, aliaj montras malbonvolon. Sed Mette Søbberg ŝajnas neŝancelebla,

kaj li baldaŭ forlasas ŝin kun ”ĝis revido”. Ŝi respondas per rutina ”bonvenon venontfoje”, kvazaŭ li estus kliento en ŝia butiko.



Svedberg malbonhumoras. Nenion li rikoltis en tiu stranga butiko en Emmaboda, urbeto je deko da kilometroj de la lago Törn, sur kies bordo falis nekonata viro. ”Falĉita kiel fojno”, pensas Svedberg, ne sciante de kie li ĉerpis tiun esprimon. Eble el la biblio, kiel multege da aliaj diraĵoj. Lia enketo ne antaŭeniĝas. Ĝi ”akvotretas surloke”, li pensas. Tiu esprimo tamen ne povas esti biblia. Aŭ ĉu tamen? Jesuo ja foje paŝis sur... Nu! La pensoj ŝajne vagas ĉien krom al la tasko solvenda. Li ekhavas ideon kaj serĉas informojn pri Mette Søbjerger en la polica registro, sed vane. Ŝi estas nekonata al la polico. Tamen li ne liberiĝas de la impreso, ke ŝi ege kutimis alfronti scivoleman policiston...

3. Ĉu sufiĉas?

La dek-unua de julio. La lokaj ĵurnaloj jam ĉesis skribi pri la murdo ĉe Törn. Hodiaŭ ŝajnas ke rekorde granda frago rikoltita sur la insulo Öland estas pli granda novaĵo. Tom Jankéus revenante post lunĉa paŭzo renkontas koleginon en la lifto.

”Kiel iras la murdo?” ŝi scivolas.

”Bone. Restas li murdita.” La humuro de Jankéus estas konata kiel iom aparta.

”Oni trovis forlasitan aŭton en tiu regiono. Danan Ford Sierra. En Sjunnamåla. Ĉu tio povos servi al io?”

”Serĉu la posedanton kaj sendu lin al mi. Se li vivas.”

”Kaj se ne estas *li*, sed *ŝi*?”

”Des pli bone.”



Post kelkaj telefonvokoj kaj unuhora atendo la telefaksilo de Svedberg kaj Jankéus komencas liveri el Kopenhaga policejo materialon pri la posedanto de la forlasita aŭto. Ili atendis simplan paperon kun nomo, adreso kaj naskiĝdato, sed la liverado daŭras longe, kaj antaŭ ili kolektiĝas dika fasko da paperoj. Jam en la unua paĝo aperas la nomo Brian Jespersen kaj foto el la pasporta registro de Danio. Tom Jankéus ekzamenas la foton, murmuras ion nekompreneblan kaj tenas la paperon antaŭ la okuloj de Roger Svedberg. Li aspektas kiel knabeto kiu desegnis bildon kaj nun fiere montras ĝin al sia paĉjo.

”Hm. Aĉa kvalito”, diras Svedberg.

”Pro la faksilo. Petu ni ke oni sendu veran kopion.”

”Li ne havas lipharojn.”

”Tiaj elkreskas. Provu mem, foje!”

Svedberg sendas mortigan rigardon al sia kolego. Poste li suspiras, kaj tiu sono signifas proksimume: *‘Jes, tio ĉi evidente estas la murdito de Törn, kaj nun donu al mi la Kopenhagan romanon pri li!’*

Post dek minutoj da studado li faras etan paŭzon, rigardas al Jankéus, kiu profundiĝis en alia ĉapitro de la faksita krimromano.

”Tom! Ĉu vi bonvolus telefoni al Kopenhago! Jen iu persono, kiu eble povos helpi nin. Inspektoro Søren Langgaard. Demandu, ĉu li konas Mette Søbjerg, kaj se jes, ĉu troviĝas ia rilato inter ŝi kaj tiu Jespersen.” Li ĵetas

okulon al sia brakhorloĝo. "Espereble oni ankoraŭ ne foriris por la semajnfino."

Jankéus malaperas kaj Svedberg studas plu. Brian Jespersen prezentiĝas kiel ŝtelisto, narkotvendisto, suspektita prostituisto, kaj la paperoj vicigas enuan liston da kontaktoj inter li kaj la Kopenhagaj polico, socialaj servoj kaj juĝinstancoj.

Jankéus revenas.

"Oni konas ŝin, sed ŝi ne estas kondamnita pri io."

"Kiel oni konas ŝin?"

"Nu, ŝajnas ke oni ofte trovis ŝin promenanta sur kelkaj stratoj, kiuj nomiĝas..." Li esploras slipon: "... Halmtorvet, Istedgade..."

"Bone, bone. Mi ne bezonas turistan gvidlibron. Sed ĉu estas rilato al Jespersen?"

"Jes, iom strangan. Antaŭ dek jaroj ŝi anoncis Brian Jespersen kiel patron de sia filino Katrine, sed post sangotesto montriĝis ke ne povas esti li."

Svedberg enpensiĝas, kaj Jankéus diras, kvazaŭ konklude:

"Jen ĉio, mi pensas."

"Bone. Sufiĉas."

"Ĉu sufiĉas? Por kio? Ne sufiĉas por murdi, ŝajnas al mi."

"Murdi? Aha... Ne, eble ne..." murmuris Svedberg kun konfuzita mieno. "Eble ne."

4. Idilio ĉe lago

”Ĉu vi trovis?”

Tom Jankéus stiras la policaŭton laŭ mallarĝa grua vojo kiu serpentas inter ŝtonmuroj, abioj kaj eratikaj blokoj. Svedberg apude konstatas, klopodante por akordigi la perspektivon eksteraŭtan kun mapo kiun li tenas enmane:

”Ŝajnas ke ŝi loĝas ĉe la lago, rekte translage kontraŭ la somerdomo de niaj karaj germanaj turistoj. Krome, kvar kilometrojn sude estas Sjunnamåla, kie staris la aŭto de Jespersen.”

”Bone, ke moviĝas ili ĉiuj sur tiel eta areo. Domaĝe nur, ke tiu ĉi paroĥo situas tiel longe for de la civilizo.”

”Unuafaje mi aŭdas vin nomi la policejon *civilizo*! Kutime vi diras *frenzulejo*.”

”Mi ne pensis tiel multe pri la policejo kiel pri ekzemple la taverno de Hotelo Witt.”

Dum babilado en amike kolega ĵargono Svedberg kaj Jankéus alproksimiĝas al sia celo. Estas sabato, la suno brilas de blua ĉielo, la kamparo aspektas kiel turisma broŝuro.

”Kien nun? Dekstren, ĉu ne?”

La grua vojo forkiĝas, kaj Jankéus iom nedecideme turnas dekstren.

”Mi pensas ke ne. Laŭ la mapo ni devos pluiiri ankoraŭ iom suden. Devas esti maldekstren, ŝajnas al mi, sed mi ne retrovas tiun ĉi vojkruciĝon.”

Jankéus enigas la retroan rapidumon, sed ankoraŭ hezitas.

”Ni demandu tiun!”

De la maldekstra vojo venas viro sur trirada ŝarĝmopedo. Li estas vestita en eksmoda kombineo kaj kasko.

Jankéus malfermas sian pordon kaj sukcesas haltigi la viron.

”Pardonu! Al Madviken, ĉu dekstren de ĉi tie?”

”Kio?”

”Ni iros al Madviken. Eble vi konas Mette Søbberg. Kiu vojo estas la ĝusta?”

”Kiu vojo?”

La viro balbutas malklare. Eble li estas iom mense malforta, aŭ ĉu li simple ne enbuŝigis sian falsdentaron?

”La danino”, kunhelpas Svedberg. ”Ĉu vi scias kie loĝas la danino?”

Finfine la viro komprenas:

”La danino? Jes ja!” Li faras grandiozan geston malantaŭen, al la maldekstra vojo. Jankéus dankas, preterlasas la ulon kaj ekiras denove.

Madviken, la loĝejo de Mette Søbberg, kiel supozite, situas tute apud la lago Törn, sed ĉifoje la du policistoj sin trovas sur ĝia orienta bordo. Antaŭ la domo ili vidas kelkajn infanojn kuradi, kaj irante de la aŭto al la domo ili renkontas la sveltan, malaltan figuron de Mette en la pordo. Ŝi salutas kviete sed montras neniun signon, ke ŝi volas enlasi ilin endomen.

”Ĉu ni povas iom paroli?” diras Svedberg ĝentile.

”Certe.”

”Eh... eble iuloke kie la infanoj ne...”

”Bone.” Mette levas la ŝultrojn kaj eniras en la domon. Ili sekvas ŝin. Ŝi iras en la kuirejon, restas staranta kaj ne petas ilin sidi. Ŝi atendas silente.

Svedberg montras la saman foton kiel lastfoje kaj diras kun leĝera tono:

”Bonvolu pripensi, kiam vi lastfoje vidis Brian!”

”Vidis kiun?” Mette rigardas lin sfinkse, kiel antaŭe.

”Brian Jespersen, vian amikon el Kopenhago.”

Mette ne ŝanĝas milimetron de sia mieno.

”Mi ne konas tiun nomon, nek la viron de via foto.”

Svedberg suspiras kaj nepetite sidiĝas sur kuirejan seĝon. La aliaj restas starantaj. Li iomete pripensas. El la jako li elpoŝigas paketon da cigaredoj kaj etendas ĝin al la virino.

”Ĉu vi fumas?”

”Jes, sed ne ĉi-momente.”

”Ankaŭ mi ne”, diras Svedberg kun rideto kaj remetas la paketon. ”Tie ĉi devas esti bona tereno por infanoj... Kiom da infanoj vi havas?”

”Tri.”

”Kaj Katrine estas la plej aĝa, ĉu?”

Unuafoje oni perceptas minimuman paŭzeton, heziton, antaŭ ol venas la trankvila respondo:

”Jes.”

”Ĉu vi efektive kredis, ke Brian estis ŝia patro?”

Ĉi-foje la hezito jam daŭras pli longe. Poste ŝi retretas:

”Bone. Mi vere konis lin, iam. Sed tio estis antaŭ deko da jaroj, eĉ pli. Kaj li ne havis precize tian vizaĝon kiel sur via foto.”

”Sed en via butikio, antaŭ semajno, ĉu li kunhavis la vizaĝon? Kara sinjorino, ĉu vi vere tiel ŝatas la policon, ke vi volas longigi ĝis absurdo niajn interparolojn? Pri kio vi tiel vigle diskutis kun Brian Jespersen en via butiketo Ursino?”

”Demandu lin.”

”Bedaŭrinde li babilas eĉ malpli ol vi.”

Unuafoje oni vidas ekbrilon de intereso en ŝiaj okuloj. Svedberg daŭrigas:

”Vi loĝas ĉe la lago Törn. Dum la lastaj tagoj la lokaj ĵurnaloj plenigis tutajn paĝojn per stultaĵoj pri la viro buĉita ĉe Törn. Sed vi ŝajnas nekredeble indiferenta.”

”Unu el la ĉefaj fontoj de spirita malekvilibro estas, ke homoj tro multe okupiĝas pri tiaj ĵurnalaj kaj televidaj aferoj.”

”Ĉu vi ne scivolas, kiu estas tiu murdito?”

”Ĉar vi demandas pri... pri li, mi supozas ke...”

”Aha. Vi supozas. Kial vi ne supozas, ke ni serĉas vian amikon kiel murdiston?”

”Ankaŭ tio eblas.”

Svedberg sendas okulsignon al sia kolego, kiu transprenas la stafetilon.

”Vi ŝparus tempon por vi mem kaj por ni, se dirus vi, pri kio interparolis vi kaj Jespersen en via butikio.”

Mette Søbjerger iomete pensas, kaj poste respondas:

”Mi ne scias, kiel li trovis min. Li estas kreteno. Li volis ke mi faru kelkajn idiotaĵojn por li. Verdire li estas... li estis kaduka, mense kaduka. Li jam delonge detruis al si la lastan cerboĉelon.”

”Kian idiotaĵon li petis de vi?”

Mette denove pensas, poste levas la ŝultrojn.

”Li volis, ke mi transportu kelkajn varojn por li. De trans la landlimo.”

”Kiajn varojn?”

”Mi ne demandis. Mi entute ne konsideris la aferon. Mi neniam faris, nek faros, tian kretenaĵon.”

”Se jes, kiel povis li atendi, ke vi helpas lin?”

”Mi jam diris. Lia cerbo paneis definitive.”

”Ĉu vi revidis lin post tiu butika vizito?”

”Ne.”

”Kiu mortigis lin?”

”Mi havas neniun ideon.” Mette rekonkeris sian neŝanceleblan trankvilon kaj ŝajnan stoicecon.

Jankéus paŭzas, kaj Svedberg enĵetas kun neatendita leĝereco:

”Estas bele ĉi tie, ĉe la lago. Vera idilio. Kaj vi havas boaton, sendube?”

”Jes.”

”Kompreneble. Amuze por la infanoj. Kun motoro?”

”Jes, sed difektita jam de jaro. Do, ni remas.”

”Domaĝe. Kaj la infanoj, la etaj, ĉu ili naskiĝis en Svedio?”

”Ditte jes, Henrik ne.”

”Tio signifas, ke vi venis al Svedio antaŭ...”

”Kvin jaroj.”

”Ĉu vi tuj venis tien ĉi, al Långasjö?” Svedberg konservas la leĝeran tonon al Mette, kvankam li devas akuŝigi ŝin je ĉiu vorto kvazaŭ per forcepso.

”Jes, tuj.”

”Kiel vi povis ekloĝi ĉi tie? Ĉu vi trovis laboron? Kiel vi trovis la ĉarman dometon, kiun vi... luas aŭ posedas?”

”Mi luas de la terposedanto, Åke Karlsson. Li helpis min veni ĉi tien.”

”Aha. Kiel vi ekkonis tiun sinjoron?”

”Mi estis amiko de lia filino.”

Svedberg paŭzas por pensi. Por dragi ion el tiu ĉi rimarkinda virino necesas scii precize la ĝustajn demandojn. Li tamen provas ankoraŭfoje:

”Kaj tiun filinon, kiel vi ekkonis ŝin?”

”Ŝi loĝis en Kopenhago.”

”Ĉu vi estis koleginoj?”

Sed Mette ne ŝanĝas mienon:

”Ni estis amikinoj.”

Svedberg sendas helpopetan rigardon al Jankéus, sed vane. Tiu profundigas en siajn notojn kaj ŝajnigas ne vidi la signalon de sia kolego.

”Bone. Ni revidos nin, sendube. Ĉu vi povas doni al ni la adreson de tiu sinjoro Karlsson, la terposedanto?”

”Li havas bienon en *Bråten*, proksime de la preĝeja vilaĝo de Långasjö.”

5. Helpi sian kunhomon

Neniu malfermas kiam la du policistoj sonorigas ĉeporde de la bieno Bråten. La domo ne aspektas kiel kampara domo sed pli similas urban vilaon el blankaj sabloŝtonaj brikoj. Apude tamen troviĝas bovinŝtalo, fojnejo kaj diversaj grandaj konstruaĵoj magazensimilaj. Ĉe la rando de apuda arbaro staras granda grize verda konstruaĵo el lado, senfenestra.

”Ĉu porkejo?”

”Povas esti ĉio ajn, porkejo, kokinejo, fabriko de iuj plastaĵoj. Ĉio aspektas same hodiaŭ. Ne kiel la bienetoj de fabellibroj.”

”Bone. Ni reiru hejmen. Ni povos kontroli ŝiajn asertojn telefone.”

Sed kiam ili startigas la aŭton, vidiĝas kompakta, fortika viro piediranta per decidaj paŝoj de la lada konstruaĵo kontraŭ ilin. Ili atendas lin, kaj alvenante li demandas:

”Vi serĉas?”

”Sinjoron Åke Karlsson.”

”Estas mi.”

”Ha, bone. Svedberg, Jankéus, Kalmar’a polico. Ĉu eblas mallonge interparoli?”

”Certe. Ĉu denove io okazis?”

”Ni esploras pri la murdo de viro apud la lago. Ni volas kontroli kelkajn aferojn.”

”Bone. Ni eniru. Mi supozis ke tiu afero estas jam solvita.”

La viro kiu havas tiel grandan fidon je la polica rapideco kondukas ilin en sian domon, kaj ili sidiĝas fotelen en lia vivoĉambro.

”Ĉu komforte? Propra sortimento.”

”Propra? Ĉu vi fabrikas meblojn?”

”Nur importas kaj vendas. En la kamparo necesas esti ĉiofaranto. Mi havas la bienon, kompreneble, ĉefe pro sentimentalaj kaŭzoj. Plue la meblokomercon, kaj la vulpofelojn. Se unu branĉo rompiĝas, oni devas alkoĉi sin al dua por ne fali!”

Sinjoro Karlsson ridetas. Li ne aspektas kiel falema homo, kontraŭe li disradias firmecon kaj stabilecon.

”Sed kiel vi vidas, mi vivas simple. KREDU min, oni spertas pli grandan ĝojon helpante aliajn homojn ol sin mem.”

Tio ŝajnas konvena enkonduko al ilia temo.

”Bone, ni ĝuste ŝatus demandi pri io simila. Ĉu vi konas personon nomatan Mette Søbberg?”

”Kompreneble. Mi ne nur konas ŝin, sed ege estimas ŝin. Komprenu, por homoj kiuj naskiĝis en palaco ne estas malfacile iri virte tra la vivo. Sed

Mette estas homo kiu levis sin el la ŝlimo kaj mem kreis sian novan vivon en digno kaj pureco. Jes, mi helpis ŝin, mi helpis ŝin. Sed la grava afero estas la spirita volo, kaj tie ĉiu homo devas mem trovi la vojon.”

Li ridetas, kaj aldonas:

”Vi eble pensas, ke mi predikas kiel pastro. Sed ne temas pri tio. Mi estas homo ordinara, sed esti homo signifas helpi sian kunhomon. Jen ĉio.”

Roger Svedberg ne scias kiun li preferas pridemandi, la sfinksan Mette Søbberg aŭ la oratoran Åke Karlsson. En ambaŭ okazoj povas esti komplike elgajni la informojn kiujn li bezonas. Li tamen enŝovas kelkajn demandojn, kaj akiras elokventan konfirmon pri la avaraj respondoj antaŭe faritaj de Mette. Krom tio li ekscias ke la filino de Karlsson, Pernilla, mortis en Kopenhago, kie ŝi vivis kiel narkotulo, same kiel Mette, ke Karlsson dufoje helpis al Mette veni al Svedio kaj Långasjö por komenci novan vivon sen narkotaĵoj, kaj ke ŝi nun de preskaŭ kvar jaroj vivas ‘pure’. Karlsson krome parolas multe pri krimo, prostituado kaj senmorala vivo, kion li priskribas per vortoj kiel ‘koto, ŝlimo, malpuraĵo, feĉo, abomenaĵo’. Batali kontraŭ tiuj aferoj, pro kiuj lia filino pereis, ŝajnas esti la vivotasko de tiu ĉi celkonscia kaj vortriĉa viro. Laŭ sia propra aserto, la monon gajnitan per meblokomerco kaj fabrikado de vulpofeloj li uzas por batali kontraŭ krimo kaj drogaĉoj.

Antaŭ ol foriri Svedberg montras al Karlsson la foton de Jespersen.

”Ne, mi ne rekonas lin. Iu policisto jam montris al mi la bildon, la saman, mi pensas. Antaŭ kelkaj tagoj. Bedaŭrinde mi ne povas helpi vin.”



Vespere la familio Schulze revenas al la Fiŝplaco de Karlskrona post dutaga ekskurso per pasaĝera ŝipeto tra la arkipelago. La nokton ili pasigis en pensiono sur la insulo Aspö. La suno, la vento kaj la akvo de Balta Maro donis al Dieter Schulze rozan haŭton, malfortan kapdoloron kaj sekan gorgon, kaj li sopiras al sia lasta doso da bona germana biero, konservata en termosa valizeto en la kofro de ilia aŭto. La infanoj, kiuj hodiaŭ naĝis proksimume dekfoje, plendas ke ili ne povis naĝi sufiĉe. Nur Renate Schulze konservas sian kutiman mienon de anĝelo, kvankam momente temas pri anĝelo iomete laca.

La Mercedo devas atendi ilin sur apuda flankstrato, kaj Schulze ekridas seke, kiam li ne trovas ĝin unuavide. Se estus en Parizo aŭ Madrido, ne estus mirinde se li dum momento erarus pri la ĝusta strato, sed en la dormema Karlskrona, situanta sur kelkaj insuletoj ĉe la suda marbordo de Svedio, li devus orientiĝi senprobleme.

”Ĉu do estas la sekvanta strateto?”

”Ne!” asertas Holger decide. Ĝi staris ekster tiu ĉi fenestro. Mi memoras la tabulon kun ‘GLASS’. Tio signifas glaciaĵo. Mi pensas ke oni ŝtelis ĝin.”

Post konsternita paŭzo Franziska esploras, kaj ŝia patro volus kunplori kun ŝi. Ilia ĉi-jara libertempo en la kvieto, idilia Svedio ne trovis sian perfektan formon. Li emas eldiri ian ŝercon kiel ‘*venontjare ni iros ripozi en la karnavalo de Rio*’, sed ĉi-momente neniu spritaĵo povas amuzi lin.

La urba policejo troviĝas je praktike piedira distanco. La loka polico impresas efike, sed malapero de Mercedo ŝajnas tamen esti rutinaĵo. Oni promesas telefoni al Gdynia por averti ĉe la alveno de pramo el Karlskrona, sed ne promesas rezulton.

”Kutime ili ne uzas tiun vojon, ĉar ĝi estas tro malrapida.”

‘Kutime’. Por la familio Schulze ne troviĝas natura rilato inter tiu vorto kaj la malapero de ilia aŭto. La infanoj kun sia patrino atendas en ĝardeno kafejo, dum la patro iras por lui aŭton. Incitas lin, ke malaperis kun la Mercedo ankaŭ lia lasta biero. Reirante – per Toyota! – li konstatas ke la alkoholvendejo, kie li vidis svedojn vicostari – laŭ lia supozo por ia surogato de biero – fermiĝis jam je la sesa horo.

6. Serĉu, kaj vi trovos!

En la policejo de Kalmar la murdo de Brian Jespersen ne plu estas la plej freŝa enketo. Du bankraboj, iu enfamilia murdo sen antaŭmedito, kies sola enigmo ŝajnas esti kial ĝi ne okazis jam antaŭ dudek jaroj, vendado de kontraŭleĝe distilita alkoholo al dek-dujaruloj – la kazoj viciĝas kaj postulas traktadon aŭ almenaŭ ordigadon de la dokumentoj. Dume tamen ie kaj tie oni plulaboras pri la buĉito ĉe Törn.

”Allan!” Roger Svedberg malofte vokas telefone sed utiligas sian voĉon kaj la nesufiĉan sonizolon inter la oficejaj ĉambretoj. En lia pordo la policinspektoro Allan Mårtensson montras sian brunan vizaĝon. Li ĵus revenis de kvarsemajna libertempo en Majorco kaj nun ĝuas enviajn komentojn de siaj kolegoj laŭ la tipo *‘ĉu vi trovis ĉefenestran tablon en la drinkejo?’*

”Allan, ĉu vi konas Janek Nowak?”

”Eble jes, eble ne. Estas tiom da”, Mårtensson senentuziasme respondas. Li ne precizigas da kio.

”Temas pri la murdo ĉe Törn, vi scias. Oni identigis fingrospurojn en la aŭto de Jespersen, krom liaj propraj. Janek Nowak. Punita pro ŝtelo, aktuala plurfoje pro narkotvendado, sed neniam kondamnita pro tio. Unufoje akuzita pri perforto al virino, sed ŝi rezignis pri la denunco. Loĝis en Malmö, Jönköping, Helsingborg, Södertälje, Pollando, denove Malmö, Nybro, Tyringe (kie ĝi situas?), denove Pollando, Landskrona ktp ktp. Ĉu vi povus esplori, ĉe ni kaj ĉe la polico de kelkaj el tiuj lokoj, kaj se eble ankaŭ inter la homoj tiuspecaj kiuj hazarde ŝatus babili kun vi, atentu bone: *kiam* kaj *kie* oni laste vidis lin. Ni atendu, eble du tagojn, ĝis ni serĉos lin oficiale, ĉar verdire ni havas nenion kontraŭ li.”

”Ŝajnas iomete kiel serĉi pinglon en fojnamaso.”

”Sed vi scias – *serĉu, kaj vi trovos; frapu, kaj estos malfermite al vi!*”

Mårtensson faras mienon kvazaŭ li bedaŭrus sian stultecon reveni de la Mediteranea plaĝo kaj poste malaperas por plenumi sian taskon. Dum kelkaj tagoj li entute ne montras sian sunbrunigitan vizaĝon. Ankaŭ Svedberg donas al si du liberajn tagojn por festi la naskiĝtagon de sia edzino. Jankéus ferias en norvega montaro. Eventualaj novaĵoj pri Brian Jespersen devas iri al Lars-Gunnar Frisk, kiu prizorgos ilin per la maldekstra mano dum li dediĉas sin ĉefe al la bankraboj.

La ĝenerala polica laboro limakas, kaj la murdenketo preskaŭ mortis. Malaltaj aerpremoj de Norda Maro vice pasas super la sud-oriento de Svedio, kaj la naskiĝtaga torto de sinjorino Svedberg, prezentita en la ĝardeno, supiĝas pro subita pluvego. Apud la lago Törn sinjoro Schulze

telefone traktadas kun sia Hamburga asekura kompanio. Sinjorino Schulze komencas iom sopiri al la teatroj, vendejoj kaj homoj en Hamburgo. Iliaj infanoj apenaŭ montras sin, ili trovis amikojn kaj pasigas la tagojn ĉelage, enlage kaj surlage en boato.



Kiam Svedberg fine ricevas raporton de Mårtensson, tiu estas magra. Plurloke oni ja kredas koni Nowak'on, sed de kelkaj monatoj neniuj lin vidis. Oni tamen trovas tion normala. Pluraj supozas, ke li estas en Pollando, sed pli precize oni ne scias kie serĉi lin.

Antaŭ ol dissendi oficialan serĉon, Svedberg akiras permeson de la distrikta poliestro kontakti la policon de Gdańsk kaj Szczecin, la du polaj urboj kun plej intensa komunikado kun Svedio. Li iom primeditas ĉu alvoki interpretiston, sed poste rezignas. Cetere, ankaŭ ili eble libertempas. Li sendas anglalingvan telefaksaĵon al la du policaj administracioj kun peto pri helpo.

La sekva tago estas merkredo, la 23an de julio. Posttagmeze, ĝuste kiam li intencas preni sian sanktan tason da kafo, oni telefonas el Szczecin. Iu virino prezentas sin – nedistingebla por sveda orelo – kaj demandas angle, ĉu li estas la komisaro kiu demandis pri Janek Nowak.

”Yes, it’s me!” konfirmas Svedberg.

”Mi havas la komision doni al vi informon de la ĉefkomisaro sinjoro Matkowski.”

”Jes, mi petas. Ĉu vi konas lin?”

”Pardonu, kiun?”

”Janek Nowak!”

”Ne, sinjoro. Li estas murdita.”

”Ne, ne. Devas esti miskompreno. Iu alia viro estas murdita, kaj mi enketas pri tiu murdo. Ni serĉas tiun Janek Nowak!”

”Mi bedaŭras, sed mi devas doni al vi la mesaĝon, ke oni trovis lin murdita en Kamień Pomorski.”

”Janek Nowak estas murdita en Pollando?”

”Jes, jes, prave.”

”Kiam?”

”Antaŭ unu semajno.”

Svedberg faltas la frunton. Antaŭ unu semajno, tio signifas pli ol semajnon post la murdo ĉe Törn.

”Ĉu vi scias kiu mortigis lin?”

”La enketo kompreneble ne estas finita, sed unu viro estas arestita, kaj laŭ ĉefkomisaro Matkowski li estas sufiĉe firme ligita al la krimo.”

”Bone. Bone. Via informo estas tre utila, kvankam nia enketo ja komplikiĝas. Ĉu tiu komisaro, *Matski...* ĉu li respondecas pri la murdenketo?”

”Jes.”

”Bone. Mi ŝatus ricevi kopiojn de ĉia materialo de tiu enketo, se eblas. Tiu Nowak povas esti iel ligita al murdo en Svedio. Ĉu vi povas diri la nomon de la arestito?”

”Jes, volonte. Włodek Szczepański. Mi literumas: duobla vo, lo kun streko, o...”

Svedberg notas la nomon kaj finas la interparolon.

Trinkante sian prokrastitan kafon li informiĝas, ke tiu Szczepański ne estas konata en la sveda polica registro. Li rondiras en sia ĉambro kun la kafotaso enmane, murmurante al si mem, ripetante la malmultajn faktojn eltrovitajn en la kazo Jespersen. Poste li sidiĝas ĉe la skribtablo, elserĉas telefonnumeron en la katalogo, kaj butonas ĝin sur la telefono.

”Butiko Ursino.”

”Saluton! Parolas Roger Svedberg, polickomisaro. Ĉu vi povus respondi al mallonga demando?”

”Bonvolu.”

”Vi diris, ke Jespersen volis ke vi transportu ion trans landlimon. Pri kiu limo temis?”

”Mi ne demandis.”

”Eble vi ne bezonis demandi? Mi supozas, ke ne temis pri Danio.”

”Verŝajne ne.”

”Sed pri...”

”Ne plu troviĝas tiel multaj veraj landlimoj.”

”Do...”

”Vi povas diveni same bone kiel mi.”

”Sed mi atendas vian supozon.”

”Ne estas sekreto, ke venas multe el Pollando.”

”Ne. Tio ne estas sekreto. Do, ĝis revido!”

”Bonvenon venontfoje.”

7. Baltmara kunlaboro

Ĉu la vojaĝo efektive utilas al lia enketo? Eble ĝi estas nur kamuflita plezurekskurso? Roger Svedberg stirante la aŭton suden laŭ la Eŭropa ŝoseo 22 sentas et-etan rimorson, sed li sufokas ĝin. Oni ja devas *ion* fari, aŭ simple fermi la enketon. La demandado ĉirkaŭ Törn donis nekredeble magran rezulton. Ŝajnas ke homoj estas blindaj surd-mutuloj. Pli ĝuste, troviĝas tro malmulte da homoj en tiu arbara regiono, kaj ne ĉiuj eĉ estas hejme por atesti kio okazas.

Apud Svedberg sidas Małgorzata Håkansson, interpretistino kiun Svedberg engaĝis por du tagoj. Ĉi-foje li ne dependos de pli-malpli profundaj scioj de la angla ĉe siaj polaj kolegoj, nek ĉe si mem. Sinjorino Håkansson – *nomu min 'Goŝa'*, ŝi cetere diris kun sveda neformaleco – estas eleganta kvindekjara polino, blonda – aŭ ĉu blondigita? – kiu antaŭ dudek jaroj edziniĝis al sveda konstrulaboristo kaj venis el la brua Varsovio al la kvieta Kalmar. Dum la frumatena veturo ili babilas pri ĉiutagaĵoj, pri la somera vetero kiu komenciĝis per varmego kaj transformiĝis al ripeta pluvado, pri Svedio kaj Pollando, pri la kreskanta krimado, pri siaj infanoj, pri la instruistoj de la infanoj, pri la lasta skandaletto de loka politikisto. Tiel ili post tri horoj alvenas en la havenon de Ystad kaj baldaŭ povas surveturi la pramon *Wawel*, kiu prenas ilin al Świnoujście.

Posttagmeze en la regiona policejo de Szczecin okazas kolega diskuto pri la du murdenketoj ĉe glaso da teo. Ĉefkomisaro Matkowski estas nekutime alta, maldika viro kun eleganta frizaĵo kaj zorgita, senpolva civila vesto. Lia ĉambro havas tri fenestrojn al parko, kiu deklivas malsupren ĝis la rivero Odro. Surmure troviĝas mapoj pri la urbo kaj vojevodio de Szczecin.

Svedberg kun ioma embaraso prezentas sian kazon, kaj lia pola kolego rakontas kio okazis en iu arbareto ĉe la urbo Kamień Pomorski norde de Szczecin. Li ekstaras por montri al mapo.

”Aha. Tio estas sufiĉe proksime de la pramo el Svedio”, konstatas Svedberg.

”Prave. Sed ne eblis certigi ĉu iu el ili venis de tie. Oni trovis la viktimojn en aŭto germane registrita, kaj la pramkompanio ŝajne ne havas bonan ordon pri siaj listoj: ili ne povis diri ĉu tiu aŭto iris per la pramo. Sed ni scias ke almenaŭ Nowak ofte restadis en Svedio, kaj ni suspektas ian rilaton al Svedio ankaŭ de la akuzito, Szczepański. Sed li ne parolemas.”

”Kiel li mortigis lin?”

”Per pistola pafo de proksime en la kapon. Nowak sidis ĉe la stirilo, sed la aŭto ŝajne staris senmova.”

”Hm. Germana aŭto. Ĉu oni trovis ion interesan en la aŭto?”

”Malmulte. Sangon kompreneble, kaj la kuglon. Neniun pistolon. Cetere estis nur ĉiutagaj aferoj, vestaĵoj, laboriloj. Nenio kio prilumas la aferon.”

”Kion pri la motivo?”

”Por diri la veron, ni ne scias precize. Kredeble temas pri ia interna *ekzekuto*, por tiel diri, en la krimaj rondoj. Eble pri narkotaĵoj. Aŭ japana elektroniko. Certe pri mono. Tre supozeble je la ordono de iu en la fono, kiu mem ne malpurigas la manojn.”

”La mafio?”

Matkowski lace ridetas.

”Ne ekzistas *la* mafio, sed multaj grupoj, kelkaj gravaj, aliaj bagatelaj, kelkaj kun rilatoj al aliaj landoj, kelkaj protektataj de gravuloj – kaj protektantaj gravulojn.”

Post paŭzo, li aldonas:

”Kompreneble, la eventuala rilato al *via* murdo prezentas novan perspektivon. Se Nowak efektive kulpis pri tiu, ni povas imagi du kazojn. Aŭ temas pri venĝo, puno pro tiu ago. Aŭ ambaŭ havas ian fonan klarigon, kaj *nia* murdo celas kaŝi ion pri la via. Oni ne fidis je Nowak, do oni forigis lin. Sed ĉio ĉi ŝajnas tre libera spekulativo, ĝis ni trovos pruvitajn rilatojn inter Szczepański, Nowak kaj via murdito... kies nomon mi...”

”Jespersen.”

”Tiel, jes. Dano, ĉu vi diris?”

”Jes, dano.”

”Nu, oni multe oratoras pri Baltmara kunlaboro, ĉu ne? Ŝajnas ke en iuj rondoj ĝi estas jam realaĵo.”

”Jes, jes. Kunlaboro – aŭ milito.”

Denove estas paŭzo. La du policistoj cerbumas, kaj la interpretistino ricevas momenton da ripozo. Svedberg iom malkomforte tenas la glason, trinketas teon kaj sopiras je sia taso da kafo. Poste li kaptas alian fadenon:

”Tiu aŭto, germane registrita, vi diris. Ĉu vi konas la posedanton?”

”Jes ja, ĉu mi ne diris? Denove Baltmara kunlaboro. Germane registrita, en Hamburgo, la posedanto estas germano, sed ĝi estas anoncita kiel ŝtelita en Svedio.”

”Aha. Ŝtelita, tio estas komprenebla. Ĉu vi scias *kie* en Svedio?”

”Jes, momenton, mi petas...” Ĉefkomisaro Matkowski serĉas en siaj dokumentoj, murmuris ion pole kion sinjorino Håkansson elektas prisilenti, kaj fine trovas: ”Jen! La registra numero estas HH-GB 456, la precizan lokon de ŝtelo oni ne mencias, sed la anonco estas farita de la polico en... loko nomata... Karlskrona.”

8. Ŝafo, ĉu ne?

”Do, vi ne rekonas la virojn de la fotoj, vi neniam aŭdis la nomojn. Janek Nowak estas por vi nekonata. Same Włodek Szczepański.”

”Vi ĝuste komprenis.”

Roger Svedberg sidas kun Mette Søbjerger sur ligna seĝo en la eta verando antaŭ ŝia domo. La varma vetero revenis, sed ne la suno. Oni atendas fulmotondron, la aero sentiĝas peza. Li rigardas preter ŝi inter la betularon, kiu jam akiris sian saturitan, intense verdan koloron de malfrua somero. La frondaroj ne moviĝas, neniuj vento freŝigas la aeron. Eĉ la tremoloj ne tremas. Li rigardas la virinon trans la blanka tableto el lignolatoj. Ŝi aĝas iom pli ol tridek jarojn, kaj la vizaĝo jam portas reton da fajnaj sulketoj. Ŝi havas malhele blondan hararon, rektan, preskaŭ ĝis la ŝultroj, grizajn aŭ blu-grizajn okulojn, grandan buŝon. Ŝi fumas cigaredon. Ŝi portas kotonan robon kvadratan, bluan kaj violan, ĝis sub la genuoj, kaj ŝi estas nudpieda.

”Aŭskultu. Ni scias ke Janek Nowak konis vian amikon Jespersen. Mallonge antaŭ la murdo li renkontis Nowak-on kaj vin. Jespersen estas murdita, brutale, Nowak estas murdita, brutale. Oni suspektas Szczepański-n pri la murdoj. Eble li estos kondamnita, almenaŭ pri la dua, eble ne. Dependas de kiom da informoj ni povas akiri pri la rilatoj, motivoj kaj tiel plu.”

”Mi nenion scias pri ili.”

”Ĉu vi timas?”

Mette Søbjerger forfrapas cindron de la cigaredo.

”Kion?”

”Ĉion! Mi pensas ke vi timas venĝon, se vi ion diros. Sed vi eble devus timi pli severan venĝon, se vi nenion diros.”

”Venĝon? De kiu?”

”Nowak estis pli-malpli ekzekutita. Pafilo kontraŭ lia nuko kaj – paf. La tribunaloj ne ekzekutas, eĉ ne pro murdo.”

Ŝi stumpigas la cigaredon kaj rigardas al Svedberg, ŝajne kun intereso.

”Vi estas *Ŝafo*, ĉu ne?”

La policisto konsterniĝas. Lia provo minaci ŝajne fluis de ŝi kiel akvo.

”Ŝafo? Pri kio vi nun parolas?”

”Vi impresas al mi kiel tipa *Ŝafo*. Naskita en la signo de la Ŝafo. Ĉu mi pravas?”

”Mi ne scias. Kaj vi? Ĉu en *Virgo*?”

Ne eblas ne kapti la aludon, sed ŝi ne palpebrumas.

”Mi estas *Ĝemelo*.”

Proksime, ĉe la lagobordo, iu provas startigi motorboaton. Je la tria tiro ĝi startas kaj akre ekzumas kiel giganta vespo.

”Ĉu via boato?”

”Jes.”

”Kies motoro estas difektita jam de jaro?”

”Tiu germana knabo, Holger, trovis la difekton. Estis ia bagatelo. Li kaj Katrine rajtas veturi per ĝi.”

”Ĉu vi havas ideon kial Brian Jespersen estis murdita?”

Esceptokaze Mette ne respondas tuj, senmedite. Ŝi paŭzas, faltas la frunton kaj pensas. Poste ŝi reprenas sian normalan mienon dirante:

”Mi ne tre miras, ke iu mortigis lin. Tio povus okazi jam antaŭ longe.”

”Kial?”

”Li mem minacis homojn. Ne perforte, sed... Li ekzemple memorigis homojn pri iuj stultaĵoj, kiujn ili faris, aŭ li inventis mensogojn. Bone do, tiujn blagojn li minacis rakonti. Foje al la polico, sed ofte al iu alia, kiu ŝatus scii tion.”

”Tio signifas, ke li ĉantaĝis ilin?”

”Eblas diri tiel.”

”Pri kio li ĉantaĝis vin?”

”Mi jam diris. Li volis ke mi veturu kun kelkaj varoj.”

”Bone, bone, sed *pri kio* li ĉantaĝis vin? Kiun sekreton li minacis malkaŝi?”

”Estis idiotaĵo. Mensogo. Nenio serioza.”

”Kaj la enhavo de tiu mensogo estis?”

Mette ekbruligas novan cigaredon, ensuĉas kelkfoje, kaj diras:

”Mia amikino, Pernilla. Ŝi... ŝi mortis, ĉu ne. Ŝi ne eltenis vivi, kaj sinmortigis. Li fantaziis, ke mi tion faris al ŝi.”

”Ke vi mortigis ŝin?”

”Tion li asertis. Li scias entute nenion pri la afero, sed lia cerbo ŝatas forvagi.”

”Al kiu li malkaŝus tiun fantazion?”

”Mi ne scias. Al la polico, eble. Aŭ...”

”Aŭ?”

”Mi ne scias.”

”Eble al ŝia patro?”

”Ankaŭ tio eblas.”

”Do, kio okazus, se li rakontus tion al sinjoro Karlsson?”

”Sendube nenio. Li certe ne kredus lin.”

”Ĉu ili estis konatoj?”

”Ne laŭ mia scio. Certe ne.”

”Kial do li ne kredus al Jespersen?”

”Kial li kredus?”

”Se Åke Karlsson konis kaj helpis *vin*, eble li konis ankaŭ Jespersen?”
”Mi pensas ke ne. Demandu lin.”



La somerdomo de familio Schulze estas eksa bieneto tipe sveda. Malhele ruĝaj muroj el lignaj tabuloj, blankaj anguloj kaj fenestrokadroj, tegola tegmento. Antaŭ la domo etendiĝas gazono, borderita de ribarbustoj. Eĉ flagstango troviĝas, kvankam iom kadukaspekta, supozeble uzata malofte aŭ neniam.

Svedberg petas permeson fari ankoraŭ kelkajn demandojn al sinjoro Schulze:

”Ĉu via alveno ĉi tien estis atendata?”

”Atendata? De kiu?”

”Mi ne scias. De iu. La najbaroj...”

”Apenaŭ troviĝas najbaroj. Mi pensas ke neniu precize atendis nin. Ja ni venas ĉiujare, sed ĉi-foje iom pli frue ol kutime.”

”Kial pli frue?”

”Mi plilongigis mian libertempon.”

”La domo devas esti dezerta dum preskaŭ tuta jaro. Ĉu iu prizorgas ĝin dume? Kaj la ĝardenon?”

”Ni dungis viron por somere tondi la gazanon kaj dum la tuta jaro kelkfoje esplori, ĉu la domo estas en ordo. Nur ekstere, tamen. Ni aranĝis tion post enrompo antaŭ du jaroj. Cetere, la polico neniam trovis la enrompinton.”

”Mi bedaŭras. Do, tiu viro devus scii, kiam vi alvenos.”

”Ne la precizan daton, sed li ja scias ke ni venos en julio.”

”Kiu li estas?”

”Lia nomo estas Lasse Lund. Mi povas doni al vi lian adreson, se vi atendos iomete.”

Svedberg pripensas la aferon. La murdo evidente okazis tuj antaŭ la alveno de la germanoj. Ankaŭ la nekropsio tion konfirmis. La murdloko estas iom izolita, senhoma, sed nur se la familio ankoraŭ ne alvenis. Li ekesploras alian pensfadenon:

”Ĉu vi aŭtis rekte el Germanio en tiu sabato?”

”Ne. Nur de Elsinoro en Danio, kien ni alvenis vendrede vespere.”

”Kie vi tranoktis?”

”En Elsinoro. En gastejo. Kial?” Dieter Schulze ne atendis, ke ilia vojo de la hejmo al la somerdomo fariĝos parto de sveda murdenketo.

”Mi nur kolektas informojn por havi ĝeneralan imagon”, Svedberg klarigas iom neklarige.

Li ricevas la adresojn de la sveda domprizorganto kaj de la dana turista gastejo. Poste jen tria temo:

”Via aŭto ja estas retrovita en Pollando, kiel vi sendube scias.”

”Jes, oni informis. Sed tiuj... tiuj poloj ne redonas ĝin. Pro alia murdenketo, laŭdire.” La tono de Schulze donas impreson de nekredemo. Eble li imagas, ke la pola polico uzurpis lian Mercedon por propra uzo.

”Kie precize ĝi estis ŝtelita?”

”En Karlskrona. En strateto proksime al la kajo, de kiu iras ŝipeto al la insuloj. Mi ne scias la stratnomon.”

”Ĉu vi devis pagi parkkotizon?” La demandado okazas angle, kaj Svedberg devas subpremi sian malinklinon paroli en lingvo, kiun li ne majstras. La termino parkkotizo – *parking fee* – kiun li ĵus inventis, ŝajnas al li tute bona, sed li suspektas ke *‘oni ne diras tiel ĉar oni ne diras tiel’*.

”Ne, estis senkosta parkado.”

”Hmm. Domaĝe.”

Schulze sendas al Svedberg tre konsternitan rigardon sed ĉi-foje ricevas eĉ ne malklaran klarigon. Post iom embarasa paŭzo li daŭrigas:

”Ĉu en la aŭto troviĝis io ŝtelinda?”

”Kredeble ne. Kelkaj vestaĵoj. La laboriloj de la aŭto. Unu bierdoso.”

Svedberg memoras la priskribon ricevitajn en Szczecin pri la enhavo de la aŭto, en kiu Janek Nowak estis fridsange ekzekutita. ”Vestaĵoj, laboriloj”, diris ĉefkomisaro Matkowski. Ŝajne nur la bierdoso malaperis ie inter Karlskrona kaj Kamień Pomorski.

”Do, sufiĉas por hodiaŭ. Ĝis revido, sinjoro Schulze!”



Lasse Lund loĝas en plurfamilia domo en Emmaboda. Kiam Svedberg sonorigas, daŭras iom da tempo, sed fine la pordo estas malfermita de malalta, ruĝvizaĝa viro en nedifinita aĝo inter 50 kaj 65. Li ŝajnas iel konata.

”Svedberg, polico.” Lia identiga karto rutine dancas antaŭ la okuloj de la viro. ”Ĉu vi estas Lasse Lund?”

La viro kapjesas kaj elsnufas ian ”Mhmm.”

Ili eniras la etan apartamenton, kiu estas plenplena je brikabrakaj objektoj: antikvaj lignaĵoj, ĉipaj memoraĵoj el porcelano aŭ plasto, bildkartoj, kusenetoj, murtapiŝoj kun broditaj proverboj, florpotoj, strangaj ŝtonoj, lampetoj, tri aŭ kvar remburitaj birdoj kaj unu sciuro, tre malgrandaj tabloj kun eĉ pli minimumaj tukoj – ĉio en ĥaosa miksaĵo.

”Laŭ niaj informoj”, ekformalas Svedberg, ”vi estas dungita de gesinjoroj Schulze el Germanio por prizorgi ilian somerdomon ĉe Törn. Ĉu prave?”

”La germanoj? Jes ja, tio estas la vero. Tio estas la vero.”

Nun Svedberg subite scias, kial Lasse Lund donis impreson de konateco. Li estas la strangulo, al kiu Svedberg kaj Jankéus iam demandis pri la vojo al Mette Søbjerger. La espero akiri uzeblajn informojn tuj velkas.

”Kiam vi lastfoje vizitis ilian domon?”

”Lastfoje? Antaŭlonge, antaŭlonge!”

”Tio estas pli precize...?”

”Hmm. Estas vere multe por fari tie, sed ne nun. Ne nun.”

”Kiel ofte vi iras tien, kiam la familio ne ĉeestas?”

”Kiel ofte? Sufiĉe ofte! Jes, ja, tiel estas, sufiĉe ofte.”

”En kiu tago vi atendis ilin ĉi-somere?”

”Kiu tago? Hmm. Somere ili estas tie, jes vere. Por ripoz. Libertempon ili havas. Mi ne! Ne, ne, neniun libertempon! Sed ili havas. La germanoj, jes, tiuj germanoj vere ripozas.”

Tiel la demandado pluiras ankoraŭ kelkan tempon. Svedberg havas paciencon. Li jam spertis multajn manierojn eviti vere respondi liajn demandojn. Kutime tamen troviĝas ia vojo por trapasi aŭ ĉirkaŭiri la malhelpemon. Sed la ruza stulteco aŭ stulta ruzeco de Lasse Lund ŝajnas preskaŭ likimuna.

”Kiam vi iras por rigardi la domon, esplori ĉu ĝi estas en ordo, kion vi rigardas precize?”

”Necesas ĉion vidi, ĉion, certe.”

”Ĉu vi eniras la domon?”

”Necesas zorgi, ke neniuj povas eniri. La domo devas esti ŝlosita. Protektita kontraŭ ŝtelistoj kaj ĉiaj diabloj.”

”Ĉu vi rigardas ankaŭ la remizon?”

”Necesas ĉion zorgi.”

”Do vi konas ĉiujn ejojn?”

”Certe mi konas, certe. Ĉion!”

”Ĉu vi vidis ankaŭ la falĉilon?”

”Falĉilon mi ne uzas tie, ne, tute ne, nur gazontondilon.”

”Sed ĉu vi iam provis la falĉilon de sinjoro Schulze?”

”Nur la gazontondilon, jes ja, por la herboj!”

Svedberg dubas, ĉu entute eblas certiĝi, kion tiu ĉi ulo vidis aŭ ne vidis, scias aŭ ne scias, faris aŭ ne faris. La kapo de Lasse ŝajnas simili lian apartamenton, kaj post iom da pripensado Svedberg forlasas tiun.

9. Sur la ĝustan vojon

Estas griza tago. La ĉielo minace malaltas. Ĉi-foje Svedberg pluiras al la granda ladfasada konstruaĵo, kiam Åke Karlsson ne estas hejme en sia vilao. Li ne intencas denove demandi ĉu Karlsson tamen konis la murditon, sed volas ekscii iom pli pri la filino, Pernilla, kaj pri Mette.

Li trovas pordon, provas ĝin kaj senprobleme envenas. Interne regas akra, malagrablaodoro. La konstruaĵo estas plena je fakoj disigitaj per dratreto, kaj en la kaĝoj troviĝas dekoj, centoj da vulpoj, de diversaj grandecoj ek de idoj ĝis plenkreskaj. La blekoj de la bestoj sonas senĉese kaj impresas deprime. Li ankaŭ tuj vidas la vulpobrediston kaj bienulon Åke Karlsson, kiu per elektra ĉarelo porciumas furaĝon en la diversajn fakojn. Svedberg dum kelka tempo rigardas lin ĝis Karlsson ekvidas la vizitanton, alveturas, kaj signas ke ili iru eksterdomen.

”Se vi permesus al mi ankoraŭ dek minutojn, mi povus fini la furaĝadon por ĉi-foje”, diras Karlsson, kaj je la kapjesado de Svedberg reiras en la konstruaĵon. Baldaŭ li revenas kaj deklaras, ke li estas je dispono de la polico. Ili stariĝas ĉe muro de la vulpejo, por esti pretaj endomiĝi se la pezaj nuboj komencus priverŝi ilin per pluvo.

”Sinjoro Karlsson, vi jam deklaris ke vi neniam vidis la murditon, Brian Jespersen. Nu, li estis kopenhagano, kaj... Ĉu vi povas imagi ke via filino lin konis?”

”Estas neeble por mi diveni tion. Tute neeble.”

”Li havis proksiman rilaton al Mette Søbjerger, kaj ŝi estis amikino de via Pernilla, ĉu ne?”

”Jes, jes, Mette multe helpis al Pernilla, do eble ŝi konis tiun viron. Sed ĉu gravas? Pernilla ne plu estas inter ni, de kvin jaroj.”

”Jes. Mi bedaŭras ke mi devas memori al vi tiajn tragikajn aferojn. Mette helpis al Pernilla, vi diris. Pri kio?”

”Nu, pri ĉio, mi pensas. Manĝo, loĝejo... ŝi subtenis ŝin, kiel fratino. Pernilla estis tre juna, fakte nur infano.”

”Ĉu ankaŭ pri narkotaĵoj ŝi helpis?”

”Ili ambaŭ estis sklavoj de tiu malbeno. Se ŝi kulpis pri io, ŝi kulpis al si mem, ne al iu alia.”

Svedberg dum momento primeditas la respondon de Karlsson. Li havas nekularan impreson, ke la patro ne montras tre profundajn sentojn rilate al sia filino, kiu tiel tragike vivis kaj mortis. Sed eble la iom bombastaj frazoj estas rimedo eviti siajn vundojn?

”Ĉu vi scias, ĉu Mette havis iun... protektanton?”

”Prostituiston? Mi ne scias, sed mi dubas. Ĝi estas persono sufiĉe memstara. Sed vi devas demandi ŝin, ne min. Ĉiuokaze, ĉu gravas hodiaŭ? Tio estas pasinteco.”

”Kaj Pernilla?”

”Kio pri Pernilla? Ĝi estas for, vi jam scias.”

”Ĉu ŝi havis prostituiston?”

”Ne laŭ mia scio. Sed drogaĉo estas la plej kruela prostituisto, kiu neniam kontentiĝas.”

”Kiel okazis, ke ŝi iris al Kopenhago?”

Åke Karlsson glatigas al si la harojn kaj faras malĝojan mienon.

”Mi evidente ne povis sola doni al ŝi la bonan infanaĝon kaj junaĝon kiun ŝi bezonis, kvankam mi klopodis laŭ mia tuta kapablo. Kiam ŝi havis dek kvin jarojn ŝi renkontis knabojn kiuj mistraktis ŝin, logis ŝin al la drogaĉoj kaj tenis ŝin suben, en la marĉon. Post unu jaro ŝi forkuris, kaj tiam komenciĝis mia laboro por rekonduki ŝin. Mi malsukcesis pri ŝi, sed mi volas kompanse helpi al ĉiuj, kiujn mi povas helpi.”

”Pardonu min, sed ĉu vi povas rakonti kiel ŝi mortis?”

”Superdozo, kompreneble. Ŝi injektis troan dozon da heroino.”

”Ĉu senintence?”

”Kiu scias? Eble ŝi eĉ mem ne sciis.”

Falas kelkaj pezaj gutoj deĉiele, sed Svedberg preferas tiujn ol la akran fetoron en la vulpejo. Li ŝatus demandi pri la patrino de Pernilla, sed li jam tro malproksimiĝis de la murdenketo pri Brian Jespersen.

”Se mi ĝuste komprenis vin, Mette Søbjerger ne estas la sola, al kiu vi helpis komenci novan vivon?”

”Certe ne. Temas pri multaj, foje sukcese, foje ne. Ĉu vi konas la esprimon pri pardono? Mia moto estas ne nur pardoni sed helpi ĝis sepdekoble sep fojoj.”

”Bone, sed *kiel* vi tion faras?”

”Mi havas kontaktreton de gepatroj, kies infanoj fiksiĝis en la koto. Mi elserĉas la idojn, provas ĵeti al ili ŝnuron por eltreni ilin.”

”Al kio?”

”Al pureco, al homa digno.”

”Ĉu vi povas doni al ili ion anstataŭ la drogaĉoj? Ĉu laboron, loĝejon?”

”Kelkfoje jes. Aliffoje mi rekondukas ilin al la gepatroj.”

”Ĉu ĉi tie vi laborigas iujn?”

”Jes, en miaj entreprenoj foje mi povas helpi al kelkaj homoj trovi la valoron de honesto kaj diligenteco.”

”Ĉu iuj nun laboras ĉi tie?”

”Nur unu knabo, kiu pliparte laboras pri naturflegado, kaj foje anstataŭas min en la vulpejo, kiam mi devas prizorgi aliajn aferojn.”

”Naturflegado? Kio estas tio?”

”Nu, mi posedas iom da tero ĉirkaŭ la lago kaj pli okcidente, trans la vilaĝo. Grandparte estas ĉebordaj herbejoj aŭ eksaj paŝtejoj, kiuj nuntempe nur kuŝas sen vera uzo. Iam oni paŝtis siajn brutojn tie, aŭ falĉis fojnon. Nun la tereno iom post iom transformiĝas en vepron el betuloj, tremoloj ktp. Por konservi la belan pejzaĝon kaj la ekologian ekvilibron, necesas flegi la naturon. Foje la gubernia muzeo pagas subvencion por tiaj taskoj, sed cetere mi mem pagas. Mi pensas ke mi ŝuldas tion al la antaŭaj generacioj, kiuj kreis tiun ĉi pejzaĝon per siaj nudaj manoj. Mi prenis sur min rekonduki la naturon sur la ĝustan vojon. Pri tio laboras tiu knabo, kaj ĝi estas vere bona tasko por homido kiu mem devas trovi la ĝustan vojon.”

”Kiu li estas?”

”Knabo dek-naŭjara el Stokholmo, kiu estis survoje al la fundo, sed nun jam reakiris aspirojn vivi.”

”Kie vi trovis lin?”

”Lia patrino suspektis, ke li vivas inter kelkaj homaj vrakoj kiujn mi konis de antaŭe. Mi traserĉis kelkajn lokojn, kaj fine mi akiris informon pri li. En iu malpura domaĉo li ŝvebis en sia propra nebula mondo. Mi pli-malpli portis lin de tie. Sian patrinon li ne volis vidi. Pro honto, kredeble. Do mi veturigis lin ĉi tien. Korpa laboro kaj spirita paco faras miraklojn al taŭzita animo.”

Åke Karlsson sendube povus longe daŭrigi, sed Svedberg iom enuas pro la edifa tono, kaj provas revenigi la interparolon al pli fekunda direkto.

”Ĉu iu persono, en Kopenhago aŭ aliloke, povus helpi nin ekscii pli multe pri la rondoj, kie via filino pasigis sian lastan tempon?”

La fortika bienulo mallonge pripensas, sulkas la frunton kaj diras:

”Eble, sed mi ne konas tiujn homojn.”

”Vi ja konas Mette Søbjerger, ĉu ne?”

”Certe, sed vi jam parolis kun ŝi. Mi supozis ke vi volas iun alian. Vi komprenu, la homoj kiuj rampas en la ŝlimo ne tre emas rakonti pri siaj aferoj.”

Roger Svedberg sentas, ke laceco invadas lin fronte al tiu ĉi parolmaniero. La tuta murdenketo ŝajnas rampi en ŝlimo, aŭ eble en gudro. Tamen li provas ankoraŭfoje:

”Tamen vi ĵus rakontis, ke vi konas multajn homojn en tiu medio. ‘Homajn vrakojn’ vi diris, se mi ne eraras. Tio ja estas natura afero, pro via lukto kontraŭ krimo kaj narkotaĵoj, ĉu ne? Do, se vi nur pripensas dum momento... Kiam vi serĉis vian filinon en Kopenhago, kaj renkontis ŝian amikinin, Mette, vi sendube renkontis ankaŭ multajn aliajn homojn. Aliajn knabinojn, virojn, kiuj eble konis Jespersen.”

”Certe, certe, sed ĝenerale ili ne prezentas sin per nomo kaj adreso. Do, mi neniun povas nomi tuj, sed eble se vi donos al mi iom da tempo.

Bonvolu lasi vian telefonnumeron, kaj se mi ion rememoros, kiu povus helpi vin, mi promesas kontakti vin.”



Veturante de la bieno Bråten Roger Svedberg sentas, ke estas tempo lasi la kazon *Murdito ĉe Törn* por kelka tempo. Plenumi krimenketon kelkfoje similas eduki infanon. Se oni trudas kaj klopodas tro intense, tiam ĝi baraktas kontraŭe kaj ne emas kunlabori, sed se oni dum kelka tempo lasas ĝin, fajfas pri ĝi, tiam foje io povas okazi per si mem. Li decidas lasi la kazon en relativa paco, por ke ĝi maturiĝu kiel bona vino. Aŭ kiel bona virino! Svedberg ekpensas pri sia edzino, kiu ĵus festis sian kvardek-kvinan jaron, kaj li pleniĝas de varmo kaj deziro. Li decidas ankaŭ doni al si kelkajn tagojn da libertempo. Eble iu mallonga geedza ekskurso, plilongigita semajnfino? Kie pasigi tian? Kiel fari por blovi al la ardoj? Li profundiĝas en plaĉajn privatajn konsiderojn.

Alvenante al la granda ŝoseo li devas kelkajn minutojn atendi konatan vireton kun ŝarĝmopedo, kiu tro malvaste ĝiris en la vojkruciĝo, tiel ke lia veturilo renversiĝis. Sed Svedberg jam sentas sin malpezigita de siaj decidoj, kaj nur kapsignas bonvole al Lasse Lund, kiam tiu finfine sukcesas restarigi sian mopedon sur la tri radojn. La aŭto de Svedberg jam estas longe for, kiam Lasse remetas sur la ŝarĝoplankon siajn perditajn laborilojn – rastilon, branĉtondilon kaj falĉilon – kaj ekveturas sur la vojo al Långasjö.



Finiĝis julio – komenciĝis aŭgusto. En la policejo de Kalmar normala rutino baldaŭ anstataŭas la juliajn improvizojn. Tom Jankéus revenas de sia montara ekskurso en *Jotunheimen*, plena je energio, kaj paŭzas malkontente aŭdante ke ne plu indas rompi la kapon pri la Baltmara kunlaboro ĉe Törn. Sed troviĝas jam stako da aliaj kazoj kiuj postulas solvon – aŭ ĉiukaze traktadon. ”Manko de tempo ne mankas”, li kiel kutime vortludas.

Ankaŭ la libertempo de la familio Schulze proksimiĝas al sia fino. La infanoj, kiuj antaŭ kvin semajnoj ne volis forlasi sian hejmon kaj la amikojn en Neu Wulmstorf, nun ne volas forlasi sian somerdomon kaj la amikojn ĉe Törn. Franziska kaŝas trezoron en sekreta loko, kaj klopodas klarigi al siaj amikoj Henrik kaj Ditte, ke ili ne rajtas elfosi ĝin ĝis venontsomere, kiam ŝi revenos. Holger faras sian lastan boatekskurson de la someraj ferioj kun Katrine, kaj ili faras reciprokajn promesojn por la venonta jaro. La geedzoj enpakas ĉion en la luitan Toyota’n, kaj laste, antaŭ ol ekiri hejmen, Dieter Schulze cerbume rigardas vakan najlon sur la muro de sia remizo. Nenio plu pendas tie. Lia falĉilo daŭre troviĝas ĉe la polico, kiel parto de la teknika

esploro. Nenio plu aŭdiĝis pri la murdo. Ĉu ĝi estos solvita, kiam ili revenos tien ĉi post dek unu monatoj? Sinjoro Schulze dubas.

10. Mankas disciplino

Krevis bombo en la policejo de Kalmar – bombo administracia. Publikiĝis ŝtata propono redukti la nombron de policaj distriktoj en Svedio al proksimume duono. La distrikto de Kalmar fariĝus parto de la policedistrikto de Växjö – la ĉefa rivala urbo. La policistoj de Kalmar protestas. La politikistoj de Kalmar protestas. La loka gazetaro protestas – ambaŭ ĵurnaloj esceptokaze konkordas. Oni preskaŭ havas la impreson, ke eĉ la loka krima mondo protestas. Tio tamen kredeble ne estas vera, ĉar la propono ŝajne paralizas ĉian normalan polican laboron dum semajno.

Svedberg libertempe amindumas kun la virino, kiu de dek ok jaroj estas lia edzino. Jankéus, kiu kun miro konstatis, ke oni jam ”glaciigis” la murdenketon pri Brian Jespersen, pasigas ŝtelitajn liberajn momentojn relegante ĉiujn atestojn kaj raportojn pri la kazo. Kiam Svedberg revenas al sia oficejo, Jankéus tuj atakas lin.

”Svedberg, aŭskultu: Tralegis mi la atestojn de ĉirkaŭaj loĝantoj ĉe Törn. Kio surprizas min estas tio, ke mi nenion trovis pri tiu knabo, tiu narkotulo kiun Karlsson savas el la marĉo, laŭ via lasta raporto.”

”Kara policlespektoro Jankéus. Ĉu viaj oreloj estas ŝtopitaj? La kazo estas ripozanta.”

”Jes. Ankaŭ vi, mi aŭdis. Kiel nomiĝas tiu bubo?”

”Ej, mi ne memoras. Demandu la vulpiston. Ne, ne faru, la kazo estas ripozanta, mi ripetas.”

”Bone, mi telefonos.”

”Ĉu vi scias, kio plej mankas en nia patrio?”

”Ĉu policistoj?”

”Ankaŭ tio, sed plej pleje – disciplino!”

”Bone. Vi certe pravas, ĉefo. Do, mi baldaŭ raportos al vi ĉu mi trovis tiun etan anĝelon.”

Svedberg suspiras. Jankéus malaperas, kaj envenas Inger, la sekretariino, kun dika koverto adresita al Svedberg.

”Jen kio alvenis el Pollando dum vi feris.”

”Ĉu vi konservis ĝin por mi? Ĉu vere neniu alia scias legi en tiu ĉi simiejo?”

”Ni malfermis kaj registris ĝin, kompreneble, sed ĝi estas en la pola.”

”En la pola? Do vi pensas ke mi scias la polan?”

”Mi ne scias, sed vi ja vizitis Pollandon...”

”Prave. Dum du tagoj. Bone, mi estas tre komplezita, ĉar vi tiel fidas mian lingvokapablon. *Homo! Menŝo! Ĉeloveko!* Sendu ĝin al tradukisto, je ĉiuj... Ne, atendu tamen. Mi mem prizorgos. Mi prenos ĝin. Dankon.”

Li prenas la dokumenton, malfermas kaj flugserĉas en ĝi kaj rapide trovas nomon konatan. Włodek Szczepański. Svedberg denove suspiras kaj ripetas al neniu "la kazo estas ripozanta." Poste li elserĉas la laborejan telefonnumeron de sia konato, Małgorzata Håkansson.



"Parolas Åke Karlsson."

"Bonan vesperon! Jen Jankéus, Kalmar'a polico. Mi bedaŭras ĝeni vin, sed ĉu vi bonvolus diri la nomon kaj adreson de tiu junulo el Stokholmo, kiu laboras ĉe vi? Vi menciis lin al Svedberg, sed li ne notis la nomon."

"Lia nomo estas Jimmy Robertsson. Ĉu okazis io?"

"Ne, nenio. Kie mi povas trovi lin? Ĉu telefone?"

"Mi povas lasi mesaĝon al li."

"Dankon, sed estus pli bone paroli kun li rekte. Kie li loĝas?"

"Mi havas kelkajn ĉambrojn en domo ne malproksime de ĉi tie. Li uzas unu el tiuj, sed telefono ne estas tie. Do, mi petos lin voki vin de ĉi tie, se tio plaĉas al vi. Sed momente mi ne povas certigi, ĉu li troviĝas endome."

"Bone, tio estas en ordo. Poste mi interkonsentos kun li kie ni renkontiĝos."



"Halo'! Parolas Goša Håkansson."

"Saluton! Jen Svedberg. Ĉu vi havis tempon tralegi la tuton?"

"Mi tralegis, sed estas granda amaso da detaloj sufiĉe deprimaj. Estas malfacile memori ĉion. Mi konsilus al vi tamen tradukigi ĝin. Mi povus fari tion, sed tio kostus iomete, ĉar mi bezonus kelkajn horojn..."

"Bone, bone. Mi taskos al vi. Sed diru unue, ĉu vi vidis ion kio povus interesi nin. Eblan ligon kun la kazo de Jespersen?"

Roger Svedberg sen granda entuziasmo telefone intervjuas sinjorinon Håkansson, al kiu li sendis la polan dosieron por tralego.

"Nu, eble, mi ne scias. Kiam ni estis en Szczecin, oni diris ke troviĝas supozo pri ia sveda ligo de Szczepański. Nun oni evidente trovis tian, sed mi ne scias ĉu ĝi gravas. Li antaŭ kelkaj jaroj estis dungita de iu sveda komerca entrepreno."

Svedberg suspiras.

"Pri kio li do laboris? Ĉu en Svedio?"

"Nu, ŝajnas ke li ŝoforis inter Svedio kaj Pollando. Transportis varojn per kamiono."

Svedberg ne povas eviti penson al Mette Søbberg, kiun Jespersen petis transporti "varojn", kredeble de Pollando al Svedio. Sed li bone scias, ke plejparte transportiĝas leĝaj varoj.

"Kiajn varojn?" li tamen demandas.

"Meblojn. Lignajn meblojn fabrikatajn en Pollando por vendado en Svedio."

Svedberg silente kuntiras la brovojn. Li memoras ion, kion Jankéus iam diris. 'Bone, ke moviĝas ili ĉiuj sur tiel eta areo.' Ŝajnas, kvazaŭ tiu ĉi kazo iel rondiras en la samaj radsulkoj, kiel glitanta aŭtorado, kaj nenien alvenas.

"Ĉu estas notita la nomo de tiu entrepreno?"

"Mi pensas, sed mi ne memoras. Atendu momenton, mi elserĉos!"

Svedberg atendente cerbumas. 'La kazo estas ripozanta', li diris. Sed evidente oni ne lasas ĝin ripozi en paco. Li rememoras la scenon ĉe Törn, kie nekonata viro kuŝis silenta en flako de sia sango. Ĉu eblas diri ke li ripozas en paco? Ĉu li ripozus en paco, se oni finfine trovus la murdinton? La voĉo de Maĝorzata Håkansson denove aŭdiĝas en la aŭskultilo:

"Jen mi trovis. Meblokomerca firmao 'Dacke-möbler'. Jura domicilio estas en Emmaboda, Svedio."

"Dacke-möbler!" Svedberg rikanetas. Li ne dubas, ke temas pri lia konato, la bienulo, vulpisto, meblokomercisto kaj filantropo Åke Karlsson en Långasjö. 'Dacke-mebloj' – tio vere konvenas. Nils Dacke estis regiona ribelanto en la dek-sesa jarcento, kiu defiis la reĝon Gustavo Vasa. Se Svedberg ĝuste memoras la historiajn lecionojn de sia lerneja tempo, unu el la kaŭzoj de lia ribelo estis, ke la reĝo malpermesis liberan komercadon trans la tiaman landlimon. Tiuepoke la limo inter Svedio kaj Danio trairis la arbaron ne malproksime de Långasjö, nur kelkajn kilometrojn sude de la lago Törn.

"Bonvolu unue traduki la parton kie troviĝas tiuj informoj, kaj tuj faksu al mi. Poste la ceteron. Ni pagos. Kaj... via helpo tre gravas! Ĝis!"

Roger Svedberg sentas, ke lia libertempo jam definitive finiĝis. Nek la kazo nek li mem plu ripozas.



Denove la du kolegoj alvenas ĉe Bråten, la bieno de Åke Karlsson. Neniu respondas, kiam ili sonorigas, kaj ili devas iri al la vulpejo por trovi la mastron. Post kelkaj minutoj, ili staras kune ekster la grizverda lada fasado. Unue Jankéus prezentas sian demandon:

"Mi parolis kun vi pri Jimmy, la knabo. Sed li ne kontaktis min. Ĉu vi transdonis la mesaĝon?"

”Certe. Mi diris al li. Sed li eble ne tre emas paroli kun la polico. Vi devas kompreni tion.”

”Ĉu vi bonvolus montri kie li loĝas?”

”Mi montros. Sed hodiaŭ li kredeble ne estas hejme. Mi pensas ke li forveturis.”

”Ĉu forveturis? Kien?”

”Mi ne scias. Li ne diris.”

”Ĉu vi ne timas, ke li revenos al Stokholmo kaj al siaj konatoj kaj sia antaŭa vivo?”

”Certe. Estas risko, granda risko. Ĉiam oni devas kalkuli pri tio. Kaj ĉiam oni estu preta rekomenci ankoraŭfoje. Neniam rezigni. Ĉu vi ne konsentas?”

”Eble.”

Jankéus bedaŭras, ke li ne decidis jam dekomence mem elserĉi la knabon. Sendi mesaĝon al eksa narkotulo, ke tiu kontaktu la policon, nun ŝajnas sufiĉe naive. Li lasas al Svedberg daŭrigi la demandadon, kaj tiu unue etendas al Āke Karlsson foton pri Szczepański.

”Bonvolu rigardi tiun ĉi foton. Ĉu vi rekonas lin?”

Karlsson zorge rigardas kun neŭtrala mieno, kaj kapneas.

”Ne, mi ne povas helpi vin.”

”Li tamen estis via dungito.”

La vizaĝo de Āke Karlsson montras sinceran surprizon.

”Ĉu vere? Mi ne povas konfirmi tion. Ĉu vi ne eraras?”

Svedberg ne komentas, sed prezentas duan foton, tiun de Janek Nowak. Sed ankaŭ ĉi-foje la respondo estas nea. Do li ree montras la unuan foton kaj klarigas:

”Tiu ĉi viro ŝoforis kamionojn kun mebloj por via ‘Dacke-möbler’. Rigardu denove!”

Karlsson apenaŭ oferas duan rigardon, li nur levas la ŝultrojn dirante:

”Bone, bone, mi komprenas. Sed tiujn homojn mi neniam konas. La polaj liveraj fabrikoj aranĝas ĉion pri tio.”

”Li tamen estis dungita de vi.”

”Nura formalajo, kredu min. Do, ĉu ankaŭ la dua estas kamionisto?”

Svedberg ne respondas. Anstataŭe li diras:

”Eble vi tamen rekonas la nomon de via dungito. Włodek Szczepański.”

Karlsson ĝentile rigardas la slipon, kie Svedberg notis la nomon, kiun li ne scias bone prononci, sed denove kapneas kun bedaŭra rideto. La policistoj mencias ankaŭ la nomon de Nowak, kvankam tio ŝajne ne indas, kaj la manko de rekono estas tute sama.

Karlsson akompanas ilin al la domo, kie loĝas Jimmy Robertsson. Li eĉ malŝlosas la pordon kaj montras la ĉambron de Jimmy. Ĝi estas malriĉa

ejo kun lito, tablo, seĝo kaj ŝranko. Kelkaj vestaĵoj ĵetitaj sur la lito. Bildoj de motorcikloj sur la muroj.

”Kiam li foriris?”

”Verŝajne hieraŭ posttagmeze. Li devis falĉi herbejon, sed evidente li forlasis sian taskon meze de la laboro.”

”Falĉi herbejon? Ĉu per falĉilo?” enĵetas Svedberg.

”Kompreneble ne per tradicia falĉilo. Tia bubo distranĉus al si la aĥilajn tendenojn. Sed per motora fadenrotacia falĉilo.”

Jankéus rigardas ekster la ĉambron kaj demandas:

”Ĉu estas pliaj loĝantoj en la domo?”

”Momente ne.”

”Do, ĉu vi povas averti min, kiam li revenos?” petas Jankéus, kaj ricevas kapjesan respondon, la unuan kaj lastan dum tiu ĉi vizito.

Sidante en la aŭto survoje reen Jankéus paŭtas murmurante:

”Ĉi-foje kantis li malpli longajn baladojn, ĉu ne?”

”Nu, liaj edifaĵoj ne mankas al mi. Sed mi iom miras, kiel li prizorgas tiun meblan entreprenon. Do ni esploru iomete pri liaj ekonomiaj aferoj. Ĉu vi povas kontakti la fisikan aŭtoritaton? Temas pri ‘Dacke-möbler’ kaj la vulp-fela kompanio ‘Nordic Fox Fur’ en Långasjö. Eble li havas pliajn firmaojn. Esploru tion.”

11. Mesaĝo de mortinto

Marde posttagmeze, la dek-naŭan de aŭgusto, la telefaksilo de Roger Svedberg kaj Tom Jankéus denove ekliveras faksajon el Kopenhago. Oni sciigas, ke la dana polico akiris materialon, kiu eventuale povus iel rilati al sveda murdenketo. Iu inspektoro Bagger volas ekscii, ĉu la kazo ankoraŭ restas aktuala.

Jankéus telefonas. Post enkondukaj frazoj li demandas, kion la dana polico trovis. Ĉu ion, kio rilatas al Brian Jespersen?

”Jes, memkompreneble. Jespersen. Fakte, temas pri du aferoj. Unu ŝajnas esti grava. La alia eble ne. Aperas tiel, ke Brian Jespersen havis patrinon.”

”Aha. Tio klarigas la aferon”, komentas Jankéus.

”Ĉu klarigas? Kiel?” surpriziĝas inspektoro Bagger.

”Ne, ne. Nenio. Estis ŝerco. Ankaŭ mi havas patrinon.”

Vagn Bagger ne komprenas en kio konsistas la ŝerco, sed li ekmemoras, ke li interparolas kun svedo, do li devus ne atendi ke ŝerco estu amuza. Post ioma konsterniĝo, li tial daŭrigas:

”Bone. Mian gratulon! Nu, tiu patrino, ne, ne – ne la via, tiu de Jespersen – post la morto de sia filo lasis kelkajn aĉajn aferojn al la polico de Odense, kie ŝi loĝas. Aferojn, kiujn Brian konservis en ŝia domo, manke de propra fiksa loĝloko, oni povas supozi.”

”Jes... Kion ŝi lasis, kio havas ligan al la murdo?”

”Nu, estis amaso da aferoj, kiuj kredeble ne gravas. Sed unu ŝajnas tre interesa. Estas sonkasedo. Ege aĉa kvalito, sed oni aŭdas iun kiu parolas. Laŭ la sinjorino, tio estas ŝia filo. Krome oni aŭdas ion, kio kredeble estas voĉo en telefono. La ulo kredeble volis registri telefonan interparolon, sed aĉe sukcesis pri tio. Same kiel pri ĉio, cetere. Tamen, liajn vortojn oni pliparte aŭdas. Se vere estas li. Ĉiuokaze ili ŝajnas interesaj. Ŝajnas, ke li provas ĉantaĝi iun.”

”Kiun?”

”Nu, nomon ni ne aŭdis, sed estas sufiĉe da aliaj aĉaj detaloj. Prefere ni sendu al vi kopion. Sed vi eble havos problemojn distingi liajn vortojn, ĉar li parolas sufiĉe aĉan fuenan dialekton...”

”Kian dialekton?”

”Fuenan! El la insulo Fueno! El la sudo, mi pensas. Regiono de Fåborg, ŝajnas. Aŭ eble Assens. Strangaj aĉuloj, tiuj fuenanoj. Glutas la finon de la vortoj!”

”Ĉu vere? Mi eĉ neniam rimarkis, ke danaj vortoj havas finon!”

Vagn Bagger supozas, ke tio estas nova ekzemplo de sveda humuro, kaj sekve ignoras la komenton.

”Sed ni faris tajpitan version. Kompreneble estas sufiĉe da lakunoj, dubaj lokoj, kie ne eblis deĉifri. Tamen tiu aĉa telefona voĉo estis tute neebla. Mi ne scias de kiu dialekto – jutlanda, eble. Nenio distingebla. Do, ni sendos al vi, se ŝajnas al vi interese.”

”Jes, mi petas. Tio espereble povos helpi nin. Krome menciis vi ankoraŭ ion...”

”Jes ja. Estas lia bankokonto. Kutime aĉe malplena. Sed iam-tiam, ne regule, estas faritaj pagoj al lia konto. Ĉiufoje de pluraj miloj da kronoj, sed malrondaj sumoj. Ankaŭ malsamaj. Kiel salajro, sed tiu aĉulo – kredeble denaske – ne havis laboron.

”Hmm. Kiam estas farita la lasta pago?”

”La sesan de majo, ĉi-jare. Okmil sescent okdek kronoj. Kaj duono.”

”Kaj duono?”

”Jes.”

”Duono de kio?”

”De krono, memkompreneble! Kvindek oeroj!”

”Aha. Mi komprenas. Bone, mi ne scias precize kion fari pri ĝi, sed bonvolu sendi ankaŭ tiun liston. Mi supozas, ke la banko ne povas respondi kie kaj kiel oni faris la pagojn? Aŭ kiu faris ilin?”

”Ili diras ke ne eblas. Aĉe! Ĉiuokaze se ne estas transpago de alia konto, kaj tiel ne ŝajnas.”

Tom Jankéus dankas pro la informoj, kaj post kelkaj minutoj ricevas fakte la tajpitan interpreton de la sonkasedo. Li eklegas ĝin, sed tuj stariĝas, faras fotokopion de la kvinpaĝa teksto kaj enĵetas ĝin al sia estro, Roger Svedberg, kiu ĵus revenis el kunveno.

”Legu, se vi havas tempon. Mi pensas ke ĝi interesos vin.”

Poste li residiĝas en sia ĉambro kaj zorge tralegas la tuton dufoje. Unuafoje ĝi impresas tre konfuze. La diraĵoj de Jespersen – se la parolanto estas tiu – ofte konsistas el duonaj frazoj, aludoj, minacoj. La respondoj tute mankas, ĉar la dana polico ne povis distingi ilin. Sed duafoje Jankéus komencas distili el ĝi imagon pri la enhavo. Jespersen minacas la alian, kiu evidente devas esti viro, per tio ke li denuncos, kion tiu faris al iu nomata *Nille*. Jankéus kunmetas la diversajn frazojn kiel puzlon. *Nille* estis infano, filino de la viro kiun Jespersen ĉantaĝas, kaj ŝia patro misuzis ŝin sekse kaj per tio kaŭzis ŝian morton, asertas Jespersen. Troviĝas aludoj ankaŭ al iu alia persono, kiu konas la sekreton, sed neniun nomon estas menciata. Ŝajne la telefona voĉo neas, rifuzas, ĉar Jespersen plurfoje ripetas: *”Mi scias ke vi faris, ne indas nei, mi scias, mi scias, mi havas pruvon, Nille donis al mi pruvon, kaj vi scias kiun oni kredos pli multe!”* Kiam Jankéus eklegas

triafoje la tekston por samtempe noti la ĉefajn punktojn, lia pordo malfermiĝas kaj envenas Svedberg.

”Ĉu vi havas la kasedon?”

”Ankoraŭ ne. Tion ĉi mi ĵus ricevis fakse, la kasedo espereble alvenos morgaŭ, aŭ nur postmorgaŭ.”

”Hmm.” Svedberg murmuris. ”Ĉu ne eblas sendi sonregistraĵon per ia komputila retpoŝto? Mezepoke! Do, ni devas atendi... Tamen, ankaŭ vi rekonas, ĉu ne? Jespersen kaj Karlsson?”

”Nu, devas esti Jespersen, laŭ lia patrino, diris al mi la dana polico. Kaj Åke Karlsson, jes, povas esti.”

”Povas esti? Ĉu vi subite fariĝis kreteno? Ĉu vi ne tralegis la atestojn pri Pernilla?”

”Certe, certe. Mi ĉion legis. Ankaŭ mi pensis pri ŝi. Pernilla – Nille. Jes, ŝajnas.”

”Estas klare. Eĉ azeno vidus tion. Sed ĉu ankaŭ juĝisto, mi ne scias. Do, ni devas esti tre diskretaj ĝis ni havos la kasedon. Sen tiu, aresto ne eblas. Tamen mi preparos renkontiĝon kun la prokuroro, por informi lin pri la kazo.”

Jankéus transdonas ankaŭ la alian materialon venintan el Kopenhago. Svedberg scivole rigardas la liston de pagoj al la bankkonto de Jespersen.

”Hmm. En majo okmil sescent okdek komo kvindek. En marto okmil sepcent du komo sepdek kvin. En decembro okmil sescent... interese. Ĉu vi jam retrokalkulis?”

”Retrokalkulis?”

Svedberg montras maloftan rideton.

”Nu... Mi ne vetus, tamen indas provi. Kontakto iun bankon, petu pri la kurso de dana krono je la koncernaj datoj, kaj retrokalkulu tiujn danajn okmil sescent ko-to-po al svedaj kronoj!”

La bankoj jam estas fermitaj, la poŝto ne konservis informojn pri delonge obsoletaj kursoj. Nur matene la sekvan tagon Jankéus sukcesas plenumi la matematikan hejmtaskon, kaj li povas fiera transdoni al sia estro liston de kalkuloj, kiuj je ĉiu unuopa okazo montras precize dek mil svedajn kronojn.



Ĵaŭde Svedberg pro nura hazardo ekscias pri juna narkotulo, kiu en Kalmar mortis pro superdozo de heroino. Oni trovis lian korpon antaŭ kelkaj tagoj, kaj nun li estas identigita kiel Jimmy Robertsson el Stokholmo. Laŭ la nekropsio la mortdato estas la dek-tria aŭ dek-kvara de aŭgusto.

”Diable! Damnite! Mi...” Tom Jankéus apogas la kapon al ambaŭ manoj, kiam li ekscias pri la knabo.

”Jes. Malagrable. Sed ne eblas antaŭvidi tiajn aferojn”, Svedberg provas senkulpigi lin.

”Antaŭvidi? Ne temas pri tio! Sed mi... La dek-trian aŭ dek-kvaran! Tio estas unu aŭ du tagoj post kiam telefonis mi al Åke Karlsson por demandi pri la knabo! Mi jam sciis ke tio estis idiotaĵo, tamen... morta!”

Svedberg ne povas konsoli. Iujn erarojn eblas malfari, aliajn ne.

”Ĉu vi esploros, kiu trovis lin, kaj serĉos homojn kiuj konis lin en Kalmar? Aŭ ĉu mi sendu alian?”

”Ne, ne. Mi esploros”, diras Jankéus.

Svedberg plu meditas. Tiu knabo, kiun ili neniam renkontis, eble tute ne gravas por la murdenketo. Tamen... estas io, kion Karlsson diris pri li. Kion li diris? Li ne povas memori.

Nokte je la tria horo li vekiĝas en sia lito, apud la edzino. Subite li rememoras, kion Åke Karlsson diris pri la knabo. Estis io pri falĉilo. Ke ne eblas doni falĉilon al li. *Tia bubo distranĉus al si la aĥilajn tendenojn*. Jen kiel li diris. Nu, nun tio ne plu ŝajnas grava. Per tiu frazo Svedberg tamen ekhavas alian ideon. Sed li devas prokrasti ĝin ĝis matene.

Vendrede matene li elserĉas telefonnumeron kaj butonas la numeron.

”Hallo, Frau Schulze? Good morning! Parolas Svedberg, sveda polico! Ĉu eblas mallonge interparoli kun via edzo? Jam for? Laboreje... Ĉu mi rajtus peti pri la numero tien?”

Ankoraŭ butonado, iom konfuza klarigo al sekretariino, kiu eble jes, eble ne lin komprenas, kaj finfine:

”Jes, mi petas!”

”Bonan tagon, sinjoro Schulze! Mi bedaŭras ĝeni vin... Svedberg, sveda polico... Mi havas nur etan demandon, por kompletigi. Ĉu vi permesas?”

”Bonvolu!”

”Kiam ni interparolis pri la murdilo, via falĉilo, vi menciis ke iu helpis vin pri ĝi. Kiu faris tion?”

”Estis loka bienulo, kiu spertas pri tiaj aferoj.”

”Jes, kaj lia nomo?”

”Karlsson. Estas tiu, kiu vendis la domon al ni. Li posedas multe da domoj kaj grandan terenon tie. Li kunportis la falĉilon por akriigi ĝin, kaj poste provis instrui al mi kiel falĉi. Vane, bedaŭrinde. Sed kial vi demandas? Ĉu la kazo ankoraŭ ne estas solvita?”

”Pardonu, sed kie li montris al vi kiel falĉi? Ĉu ĉe via domo?”

”Klare!”

”Kaj poste, ĉu li vidis, kie vi pendigis ĝin?”

”Mi ne memoras! Kia demando! Espereble vi tamen ne suspektas lin pri tiu terura afero!”

”Mi suspektas neniun. Baldaŭ la afero estos finita, kaj via helpo multe valoras. Kredeble vi post kelka tempo ricevos peton de germana polico lasi ĉe ili depozicion kun la sama enhavo, por ke ĉio estu formale korekta. Do, dankon, sinjoro Schulze, mi esperas ne plu ĝeni vin.”

”Ne dankinde!”



Tagmeze alvenas la kasedo. Svedberg aŭskultas ĝin unue sola, kaj preskaŭ nenion kaptas, tamen dank’ al la tajpita interpreto li rekonas la diraĵojn. Plej interesas lin la respondoj de la dua persono, sed pliparte ne eblas ion kompreni aŭ distingi. La voĉo aŭdiĝas tre mallaŭte kaj mistordite. En unu aŭ du lokoj la persono tamen laŭtigis la voĉon, kaj Svedberg paŭte murmuris ion al si mem.

Post lunĉo li renkontas Jankéus.

”Ĉu io pri la knabo?”

”Iu sociala asistanto trovis lian korpon en la haveno, en iu neuzata tenejo, kie foje restadas tiaj uloj. Mi parolis kun kelkaj aliaj junuloj, kiuj eventuale povus koni lin, sed neniun rekonas lian foton. Laŭ tio, kion ili respondas.”

”Do, aŭskultu kun mi la kasedon.”

Kiam Jankéus aŭdas la voĉon de Jespersen, li ridetas. Glutas la finon de la vortoj, diris tiu kopenhaga policinspektoro. Se temus nur pri la finoj, pensas Jankéus. Sed kiam venas unu el tiuj lokoj, kie la alia parolanto iom laŭtigas la voĉon, li petas:

”Denove tiun pecon!”

Svedberg retrobobeas kaj reaŭdigas la parton. Jankéus kapjesas:

”Jutlanda dialekto, li diris. Mi prefere dirus smolanda. Ĉi tie li diras *Mej jam dejris! Nenejam!* Ĉu vi aŭdas? Oni eĉ aŭdas la dikan so: *dejriŝ*. Tio estas nia vulpisto, je mil diabloj!”

”Bone. Do ni ekiru. Sed unue mi mesaĝos al la prokuroro. Mi proponas iri per du aŭtoj, kaj preni la vojon tra Emmaboda. Faru alian kopion de tiu kasedo, enŝlosu tiun ĉi en kirasŝranko. Kaj kunportu kasedilon!”

12. Ni trovos ŝin!

Denove Svedberg eniras la butiketon Ursino, ĉi-foje en akompano de Jankéus. La latuna sonorileto de la pordo anoncas ilian alvenon, kaj Mette Søbjerg aperas el malantaŭa ejo. Ŝi faras mienon de elreviĝo, kiam ŝi ekvidas la du policistojn.

”Mi bedaŭras, ni ne estas klientoj. Kiel iras la negocoj?” leĝeras Svedberg.

”Mi ne plendas”, respondas la butikistino neŭtrale.

”Nu, anstataŭ butikumi, ni devas aŭdigi al vi kasedon, se vi permesas. Bonvolu, Tom!”

Tom Jankéus metas kasedilon sur la vendotablon kaj ekfunkciigas ĝin. Li elektis parton de la kasedo, kie aŭdiĝas relative klaraj frazoj de la parolanto, kiu devas esti Brian Jespersen. Ambaŭ policistoj fiksas siajn okulojn al Mette, kiam aŭdiĝas la voĉo. Ĉi-foje ŝi evidente ne kapablas konservi sian kutiman kvieton kaj indiferenton. Ili vidas ŝin paliĝi, ŝia rigardo vagas tien-reen longe for. La voĉo de la kasedo eldiras sian *”kiel vi traktis ŝin, kion vi faris al Nille, ke vi devigis ŝin suĉi vin kiam ŝi estis nur eta infano! Kaj ne indas nei, mi scias, mi havas pruvon!”* Mette Søbjerg tenas per ambaŭ manoj la randon de sia vendotablo. Ŝi nenion diras, sed ŝia vizaĝo elparolas teruron.

Jankéus bobenas al alia loko kaj denove aŭdigas la voĉon. Tiuloke ĝi eldiras: *”ankaŭ iu alia scias! Nille rakontis ankaŭ al alia!”* Nun Mette sidiĝas kaj metas manon al sia buŝo. Svedberg faras signon al Jankéus haltigi la aparaton. Sekvas paŭzo. Neniu ion demandas, sed oni aŭdas la spiradon de Mette.

Kiam ŝi tamen nenion diras, Svedberg ekparolas tre trankvile, milde:

”Ni jam scias, kiu parolas en tiu kasedo. Ankaŭ kun kiu. Kaj pri kiu. Sed ni devas peti vin ankaŭ atesti pri tiuj aferoj.”

Nun Mette malfermas la buŝon, tamen ne por respondi, sed por demandi:

”De kie vi ricevis tiun?”

Svedberg afable respondas, tamen sen vere respondi:

”Nu, li evidente mem faris ĝin kaj konservis, kredeble por uzi, se necese. Eble oni povas diri, ke ĝi nun utilos al li. Sed bonvolu respondi niajn demandojn. Kiu parolas?”

Mette nur levas la ŝultrojn.

”Tio ne estas respondo. Bonvolu diri klare!”

Ŝi skuas la kapon.

”Vi certe komprenas, ke estos juĝafero. Vi estos vokita atesti antaŭ tribunalo. Tiam vi devos diri la veron. Sed vi faciligos la aferon, se vi jam nun respondos la demandojn de la polico.”

Silento.

”Kun kiu li parolas?”

La mieno de Mette ekhavas trajton de senespero, sed ŝi mutas.

”Pri kiu li parolas? Kiu estas *Nille*?”

Mette metas la manon antaŭ siajn okulojn, sed neniŭ sono.

”Lastfoje: kiu estas la parolanto de la kasedo?”

Mette nun rigardas malsupren, kapjesas kaj finfine flustras:

”Jes. Estas li. Estas Brian.”

Svedberg atendas momenton, kaj poste diras:

”Bone, Mette. Mi devas peti vin fermi la butikon. Aliaj policistoj veturigos vin al Kalmar, al la policejo. Vi devos lasi depozicion en pli formala maniero. Sed tio ne daŭros longe, poste ni veturigos vin hejmen!”

La sinteno de Mette Søbberg estas sufiĉe rimarkinda, laŭ la opinio de Svedberg. Ŝi devus kompreni, ke ŝi riskas esti arestita pro suspekto pri protektado de krimulo, eble eĉ pri kunhelpo al murdo. Tamen ŝi nenion diras, sed stariĝas kaj sekvas ilin eksteren al la dua policaŭto, kiu ekiras reen al Kalmar. Dume Svedberg kaj Jankéus pluiras suden per sia aŭto. Post malpli ol kvaronhoro ili staras antaŭ la pordo de Åke Karlsson. Ili sonorigas kaj frapetas, sed neniŭ respondas. Post kelkaj minutoj ili plupaŝas al la vulpejo, sed ankaŭ tiu ŝajnas senhoma. Tra la pordofendo ili aŭdas la blekadon de centoj da vulpoj, sed neniŭ homo venas por malfermi. Ili rondiras ankaŭ al la aliaj konstruaĵoj, same vane.

”Bone, ni lasu tie ĉi iun por gardi. Diskrete, kompreneble. Ni devas kelkan tempon kontentiĝi per Mette.”

Svedberg telefonas por venigi gardanton, kaj tio daŭras preskaŭ horon. Poste ili povas reveni al la policejo por denove pridemandi la sfinksan Mette Søbberg.

”Ĉu vi prenis lin?” estas ŝiaj unuaj vortoj, kiam ili revidas unu la alian. Ŝi daŭrigas sian kutimon prefere demandi ol respondi.

”Kiun?” diras Svedberg.

Sed ŝi nur paŭzas kaj sulkas la frunton. Ankaŭ la plua demandado malbone sukcesas. Ŝi ne volas ripeti la malmultajn vortojn diritajn en la butiko.

”Estas jam vespero! Mi devas reveni al miaj infanoj!”

”Kie ili estas?”

”La etuloj estas ĉe virino en Emmaboda, kiu vartas ilin dumtage. Katrine estas hejme, sola.”

”Do telefonu al ili kaj diru, ke vi venos malfrue.”

Ŝi parolas telefone kun la vartistino kaj kun la du etaj infanoj. Poste ŝi vane telefonas hejmen. Svedberg butonas ŝian numeron, por eviti malagrablajn surprizojn.

”Katrine ne respondas. Ŝi devis veni de la lernejo jam antaŭ horoj! Ĉu estas certe, ke vi kaptis lin?”

”Kiun?”

Sed Svedberg devas rezigni. Ne utilas persisti, kaj cetera lia ĉefa zorgo ne estas tiu ĉi rezistema danino, sed la ĉefa suspektato Åke Karlsson. Malkontente li sendas ŝin hejmen per policaŭto, ordonas ke unu policinspektoro restu ekster ŝia domo por gardi, kaj mem forlasas sian laborejon por hejme atendi la pluan evoluon de la kazo.

Li ne devas longe atendi. Je la naŭa vespere oni telefonas al li.

”Saluton! Parolas Willy Johnsson! Mi gardas ĉe tiu virino, kaj ŝi nun estas tute histeria. Ŝia filino ne revenis. Ŝi asertas ke iu kaptis ŝin, forrabis ŝin!”

”Mi parolos kun ŝi. Transdonu!”

La voĉo de Mette vere sonas tre ekscitite. Ŝi ripetas al Svedberg fojon post fojo sian maltrankvilon, eĉ senesperon:

”Ĉu vi ne kaptis lin? Kial vi ne prenis lin? Mi estas certa ke li forŝtelis mian Katrine!”

”Kial li forŝtelus ŝin?”

”Kial? Kial? Mi scias, ke li faris tion!”

”Kion vi pensas ke li faros al ŝi?”

”Mi ne scias! Forveturos kun ŝi... tenos ŝin... mi ne scias!”

”Kian utilon li havus de ŝi?”

”Utilon? Ĉu vi estas idioto? Ĉu vi ne aŭdis la kasedon?”

”Ĉu li jam antaŭe faris ion al ŝi, aŭ provis fari?”

”Ne, ne! Ŝi ĉiam estis ĉe mi! Sed nun ŝi estas for!”

”Ĉu vi suspektas, kien li iris, kien li prenis ŝin?”

”Mi ne scias!”

”Pensu! Vi konas lin!”

”Ne, ne... Ien malproksimen...”

”Ĉu al Kopenhago?”

”Eble... Jes, eble.”

Ĉu tiel li faris ankaŭ kun sia filino?”

”Kun Pernilla? Ne, ne, ŝi mem iris tien. Por eskapi...”

”Do, ni jam serĉas lin, kaj mi vastigos la serĉadon. Mi kontaktos la Kopenhagan policon. Se vi ekpensos pri io alia, aŭ se io okazos, telefonu al mi. Mi restos hejme, ĉar nokte mi ĉiuokaze nenion povos fari en la policejo. La policisto restos ĉe vi, kaj li havas mian hejman telefonnumeron. Voku kiam ajn! Ni trovos ŝin.”

Ni trovos ŝin. Facilas tiel diri, precipe en telefono, kiam ne necesas renkonti la rigardon de patrino kies dek-unujara filino malaperis. Svedberg restas hejme, kiel dirite, ĝis la sesa matene. Tamen li ne dormas dum tiu nokto.

13. Preskaŭ kiel homoj

”Mi nur nutras la bestojn. Tiuj ja devas manĝi. Alie ili manĝos unu la alian. Jes, certe, ili estas veraj diabloj. Preskaŭ kiel homoj.”

Svedberg staras ekster la vulpejo de Åke Karlsson. Estas griza sabatmateno kun malvarma vento. Antaŭ li staras Lasse Lund, la eta strangulo kun la incita kutimo ĉiam kaj ĉie aperi, klarigante sian filozofion.

”Manĝi oni devas, jes. Alie oni mordas aliajn. Jes, jen la vero. Jen la vero.”

”Ĉu vi kutimas labori ĉi tie?”

”Kutimas, kutimas. Plej ofte sur la herbejoj. En la arbaro.”

”Ĉu por Åke Karlsson?”

”Certe, certe. La mastro havas multe da tero. Multon por falĉi, multon por tondi, jes vere.”

”Sed ankaŭ en la vulpejo?”

”Kiam necesas, jes. Kiam necesas.”

”Kiel vi eksciis, ke hodiaŭ necesas?”

”Kiel? Li diris tion, la mastro. Li diris tion.”

”Kiam?”

”Kiam? Mi ja parolis kun li. Per la telefono. Jes, per la telefono. Li diris tion.”

”En kiu tago?”

”En kiu tago? En kiu tago? Hmm. Kiam ili kaptis la daninon! Jes, tio estas la vero. Mi diris al la mastro, ke ili kaptis la daninon. Finfine, mi diris, ili prenis la putinon. Jes. Tiam li diris, ke mi devas nutri la bestojn. Tion li diris.”

”Ĉu vi vidis policistojn ĉe ŝia butiko?”

”Ĉu vidis? Hmm. Mi vidis. Mi vidis. Ili kaptis ŝin, finfine. La danan putinon.”

”Do, ĉu tiam vi telefonis al Åke Karlsson?”

”Jen la vero.”

”Ĉu li diris, kial vi devas manĝigi la vulpojn?”

”Ĉu diris? Jes, li diris. Certe li diris. Li mem ne povas nutri ilin. Li devas zorgi pri aliaj. Jes, tion li devas.”

”Zorgi pri aliaj? Kiaj, kiuj aliaj?”

”Aliaj idoj. Ne vulpidoj, ne vulpidoj, sed putinidoj. Jes, li devas nutri la putinidojn, kaj mi la vulpidojn. Iu devas nutri ilin. Ĉiu devas manĝi, alie ili ekmordas. Jen la vero.”

Tio ĉi estas unu el la pli originalaj demandadoj en la labora sperto de Roger Svedberg. Sed ĝi estas ankaŭ unu el malmultaj demandadoj de tiu ĉi

enketo, kiu kontribuas al la kazo. Kiam la strangulo nur pli kaj pli implikiĝas en sia vivo-filozofio, Svedberg pluiras al Madviken, la domo de Mette Søbjerger.

Tie li nenion gravan povas fari. Nova policisto transprenis la gardotaskon de sia antaŭulo, kaj tiu tasko momente konsistas ĉefe el zorgado pri la du infanoj, Henrik kaj Ditte. Kiam Svedberg alvenas, Mette sidas apatia sur seĝo, ĉenfumante, dum la policinspektoro prezentas al ŝiaj infanoj matenmanĝon. Kiel diris Lasse Lund, "iu devas nutri ilin". Svedberg deprimate reveturas urben.

Li kontaktas la Kopenhagan policon, sed sabate ŝajnas malfacile ricevi kompetentan helpon. Li telefonas al la hejmo de Tom Jankéus por diskuti kaj ricevi bonajn ideojn, sed tiu ne havas pli da tiaj ol li mem. Tagmeze la telefona deĵoranto de la policejo anoncas:

"Mi havas la Ministrejon por Eksteraj Aferoj. Estas io pri Åke Karlsson. Ĉu vi prenos?"

"Ministrejon? Åke Karlsson? Mi prenos!"

La ministrejo en formo de mola virina voĉo savas lin el lia paralizo:

"La polico de Pollando arestis svedan civitanon, Åke Karlsson el Långasjö, en via polica distrikto, suspektitan pri pedofilio. Kun li estis juna knabino sen pasporto, sed ŝajne sveda."

"Kiel estas al la knabino? Ĉu ŝi estas en ordo?"

"Mi ne scias detalojn, bedaŭrinde, sed mi havas nomon kaj telefonnumeron de la pola polico en Poznań. Principe ni preferas ekstradicion, se la supozata krimo ne koncernas polan civitanon aŭ estis plenumata pliparte en Pollando."

Se la supozata krimo ne estis plenumata pliparte en Pollando. Kia esprimo! Svedberg notas la faktojn, nomojn, numerojn. Poste li ekserĉas sian antaŭan helpantinon, Małgorzata Håkansson. Ŝi vere troviĝas hejme, okupita per preparado de naskiĝtaga torto por sia plej juna filino. Svedberg mallonge klarigas, kaj ŝi tuj lasas la torton atendi, por partopreni en tri-persona telefona interparolo kun la policejo de Poznań.

"La afero okazis tiel, ke iu eksterlandano aĉetis kafon kaj sandviĉon de kiosko en la urbeto Września proksime de Poznań. Kiam li repaŝis al sia aŭto kun tiuj aferoj, infano pli-malpli falis el la aŭto kaj rampis trans la straton. Li ĵetis la kafon kaj sandviĉon, kaptis ŝin kaj enpuŝis ŝin en la aŭton. Malfeliĉe por li, sed feliĉe por la knabino, tio okazis antaŭ la okuloj de loka policano, kiu tuj suspektis krimon. Do nun ni tenas lin ĉi tie provizore, ĝis la esploro estos finita."

"Aŭskultu! Nepre faru ĉion eblan por reteni lin. Li estas suspektita pri murdo, eĉ pri du murdoj! Ni petos ekstradicion."

"Certe ni retenos lin. Ĉi tie oni suspektas pedofilion, kaj ni ĝuste nun havas kampanjon por purigi la respublikon de tia abomenaĵo."

Svedberg havas vertiĝan senton, kvazaŭ li denove aŭdus la gurdadon de Åke Karlsson. La vortoj, kiujn sinjorino Håkansson interpretas por li, ŝajnas tro bone konataj. Sed li rekaptas la celkonscion:

”Kaj la knabino? Kiel ŝi fartas? Ĉu en ordo?”

”Nu, oni ankoraŭ ne povis fari veran esploron... tio estas, ginekologian esploron... Ŝi estas sufiĉe toksita de io, ni ne scias de kio, ĉu alkoholo, ĉu iu drogo. Sed ni prenis sangoprovon kaj atendas la rezulton.”

Svedberg terurite imagas, kiel la dek-unujara knabino devos suferi ginekologian esploron fare de iu fremda kuracisto, kun kiu ŝi eĉ ne kapablas komuniki. Li diras:

”Ĉu eblas paroli kun ŝi telefone? Ĉu ŝi jam parolis kun sia patrino?”

”Ni eĉ ne scias kiu ŝi estas! Ŝi balbutis iun nomon, atendu... jen – Katarina Sobjeg aŭ io simila. Sed trovigas neniuj dokumentoj.”

”Estas ŝi. Katrine Søbberg. Mi donos al vi telefonnumeron. Ĉu vi helpas ŝin telefoni al sia patrino? Jen mi havas: unue kvardek ses por Svedio, poste kvar sep unu, poste ses du sep kvar kvar. Ĉu vi kaptis?”

Roger Svedberg atendas la ripeton de la numero pole, kaj finas la interparolon. Poste li denove vokas la Ministrejon por esplori kiel procedi pri formala peto pri ekstradicio. Li timas ke tio ĉi estos komplika kaj longdaŭra afero.



Estas merkredo. Svedberg sidas en la hejmo de Mette Søbberg kaj interparolas kun la ĵus hejmenveninta Katrine. Apude sidas Mette, kiu reakiris iomete de sia antaŭa forto, kaj polica inspektoro Vivianne Ljunggren. Oni ne faras formalajn demandadojn kun dek-unujaraj infanoj, sed eblas iom interparoli en ĉeesto de la patrino.

”Mi jam rakontis al tiu psikologo, aŭ kio ŝi estas!” diras Katrine.

”Jes, mi scias. Vi ne bezonas ripeti ĉion. La plej grava estas, ke vi estas sana kaj sekura. Mi jam komprenis, ke vi estis tre saĝa kaj ankaŭ kuraĝa. Se estas en ordo por vi, mi ŝatus aŭdi nur kelkajn aferojn. Unue, kiam sinjoro Karlsson venis ĉi tien, kion li diris kaj faris, por ke vi venu kun li.”

Katrine honte rigardas sian patrinon kaj murmuris:

”Li diris, ke Panjo foriris, kaj li veturigis min al ŝi.”

”Do kion vi faris?”

”Mi telefonis al la butiko, sed Panjo ne estis tie.”

”Kaj poste?”

”Li diris, ke mi venu kun li. Sed mi volis telefoni al Sonja. Kaj tion li ne permesis.”

”Kiu estas Sonja?”

”Ŝi estas tiu, kie Henrik kaj Ditte estas dumtage. En Emmaboda.”

”Jes ja! Ĉu li malpermesis al vi telefoni tien?”

”Jes. Tiam li diris, ke mi atendu en la sofo, kaj li preskaŭ puŝis min tien, kaj tenis mian brakon rekta. Poste li pikis mian brakon per injektilo.”

”Kaj...?”

”Mi nenion memoras. Nur kiam mi vekiĝis en la aŭto. La aŭto haltis, kaj li eliris. Mi malbonfartis, mi bezonis vomu. Do mi provis iri eksteren el la aŭto, sed mi ne povis paŝi. Tiam li reportis min en la aŭton. Poste mi aŭdis ke li parolas germane al iu, kaj li diris, *‘mia filino estas malsana’*, mi pensas.”

”Ĉu vi lernis la germanan en la lernejo?”

”Ne, ne. Sed Holger, li estas iu germana knabo, li instruis al mi kelkajn vortojn, kaj mi diris al li svedajn kaj danajn vortojn.”

”Bone. Do, kion vi poste faris?”

”Mi denove malfermis la aŭtopordon kaj provis eliri. Mi falis sur la straton, kaj tiam mi kriis, ke li ne estas mia patro. *‘Nix mein Vater!’* mi kriis. Poste alvenis pli da homoj, kaj mi pensas ke ili kaptis lin. Mi ne memoras tre bone.”

”Ĉu vi sciis, kie vi troviĝas?”

”Mi pensis en Germanio. Daŭris tre longe ĝis mi komprenis, ke estas Pollando.”

”Do vi sciis, ke vi longe veturis?”

”Ne, mi ne sciis. Mi dormis la tutan tempon. Sed mi tuj sentis, ke estas eksterlande. La domoj estas tute aliaj. Kaj estas aliaodoro.”

Roger Svedberg ridetas. La knabino impresas esti tre mense forta, malgraŭ sia eta, fragila figuro. Iomete kiel sia patrino.

Poste li turnas sin al tiu:

”Mette, morgaŭ ni venigos vin denove al la policejo por fari formalan depozicion. Lastfoje la rikolto estis malabunda. Tiuj aferoj vere gravas, kreu min. Baldaŭ espereble ni ricevos lin el Pollando, la juĝproceso povos okazi, kaj vi estos grava atestanto. Ĉu en ordo?”

”Kiel vi volas”, respondas Mette, sed kun sia malnova tono, neŭtrala kaj indiferenta.



Sed ne okazas tiel, kiel Roger Svedberg volas. Kiam la policaŭto jaŭde alvenas por veturigi ŝin al la policejo, Mette Søbjerger estas for, kaj same ŝiaj tri infanoj. Neniu ion vidis, nek aŭdis, kiel kutime. Sonja Andersson, la vartistino en Emmaboda, povas nur raporti, ke Mette hodiaŭ ne alvenis kun la du etaj infanoj, kaj ke ŝi ne respondis telefonalkvokon.

”Tio ĉi estas murdenketo de malaperantoj”, pensas Svedberg. ”Nur la murditoj restas.”

14. Lama ĉeno

Pasis du monatoj de la murdo de Brian Jespersen. La interŝtataj rilatoj rabis sian tempon, sed nun Åke Karlsson troviĝas denove en Svedio, pli precize en la arestejo de Kalmar, arestita pro suspekto pri du murdoj, kontraŭleĝa limigo de homa libereco – tio estas la forŝtelo de Katrine – korpa mistraktado – tio estas la injektado de heroino en ŝian vejnon, kaj perado de narkotaĵoj. En Pollando li estas suspektata pri kontraŭleĝa transpaso de la ŝtatlimo, ĉar li kaŝe enveturigis la knabinon sen pasporto, sed oni konsentis transdoni lin al svedaj instancoj pro la pli severaj krimoj okazintaj en Svedio. En Pollando troviĝas ankaŭ suspekto pri preparo al seksa misuzo de infano, sed tiun enketon oni transdonis al la sveda polico, ĉar la eventuala krima ago *‘estis iniciatita kaj en sia precipa amplekso plenumata ekster la teritorio de la Pola Respubliko’*.

Intertempe Tom Jankéus pasigis multajn horojn studante la ekonomiajn aferojn de Åke Karlsson. Li trovis plurajn firmaojn registritajn en lia nomo, sed la rilatoj inter ili, kaj la karaktero de iliaj enspezoj kaj elspezoj, ankoraŭ restas labirinta mistero. Li trovis kelkajn elprenojn de mono, kiuj koincidas kun kelkaj el la pagoj al la konto de Jespersen. Sed ne eblas diri, ke la afero estas perfekte klara.

Svedberg kaj Jankéus kune komencas pridemandi la suspektaton. Svedberg scias, ke estos malfacile superruzi la vulpiston. Li rigardas slipon, kie li notis liston da temoj, kiujn necesos pritrakti. Sed li ankoraŭ ne decidis kie komenci. Li improvizas:

”En via batalo kontraŭ la ŝlimo, kiel vi kutimas diri, vi evidente lernis iomete pri diversaj droĝoj, ĉu ne?”

”Precipe pri la tragikaj sekvoj de la sklaviĝo.”

Li scias, ke li estas suspektata pri narkotaj krimoj, tamen li konservas la malnovan edifan lingvaĵon. Svedberg daŭrigas:

”Ĉu ankaŭ pri dozoj?”

”Mi ne komprenas.”

”Vi scias precize kiel grandan dozon da heroino toleras infanoj de diversa grandeco, kaj kiel grandan ili *ne* toleras.”

”Ne, tiel detalajn sciojn mi ne havas. Sed mi vidis, ke eĉ malgrandaj dozoj iom post iom katenas la liberan volon kaj aspiron de la animo.”

Karlsson ankoraŭ ne scias, ke oni retrovis la knabon Jimmy mortan. Sed li montras neniun maltrankvilon aŭ scivolemon.

Svedberg saltas al alia temo:

”Kial vi forveturis?”

”Mi venis hazarde al la hejmo de Mette Søbberg, kaj konstatis, ke ŝi denove refalis. Mi ja sciis, ke tio povos okazi, kaj mi sciis, ke mi devos esti preta ĉiam rekomenci. Se oni permesos al mi tion. Sed ĉi-foje la afero estis pli abomena, pro la stato de Katrine, la filino.”

”Kiu stato?”

”Nu, vi jam scias! Mette evidente ne nur mem sinkis denove al la fundo, sed kuntrenis tien ankaŭ nian filinon. Katrine estis tute ebria de iu drogaĉo. Do, mi decidis, ke la sola eblo estas komenci pri ŝi. Se mi komencus pri la patrino, tiam la infano dume pereus.”

Svedberg suspiras kaj interŝanĝas rigardon kun Jankéus. Karlsson vere estas digna kontraŭulo! Li ne nur defendas sin, li ofensivas!

”Vi diris ‘*nia filino*’, se mi aŭdis ĝuste. Ĉu tio signifas...?”

”Jes. La knabino estiĝis kiam mi provis savi mian filinon, mian grandan filinon, Pernillan. Tiam mi multe rilatis kun Mette, kiu estis la sola amikino de Pernilla. Ja mi estis vidvo de pluraj jaroj... Mi eĉ pensas, ke la infaneto, do Katrine, estis tiu kiu savis la vivon de Mette. Fakte, mi jam ofte vidis tion. Se iu kompatinda ulino gravediĝas, ŝi ofte povas levi sin el la marĉo, pro la bebo! La infaneto, kiun ŝi naskos, povas savi ŝin!”

”Bela ideo. Sed kiel savas vi la knabojn? Ilin ne eblas gravedigi!” enŝovas Jankéus. Karlsson tamen neglektas lian pikon.

”Do, vi komprenas, ĉu ne? Mi ne volas ke la tragedio de mia vivo ripetiĝu. Mi perdis mian unuan filinon, por la dua mi pretas oferi ĉion!”

”Tamen vi antaŭe ŝajne ne montris tion. Aŭdas mi unuafoje, ke vi estas ŝia patro. Mette neniam menciis tion”, Jankéus seke konstatas.

”Mette estas rimarkinda virino. Ŝi volas mem zorgi pri la infanoj. Mi do restis en la fono, helpis pri mono ktp. Tiu ŝia butikoj ja ne donas grandan profiton. Sed por mi gravas, ke la knabino havu sian patrinon. Mia unua filino perdis sian patrinon tro frue. Ankaŭ tion mi ne volas ripeti.”

”Kiel mortis via edzino?” demandas Svedberg.

”En akcidento. Ŝi dronis.”

”Kie? En la lago?”

”Ne, ne. Ŝi falis de pramo. Sur la Balta maro, en malbona vetero.”

”Ĉu vi ĉeestis?”

”Mi kaj Pernilla dormis en kajuto. La knabino havis ses jarojn. Mia edzino nokte iris supren sur la ferdekon. Eble ŝi malsanis, mi ne scias. Matene ŝi estis for. Oni neniam retrovis ŝin.”

Svedberg eluzas la okazon por fari ambiguan demandon:

”Kien vi iris?”

Sed Åke Karlsson ne distriĝas:

”Kiam? Ĉu tiufoje? Aŭ kun Katrine?”

”Kun Katrine. Se ŝi estis jam toksita, kiel vi asertas, kial ne iri al hospitalo?”

”Mi sciis, ke en Svedio mi havas neniun rajton kiel ŝia patro. Oni simple redonus ŝin al la patrino, negrave ĉu tiu kapablas protekti ŝin kaj sin mem aŭ ne. Mi bezonis provizoran restadejon, por garantii ke Katrine ne kaptiĝu de la diablo.”

”Pli precize kie troviĝas tiu restadejo?”

”Mi intencis vojaĝi, ne resti en fiksa loko.”

”Kion postulis Brian Jespersen, kiam li aperis ĉe vi ĉi-somere?” Svedberg ne ŝanĝas sian konversacian tonon, kvankam li neatendite saltas al alia punkto de la listo.

”Mi ne komprenas vin. Pri kiu vi parolas? Jespersen, ĉu tio ne estas la murdito?”

Svedberg ĵetas rigardon al Jankéus, kiu funkciigas redaktitan kopion de la kasedo. Karlsson aŭskultas kun ŝajna intereso, sulkas la frunton kaj post kelka tempo kapneas kun bedaŭra mieno dirante:

”Kio estas tio? Mi eĉ ne unu vorton komprenas!”

”Tamen pasigis vi sufiĉe da tempo en Kopenhago, sur la putinaj stratoj. Kiel vi komprenis tiujn homojn?” Denove Jankéus prenas la taskon piki.

”Kiel mi komprenis? Nu, kun iom da peno, mi povas kompreni la danan lingvon. Ĉu tio estis la dana?”

”Jen alia lingvo”, diras Jankéus kaj denove ekfunkciigas la kasedilon. Aŭdiĝas laŭtigita fragmento el la vortoj de *la alia parolanto*. Tiu loko, kie Karlsson, se estas li, prononcas ‘*mi jam diris, neniam!*’ Karlsson aŭskultas ankaŭ tion kaj kapneas.

”Vi ne rekonas?”

”Ne, mi bedaŭras.”

”Tio estas normala. Oni kutime ne rekonas la propran voĉon sur bendo.”

Karlsson elĵetas mallongan ridon al Jankéus, kaj poste turnas sin al Svedberg, kvazaŭ por serĉi pli seriozan homon.

”Mi ne komprenas la ŝercojn.”

”Ne estas ŝerco. Ni ĵus aŭskultis vin rifuzi la ĉantaĝon de Jespersen. Tamen vi ne rifuzadis. Almenaŭ okfoje vi pagis al li dek mil svedajn kronojn, por ke li ne malkaŝu, ke vi sekse misuzis vian unuan filinon, Pernillan. Ankaŭ ne estas ŝerco ke vi mortigis lin ĉe la domo de gesinjoroj Schulze. Kion li tiufoje postulis de vi? Kion li minacis malkaŝi?”

Ĉke Karlsson dum kelkaj sekundoj restas silenta. Nur eta grajno da maltrankvilo ekbrilas en liaj okuloj, sed poste lia mieno sereniĝas:

”Pardonu min, sed vi evidente fantazias. Mi neniam renkontis la viron, ĉiuokaze laŭ mia scio. Se tiu sonbendo, kiun mi ne komprenas, vere enhavas tiajn akuzojn, tio estas nura infanaĵo. Tamen, eble mi ne surpriziĝu. Ne estas la unua fojo, ke homaj vrakoj sur la fundo de la strata defluilo turnas sin kontraŭ mi kaj provas iel vundi min. Sed mi ĉiam pensas, ke tiuj

provoj originas en ilia malespero. Ni ne kondamnu ilin, ni devas pardoni kaj helpi!”

La listo de Svedberg havas ankoraŭ multajn punktojn, sed li preferas lasi la kasedan prezentadon resti finalo por hodiaŭ. Li silentas dum kelka tempo, poste anoncas ke la demandado provizore estas ĉesigita.



”Ni ne ŝancelos lin. Havas ni nenion, kio movos lian maldekstran brovon eĉ unu milimetron!”

Jankéus pesimismas, kaj Svedberg emas konsenti. Ilia kazo baziĝas sur longa vico de indikoj, kaj sur atestoj de personoj malaperintaj. Nenio vere firma. Ĉu entute eblas, ke li estos kondamnita, aŭ ĉu li glitos tra la maŝoj?

Oni daŭrigas la pridemandadojn, sed senrezulte. La juĝisto permesas ankoraŭ tritagan areston antaŭ ol prezenti akuzon, sed la prokuroro hezitas prezenti leĝan akuzon sen pli stabila fundo. *”La kazo konsistas el ĉeno el indicoj, kiu bedaŭrinde lamas”*, li plendas. Svedberg mordas al si la lipon por ne demandi kiel ĉeno povas lami.

Tute neatendite aperas nova ĉenero, denove el Pollando. Svedberg iam havas la senton kolekti pecojn de puzloludo, sed ĉiu peco venas de aliloke. Tiu ĉi peco ŝajnas grava, sed ne estas facile vidi, kie ĝi konvenas. Eble ankaŭ la puzlo lamas.

La polico de Poznań sciigas, ke oni trovis eksan kontraŭleĝan fabrikon de amfetamino en iu loko nomita *Konin*. Neniu narkotaĵo, neniue homo, sed klaraj spuroj, ke oni forlasis ĝin antaŭ nelonge. Oni trovis ankaŭ rimedojn por kontrabandi la narkotaĵon, kaj tiuj rimedoj estas seĝoj. Lignaj, remburitaj brakseĝoj el pino, *”de skandinava stilo”*, kiel asertas la dokumentoj. Oni faksas eĉ fotojn de la koncernaj seĝoj, kun detala bildo pri kaŝita poŝo en la remburaĵo.

”Se tio ĉi iel helpos nin, estos vera hazardo!” komentas Jankéus. Sed ili akiras permeson traserĉi la meblostokejon de Åke Karlsson, kaj tuj trovas identajn seĝojn. Sen poŝoj en la remburaĵoj, tamen la ĉeneroj ŝajnas iel kunkroĉiĝi. Kvar viroj pasigas plurajn horojn traserĉante ĉiun seĝon de *”skandinava stilo”*, trovante nenion.

”Li havas iun alian ejon, kien ili metas tiujn seĝojn kiuj entenas la varojn. Sed kie?”

”Jes, kie? Kaj kiel ili scias kiuj seĝoj estas la ĝustaj?”

Oni serĉas ian markon, sed laŭ la fotoj ne eblas vidi tian. Svedberg havigas al si mapon pri Pollando, kaj konstatas ke Wrzeŝnia, la loko kie Karlsson estis kaptita, situas proksime de Konin kaj sur la vojo al tiu loko, se oni venas el Svedio. Denove la ĉeneroj kuntuŝiĝas.

Matene la dekan de septembro Tom Jankéus aperas en la ĉambro de Svedberg kun petola mieno.

”Holger ricevis poŝtkarton”, li anoncas.

Svedberg suspiras. La humuro de Jankéus foje estas iom tro stranga. Sed subite lia rigardo firmiĝas, kaj li demandas:

”Holger? La knabo Schulze? De kiu? Kaj kiel vi scias?”

”De lia somera amikino. Ĉu vi ne vidis ilin en la boato? Beleta paro! Nu, mi pensis, ke ili eble estas plumamikoj, kaj telefonis al Hamburgo. Bone, Katrine efektive sendis al sia amiketo poŝtkarton, dirante mi ne scias kion, eble ke ili renkontiĝos iam, sen adreso, sed stampita en Odense.”

”Odense? En Danio, ĉu ne? Do, ni petu helpo de la polico tie. Sed ŝajnas iom malfacila tasko trovi ilin, se ili volas kaŝiĝi.”

”Ne, la polico ne estas bona.”

Svedberg rigardas sian kolegon, la policinspektoron Tom Jankéus, kiu ŝajne sen ironio elbuŝigis la simplan frazon *‘la polico ne estas bona’*.

”Do, kiu estas pli bona?”

”La sola persono, ŝajnas al mi, kiu libervole, proprainiciate helpis al ni en tiu ĉi kazo. Kiu krome loĝas en Odense. Ĉu vi senilas?”

”Prefere diru. Kvizon vi povas aranĝi en liberaj horoj!”

”La maljuna damo Tove Jespersen.”

”Ej! Mi *estas* senila!”

”Se vi insistas.”

”Do, ni parolu kun ŝi!”

”Jam farita. Hieraŭ vespere mi havis tre interesan telefonan interparolon kun ŝi.”

”Bone... ĉu ili troviĝas tie?”

”Mi ne demandis.”

”Vi ne demandis?”

”Necesas iom da delikateco. Kiel dirite, mi interparolis kun ŝi, klarigis kiel statas la kazo. Ke ni vere bezonas la ateston de Mette. Mi eĉ voĉlegis al ŝi pecojn el nia demandado kun Åke Karlsson...”

”Vi voĉlegis? Sekretan materialon el la enketo?”

”Jes, ekzemple tiun pecon kie li klarigas, kiel li volis savi sian filinon Katrine el la ŝlimo. Mi pensis, ke tio povus utili.”

”Hmm... Kaj?”

”Ĉi-vespere parolos mi denove kun sinjorino Jespersen. Mi esperas ke ŝi denove helpos nin!”



”Ĉe Jespersen!”

”Bonan vesperon, sinjorino Jespersen! Parolas Tom Jankéus denove, la policisto el Kalmar!”

”Saluton!”

”Ĉu vi havis okazon paroli kun Mette?”

”Jes, mi parolis kun ŝi. Kaj sub certaj kondiĉoj, ŝi eventuale povos helpi vin.”

”Bone, mi esperis tiel! Kiaj kondiĉoj?”

”Nu, ŝi ne volas iri al Svedio. Ĉu eblas fari tie ĉi la atestadon?”

”Mi aranĝos tiel ke eblos.”

”Bone. Plue ŝia adreso kompreneble devas esti protektata.”

”Jes, tio ne estos problemo.”

”Do, se plaĉas al vi, ŝi staras apud mi. Vi povas paroli rekte kun Mette.”

”Jes, bonvolu!”

”Halo’. Parolas Mette.”

”Saluton, Mette. Jen Jankéus. Ĉu ĉio en ordo?”

”Ni ankoraŭ vivas.”

”Feliĉe! Do, laŭ la sinjorino, vi pretas lasi depozicion ĉe la dana polico. Mi aranĝos tiel, ke tio sufiĉos. Ni bezonos vian rakonton pri tio, kion Pernilla diris pri sia patro en Kopenhago, kaj kion Brian diris al vi en via butikio. Ĉu vi havas ankoraŭ informojn pri kio okazis en la tago de la murdo?”

”Jes, mi havas. Li pruntis... Ĉu pruntis mian boaton. Li ne klarigis kial, sed reveninte li diris, ke mi devas nenion menciigi pri tio al iu homo. Poste li forprenis la sparkilon de la motoro, kaj devigis min diri, ke la motoro paneis antaŭlonge. Mi sciis nenion pri la kialo, nur pli malfrue, kiam mi aŭdis pri la murdo, mi komprenis.”

”Bone. Tion ĉi ripetu antaŭ dana polico.”

”Jes. Sed... estas ankoraŭ unu afero. Kiun Brian menciis en la butikio. Tiu polo...la konato de Brian... ĉu Nowak? Li malkaŝis al Brian, kie ili konservas la aliajn meblojn, la plenajn. Estas iu malnova fojnejo de Ĉu, sed en dezerta loko. Proksime de vojkruciĝo en Fåglasjö, li diris. Mi ne volis ekscii tion, sed li trudis al mi. Li volis ke ni kune postulu grandan sumon de Ĉu. Mi rifuzis, kompreneble.”

”Vojkruciĝo en Fåglasjö. Trovos ni. Se vi pensos pri io alia, ne hezitu kontakti min! Dankon, Mette! Ĝis revido!”

”Mi esperas ke ne.”

”Bone... Do, ĉion bonan!”

Jankéus tuj telefonas al Svedberg kaj salutas lin per la gajaj vortoj:

”La ĉeno ĉesis lami!”

En la sama vespero oni elserĉas la fojnejon, gardas ĝin dumnokte, kaj matene akiras permeson traserĉi ĝin. Troviĝas nur deko da seĝoj ene, ĉiu kun kaŝita poŝo, kaj en ĉiu poŝo kelkcent gramoj da amfetamino.

15. Ne plu bezonata

En decembro fine okazas la juĝproceso. Svedberg kaj Jankéus ne plu havas ligan al la kazo. Novaj krimoj, novaj krimuloj okupas iliajn tagojn. Ili legas pri la proceso en la lokaj ĵurnaloj, kiel ĉiuj homoj. Dum kelkaj tagoj la detaloj plenigas plurajn paĝojn. La prokuroro rezignis akuzon pri la morto de Jimmy Robertsson. Kredeble mankas sufiĉaj pruvoj. Murdo de Brian Jespersen, perado de narkotaĵoj, rabo kaj mistrakto de infano, jen tamen listo de akuzoj, kiu ŝajnas sufiĉa. Sed ĉu la tribunalo estos konvinkita?

En la policejo oni rilatas al juĝprocesoj kiel al fremda mondo, kaj kutime preparolas ilin kun cinika kaj sarkasma tono. La ĝenerala sinteno estas, ke el la laboro kiun la polico kun peno plenumas, en la tribunalo rezultas preskaŭ nenio. Juĝistoj kaj advokatoj ŝajnas esti kreitaj ekskluzive por ruiniĝi tion, kion policistoj konstruas.

Kiam post du semajnoj prezentiĝas la verdikto, dekjara malliberigo de Åke Karlsson, la proceso ne plu estas novaĵo kaj ricevas nur notican grandecon en la gazetaro.

”Dek jarojn ferios li je ŝtata kosto”, komentas Jankéus legante la noticon en la polica lunĉejo. ”Do havos li okazon savi kelkajn animojn el la koto.”

”Pli kredeble li establos prizonan filion de sia komerca firmao”, supozas Svedberg.

”Ĉu vi pensas, ke la malliberuloj bezonas vulpofelojn? Aŭ seĝojn de skandinava stilo?”

”Nu, eble ne. Sed ili certe aprezos la remburaĵon. Amfetaminon de internacia stilo.”



En la dana Odense la proceso estas menciata unufoje en *Fyens Stiftstidende*, loka ĵurnalo, ĉefe pro tio ke la murdito estis homo el la provinco ĉirkaŭ tiu urbo. La notico tamen ne enhavas multe da detaloj, kaj oni tute ne mencias la gravan ateston de Mette Søbjerger, kiu eble estis decida por la verdikto. Inter la legantaro sendube troviĝas almenaŭ unu, kiu tre kontentas pri tiu manko de informo.

La Hamburga gazetaro ne mencias la kazon. Nur en la sekva somero Holger ekscias pri la verdikto. Plian poŝtkarton de Katrine li neniam ricevos. En la aĝo de dek du jaroj, novaj amikoj rapide anstataŭas la malnovajn, sed tiusomere, en la arbaro ĉirkaŭ la lago Törn, li trovas neniun. Post la

malaperinta familio Søbjerg maljunula paro ekloĝas en Madviken, kaj aliajn infanojn li ne konas en la ĉirkaŭaĵo.

Sinjoro Schulze povus, se li volus, ricevi sian falĉilon de la polico. Ĝi ne plu estas bezonata kiel pruvaĵo. Sed li rezignas pri ĝi. Ankaŭ por li ĝi ne plu estas bezonata.

Glosoj

AC André Cherpillod: NePIVaj vortoj, 1988.

EV Ebbe Vilborg: Ordbok Svenska-Esperanto, 1992.

JR Josef Rumler: Abunde kaj redunde, 1986.

NPIV Nova Plena Ilustrita Vortaro, 2002.

PIV Plena Ilustrita Vortaro, 1981.

<i>akĉento</i> <i>NPIV</i>	aparta prononco fremda aŭ dialekta
<i>bijuterio</i> <i>AC</i>	juveletoj, ornamaĵoj
<i>brikabrako</i> <i>PIV</i>	miksaĵo de malnovaj brokantaj objektoj
<i>ĉarelo</i> <i>NPIV</i>	ĉareto kun forko aŭ platformo por levi varojn
<i>ĉipa</i> <i>NPIV</i>	malmultekosta
<i>doso</i> <i>AC EV</i>	skatoleto, kutime el lado
<i>ekstradicio</i> <i>PIV</i>	transdono de krimulo al alia lando
<i>Elsinoro</i> <i>PIV</i>	dana urbo Helsingør
<i>eratika</i> <i>PIV</i>	translokita de glacio aŭ alia naturforto
<i>faksi</i> <i>NPIV</i>	telefaksi
<i>fortisimo</i> <i>JR</i>	maksimumo de laŭteco
<i>Fueno</i> <i>AC EV</i>	dana insulo Fyn
<i>lakuno</i> <i>PIV</i>	vaka loko, malplenaĵo
<i>Mercedo</i>	germana aŭto Mercedes
<i>obsoleta</i>	ne plu valida, ne plu uzata
<i>pedofilio</i>	seksa direktiĝo de plenkreskulo al infanoj
<i>retoŝto</i>	elektronika perkomputila komunikado
<i>Selando</i> <i>AC EV</i>	la dana insulo Sjælland, sur kiu situas Kopenhago
<i>Skanio</i> <i>AC EV</i>	la plej suda provinco de Svedio, Skåne
<i>Smolando</i> <i>EV</i>	provinco en sud-orienta Svedio, Småland
<i>Sundo</i> <i>PIV</i>	la markolo inter Danio kaj Skanio
<i>telefaksi</i> <i>EV NPIV</i>	telekopii, sendi per telefonreto kopion de dokumento

Sten Johansson

TRANS MARO KAJ MORTO

Krimromano

*Al-fab-et-o,
Skövde, Svedio 1999*

Dua reviziita eldono 2014

1. Doktoro venas malfrue

”Ne, niaj reguloj estas perfekte klaraj. Ne eblas.”

”Sed la tuta familio estas rifuĝantoj!”

”Ĝuste tial ni devas postuli garantian sumon. Pli precize, ĝuste pro tio, ke ili ne estas registritaj kiel loĝantoj ĉi tie, la ĝenerala malsanasekuro ne inkluzivas ilin. Do – ili devas pagi la veran koston.”

”Sed ni simple ne povas tuj akiri tiom da mono!”

”Mi bedaŭras.”

”Aŭskultu. Mi estas pastro de la paroĥo Resmo. Mi aranĝos la pagon poste, certe jam lunde. Sabate ne eblas!”

”Niaj reguloj ne permesas tion. Imagu, se ni permesus, sendube ĉiuj volus pagi poste. Ni devas sekvi la regularon. Mi bedaŭras. Nun, kiel vi vidas, pluraj homoj vicitendas...”

Leena Fagerström flustre interparolas kun Mehdi Ghamari kaj lia edzino Nasrin, kiu tenas sian malsanan filinon en la brakoj. La knabino nun estas kvieta, nur de temp’ al tempo aŭdiĝas etaj ĝemoj, kaj samtempe mallarĝiĝas ŝiaj okuloj. Eble la plej intensa stomakdoloro jam pasis?

La virino en la hospitala akceptejo apenaŭ jetas rigardon al la infano. Ĉirkaŭe vere atendas deko da homoj pli-malpli malsanaj. Viro laŭaspekte kvardekjara malkviete paŝas tien-reen kun malregulaj moviĝoj, argumentante kontraŭ iu nevidebla antagonisto. Sur rul-lito kuŝas virino kun tuko antaŭ sia sanga vizaĝo. La plej multaj atendantoj tamen sidas kviete, ne montrante per sia ekstera aspekto aŭ konduto, kial ili serĉas hospitalan helpon.

”Mi ne povas persvadi tiun virinon”, flustras la pastrino Leena Fagerström anglalingve al la geedzoj Ghamari. ”Ni devos reveturi, kaj mi provos venigi privatan doktoron, kiun mi iomete konas.”



Sabate vespere je la oka kaj duono doktoro Torkel Wibe eniras la preĝejon de Resmo. Vidante la mienon de sia konatino, la pastrino, kiu akceptas lin en la preĝeja ĉefnavo, li malrapidigas la paŝojn. Jam ne urĝas. Kune ili paŝas antaŭen ĝis benko, kie sidas la patrino tenante mortan kvarjarulinon en la brakoj. Kelkajn metrojn for de ŝi, sur la longa tapiŝo de la meza paŝejo, genue preĝas la patro de la infano, direktite al la horejo.

La kuracisto povas nenion fari por la kvarjara Jasmin. Post kelka tempo li klopodas klarigi al la patrino, ke necesas fari nekropsion por eksci, pro kio la knabino suferis kaj mortis. Nasrin Ghamari nur fikstenas sian

mortintan filinon kaj fortunias la vizaĝon. La patro jam eliris el la preĝejo. Torkel Wibe klarigas al Leena Fagerström, ke li devas alvoki policon kaj ambulancon, por transporti la kadavron de Jasmin al la hospitalo de Kalmar, tiu sama kie oni antaŭ nur ses horoj rifuzis akcepti kaj ekzameni ŝin. La pastrino petas lin tamen atendi kelkajn horojn, kaj li akceptas tion.

Atendante Torkel Wibe eliras el la preĝejo por promeni. Ekstere la oktobra vespero jam mallumiĝis, kiam li ekpromenas laŭ la supra rando de kruta deklivo, kiu formas la okcidentan eĝon de la Oelanda ebenaĵo. Okcidente la ĉielo ruĝas kaj purpuras super la markolo de Kalmar.

La doktoro ŝatas promeni laŭ ĉi tiu pado, kiun li konas de antaŭe, kaj la densiĝanta obskuro ne ĝenas lin. Li cerbumas pri la morto de la infano. Li ne komprenas, kio okazis al la socio, kie li mem pasigis sian tutan vivon. Li ne povas kredi, ke oni antaŭ dek aŭ dudek jaroj rifuzus flegi mortontan infanon pro burokrata aŭ ekonomia kialo. Sed hodiaŭ li jam preskaŭ ne trovas forton por indigni pri la afero.

Post kvaronhoro li preterpasas iaman ŝtonminon, kie la ruĝa kalkŝtona grundo estas rompita laŭ tavoloj. Cent metrojn pli fore li iras laŭ la periferio de arbareto, el kies nigra interno li aŭdas viglan interparolon, kverelon, ŝajne. Unu voĉo mallaŭte sonoras, sed la alia foje eksplodas elsputate anglajn vortojn kun fremda akĉento: "Too much – too much – I can pay only..." "Tro multe, mi povas pagi nur... – kiajn strangajn negocojn oni plenumas vespere en tiu bosko?", demandas sin la doktoro. Sed li preferas resti je siaj propraj zorgoj. Kia stomakmalsano povas tiel rapide distondi la vivofadenon de infano? Nu, tio nun ne plu koncernas lin, sed la hospitalan patologon. Kompreneble povas esti, ke la knabino jam delonge malhavis ĝustan flegadon. De kie venis tiuj Irananoj al la insulo Oelando? Ĉu de trans la Balta maro? Li kredas, ke li legis en loka ĵurnalo pri sia konatino, kiu enlasis rifuĝantojn en sian preĝejon, sed li malmulte atentis la precizajn informojn.

Kiam li turnas sin kaj komencas repaŝi suden, la okcidenta ĉielo portas malhele violajn striojn, kaj la pado laŭ la deklivrando preskaŭ ne plu distingeblas.



En la preĝejo Leena Fagerström ne plu trovas konsolajn vortojn por la virino, kiu perdis sian infanon. Ŝi malfermis la preĝejon kiel azilon por ĉi tiu grupo da rifuĝantoj, sed fronte al la morto, ŝi ne disponas pri azilo. La tri ceteraj virinoj inter la Irananoj kolektiĝis ĉirkaŭ Nasrin Ghamari, kaj parolas kun ŝi mallaŭte, miksite kun plorado. Pastrino Fagerström eliras el sia preĝejo en la malluman oktobran vesperon.

Nasrin Ghamari sidas sur preĝeja benko apud sia morta filino. La okuloj de la filino estas fermitaj kaj nenion plu vidas. Tiuj de la patrino estas malfermitaj, sed ili ne vidas la ejon kaj homojn ĉirkaŭ ŝi. Al ŝia rigardo aperas domo en Teherano, kie ŝi vivis kun sia edzo kaj ilia eta filino. Preskaŭ sen antaŭa averto tiu vivo estis frakasita. La politika grupo de ŝia edzo estis malkovrita de la polico, kaj ili devis kaŝiĝi ĉe parencoj. De tiam ili vivas en konstanta provizoro, kiel kaŝitoj, fuĝantoj, rifuĝantoj, nedeziratoj. La infanaĝo de Jasmin ŝrumpis sur la longa vojo al ĉi tiu norda templo de fremda kredo, kaj nun ĝi finiĝis por ĉiam.

Ĉirkaŭe ploras la tri aliaj virinoj, sed en la okuloj de Nasrin jam elĉerpigis ĉiuj larmoj.

2. Paganoj kaj demonoj

”Kio nova?”

”Pafis sin iu Oelanda pastro en arbaro. Sed mi suspektas, ke iu kunhelpis.”

Polickomisaro Roger Svedberg levas la rigardon de sia matena taso da kafo por vidi, ĉu lia pli juna kolego, inspektoro Tom Jankéus, parolas serioze. Lia bizara humuro estas fifama, tamen... Svedberg demandas:

”Oelanda pastro? Kie?”

”Ie en la sudo. Resmo, mi pensas”, informas Jankéus.

”Resmo? La pastro de Resmo? Mi ĵus legis pri ŝi en la matena ĵurnalo! Ŝajnas, ke ŝi plenigis la preĝejon per mahometanoj, kaj iu infano mortis. Ĉu pro tio ŝi memmortigis sin? Hmm. La nunaj pastroj...”

”Svedberg, Svedberg, antikvas vi. Sciu, ke *A* oni nuntempe diras *islamanoj*, *B* la mortinta pastro ne estas *ŝi* sed *li*, kaj *C* forte dubas mi persone, ĉu li mem tenis la pafilon.”

”Ĉu *li*? Ŝajnas esti stranga li. Mi ĵus vidis foton en la ĵurnalo. Verŝajne vi eraras pri la loko. Estas almenaŭ trideko da paroĥoj en Oelando.”

La du kolegoj en la polico de Kalmar devas forlasi la misteron ĝis posttagmeze. Ili provizore interrompas sian amikan ĵargonon, glutas la lastan buŝplenon da kafo, kaj reiras ĉiu al siaj taskoj. Roger Svedberg, kiu havas la pli altan postenon, estas nealta, diketa viro, kiu ĵus festis sian 47an jaron sur la tero kaj la 24an en la polico. Lia kolego Tom Jankéus, 38jara patro de tri idoj, estas pli alta, muskola sed svelta. Kiam tio eblas, kaj la tasko tion postulas, ili ofte laboras duope. Laŭ metodo kaj pensmaniero ili kompletigas unu la alian; krome estas konata fakto en la policejo, ke komisaro Svedberg pli bone ol multaj aliaj kolegoj eltenas la ironian ŝercemon de la pli juna Jankéus. Pluraj lin evitas pro tio, ke ili ne ĉiam certas, ĉu ili aŭ iu alia estas celtabulo de liaj spritaĵoj.

Postlunĉe Roger Svedberg ricevas teknikan raporton kaj devas malfermi novan murdenketon. Montriĝas, ke la suspekto de Jankéus estas prava. La mortinto sur la insulo Oelando vere estis pafita per revolvero, kiu kuŝis ĉe lia mano, sed ŝajne la pafisto venis el distanco plurobla kompare kun la longeco de liaj brakoj. La policisto, kiu deĵoris sabatvespere raportas al Svedberg:

”Li estas Erland Bexelius, pastro de Vickleby. Sesdek-kvinjara, proksimume. Postlasas edzinon. La arbareto, kie oni trovis lin, situas apenaŭ kilometron norde de la preĝejo de Resmo, do en la direkto al Vickleby. Ŝajnas, ke oni trenis la kadavron almenaŭ kelkajn metrojn inter la arbojn for de iu pado.”

”Ĉu troviĝis aliaj signoj? Piedsignoj, radsulkoj?”

”Ne, nenio. La grundo estas tre malmola, preskaŭ nuda kalkŝtono. Sed malnova biciklo kuŝis ĉe la ŝoserando proksime al la loko, kie li estas trovita.”

”Kiel longe for de la ŝoseo li kuŝis?”

”Kvindek metrojn, aŭ eble sesdek.”

”Kiu trovis lin?”

”Tu kuracisto, Wibe, el Algutsum. Li trovis la kadavron ankoraŭ varma. Eventuale li eĉ aŭdis la pafon.”

”Ĉu io supozigas rabon?”

”Ŝajne ne. En la poŝoj troviĝas monujo kun iom da mono, identiga karto ktp, kaj ŝlosilaro. Krome io tre interesa: anonima letero kun diversaj insultoj. Ĝi troviĝas ĉe la teknikistoj, sed jen kopio.”

Svedberg rigardas fotokopion kun malmulte da teksto, presita aŭ komputile printita. Ĝi tekstas:

DIABLO OKUPIS VIN. VI PROFANAS
DOMON DE DIO PER MALĈASTADO
KUN PAGANOJ KAJ DEMONOJ.
VI EBRIIĜIS PER LA VINO DE VIA
MALĈASTEKO
SATANO PRENOS VIN BALDAŬ.

La kolego transdonas ankaŭ kelkajn fotojn de la kadavro. Iom korpulenta, grizhara, vestita per malhelbruna jakso, griza aŭ nigra pantalono, nigra Vaska ĉapo, brunaj gantoj. Unu flanko de la kapo estas kovrita de nigra kaĉo el sango kaj malpuraĵo.



Svedberg kaj Jankéus vizitas la arbareton, kie oni trovis la murditan pastron. Unu policisto gardas la lokon kaj la plastrubandojn, kiuj ĉirkaŭas ĝin. La rubandoj formas straton de la loko, kie la korpo de Bexelius kuŝis, dek kvin metrojn ĝis la loko, kie troviĝas surgrunde la unuaj sangomakuloj kaj la unuaj postsignoj de tio, ke oni ion trenis inter la arbojn. La loko, kie la viktimo kredeble estis pafita, situas sur malnova tervojeto, kiu kondukas de la ŝoseo, kvindek metrojn for, preteriras la arbareton kaj finiĝas ĉe kruta deklivo malsupren. Sude de la vojeto kreskas densa vepro el juniperoj; norde la arbareto konsistas ĉefe el pinoj, tremoloj kaj avelarbustoj.

Jankéus de kelka tempo esploras arbustojn laŭlonge de la vojeto. Nun li haltis kaj kaŭras duonmetron ekster la plastrubandoj, kvazaŭ

admirante raran sed escepte malfruan orkideon. Kun la dorso al Svedberg, li krias:

”Svedberg! Ĉu hazarde kunportis vi plastsaketon?”

Svedberg alpaŝas, transdonas saketon. Jankéus per tiu prenas ion de la tero, turnas sin, kun rideto tenas la saketon antaŭ la okuloj de Svedberg. En ĝi kuŝas kuglo de pafilo.

Svedberg levas la brovojn dirante:

”Nu, nia teknikisto ŝajne ne havis sian plej ambician tagon.”

Jankéus komentas:

”Jen la maltroigo de hodiaŭ!”

Kunlabore kun la gardanta policisto, ili markas la lokon, kie kuŝis la kuglo. Poste la du kolegoj trovas nenion fareblan tie, kaj pluiras al la sekva vizitota loko: la pastrejo de Vickleby.

La pastra vidvino Elisabeth Bexelius akceptas ilin en bela ĉambro, meblita laŭ stilo de la antaŭa jarcento, kun fenestroj rigardantaj suden, en la direkto kie mortis ŝia edzo. Ŝi estas alta, maldika virino kun aspekto de pli ol sesdek jaroj. Ŝi portas nigran robon, kaj la okuloj maltrankvile saltas inter la du policistoj kun esprimo de konfuzo pli ol de funebro.

Svedberg kondolencas kaj bedaŭras la ĝenon, sed klarigas, ke necesas fari kelkajn demandojn. La vidvino nur kapskuas sed ŝajne pretas aŭskulti lin.

”Sinjorino, ĉu vi scias je kiu horo via edzo ekiris de hejme sabate vespere?”

”Ne, mi eĉ ne sciis, ke li forlasis la hejmon. Mi pensis, ke li estas ankoraŭ en sia laborĉambro.”

Ŝi parolas mallaŭte kaj nerapide, kun iel demanda tono kaj kulturita Skania akĉento.

”Mi komprenas. Do, kiam vi eksciis...?”

”Nur kiam oni alvenis, iom post la deka, mi pensas.”

”Kiu alvenis?”

”Nu, uniformita policisto kaj sinjorino Fagerström el Resmo. Estis tute malreale. Mi devis iri en lian laborĉambron por rigardi, antaŭ ol kredi ilin.”

”Jes, mi komprenas, ke estis terura ŝoko. Ĉu vi povas imagi, pro kio via edzo eliris?”

”Tute ne, tute ne.”

”Ĉu li iam sabate ricevis mesaĝon aŭ alvokon? Telefone aŭ alimaniere?”

La vidvino pripensas.

”Nu, certe la telefono kelkfoje sonoris, sed mi ne scias pri kio temis. Ĉefe ekleziaj aferoj, sendube. Li nenion menciis al mi.”

”Ĉu vi mem respondis telefone?”

”Unufoje jes. Tiam vokis pastro Sunnanbris en Kalmar, kolego kaj amiko de mia edzo.”

Svedberg montras foton de la trovita biciklo.

”Bonvolu diri, sinjorino Bexelius, ĉu vi rekonas tiun biciklon?”

”Ŝajnas esti tiu de mia edzo. Sed li preskaŭ neniam uzas ĝin.”

”Ĉu li havis malamikojn?”

”Malamikojn? Certe ne!”

”Ĉu li havis konatojn, al kiuj li povus bicikli vespere? Ekzemple en Resmo. Aŭ eble en Mörbylånga?”

”Mi ne povas imagi. Ne sen mia scio...”

”Ĉu al la pastro de Resmo?”

La pastra vidvino paŭtas, replikante kun pli da emfazo ol antaŭe:

”Sinjorino Fagerström? Certe ne! Absolute ne! Vi devus scii...”

”Kion?”

”Nu, mi supozis, ke vi jam scias. Mia edzo ne akceptas... ne akceptis virinojn kiel pastrojn. Li estis fidela al la instruo de Paŭlo.”

”Mi komprenas. Do, ĉu vi dirus, ke lia rilato al Leena Fagerström estis malamika?”

”Tute ne, tute ne. Male, ni tute ne rilatas al ŝi. Ni tamen kompatas la homojn, kiujn ŝi geedzigas, kaj la infanojn, kiujn ŝi baptas, ĉar tiuj agoj ja tute ne estas validaj!”

”Tamen ŝi akompanis la policiston por sciigi al vi, kio okazis.”

”Nu, ŝi ja estas najbaro... tio estas, niaj paroĥoj najbaras...”

Ŝia esprimo ŝajnas subkompreni, ke la pastroj de najbaraj paroĥoj en la kamparo, eĉ se ideaj malamikoj, tamen havas certajn reciprokajn respondecojn.

Svedberg paŭzas lasante al Jankéus demandi:

”Sinjorino, ĉu iam ricevis via edzo anoniman leteron?”

La esprimo en ŝiaj okuloj ŝanĝiĝas de maltrankvilo al timo, sed la respondo estas:

”Neniam, certe ne!”

”Eble li ne informus vin?”

”Kiu sendus al li anoniman leteron? Mi ne povas imagi!”

Jankéus montras kopion de la letero, kaj la okuloj de la vidvino cedas flanken, kvazaŭ por esplori, ĉu iu kaŝiĝis malantaŭ ŝia ŝultro. La policisto demandas:

”Kiu sendus al li ekzemple tian mesaĝon?”

Ŝi ĵetas al li rigardon, kvazaŭ esplorante, ĉu li seriozas.

”Al li? Tio ja ne povas... rilati al mia edzo!”

”Do al kiu, laŭ vi?”

”Mi tute ne scias. Tute ne.”

Svedberg ekkaptas alian fadenon:

”La pastrino de Resmo ja enlasis rifuĝantojn en la preĝejon. Ĉu via edzo havis opinion pri tio?”

La vidvino ĵetas okulon al la kopio de la anonima letero, kaj poste respondas:

”Ne laŭ mia scio.”

Svedberg plue montras fotojn de la objektoj trovitaj en la poŝoj de la murdito kaj petas la vidvinon pripensi, ĉu io mankas, kio devus troviĝi tie. Sed ŝajne nenio mankas.



Doktoro Torkel Wibe laboras en sia privata konsultejo en Kalmar sed loĝas sur la insulo Oelando, en la vilaĝo Algutsrum, dek tri kilometrojn norde de Vickleby. Tie li akceptas la du policistojn en salono moderne meblita, kie lia juna edzino prezentas kafon kaj poste silente malaperas. La tri viroj sidas sur granda, ledotegita sofo. Ekster la preskaŭ tutmura fenestro etendiĝas herbejo, kie ĉevalo paŝtiĝas. La doktoro estas altulo apenaŭ kvindekjara, kun bruna haŭto kaj blonda hararo mallonge tondita.

”Bonvolu rakonti”, komencas Svedberg, ”pri via vizito en Resmo sabatvespere.”

Torkel Wibe kapjesas.

”Mi pasigis la tutan tagon en Borgholm, spektante mian edzinon konkursi pri ĉevalsaltado. Ni ankaŭ supeis tie. Revenante hejmen, je la oka kaj kvarono, mi senprokraste, kiel kutime, aŭskultis la telefonrespondilon. Troviĝis interalie tri mesaĝoj de Leena Fagerström en Resmo. Temis pri malsana knabino inter ŝiaj rifuĝantoj, kaj pri tio ke la hospitalo de Kalmar evidente rifuzis akcepti la knabinon sen pago de kelkmil kronoj. Tio estas normala, kaj kutime la kaŝitaj eksterleĝaj rifuĝantoj eĉ ne provas, aŭ kuraĝas, konsulti la publikan sanflegon. Sed laŭdire oni tamen devas akcepti la akutajn, danĝerajn kazojn sen garantia pago. Tial mi surpriziĝis, kiam troviĝis dua kaj tria mesaĝoj, kie sinjorino Fagerström sonis pli-malpli despera. En normalaj kondiĉoj ŝi estas tre trankvila homo...” Elegantaj mangestoj akompanas la elokventan parolon de la doktoro.

”Ĉu la mesaĝoj estas konservitaj?” entranĉas Jankéus.

”Bedaŭrinde ne. Nu, mi decidis senprokraste ekiri tien, kaj aŭtis al Resmo. Sed tuj veninte en la kirkon mi komprenis, ke mi venas tro tarde. Mi ne scias, pro kiu morbo la infano mortis. Povus esti apendicito, aŭ intesta obstrukco. Ni ekscios.”

”Kion vi faris, konstatinte ke la knabino mortis?” demandas Svedberg.

”Leena Fagerström petis min prokrasti la alvokon de polico kaj ambulanco por doni kelkan tempon al la gepatroj. Kiam mi alvenis, la patro unue preĝis, turnite al Mekko, supozeble; poste li malaperis. La patrino

ŝajnis tute paralizita kaj ne volis formeti la infanon. Mi iris eksteren por promeni.”

”Ĉu vi povas diri je kioma horo vi forlasis la preĝejon?”

”Je la oka kvardek.”

”Kaj via alvoko de polico poste okazis je...?”

”La naŭa kaj duono, proksimume. Mi ne notis, sed vi sendube scias precize.”

”Jes ja.” Svedberg povus parkere reciti la tempon notitan de la alarmcentralo – dudekunua tridek tri. Sed anstataŭe li konkludas:

”Do dum horo vi promenis?”

”Preskaŭ. Mi iris norden laŭ la supra rando de la faŭlto. Troviĝas pado paralele kun la ŝoseo.”

”Ĉu ne estis mallume?”

”Sufiĉe. Tamen la okcidenta ĉielo iom lumigis. Mi konas la padon de antaŭaj promenoj. Mi do iris norden, kaj preterpasante la boskon, tio estas eble kilometron norde de la kirko, mi aŭdis du voĉojn el ĝi. Kverelon, ŝajne. En la angla, kaj – fakte mi aŭdis ĉefe unu voĉon, kiu parolis kun fremda akĉento. La viro diris ‘Too much, I will pay only...’ kaj ion nedistingeblan.”

”Kaj la alia voĉo? Ĉu ankaŭ vira?”

”Malfacile diri. Ĝi estis pli febla, pli alta, sed mi nenion distingis.”

”Ĉu vi kaptis pliajn vortojn?”

”Ne. Nu, eble li diris denove ‘No, no!’ Sed cetere nenio. Mi ne volis enmiksiĝi, la afero asociigis al mi ion pri narkotaĵoj.”

”Bone. Kio poste okazis?” demandas Svedberg.

Wibe trinketas kafon kaj daŭrigas:

”Mi pluiris norden ĝis iuj vikingaj vestiĝoj aŭ mi-ne-scias-kio. Tie mi returnis min suden, kaj preskaŭ tuj mi aŭdis sonon, kiu unue impresis kiel pafo. Mi tamen konvinkis min, ke ĝi estas nur missono de aŭto, kaj paŝis plu laŭ normala rapideco. Estis jam pli obskure, kaj mi devis iom singarde meti la piedojn. Kiam mi preterpasis denove la boskon, mi ekpensis, ke mi tamen volas iom skolti. Mi decidis trairi la boskon ĝis la ŝoseo por poste daŭrigi suden laŭ la ŝoseo, kie estas pli ebena grundo por marŝi. Post eble dudek paŝoj mi efektive stumblis sur la kadavro kaj preskaŭ falis sur ĝin.”

”Ĉu tio estis la sama loko, de kie vi antaŭe aŭdis voĉojn?”

”Jes, la sama loko. Do... tute certe la sama bosko, kaj eĉ ŝajne la sama, suda parto de ĝi.”

”Kaj en la intertempo, post la voĉoj, ĉu vi notis ion alian, krom la pafo-sonon?” provas Svedberg.

”Ne, nenion”, tujas Torkel Wibe, kaj aldonas post momento: ”Kompreneble, sur la ŝoseo pasis kelkaj aŭtoj; tiujn oni klare aŭdas. Sed alie mi perceptis nenion.”

”Ĉu iu aŭto haltis – aŭ startis?”

”Ne. Aŭ pli precize: tion mi ne notis.”

”Do, kion vi faris ĉe la kadavro?”

”Mi konstatis, ke ĝi mortis, kaj ke tio okazis ĵus, laŭ la temperaturo. Mi elserĉis manartikon kaj palpis, sed ne trovis pulsadon. Same ĉe la kolo. La haŭto de la kuŝanta homo tamen havis normalan temperaturon. Ĉio ŝajnis malreala – dufoje en unu horo mi do alvenis tro tarde al mortinto. Fakte, mi praktike nenion vidis, sed devis palpi. Poste, mi kuris; bedaŭrinde mia poŝtelefono kuŝis en la aŭto, do mi kuris al tiu kaj alarmis la policon.”

”Kaj poste?”

”Mi denove eniris la kirkon. Leena Fagerström ne estis tie, do mi reiris eksteren, kaj ekvidis ŝin alveni de sia domo. Do mi senprokraste rakontis la aferon al ŝi.”

”Kiel ŝi reagis?” demandas Jankéus.

”Ŝi estis ŝokita. Nu, efektive ŝi jam de antaŭe estis en psika ŝoko pro la infano, kaj mi ne certas, kiom ŝi vere aperceptis el mia informo.”

La buŝo de Svedberg faras minimuman rideton. Malofte li pridemandas personon kun tia vortprovizo. Sed la doktoro pluas:

”Mi memoras, ke ŝi kuris en la kirkon por rigardi, kaj revenante ŝi ŝajnis tre konsternita.”

”Ĉu vi scias pro kio?”

”Fakte ne. Estis io pri ŝiaj rifuĝantoj, sed mi ne demandis. Konjekteble ŝi timis, ke iu el ili, ekzemple la patro de la infano, faris ion malprudentan. Fakte, ŝi iom trankviliĝis, kiam tiu patro baldaŭ poste aperis.”

”De kie li aperis?”

”Mi ne scias. Tamen, evidente li ne suicidis.”

Estiĝas eta paŭzo en la demandado. Ĉiuj tri trinkas iom da kafo, kiu jam estas nur varmeta.

”Ĝi tepidiĝis”, konstatas Torkel Wibe. ”Ĉu mi surverŝu iom da varma?”

La pasia kafamanto Jankéus jesas, sed Svedberg preferas enketi plu pri la fino de la rakonto. Per kelkaj demandoj li ekscias, ke la doktoro kaj la pastrino kune iris per lia aŭto al la murdloko, kie ili ĝisatendis la alvenon de du policistoj. En la lumo de policista poŝlampo Leena Fagerström tuj rekonis sian kolegon el Vickelby, kaj mem proponis sin por averti la pastredzinon. Nur post tio oni finfine alvokis ambulancon por la mortinta infano, kaj ankaŭ tie pastrino Fagerström devis interveni por pacigi kaj eviti tumulton, kiam oni forprenis de la gepatroj la infanan kadavron. Fine, post noktomezo, la doktoro povis reveturi hejmen.

Jankéus malplenigas sian tason, kaj ili povas forlasi la vilaon de la geedzoj Wibe por denove iri suden.

3. Terura domo!

La pastrejo de Resmo estas duetaĝa, blanka domo el ligno iom sude de la preĝejo. Sur ĝia fronto troviĝas tradicia fenestra verando, kie pastrino Fagerström akceptas ilin kaj proponas kafon. Nun eĉ Jankéus rifuzas, kaj post mallonge ili trovas sin kun glaso da riba siropo en la mano.

”Bela domo”, enkondukas Svedberg el sia vimena fotelo.

”Fu! Terura domo!” ekkrias la pastrino kun Finnlanda akĉento. ”Terura ĝi estas. Granda, tro granda por ni. Kaj kiam mi sola dormas ĉi tie, aperas el ĉiu malluma angulo fantomoj de iamaj pastroj. Terure!”

”Hm”, umas Svedberg, iom embarasite pri kiel daŭrigi. Dume, Tom Jankéus nur ridetas gaje.

”Kiam mia edzo ankoraŭ loĝis ĉi tie, tio estis eltenebla. Do, la domo estis tia, ne la edzo. Krome li havis konsultejon por dorlotbestoj en unu salono. Li estas veterinaro.”

”Sed ĉu vi nun sola loĝas ĉi tie?” Svedberg alkroĉas sin.

”Pli-malpli. Ne, tamen ne. Ankaŭ mia filo loĝas ĉi tie, sed foj-foje li tranoktas ĉe sia patro, kaj foje ĉe iu konato en Kalmar.”

”Kiom li aĝas?”

”Dudek. Do li devus jam forlasi la panjon, sed ne estas facile aranĝi tion.”

La pastrino mem ŝajnas havi kvindek jarojn. Ŝi estas maldika kaj ne alta, sed disradias ian bazan trankvilon, eĉ parolante pri fantomoj. Ŝia mieno estas serioza, preskaŭ malgaja, sed ŝia teniĝo impresas nestreĉite. Svedberg petas:

”Bonvolu rakonti pri sabate vespere.”

”Jes ja. Terura tago! Kiel komenci? Dumtage mi akompanis la geedzojn Ghamari kun ilia malsana filino al la hospitalo, kie oni rifuzis akcepti ŝin. Estis koŝmaro, pura koŝmaro. Mi ankoraŭ ne povas esprimi, kion mi sentas pri tio. Ĉiuokaze ni revenis posttagmeze, kaj mi klopodis venigi mian konaton, doktoron Wibe. Sed la horoj rampis, kaj li ne venis. Cetere la knabino estis pli kvieta, kaj ni kredis, ke tio signifas pliboniĝon. Tamen... Nu, je la oka vespere iu alia el la Irananoj vokis min, kaj mi iris en la preĝejon, kie Jasmin ĵus mortis. Baldaŭ poste vere alvenis Torkel Wibe, tro malfrue. Li preskaŭ tuj ekparolis pri nekropsio – li kelkfoje estas iomete nesentema – kaj mi devis elpeli lin dum kelka tempo. Li iris promeni laŭ la klifo.”

”Kiam li eliris?”

”Mi fakte ne scias, mi ne pensis pri la horo.”

”Bone. Bonvolu daŭrigi.”

”Nu, mi iomete parolis kun Nasrin, la patrino. Mehdi jam antaŭe eliris el la preĝejo. Poste...”

”Ĉu rimarkis vi, kien li iris?” interrompas Jankéus.

”Ne. Li kredeble tutsimple volis esti sola. Eble li transiris la ŝoseon, sur la stepon, por rigardi orienten. Mi vidis, ke li kelkfoje faradas tiel.”

Estiĝas silenta momento, antaŭ ol ŝi daŭrigas:

”Do, kiam mi konstatis, ke la aliaj virinoj zorgas pri Nasrin kaj interparolas Perse, mi forlasis ilin kaj iris hejmen dum kelka tempo. Mi sidiĝis tie, kie vi sidas nun” – ŝi montras al Svedberg – ”kaj provis ordigi la pensojn. Sen granda sukceso, mi timas.”

”Kaj kiam vi revenis al la preĝejo?”

”Mi ne rigardis horloĝon. Post duonhoro, eble.”

”Kio okazis ĉe la preĝejo?”

”Doktoro Wibe jam revenis, kaj li anhelis ion pri iu, kiu mortis. Nu, mi jam sciis, ke iu mortis, do mi ne tuj kaptis la sencon. Poste mi tamen komprenis kaj akompanis lin en lia aŭto.”

”Ĉu vi entute ne eniris la preĝejon?”

”Ho, jes. Vi pravas. Kiam mi komprenis, ke iu plenkreskulo mortis, mi tuj timis ke Mehdi Ghamari faris al si ion stultan. Mi kuris en la preĝejon, sed li ankoraŭ ne estis tie. Tamen li alvenis antaŭ ol ni ekiris.”

”De kie li alvenis?” demandas Svedberg.

”De nenie! Li simple staris tie, subite, kaj reiris en la preĝejon.”

”Bone. Daŭrigu, mi petas!”

”Ni iris kelkcent metrojn per la aŭto, poste atendis la policaŭton, kiu baldaŭ alvenis kun sia blua lumo. Torkel Wibe montris al ili la lokon; mi restis proksime de ili, kaj post kelka tempo ili petis min rigardi, ĉu mi rekonas la viron. Kaj tion mi ja faris. Terura vidaĵo! Li estis mia respektinda kolego, pastro Bexelius.”

”Kiel vi reagis?”

”Mi tre surpriziĝis. Ne tiel multe pro tio ke li mortis, sed kion li faris en tiu arbareto?”

”Kial vi ne surpriziĝis pro lia morto?”

”Nu, ankaŭ pro tio, sed ne tiom. Li ne estis tute juna.”

Jen sufiĉe stranga klarigo, pensas Svedberg. Laŭ lia sperto, oni pli ofte murdas junajn homojn ol maljunajn. Li tamen daŭrigas:

”Poste, kio okazis?”

”La policistoj iom aranĝis, kaj post kelka tempo unu el ili veturigis min al sinjorino Bexelius por rakonti.”

”Kiel ŝi reagis?”

”Terure! Ŝi simple ne kredis nin. Supozeble ŝi pensis, ke tio estas unu el miaj atencoj kontraŭ la eklezio.”

”Viaj interrilatoj ne estas tre bonaj, ĉu?”

”Kompreneble ne. Bexelius estas unu el tiuj fundamentistoj. Pastrino – por ili tio estas same hereza kiel diino!”

Svedberg ridetas kaj ekiras laŭ alia direkto:

”Nun, ĉu vi bonvolus rakonti iom pri tiuj rifuĝantoj en via preĝejo? Kiam ili venis ĉi tien, kaj kiel tio okazis?”

”Antaŭ eterno, ŝajnas nun, sed vere temas pri tri semajnoj. Ili alvenis per iu Latva ŝipaĉo, kiu grundis ĉe la orienta bordo, ĉe Stenâsa. Vi devus scii, ĉar la polico ĉeestis por fortransporti ilin. La ŝipestron oni arestis, mi pensas. Sed ili ne fidis la policon – strange, ĉu ne – kaj fuĝis en la preĝejon de Stenâsa. Fariĝis tumulto, ĉar la pastro enlasis ilin, dum la paroĥa estraro volis elpeli ilin. Terure! Tiam mi proponis la preĝejon de Resmo kiel alternativon, kaj ni veturigis ilin ĉi tien per kelkaj aŭtoj.”

”Kion diras via estraro? Kaj la paroĥanoj?”

”Nu, la estraro ne tro protestas, krom unu konata rasisto, kaj la paroĥanoj ĝenerale aprobas la aferon. Almenaŭ tiuj, kiuj vizitas la preĝejon. Ili donacas vestaĵojn kaj manĝon, eĉ pli ol sufiĉe.”

”Kiom estas la rifuĝantoj?”

”Dek ses... ili estis. Do nun estas...”

”Dek kvin.”

”Kredeble dek kvar, ĉar unu viro ŝajne kaŝe foriris. Mi ne scias kien.”

”Kiel longe ili povos resti, laŭ vi?”

”Mi ne scias. Se dependas de ili, tre longe, mi pensas. Ili vivis tutan eternon en mizeraj kondiĉoj unue en Ruslando, poste en Latvio.”

”Ĉu ili ĉiuj estas Irananoj?”

”Jes, ĉiuj.”

Svedberg rigardas al Jankéus, kaj tiu, kun ŝajne leĝera tono, demandas:

”Sinjorino Fagerström, ĉu ricevis vi anoniman leteron?”

Ŝi surprizite rigardas lin kaj mute pripensas. La brovoj kuntiriĝas. Poste ŝi kun suspektama mieno diras:

”Kiel vi scias? Ĉu mia edzo tion diris?”

Jankéus havas sufiĉan rutinon por responde demandi:

”Ĉu rakontis vi tion al iu, krom al via edzo?”

”Nu, mi montris ilin al li por ricevi konsilon, kiel fari... Jes, fakte, mi rakontis al ankoraŭ unu persono, sed ŝi kredeble ne informus vin.”

”Kiom da leteroj vi ricevis?”

”Tri. La unua kaj dua venis antaŭ jaro, proksimume. La tria antaŭ semajno.”

”Kaj kion oni skribis? Ĉu vi konservis ilin?”

”Mi konservis ilin, aŭ pli ĝuste mia edzo konservas ilin por mi. La enhavo estis ne tre timiga, ĝi konsistis el naive, stulte krudaj insultoj.”

”Kial vi ne faris denuncon?”

”Ili ŝajnis ne danĝeraj. Okaze de denunco, mi supozis, ke estus ĵurnala skribaĉado, kio nur kontentigus tiun kompatindulon, kiu sendis ilin al mi.”

”Ĉu vi suspektas iun?”

”Ne, nenium. Povas esti ĉiu ajn frenezeta aŭ inhibicioplena homo.”

”Ĉu povus ni vidi la leterojn?”

”Jes, mi diros al Lennart, mia edzo, ke li montru ilin. Sed mi ne volas denunci.”

”Bone. Kiel atingis vin la leteroj?”

”Mi trovis ilin en mia leterkesto, sed iu mem metis ilin tie, senkoverte.”

”Ĉu ili similis tiun ĉi?” demandas Jankéus etendante la kopion de la anonima letero. Lia mieno estas preskaŭ gaja. Leena Fagerström kun intereso rigardas la folion kaj kapjesas:

”Tute similaj. De kie venas ĉi tiu? Ĉu ĝi alvenis nun en la leterkesto?”

”Rigardu denove, mi petas”, replikas Jankéus. ”Ĉu vi certas, ke ĝi celas vin?”

”Kompreneble. Estas klare kiel vitro!”

”Do, vi avertos vian edzon, ke li montru al ni la pli fruajn. Cetere, al kiu alia persono vi montris ilin?”

Pastrino Fagerström iom hezitas, sed diras:

”Nu, mi ne vere montris ilin, sed rakontis pri ili. Estas konatino, kun kiu mi kelkfoje kunlaboras.” Subite ŝia mieno alprenas petolan nuancon. ”Eble vi trovus interese intervui ŝin. Ŝi estas profesia sorĉistino. Guðrún Jónsdóttir en Långlöt. Mi rakontis al ŝi, ĉar evidente ŝi estis menciita en la unuaj leteroj.”

Tom Jankéus rigardas al sia kolego por indiki, ke li estas kontenta, kaj Svedberg diras:

”Do, sufiĉas, mi pensas. Kredeble ni devos pridemandi ankaŭ la rifuĝantojn, sed por tio ni bezonos interpretiston. Mi supozas, ke la preĝejo plej konvenas por tio. Ĉu troviĝas iu ĉambreto, kiun ni povos uzi?”

”La sakristio sendube konvenos.”

”Ha, jes. Bone. Cetere, ĉu via filo estis ĉe vi sabate?”

”Jes, matene Martin estis hejme, sed poste ne. Verŝajne li vizitis la ĉevalkurejon, kaj vespere iun amikon.”

”Ĉu li nun estas hejme?”

”Ne, sed eble morgaŭ post la kvina.”

”Do, ni pridemandos lin morgaŭ. Tiam ni eble havos ankaŭ Persan interpretiston. Ĝis revido, sinjorino!”

4. La plej naturaj aferoj

Marde matene Svedberg organizas pliajn pridemandadojn. Por la posttagmezo li sukcesas rezervi Perslingvan interpretiston, kaj li interkonsentas kun la veterinaro Lennart Fagerström en Gårdby pri rendevuo. Plue li konstatas, ke Guðrún Jónsdóttir vere troviĝas en la telefonlibro kun titolo "sorĉistino", sed tie li atingas nur telefonresponilon.

"Provu telepation!" proponas Jankéus.

Pli detalaj teknikaj rezultoj venos plej frue posttagmeze. Ili ekstudas la du lokajn ĵurnalojn, kiuj plenas je artikoloj pri la dramoj en Resmo. La pli granda ĵurnalo koncentras sin ĉe la alteklezia pastro, kiu estis mortpafita proksime de loko plena je kontraŭleĝaj islamanaĵoj rifuĝantoj. Ĝia pli malgranda konkuranto informas sobre pri la suspektinda morto de pastro, sed plenigis tri paĝojn per raporto pri la kvarjara Irana knabino, kiun la publika hospitalo rifuzis akcepti pro nekapablo pagi, kaj kiu mortis kelkajn horojn pli malfrue. Pluraj aŭtoritatuloj de la malsanflega administracio estas intervjuitaj, sed ŝajne havis nenion substancan por diri. La flegistino, kiu rifuzis akcepti la knabinon sen pago de kelkaj miloj da kronoj, mem malsaniĝis kaj sekve ne povis komenti la aferon.

"Malsana historio!" komentas Jankéus. "Ŝajnas pli bone fariĝi ĵurnalisto."

"Ĵurnalisto? Kial?" diras Svedberg nekredeme.

"Scias ili same malmulte kiel ni, tamen facile plenigas per tio tutajn ĵurnalojn."



"Jen la leteroj. Infanaĵo, se vi demandas min!"

Lennart Fagerström estas fortika, alta kaj decidvoĉa, kaj disigas malfortan odoron de bovo. Li ŝajnas tre malsimila de sia edzino. Nur la Finnlanda dialekto sonas same.

"Ni vivas separate de du jaroj. Plej bone tiel. Leena ne havas talenton por geedza vivo. Sola suferanto estas la filo. Sed li jam plenkreskis. Do li ĉiuokaze devas sendependiĝi."

Jankéus fotografas la tri pli malnovajn leterojn, kies enhavo aludas je nigra magio, envulto, kaj perversa voluptado. Konkretaj minacoj ne enestas, se ne kalkuli la ripetitan "SATANO VIN PRENOS".

"Ĉu vi konis la mortintan pastron Bexelius?" demandas Svedberg.

"Ne, tute ne. Mi ne emas je ekleziaj aferoj."

"Bonvolu diri, kion vi faris sabate vespere?"

”Nenion. Estis hejme. Ripozis.”

”Ĉu vi estis sola?”

”Hmm. Amikino vizitis min. Viola Fransson.”

Aliajn informojn la du kolegoj ne povas elgajni el la efikimpresa bestkuracisto. Do ili faras provon dudek kilometrojn pli norde, en Långlöt. Post iom da serĉado ili trovas la domon de Guðrún Jónsdóttir, sed neniu respondas la alvokon, kiam ili frapetas ŝian pordon.

”Prenis ŝi la balailon kaj iris en ofica vojaĝo”, estas la nepra komento de Jankéus.

Reirante al la aŭto ili ekvidas maljunulon en la najbara ĝardeno, kaj demandas lin, ĉu li scias kie ŝi estas.

La viro ekzamenas ilin kaj sciigas:

”Matene mi vidis ŝin. Kaj la kato restas, ĝi ĵus kaŝis sin sub la grosujo. Do ŝi certe baldaŭ revenos, la knabineto.”

Kompreneble sorĉistino devas havi katon, kvankam tiu, kiu nun ŝtelrigardas ilin el sub grosarbusto ne estas nigra, sed ordinare stria grizulo. Kaj ”knabineto” ŝajnas nekutima epiteto de sorĉistino. Svedberg rigardas la brakhorloĝon. Restas pli ol du horoj ĝis ili renkontiĝos kun la interpretisto en Resmo. Ili decidas kafumi en proksima vilaĝa skanseno por poste fari plian provon ĉe la sorĉistino kaj ŝia kato.

”Do, evidente la pastro verkadis leterojn”, murmuris Jankéus super sia kafotaso. ”Tamen ne tre talentis li pri tio, ŝajne.”

”Ĝuste tio iom konsternas min. Nature, se iu enmanigis al li revolveron por fuŝe ŝajnigi memmortigon, tiu povus ankaŭ enpoŝigi al li leteron. Ambaŭ agoj iel similas sin laŭ stilo: naivaj, ne tre konvinkaj.”

”Eble iu alia ricevis leterojn, kiuj lin konvinkis, ke la pastro devas malaperi. Kaj la vidvino scias ion pri la leteroj.”

”Prave, tiel ŝajnis. Ni povus reviziti ŝin por eble rigardi lian laborĉambron.”

”Ĉu vi pensas, ke verkanto de anonimaj leteroj arkivigas kopion?” Jankéus demandas kun ironia rigardo.

”Eble jes. Tio kongruus kun la cetera stilo.”



La maljuna najbaro pravis: la knabineto baldaŭ revenis. Kiam la policistoj duafoje haltas antaŭ ŝia ruĝa dometo, ŝi sidas sur la ŝtupareto, karesante sian strian katon, kaj vere impresas tute ne kiel sorĉistino, sed ĝuste kiel ridetanta knabineto en blanka bluzo, blua ĝinzo kaj blankaj trejnŝuoj. Ŝia aĝo sendube ne superas tridek jarojn, kaj ŝi estas svelta, nealta, kun brunruĝa, mallonge tondita hararo.

Kiam Svedberg prezentas sin kiel policiston, kaj petas permeson fari kelkajn demandojn, ŝia rideto malaperas, kaj ŝia mieno alprenas pli atentan trajton, eble timeman.

”Kio okazis?” ŝi rapide sed mallaŭte demandas.

Svedberg, pensante pri la najbaro, petas ke ili eniru, kaj en la vestiblo klarigas, ke ili enketas pri la morto de pastro Bexelius en Vickleby.

Ili sidiĝas en simpla, kampara kuirejo, ĉe tablo kovrita per blua vakstolo. Grandega antikva fridujo zumas en unu angulo, konkure kun kelkaj obstinaj muŝoj en la fenestro.

Svedberg montras la leterkopion kaj demandas:

”Bonvolu diri, kion vi opinias pri ĉi tio.”

Guðrún Jónsdóttir atente tralegas la mallongan tekston, rigardas la du policistojn nenion dirante, kaj denove rigardas la leteron.

”Ĉu vi vidis ion similan?” demandas Svedberg.

Ŝi ankoraŭ iom silentas, poste diras:

”Kiu verkis tion, tiu volas impresi iel primitive, preskaŭ arkaïke. Sed ne estas certe, ke tiu trajto sinceras. Povas esti masko. Ne, mi ne vidis similan, sed mia amikino Leena rakontis kaj recitis al mi aliajn. Ĉu tiu ĵus alvenis al ŝi, vi diris?”

Svedberg pripensas dum momento. La ”knabineto” parolis kun leĝere fremda akĉento de nedifinebla speco. Ŝiaj lastaj vortoj havis ironian tonon, kaj ŝi evidente posedas apartan mensan kapablon, tion li ne pridubas. Li pluas:

”Ĉu vi povas imagi, kiu sendis tiujn leterojn?”

”Verdire ne. Sed vi ja venas pro tiu murdo, ĉu ne? Mi jam antaŭe pensis pri la anoj de tiuj nigraj klerikoj, Bexelius, Sunnanbris kaj aliaj. Tamen, povus esti ĉiu ajn konfuzita homo...”

”Nigraj, vi diris?”

”Nigraj, jes. Ili vere servas la nigrajn potencojn, vi komprenu.”

Svedberg ĵetas helpopetan rigardon al sia kolego, sed tiu mute aŭskultas kun stulta rideto ĉe buŝo kaj okuloj, kvazaŭ enamiĝinto – aŭ sorĉito.

”Se mi ĝuste komprenis, vi mem okupiĝas pri iuj... supernaturaj aferoj?” li klopodas daŭrigi kun videbla embaraso.

”Tio estas miskompreno”, ŝi diras. ”Male, mi okupiĝas nur pri la plej naturaj aferoj.”

”Aha. Nu, bone. Bedaŭrinde ni devas okupiĝi pri murdoj kaj aliaj krimoj...”

”Sed eĉ en tiel malhomaj agoj eblas serĉi tion, kio estas natura”, asertas la knabino, dum sonoras ŝia poŝtelefono. Ŝi respondas, kaj plenumas mallongan kaj efikecan telefonan interparolon kun iu kliento, kio inkluzivas notadon de rendevuo en ŝia elektronika poŝkalendaro.

Antaŭ ol adiaŭi la sorĉistino, Svedberg ekscias, ke ŝi pasigis la tutan antaŭan semajnfino en Stokholmo pro kurso pri psikodramo. Ŝi eĉ nepetite nomas du samkursanojn, ”por la okazo, ke vi bezonos konfirmon pri mia ĉeesto tie”, kiel ŝi diras kun moka rideto.



”Vekiĝu, Jankéus!” diras Roger Svedberg al sia kolego, sidante en la aŭto survoje suden. ”Vekiĝu el la sorĉo! Ĉu vi hazarde kunportas komputilan disketon?”

”Jes, certe”, respondas Jankéus etendante la manon al sia teko sur la malantaŭa sidloko. ”Kial?”

”Bonvolu enpoŝigi ĝin”, petas lia kolego.

La suno brilas lumigante la buntajn aŭtunajn kolorojn de foliarbaro, kiun ili trapasas de oriento al okcidento. Ĉiaj nuancoj miksiĝas – ruĝo de sorpujoj, oranĝa koloro de tremoloj, flavo de betuloj kaj ulmoj, pala bruno de kverkoj, kaj ie-tie la ankoraŭ restanta verdo de fraksenoj kaj alnoj. Svedberg mallevas flankan fenestron de la aŭto por enlasi iom da arbara freŝo, kaj por enspiri la aromon de aŭtuno.

5. Jankéus malviŝas

La laborĉambro de la forpasinta pastro Erland Bexelius prezentas miksaĵon el novo kaj malnovo. Sur la skribtablo kuŝas verda sorba papero kun malhelbluaj inkmakuloj, kaj en skribilujo el malhela ligno kuŝas fontplumo. Apude sur tableto kun tornitaj kruroj, eble iama triktraka ludotablo, staras persona komputilo kiel anakronisma entrudaĵo. Sur librobretoj miksiĝas malhelaj ledbindaĵoj kun bunte broŝuritaj libretoj.

”Ĉu ĉi tie via edzo preparis siajn predikojn?” komencas Svedberg.

”Jes, ĉiam”, respondas la nigre vestita vidvino. ”De pli ol tridek jaroj.”

”Kaj se li ricevis leterojn, tiuj troviĝas ĉi tie?”

”Certe jes. Sed li ne multe korespondis. Eble ĉi tie io kuŝas.” Ŝi malfermas tirkeston kun aro da leteroj, gazeteltondaĵoj kaj dokumentoj sen evidenta ordo.

Svedberg ekfoliumas la paperojn, poste levas la rigardon, montras al la komputilo, kaj demandas senemfaze:

”Ĉu ni povus startigi tiun?”

La vidvino kun senpova mieno diras:

”Mi eĉ ne scias, kiel funkciigi ĝin.”

Svedberg kapsignas al Jankéus, kaj tiu sidiĝas ĉe la komputilo kaj ŝaltas ĝin. La aparato ekzumas, kaj post kelka tempo Jankéus demandas:

”Pardonu, sinjorino, sed ĉu hazarde konas vi la pasvorton, kiun uzis via edzo por startigi Windows?”

‘Stulta demando’ pensas Svedberg, dum la sinjorino levas la ŝultrojn kun eĉ pli senpova mieno ol ĵus.

”Mi tute ne komprenas tiun maŝinon.”

Jankéus prove klavas ion kelkfoje, ŝajne sensukcese. Li demandas:

”Ĉu via edzo havis duan personan nomon?”

”Jes... Abraham”, respondas konsternite la vidvino.

Jankéus klavas plu, kaj suspiras. Poste li faras ion, kaj la ekrano nigriĝas. ‘Li fiaskis’, pensas Svedberg kaj foliumas plu. Sed Jankéus skribadas per la klavaro, blankaj tekstoj preterkuras sur la nigra ekrano, li enŝovas sian disketon kaj ankoraŭ klavas. Svedberg turnas sin al la vidvino:

”Ĉu via edzo regis la anglan lingvon?”

La konsterniĝo de la vidvino kreskas ĝis plena konfuzo. Evidente ŝi tamen havas sufiĉan fidon je la polico por bonkondukte respondi:

”Iomete, mi pensas. Ne tre bone, sed mi kredas, ke li iufoje legis ion en tiu lingvo.”

Svedberg denove kliniĝas super la fasko da paperoj, kiun li trovas terure teda. Vidante ke Jankéus ŝajnas preta, li tamen petas permeson

kunporti la paperojn al la policejo, kontraŭ kvitanco. La vidvino hezite permesas tion.

Subite eksusuras la printilo, lokita sur librobreto inter biblioj kaj kateĥismoj. Jankéus elprenas la printitan paĝon kaj sian disketon, kaj poste malŝaltas la komputilon.

Poste, en la aŭto, Svedberg scivolas:

”Ĉu vi ion trovis?”

”Dubinde. Ekigi Windows ne eblis, manke de kodvorto. Feliĉe scias mi iom DOS-umi. Li ŝajne uzas... hmm... uzis Word aŭ WordPerfect. Malviŝis kaj kopiis mi ĉiujn viŝitajn dosierojn de la lastaj tri semajnoj. Estis nur naŭ dosieroj. Ni rigardu ilin ĉe ni.”

”Malviŝis?! Bone”, diras Svedberg, ŝajnigante ke li ion komprenis. Li supozas ke Jankéus, post ilia vizito ĉe la sorĉistino, ekhavis kapricon montri sian propran talenton pri magio. Memorante la printilan sonon, kiu fine akompanis la komputilan manipulado, li demandas:

”Kion vi eltajpis?”

”Ho, nenion. Nur presprovaĵon, por vidi kiel ĝi printas.”



Tri horoj en la sakristio de Resmo sufiĉe lacigas komisaron Roger Svedberg. Ne pro tio, ke la demandado postulas apartan fortostreĉon aŭ estas iel drama. Sed pridemandi helpe de interpretisto dekon da rifuĝantoj, kiuj kaŝas sin en preĝejo, interalie por eviti la policon, postulas iom da organizado kaj takto. Sen la helpo de Leena Fagerström la afero entute ne estus plenumbla. Krome aldoniĝas aparta problemo, kiun li tute ne povis antaŭvidi. Kiam la rifuĝantoj unuafoje renkontas Sved-Persan interpretiston, sinjorinon Fatemeh Mozaffari, ili tre avidas utiligi ŝin por elmelki informojn pri Svedio kaj siaj ŝancoj resti, kion la interpretisto malmulte povas kontentigi.

La unua pridemandato estas Mehdi Ghamari, patro de la mortinta knabino Jasmin. Li estas kompakta viro tridek- aŭ tridekkvinjara, kun fermita mieno, kiu ne rivelas multon de liaj pensoj aŭ emocioj. Li havas nigrajn harojn kaj nigrajn lipharojn. Svedberg tuj rimarkas, ke li tre malemas respondi ĉiujn demandojn, sed post longa provado per diversaj ĉirkaŭfrazoj li konfirmas parton de la informoj donitaj pli frue de Leena Fagerström kaj Torkel Wibe. Li vere eliris el la preĝejo – la horon li tute ne notis, sed ”iomete post kiam la doktoro alvenis”.

”Kien vi iris? demandas Svedberg.

”Nenien. Nur promenis.”

”Kie vi promenis?”

Ŝultrolevo estas la sola respondo, kio ja faciligas la taskon de la interpretistino (‘kondiĉe ke ŝultrolevo havas tutmonde egalan signifon’, pensas Svedberg).

”Ĉu sur la ŝoseo?”

”Ne. Trans la ŝoseo. Sur tiu... ebena dezerto.”

La aspekto de la Oelanda stepo, kiu komenciĝas tuj trans la ŝoseo, vere impresas preskaŭ kiel dezerto. Ankaŭ Svedberg trovas la priskribon de Ghamari adekvata.

”Kiel longe vi promenis?”

”Mi ne scias. Ne longe. Mi iris ĝis la malgranda ŝoseo, kiu kondukas orienten. Poste mi revenis laŭ tiu vojo.”

”Ĉu vi aŭdis ion dum via promeno?”

”Nenio. Troviĝas nenio tie.”

”Dum kiom da tempo vi estis for?”

”Mi ne scias.”

”Kio okazis, kiam vi revenis?”

”Nenio. Mi iris al mia edzino kaj la filino, mia morta infano.”

Svedberg montras foton de la mortinta pastro Bexelius, sed Mehdi Ghamari post mallonga rigardo komentas:

”Ne. Mi ne konas.”



Svedberg pridemandas entute naŭ plenkreskulojn. Ĉiuj krom Mehdi Ghamari restadis la tutan koncernan tempon en la preĝejo aŭ tuj ekster ĝi, por fumi. Neniu rekonas la pastron laŭ la foto. Post la tria demandado li sendas sian kolegon por trovi la filon de la pastrino kaj pridemandi tiun.

Tom Jankéus paŝas al la pastrejo kaj trovas la junulon hejme. Martin Fagerström estas svelta sed fortika blondulo kun iom suspektama rigardo. Li enlasas la policiston en la kuirejon, kiu estas vasta kiel halo. Ili sidiĝas ĉe granda tablo el masiva pinligno. Sur la lavtablo staras amaso da lavota vazaro. Surmura kalendaro ankoraŭ montras la monaton aŭgusto.

Jankéus ĵetas rigardon trafenestre al la eksterdomaj aceroj, kie oktobra vento penas forbalai la ruĝajn foliojn.

”Mi vin petas rakonti, kion faris vi sabate”, li komencas.

”Mi ne estis ĉi tie”, diras la knabo paŭte.

”Kie vi estis?”

”En Kalmar, ĉe amiko.”

”Nome?”

”Patrik Eriksson, Stensbergsvägen 15.”

”Je kioma horo vi iris tien?”

La junulo pripensas.

”Mi ekiris de ĉi tie eble je la kvina, por iom fiŝadi. De tie mi iris senpere al Kalmar kaj venis tien je la oka.”

”Kie vi fiŝis?”

”En la markolo, ĉe Lilla Frö.”

”Kaj kiam revenis vi tien ĉi?”

”Nur hodiaŭ. Mi tranoktis ĉe mia amiko.”

Jankéus denove rigardas eksteren tra la fenestro, kvazaŭ sopirante al pli interesa tasko. Li ne ŝatas pridemandadojn, kie malgraŭ lia pacienca fiŝado, tamen nenio valora kaptiĝas.

”Bone. Ĉu konis vi la mortinton?”

La knabo hezitas momenton, poste demandas:

”La pastron de Vickleyby? Ne. Kial mi konu lin?”

”Mi ne scias. Najbaro, preskaŭ. Kolego de via patrino.”

”Li estis tia, kiu malamas virinajn pastrojn.”

”Jes. Ĉu havis li samideanojn en la regiono, laŭ vi?”

”Kredeble kelkajn, sed mi ne konas ilin. Kial do?”

”Aŭ kontraŭulojn?”

Li denove pensas dum momento.

”Tio estus mia patrino, ekzemple. Fakte, la plej multaj homoj kredeble ne konsentus kun li.”

”Sed ĉu vi povas pensi pri iu speciala malamiko de Erland Bexelius?”

”Ne. Mi dubas, ĉu troviĝas. Li estis sendanĝera maljunulo, laŭ mi. Sed mi ne konas tiujn pastrajn aferojn.”

”Ĉu iam aŭdis vi pri anonimaj leteroj?”

Martin Fagerström ĵetas surprizan rigardon al Tom Jankéus.

”Ne. Ne laŭ mia memoro.”

”Ĉu vi ion kaptis?” La mieno de Jankéus ne rivelas, ĉu li ŝercas aŭ seriozas.

”Kaptis?”

”Sabate. Fiŝante. Ĉu vi havis bonŝancon?”

”Aha. Ne tre. Fakte, mi ricevis nenion, kion indus konservi.”

La buŝo de Jankéus formas ironian rideton apenaŭ videblan. ”Do, same kiel mi”, li duonvoĉe murmuris.



La malalte staranta suno preskaŭ blindigas ilin dum la reveturado trans la markolon. Sub la longa ponto inter Oelando kaj la Smolanda bordo la akvo muare brilas, kaj la urba konturo de Kalmar fariĝas nura nigra silueto.

”Magra posttagmezo”, komentas Jankéus, kiam ili revenas urben.

En la policejo ĉe la strateto Malmbrogatan tamen atendas ilin pli riĉa vespera rikolto. Dum Svedberg profundiĝas en kelkaj teknikaj raportoj, kiuj

alvenis dum ilia foresto, Jankéus malaperas al sia komputilo. Post kelkaj minutoj li tamen staras en la pordo de Svedberg kun sia plej petola mieno:

”Venu rigardi kion malviŝis mi!”

Kelkjara sperto diras al Svedberg, ke ne indas peti klarigon. La plej efika konduto estas bonvole akompani la kolegon al lia komputila ekrano, sur kiu vidiĝas per grandaj nigraj majuskloj la facile rekonebla teksto de la anonima letero trovita en la poŝo de la murdito. Jankéus alklakas ie per la muso, kaj jen aperas alia majuskla teksto:

MI SCIAS, KIE VI LOĜAS:
TIE, KIE ESTAS LA TRONO DE SATANO
VI INVITIS FALSAN DION
VI SERVAS ALAHON
VI ADULTAS KUN MAHOMETO
KRISTO BRULMARKOS VIN

”Ĉu tio estas la komputilaĵo de la pastro?” demandas Svedberg kun preskaŭ admira tono.

”Jes. Jen lia komputila sekreto de la 26a de septembro. Sed nun atentu! Jen novaĵo!” gajas Jankéus kaj denove alklakas.

VI SERVAS AL MAMONO
VIA EDZINO ADULTAS KUN DEMONOJ
ŜI SODOMIAS KUN SATANINO
ŜI NOMAS SIN PROFETINO
KAJ ŜI DELOGAS LIAJN SERVISTOJN
MALĈASTI
KIEL LONGE VI TOLEROS ŜIAN
MALĈASTADON?

”Jen de la 10a de oktobro. Samtage kiel la enpoŝa letero kaj la murdo. Tion ne montris al ni la bestodoktoro!”

Svedberg pensas dum momento, kaj poste diras:

”Bone, ni kontrolas morgaŭ, ĉu ĝi estis liverita al sinjoro Fagerström. Povus esti ankaŭ al iu alia, kompreneble. Ĉu estas ankoraŭ pliaj?”

”Ne, sed sufiĉas tiuj tri, ĉu ne? Krome, laŭ mia diletanta okulo, la printaĵo kiun mi faris en lia laborĉambro ne diferencas de la letero en lia poŝo.”

Roger Svedberg reiras al siaj teknikaj raportoj. La murdito, kiel oni jam supozis, mortis de kuglo, kredeble pafita je distanco de kvin ĝis dek metroj tra la dekstra parto de la kapo. La mortotempo kongruas kun la informoj donitaj de Torkel Wibe, tio estas, ke la morto povis okazi ĉirkaŭ la dudek-unua horo sabate. La kuglo trovita de Jankéus estis pafita per la trovita revolvero. Sur la revolvera kolbo ne estas fingrospuroj, sed sur ĝia tubo troviĝas spuroj de nekonata persono. La letero trovita en la poŝo de la murdito tute malhavas fingrospurojn. Surtere inter la loko, kie la kadavro kuŝis, kaj la loko, kie la kuglo estis trovita, troviĝis sango de du personoj. Unu el ili sangogrupe kongruas kun la mortinto, dum la alia ne kongruas. DNA-testo estos farita por kontrolo. Sango de la dua speco troviĝis plej grandkvante sur la grundo sub la kadavro, dum la sango de la mortinto plej amasiĝis en loko sur la malnova tervojeto, proksime al la trovita kuglo.

Tiu raporto estas la lasta, kion Roger Svedberg tralegas, antaŭ ol hejmeniri tiuvespere, kaj tiuj informoj pri la sango de du homoj akompanas lin hejmen kaj en la dormon.

6. Vojo de sekureco

Svedberg verkas raporton pri la murdenketo. Li tajpas per komputila klavaro, sed la teksto rapidege kaj nelegeble preterruliĝas surekrane. Ĝenas la tajpadon, ke liaj manplatoj plenas je sango. Li singarde manipulas por ne makuli la klavojn, kaj krome li devas zorgi ne miksi la sangon de unu mano kun tiu de la alia.

Eĉ vekigante li tenas ambaŭ manojn rigide antaŭ si, kaj li devas lumigi kaj rigardi la polmojn por certiĝi, ke la gluiĝema sango estis pura sonĝaĵo. Li trinkas glason da akvo kaj reendormiĝas.

Matene la malagrabla inkuba sento estas for. Li matenmanĝas, babilante kun sia edzino pri ĉiutagaĵoj, aĉetindaj aferoj por la hejmo kaj planoj por Kristnasko. Poste li en bona humuro aŭtas al la policejo. La mateno estas tipa oktobra mateno ĉe la marbordo: ventpelataj nubaj ĉifonoj ĉasas unu la alian, kaj pluvgutoj aspergas la frontglacon de lia aŭto. Laboreje li konstatas, ke la lokaj ĵurnaloj daŭrigas ĉiu sian kampanjon, sed manke de substancaj novaĵoj ili remaĉas la jam konatajn faktojn kaj fantaziojn. La malgranda ĵurnalo postulas demision de la hospitala direktoro Thunell, dum la pli granda prezentas intervjuon kun pastro Sunnanbris, laŭ kiu la pastrinoj iel prezentas minacon al la sekureco de veraj pastroj – do, de viraj pastroj.



Kiel kutime dum la lastaj semajnoj, Leena Fagerström matenmanĝas en sia preĝejo kun la rifuĝantoj. En la sakristio du virinoj preparis teon kaj marmeladon el pomoj kaj sorpoj, dum la pastrino alportas panon kaj jogurton. Ŝi tre ĝuas tiujn komunajn manĝojn en tute ne praktika manĝejo, kaj ofte partoprenas ankaŭ vespermanĝon kun la Irananoj. En la pastrejo – malofte ŝi diras "hejme" – ŝi nuntempe neniam emas manĝi. Antaŭe jes, kiam ŝia filo estis pli juna, kaj ili manĝis kune kaj dividis la okazintaĵojn de la tago. Sed nun ne plu. Neniam ili nun manĝas samtempe kaj samloke. Kun la rifuĝantoj ŝi eble ne dividas siajn proprajn zorgojn, sed iomete ŝi tamen partoprenas en ilia vivo. La komuna manĝado kvazaŭ redonis al la manĝo iom el ĝia sankteco, kiun ĝi tute perdis en ŝia hejmo, la pastrejo.

Ekster la preĝejo de Resmo du viroj staras fumante cigaredojn. De temp' al tempo ekbriletas inter flugantaj nuboj la pala suno de Sveda oktobra mateno, sed tiu malmulte varmigas, des malpli ĉar de la sama direkto venas obstina vento el trans la senarba ebena. Vento el sudoriento, el trans la maro, de kie ili venis por komenci novan vivon. Per mallongaj,

duonaj frazoj ili remaĉas memorojn de la longaj monatoj en diversaj provizorejoj, kie ili atendadis sian pluan sorton. Tendaro en Turkmenio, ĉe la Kaspia maro. Rifuĝejo en Moskvo. Malliberejo apud Rigo en Latvio. Holdo de rusta ŝipaĉo, kiu fine grundis ĉe la orienta Olanda bordo. Kaj nun Sveda vilaĝa preĝejo.

”Ĉu vi pensas, ke li fakte pafis tiun pastron?” mallaŭte demandas unu. Lia nomo estas Masoud Ĥosravi, kaj lia profesio, kiun li jam de pluraj jaroj ne plenumas, estas instruisto pri historio kaj filozofio.

La alia viro elblovas fumringon kaj respondas:

”Mi timas, ke jes, kvankam mi ne komprenas kial. Sed mi esperas, ke li tamen sukcesos veni al Stokholmo. Tie li devas havi pliajn ŝancojn.”

Tiu dua fumanto estas Mohammad Mirzadeh, doktoro pri aerodinamiko kaj aŭtoro de maldika poemaro, kiu bedaŭrinde ne estis eldonebla en lia hejmlando. Ŝajnas dube, ĉu li havos pli grandan literaturan sukceson en sia nuna restadlando.



En la policejo de Kalmar Svedberg spertas iom da malfacilo resumante la ĝisnunan enketon al la poliestro. Dume Jankéus telefone interparolas kun Lennart Fagerström.

”Tre utilis via helpo pri la anonimaj leteroj al via edzino. Sed vi ne menciis tiun leteron, kiun ricevis vi mem sabate.”

La linio dum kelkaj sekundoj ŝajnas morta. Poste sinjoro Fagerström diras:

”Kiu letero?”

”La anonima letero, kiun ricevis vi lastan sabaton.”

”Ĉu vi ŝercas? Aŭskultu, mi estas sufiĉe okupita...”

”Ankaŭ mi. Ĉu vi havas faksilon?”

”Jes. Sama numero.”

”Do, interrompu ni provizore, kaj mi faksos al vi paĝon. Ĉu en ordo?”

”Se plaĉas al vi.”

Jankéus faksas la leteron de la 10a de oktobro, kiu supozeble celis la edzon de la pastrino, kaj poste retelefonas. La veterinaro nun iomete pli elokventas:

”Aŭskultu. Mi ĵuras, ke mi neniam antaŭe vidis tiun stultaĵon. La stilo ja similas la leterojn al Leena, sed mi ricevis nenium. Ĉu vi komprenas?”

”Jes ja. Ĉu vi povas imagi, al kiu alia persono estis sendita tiu ĉi letero?”

”Ne. Ŝajnas celi min. Sed mi neniam antaŭe vidis ĝin.”



Svedberg cerbumas pri la fingrospuro sur la revolvera tubo, kaj pri la sango de dua persono. Ambaŭ estas bonegaj indikoj, sed mankas evidenta suspektito, de kiu eblus postuli sangoteston kaj fingropremaĵon. Li iras al la ĉambro de Tom Jankéus:

”Jankéus! Tiuj Iranaj rifuĝantoj – ĉu vi pensas ke la Enmigrada Administrejo havas iliajn fingropremaĵojn?”

”Demandos mi.”

Post dek minutoj li raportas, ke bedaŭrinde ne. Normale oni prenas tiajn, por kontroli, ĉu iu jam rifuzita persono revenas sub alia nomo. Sed en ĉi tiu kazo, dank’ al la pastroj de Stenåsa kaj Resmo, la Administrejo neniam havis okazon kolekti fingropremaĵojn.

”Aĉe! Sed eble tiu servema pastrino povus refoje iel helpi nin”, murmuris Svedberg. ”Sufiĉus se ŝi liverus ion, kion palpis tiu Ahmed Kamelo aŭ kiel-li-nomiĝas. Cetere, kial mi mem ne aranĝis tion? Nu, ne estas tro malfrue.”

Dirite-farite. Post duonhoro la aŭto de Svedberg haltas antaŭ la pastrejo de Resmo. Neniu malfermas, kiam li frapetas. Do li pluiras al la preĝejo. Pastrino Fagerström ne ĉeestas, kaj li sentas bezonon de ŝia helpo, por ne fuŝi la aferon. Unu el la Iranaj virinoj diras en la angla lingvo ”Oficejo! Pastra oficejo!” kaj poste ion, kion li interpretas kiel ”Mörbylånga”, la nomo de proksima vilaĝo. Li telefonas al la numerinformejo, poste vokas la pastran oficejon, kie li finfine trovas sinjorinon Fagerström.

”Mi forgesis demandi ion hieraŭ. Ĉu vi bonvolus konvinki sinjoron...” – li konsultas sian slipon – ”sinjoron Ghamari, ke mi bezonas ankoraŭ mallongan interparolon kun li?”

Leena Fagerström konsentas, kaj post duonhoro li trovas sin denove en la sakristio kun la moroza Iranano. Svedberg transdonas al li fotojn de tri pli-malpli hazarde elektitaj krimuloj, demandante angle, ĉu Ghamari rekonas tiujn personojn.

”Ne. Neniam vidis.” Mehdi Ghamari redonas la fotojn, singarde tenante ilin ĉe la randoj. Tie certe neniu tuta fingrospuro restos. Svedberg pentas, ke li agis tiel spontane. Necesas improvizi. Li elpoŝigas notlibron kaj globkraĵonon, alternas blankan paĝon, kaj transdonas ambaŭ al la Iranano.

”Bonvolu skribi vian nomon.”

”Kial?” la viro hezite demandas, palpante la notlibron kaj skribilon.

”Nura formalaĵo. Mi forgesis noti vian nomon. Por mia raporto.” Svedberg levas la ŝultrojn kaj ridetas, kvazaŭ li senkulpigus sin pro erareto.

La Iranano skribas *MEHDI GHAMARI* kaj redonas la aĵojn. Svedberg enpoŝigas ilin petante pardonon pro la ĝeno.

‘Kiom da klopodo pro tia bagatelo. Kompreneble li ne murdis la pastron. Kia ideo! Kial li murdus lin? Tamen estos bone ekskludi lin’, Svedberg pensas aŭtante norden. ‘Tiu stultulo Jankéus jam telefonis al la veterinaro. Alie mi povus fari la samon ĉe li. Nu, mi elpensos ion.’

Revenante en la policejon li liveras sian globkrajonon kaj notlibreton al la teknika sekcio. Poste li kaptas alian ideon. Denove li serĉas sian kolegon por diskuti.

”Jankéus! Ĉu vi havas tempon?”

”Ĉiam, ĉefo!”

Tio sendube estas ironiaĵo. Normale li respondus ‘Manko de tempo ne mankas’ aŭ ion similan. Svedberg tamen elektas kompreni lin laŭlitere.

”La edzino, la pastra vidvino, ŝajne sciis aŭ divenis ion pri la anonimaj leteroj. Eble ankaŭ aliaj scias aŭ divenis. Eble aliaj ricevis leterojn. Kiu povus orienti nin inter la diversaj koterioj de la eklezio?”

”Hmm. Povus ni komenci per liaj samideanoj. Tiu alteklezia aktivulo ĉi tie en Kalmar, ekzemple.”

”Sunnanbris? Bone, kial ne?”



Pastro Lars Gustav Sunnanbris akceptas ilin en malgranda sed solena oficeja ĉambro en bela domo el la deksepa jarcento ĉe la Malgranda Placo. Lia skribtablo estas zorge polurita kaj senpolvigita. Sur ĝia dekstra angulo pozas granda paperpremilo el kristalvitro en formo de nuda virino, sur la maldekstra tronas vitra ujo kun bombonoj, kiujn li ofertas al la du policistoj. Surmure serio da bildoj pri dolmenoj kaj tumuloj. La pastro mem estas diketa, senbarba kvardekjarulo kun helblua rigardo.

”Pastro Bexelius ja estis via kolego”, komencas Svedberg.

Sunnanbris kapjesas digne kaj senvorte, dum la policisto daŭrigas:

”Ni klopodas kolekti pecojn por formi bildon pri liaj amikoj kaj malamikoj, por pli bone kompreni kien direkti nian enketon.”

La pastro prenas krajonon kaj rotaciigas ĝin inter la fingroj dum li ekparolas:

”Mi konas nur liajn ekleziajn samkredanojn – kaj malsamkredanojn. Ŝajnas tre malprobable, ke ili rilatas al lia morto. Ĉu ne temas pri iu hazarda ago de perfortulo?”

”Nature ni esploras ankaŭ tiun eblon”, pli-malpli mensogas Svedberg. ”Sed la polico ne povas limigi sin al unu hipotezo.” Tiu frazo sonas preskaŭ komike oficiala; eble la etoso de ĉi tiu ĉambro iel influas ankaŭ la vizitantojn.

”Mi komprenas”, mielas pastro Sunnanbris. ”Nu, vi sendube scias, ke Erland Bexelius apartenis al la altekleziaj rondoĵoj, same kiel mi. Kaj en la apuda paroĥo ja troviĝas unu el la plej konataj tiel nomataj virinaj pastroj de nia diocezo, sinjorino Fagerström. Ŝia maniero utiligi la sanktan preĝejon por diversaj spektakloj sendube provokis multajn kristanojn, kaj tiuj ondoj eble plaŭdis ankaŭ ĝis la najbara preĝejo de Vickleby.”

”Ĉu Bexelius iel agis kontraŭ Leena Fagerström?”

”Jes, fervore. Li avizis al la dioceza kapitulo pri certaj misaĵoj en la paroĥo de Resmo. Senrezulte, bedaŭrinde.”

”Pri kiuj misaĵoj temis? La rifuĝantoj?” demandas Jankéus.

”Ne, tio estas tro ĵusa afero. Temis pri uzo de la preĝejo por profana aŭ eĉ superstiĉa aktivado de personoj tre malproksimaj de nia konfesio.”

”Sorĉistino, eble?”

”Jes, interalie aperis tie iu Islanda blagistino, aŭ tiel nomata sorĉistino. Sed vi pravas, ke ankaŭ la afero pri rifuĝantoj zorgigis lin. Persone mi trovas la agadon de sinjorino Fagerström por helpi al rifuĝantoj tre laŭdinda. Ni ekleziuloj devas multe pli aŭdace kaj sendepende batali kontraŭ la ŝtato kaj ĝiaj leĝoj. Sed ŝi devus trovi alian ejon por tiuj homoj ol kristanan preĝejon!”

”Do, Bexelius aktivis por sia opinio. Ĉu tio havigis al li malamikojn?” demandas Svedberg.

”En la eklezia debato jes. Sed tia malamiko, kiu murdus – tio ŝajnas inkuba fantazio! Kaj tamen tiu maljuna sincerulo mortis.” La voĉo de Sunnanbris tremas ĉe la vortoj ‘maljuna sincerulo’, kaj fadas ĉe ‘mortis’.

”Kaj ekster la eklezio?”

”Erland Bexelius preskaŭ ne vivis ekster la eklezio. Mi ne povas imagi, kio havigus al li malamikon. Mi ankoraŭ preferas kredi pli multe je la hazarda perfortulo.”

”Ĉu vi scias, ke anonimaj leteroj estis sendataj en tiuj Oelandaj paroĥoj?”

Pastro Sunnanbris rigardas komisaroon Svedberg kun malaproba mieno, kvazaŭ post blasfemo:

”Ĉu vere? Nu, kredeble tiaj aferoj povas okazi ĉie. Oelando ne estas Edeno, kvankam fojfoje oni pensas tiel.”

”Sed ĉu vi jam aŭdis pri tio?”

”Ne. Neniam.”

Jankéus montras la leteron de la 26a de septembro. La pastro rigardas ĝin kaj ridas:

”Jen! ‘Vi adultas kun Mahometo.’ Tio estas bona! Trafaj esprimoj, ĉu ne? ‘Trono de Satano’. El Apokalipso, ŝajne.”

”Ĉu vi imagas, al kiu oni sendis tiun?” demandas Svedberg.

”Se mi rajtas diveni – al sinjorino Fagerström. Ĉu mi pravas?”

”Kaj kiu sendis ĝin?”

”Nu, mi mem ne povas fieri pri tio.”

”Sed eble pastro Bexelius?”

”Tion mi definitive ne kredus. Li estis multe tro tradicia, malnovstila Sveda paroĥestro. Pli kredeble iu juna entuziasmo respondecas.”

Svedberg pripensas, ĉu malkaŝi la veron al la amuzita pastro, sed trovas tion senseca. Anstataŭe li demandas:

”Sabate, en la tago kiam pastro Bexelius mortis, ĉu vi kontaktis lin?”

Sunnanbris sulkigas la frunton, sed ĝi baldaŭ reglatiĝas:

”Jes, prave. Mi telefonis al li por diskuti la dimanĉajn predikojn. Ni ofte faras tiel. En milito necesas kunordigi la fortojn. Kiel policisto, vi eble konsentas?”

”Kion li intencis pritrakti en sia planita prediko?”

”Nu, la dimanĉo estis la Tago de Danko. Ni diskutis pri diversaj aferoj, pro kiuj ni devas danki al Dio. Precipe pri Lia Leĝo, tio ke ni ne devas vivi en plena konfuzo, sed Li montras al ni la ĝustan vojon, laŭ kiu ni iras en sekureco.”

Svedberg dankas pro la informoj kaj forlasas la ĉambron rezistante ian tenton riverenci.

”Tamen tiuvoje, kie biciklis Bexelius sabate, ne iris li en sekureco”, komentas Jankéus paŝante tra la malebena bulŝtone pavimita Malgranda Placo.

7. Kazo solvita?

Tuj postlunĉe inspektoro en la teknika sekcio de la policejo telefonas al Svedberg:

”Vi pravas. Estas la sama ulo.”

”Kio?”

”La fingrospuroj de la revolvera tubo identas kun tiu de via notlibro. Vi trovis la ĝustan ulon.”

Svedberg miras. Lia intuo trompis lin. Do, ĉu la kazo jam estas solvita? Li rezervas tempon kun la prokuroro, resumas la kazon, kaj ricevas permeson aresti la kontraŭleĝan rifuĝanton Mehdi Ghamari pro suspektita murdo sen antaŭmedito.

La aresto fariĝas tumulto. Svedberg, Jankéus kaj du pliaj kolegoj eniras la preĝejon de Resmo, ankoraŭ du kolegoj atendas ekster la pordo. Svedberg prezentas la dokumenton pri aresto kaj klarigas mallonge angle, kion ĝi signifas. Ghamari rifuzas kuniri, kvar ĝis kvin aliaj personoj klopodas bari la vojon, kiam la policistoj perforte kuntrenas lin. La du eksteraj policistoj devas enveni por forigi virojn kaj virinojn, kaj fine la ses policistoj kunlabore sukcesas enpuŝi Ghamari’n en la polican buseton kaj forveturi.

En la policejo Svedberg prokrastas al morgaŭ la demandadon de Ghamari. Oni faras sangoteston kaj sendas lin en la arestejon.

”Unu afero iomete defias mian komprenon”, diras Svedberg antaŭ ol hejmeniri vespere. ”Se li perdis tiom da sango, tio signifas, ke li vundiĝis, sed ŝajne li neniam montris sin vundita.”

”Eble trafis lin atako de naza sangado, kiam trenis li la pastron”, respondas Jankéus. ”Kio provokas *min*, tio estas: kiel li sukcesis elverŝi sian sangon *sub* la kadavron de la pastro?”



Vespere deĵoranta policisto en Kalmar ricevas anoniman telefonvokon. Estas nur kelkaj mallongaj frazoj, el kiuj duonon oni sukcesas surbendigi. Obtuzo voĉo parolas rapide kaj dishakite:

”Temas pri la murdo... de pastro Bexelius... Vi devus demandi pastron Ekström en Stenåsa... kion li faris sabate vespere... inter la oka kaj deka... Demandu lin!”

Post kiam la voĉo malaperis, kaj la linio estas rompita per subita klako, la deĵoranto skuas la kapon. Al ĉiu murdenketo apartenas ankaŭ kelkaj frenezuloj, kiuj suspektas siajn najbarojn. ”Nu, prefere tiajn, ol tiujn kiuj

denuncas sin mem”, li pensas verkante mallongan noton por matene sendi al la enketanta komisaro.



Estas frua mateno, jaŭde la 15an de oktobro. La pensiita fiŝisto Nils Sjögren traserĉas siajn fiksjajn retojn por angilkaptado ĉe la marbordo sude de Kalmar. Estas sunleviĝo kaj tri-kvar gradoj super nulo. La vento blovas modere de sudoriente.

Unu el la retoj estas disŝirita kaj ŝargita per iu granda kaptaĵo. Sjögren malbone vidas, kaj en la matena duonlumo la akvo plumbe grizas. Li levas ion super la akvon. Ĝi estas homa piedo kaj kruro kun verdstria ŝtrumpo kaj griza pantalono.

Nils Sjögren lasas la piedon regliti akven, startigas la eksterpoban motoron de sia boato kaj veturas hejmen por alvoki la fajrobrigadon. La fajrobrigadistoj estas tiuj, kiuj ne nur estingas incendiojn kaj savas katidojn el tro altaj arboj, sed krome savas dronantojn kaj elakvigas dronintojn.

Post iom da laboro ĉe la angilretoj oni elakvigas la korpon de viro, nigrabarulo kun lipharoj, vestita per griza kompleto. Sed la fajrobrigadistoj baldaŭ vidas, ke ĉi tiu mortinto ne dronis. Li havas disŝiritan ĉemizon kaj malbelan pikvundon en la brusto.



Posttagmeze Svedberg interkonsiliĝas kun Jankéus en sia laborĉambro. Li resumas:

”La fingrospuro de la pafilo jes estas tiu de Ghamari, sed la sango ne. Male, la sangogrupa de la mara kadavro kongruas kun la sangomakuloj. DNA-analizon ni ricevos, kiam tio plaĉos al la pigruloj en Linköping. Antaŭ ol konfronti nian arestiton kun la nova mortinto, mi ŝatus provi ekscii pli multe pri li. Laŭ sia aspekto la viro ŝajnas evidenta sudlandano, kaj li kredeble kuŝis en akvo de kelkaj tagoj. Ĉu ne nia pastrino iam parolis pri unu rifuĝanto, kiu forlasis la grupon?

”Jes, vi pravas. Sed kiam tiu malaperis, laŭ ŝi? Mi ne memoras.”

”Sendube ni ne demandis pri tio. Do, ek al Resmo denove!”



Ĉi-foje oni ne invitas komisaroon Svedberg eniri, nek en la preĝejon, nek en la pastrejon. La aresto de Ghamari frostigis la jam malvarmetan atmosferon en Resmo. Sur la preĝeja ŝtuparo li montras la foton de la viro trovita en angilreto.

”Jes, tio estas nia homo. Reza... mi forgesis la familian nomon. Ĉu droninta? Terure!” Leena Fagerström aperas ŝokita.

”Ĉu vi memoras, kiam li forlasis la grupon?”

”Nuu... ne estas tute facile diri. Li estis pli aktiva ol la aliaj kaj kelkfoje foriris de la preĝejo dumtage, sed revenis vespere. Mi ne scias, kien li kutimis iri, sed mi memoras, ke li iufoje havis problemon kun la busŝoforo. Sed post sabate mi tute certe ne plu vidis lin. Do, kredeble li malaperis sabate... Jes, vendrede vespere mi memoras, ke li revenis al la preĝejo de iu ekskurso.”

”Bone. Sabate, do. Kaj ĉu vi aŭdis lin diri ion, kio povus indiki, kial li ‘ekskursis’ tiel?”

”Ne, mi nenion tian memoras.”

”Kian problemon li havis kun ŝoforo?”

”Nu, mi iom hontas pro tio, ĉar fakte li unue demandis min, ĉu li povus senriske iri per la aŭtobuso al Kalmar. Li timis polickontrolon kaj similajn aferojn. Mi diris, ke certe ne okazas tiaj en la buso, kaj li ekiris. Sed li havis malbonŝancon trafi nian blu-flavan ŝoforon, kaj la rezulto estis kverelo aŭ miskompreno aŭ mi-ne-scias-kio, kaj li baldaŭ revenis.”

”Blu-flavan ŝoforon?”

”Jes, tiun John Blidh, kiu estras naciisman ”blu-flavan” movadon... Li estas konatulo en la komunumo de Mörbylånga; li formas unupersonan partion en la komunuma konsilantaro, kaj krome li estas ano de mia paroĥa estraro – tial mi konas lin bone, tro bone.”

Leena Fagerström kunportas la foton en la preĝejon, kaj post kelkaj minutoj du viroj kun malamika mieno aperas en la pordo. Ili lakone atestas, ke la viro de la foto estas Reza Sajadirad, kuzo de Mehdi Ghamari.

”Kuzo de Ghamari? Kaj kiam li forlasis vin?”

La Irananoj rigardas unu la alian kaj ŝajne ne povas decidiĝi ĉu respondi aŭ ne:

”Ni ne scias certe.”

”Ĉu lastan sabaton?”

”Eble sabate, eble alian tagon.”

”Kien li iris?”

Ŝultrolevoj.



Ĉi-foje Svedberg havas bonŝancon – kiam li sonorigas ĉe la pordo de John Blidh, apuda fenestreto malfermiĝas, kaj viro anoncas:

”Minuteton! Mi duŝas min. Atendu iomete.”

Do, Roger Svedberg atendas antaŭ la domo ĉe la strato Södra Långgatan en Mörbylånga, la komunuma centro de suda Olando. La vento

susuras en aleaj arboj, ridmevoj kriĉas ĉe la proksima marbordo. Ambaŭflanke de la pordo troviĝas florpotoj kun aŭtunaj restaĵoj de tropeoloj, kaj super la pordo flirtas blu-flava Sveda flageto sur malgranda stango. Klinite kontraŭ barilo staras biciklo.

Post kvin minutoj la pordon malfermas viro ĉirkaŭ kvindek- aŭ kvindek-kvinjara, alta, svelta kaj kun trankvila mieno. Li portas malhelruĝan trejnkompleton el mola, malstrikta ŝtofo. La mieno iomete velkas al malpli bonvola nuanco, kiam Svedberg montras sian polican identigilon, sed la viro petas lin enveni en la kuirejon.

”Pri kio temas?”

”Mi enketas pri la morto de pastro Bexelius kaj bezonas kontroli kelkajn informojn de atestantoj.”

”Ĉu? Mi pensas ke mi nenion scias pri tio.”

Svedberg elpoŝigas la foton de Reza Sajadirad.

”Bonvolu rigardi. Ĉu vi rekonas tiun viron?”

”Ne.” La respondo venas preskaŭ prompte, post nur momenta observo de la foto.

”Iu alia atestanto tamen asertas, ke vi iam kverelis kun li.”

John Blidh rigardas al Svedberg, poste la foton, kaj denove la policiston.

”Tion mi ne kredas. Sed li vere aspektas, kvazaŭ li povus mortigi pastron.”

”Vi estas busŝoforo, ĉu ne?”

”Prave. Mi ĵus venis de mia laboro. Cetere, ĉu vi permesas, ke mi manĝu kefiron dum la demandado?”

”Kompreneble.”

”Mi krome preparos teon. Ĉu vi dezirus tason da teo?”

”Dankon, ne.”

”Kafon mi ne trinkas; alie vi eble preferus tion.”

Sinjoro Blidh okupiĝas ĉe kuireja labortablo kaj forno, kaj baldaŭ residiĝas ĉe la klaptablo kun suptelero da kefiro kaj muslio. Svedberg daŭrigas laŭ sia rompita fadeno:

”Kie vi ŝoforas?”

”Diversloke en la kamparaj linioj. Ofte mi ŝoforas sur Oelando, sed fojfoje oni sendas min al Påråd aŭ iu alia sovaĝejo.”

”Ĉu vi ofte ŝoforas en tiu linio, kiu trairas Resmo’n?”

”Resmo? Tio estas ĉe la ĉefa linio de ĉi tie al Kalmar. Jes, tio ja okazas.”

”Iufoje, eble antaŭ unu-du semajnoj, la viro de tiu foto suriris vian buson en Resmo por veturi al Kalmar, sed ial okazis ia malkonsento inter li kaj vi.”

Blidh ĵetas ankoraŭ rigardon unue al Svedberg, poste al la foto, kaj glutas kefiron.

”Ĉu estas tiu ulo? Mi ne rekonas lin. Ili ĉiuj aspektas same al mi.”

”Kiuj ĉiuj?”

”Ĉiuj azianoj, afrikanoj ktp, kiuj alvenas kun pakoj da dolaroj pretendante esti rifuĝantoj. Tiuj importitaj krimuloj ja vivas pli lukse ol la Svedoj, kiuj mem perlaboras siajn enspezojn.”

”Pri kio vi kverelis kun li?”

”Ĝuste pri tio, kion mi ĵus diris. Pri dolaroj!”

”Dolaroj?”

La busŝoforo maĉas muslion kun sama trankvileco kiel antaŭe kaj klarigas:

”Jes, ĝuste pri dolaroj. Li volis pagi la veturon per dolaroj. Mi klarigis, ke ĉi tio estas Svedio, Eŭropo. Tiel statis la afero. Mi elpelis lin post kelkaj haltejoj, en Vickleby, se mi ĝuste memoras.”

Svedberg pripensas dum momento kaj poste demandas:

”Ĉu li havis multe da mono?”

”Kion scias mi? Li montris al mi unu monbileton, mi eĉ ne scias de kiu valoro, sed ĝi estis verda, dolara bileto.”

”Ĉu vi vidis lin alifoje?”

”Neniam. Jen mia teo pretas.”

Svedberg iom primeditas la informojn de John Blidh, kaj poste ekiras laŭ nova trako:

”Vi konas la pastrinon de Resmo, Leena Fagerström, ĉu ne?”

”Jes, mi ne povas nei tion.”

”Kian rilaton vi havas al ŝi.”

”Malbonan. Ŝi estas freneza. Mi konas ŝin pro mia ofico kiel paroĥa estrarano. Efektive, mi ne estas religiema persono, tamen ia diabla ordo devus esti eĉ en la preĝejo, laŭ mi.”

”Ĉu ne estas tia en Resmo?”

”Tute ne. Ŝi estas tia ino, kiu aliĝas al ĉiuj novaj manieroj kaj krome volas trude aligi la paroĥanojn.”

”Kiaj manieroj?”

”Mi jam ne scias ĉion, kion ŝi aranĝis en la preĝejo. Ĵazkoncerton, kompreneble – nu, tio estus tolerebla. Sed poste transcendan meditado. Psikodramon. Ŝamanan tamburseancon. Sorĉistinan voduon. Kaj nun – tiel nomatajn rifuĝantojn, kiuj sendube preĝas al Alaho antaŭ la altaro. Krome ŝi blovis en abelujon en la pastra oficejo ĉi tie, en Mörbylånga, per ia amafero kun alia pastro. Tio ne ĝenas min persone, sed la oficistinoj estas maljunaj sinjorinoj, kiuj tre ŝokiĝis, kaj kredeble klaĉis al lia edzino...”

Tio memorigas al Svedberg la raporton pri anonima telefona informo, kaj li elĵetas pli-malpli ŝance:

”Ĉu eble temas pri sinjoro Ekström?”

”Ha, vi jam estas informita! Kredeble ĉiuj scias pri tio, dum ŝi kredas, ke ĝi estas bone kaŝita sekreto.”

Svedberg iom cerbumas, kaj laŭiras alian pensfadenon:

”Ĉu vi konis la pastron de Vickleby, Erland Bexelius?”

”Ne, mi ne konis lin. Kompreneble mi sciis, kiu li estas, sed mi ne renkontis lin. Senofenda maljunulo, laŭ mi. Mi ne komprenas, ke iu volus murdi tian homon. Sed nuntempe ĉiaspecaj krimuloj svarmas ĉie, dank’ al la senlima homimportado.”

”Sed ĉu li ne havis malamikojn?”

”Ne laŭ mia scio. Nu... kompreneble pastrino Fagerström estas iaspeca malamiko, sed mi apenaŭ imagas ŝin kiel murdiston.”

”Kio estas la blu-flava movado?”

”Ĝi estas ĝuste movado el ordinaraj homoj, kiuj agas por ordinara, malnovstila justeco. Ni ne ŝatas, ke oni traktas Svedojn malpli bone ol eksterlandanojn. Tiel simple estas.”

”Kiel agas tiu movado?”

”Nur per manifestado de niaj opinioj. Kompreneble ni estas sub anatemo en la amaskomunikiloj, do ni klopodas disvastigi nian propran informadon per flugfolioj kaj simile. Pri la veraj kostoj de la enmigrado, ekzemple.”

Svedberg trovas nenion pluan por demandi. Li forlasas la bluflavulon ĉe lia tetaso kaj reiras al Kalmar planante demandadon de la arestito, Mehdi Ghamari, kiu, laŭ la vortoj de Blidh, ‘venis kun pako da dolaroj pretendante esti rifuĝanto’. ‘Domaĝe, ke li ne uzis tiun pakon vizitante la hospitalon kun sia filino’, pensas Svedberg lace.

8. Makabra ekskurso

”Kiu estas tiu viro?”

Svedberg montras la foton de Reza Sajadirad al lia kuzo Mehdi Ghamari kaj aŭskultas, kiel liaj Svedaj vortoj transformiĝas al Persaj per la interpretistino Fatemeh Mozaffari.

Ghamari rigardas sinsekve la foton, la interpretistino kaj Svedberg. Poste li levas la ŝultrojn kaj eldiras ion mallongan.

”Mi ne konas”, tradukas sinjorino Mozaffari.

Svedberg rigardas lin mute. Jankéus rigardas lin same mute. Ĉiuj silentas. Ghamari prezentas la kutiman morozan mienon. ‘Li vere havas motivon malgaji’, pensas Svedberg. Poste li montras alian foton:

”Jen pastro Erland Bexelius. Li estas mortpafita. Ni havas la revolveron kaj la kuglon. Sur la revolvero troviĝas viaj fingrospuroj, sinjoro Ghamari. En la sama loko mortis via kuzo, Reza Sajadirad. Lia murdita korpo nun kuŝas en kadavrejo ĉi tie en Kalmar. Ĉu vi ŝatus nun rakonti, kio okazis sabate vespere, kiam vi foriris de la preĝejo?”

La mieno de Ghamari vere ŝanĝiĝas, kiam li aŭdas la informon pri sia kuzo. Ne tiel, ke li ŝajnus timi, sed li kvazaŭ sinkas eĉ pli profunden ol antaŭe en sian internon, kaj dum momento li metas manon antaŭ la okulojn. Sed por respondo li mute skuas la kapon.

”Bone. Ni faru ekskurson”, diras Svedberg. Dum kelkaj minutoj li organizas necesajn kondiĉojn por ekspedicio: polican buseton kaj du uniformitajn policistojn. Poste la tuta aro – arestito, interpretistino kaj kvar policistoj – ekiras al la hospitala kadavrejo.

Kiam la pala, malvarma korpo de Sajadirad, kun haŭto iom verdmakula kaj dissolvita pro lia restado en la maro, kuŝas antaŭ la okuloj de la arestito, tiu pli-malpli kolapsas. Jankéus kaj alia policisto devas teni lin, por ke li ne falu. Neniu vorto estas prononcita en ĉi makabra ekskursejo, krom de Svedberg, kiu seke diras:

”Ni reiru.”

Denove en la policejo, Svedberg montras la revolveron dirante:

”Jen la pafilo, per kiu Bexelius estis pafmortigita. Viaj fingrospuroj troviĝas sur ĝi.”

Silento.

”Kiom da dolaroj havis via kuzo? Ĉu vi postulis, ke li donu monon al vi?”

Ghamari raŭke elparolas unu vorton. ”Akvon!” sonas la interpreto. Li ricevas glason da akvo kaj trinkas. Poste li ekparolas, malrapide, neregule:

”Tio estas mia revolvero. Mi kunportis ĝin, sukcesis kaŝi ĝin sur la ŝipo. La ŝipestro ne trovis ĝin. Reza petis, ke mi pruntu ĝin al li. Mi pensis,

ke ĝi ne plu utilas al mi. Do, mi donis ĝin al Reza. Li volis kaŝe iri al Stokholmo. Li trovis iun, kiu veturigis lin tien. Ni havas alian kuzon en Stokholmo, kiu eble povus helpi lin. Li pensis, ke estus pli facile vivi tie, eble trovi laboron kaj kaŝiĝi. En granda urbo estas pli facile.”

”Ĉu li diris, kiu veturigis lin al Stokholmo?” demandas Svedberg, kiam la disa rakonto de Ghamari ĉesas.

”Ne. Li ne diris multe. Iu viro kun aŭto.”

”Ĉu via kuzo havis multe da mono?”

”Mi ne scias. Iom da dolaroj. Ne multe. La ŝiptransporto el Latvio rabis preskaŭ ĉion de ni ĉiuj.”

”Kiam ekiris li al Stokholmo?” demandas Jankéus.

”Mi ne scias. Iam sabate. Mi estis okupita... de mia malsana filino.”

”Ĉu vi petis lin pagi por la flegado de via filino?”

”Ne, ne. Mi pensas, ke li ne havis tiel multe.”

”Sed ĉu vi lin demandis?”

”Ne. Antaŭe, mi ne sciis, ke tio kostos tro multe por ni. Kiam Jasmin pli malsaniĝis sabate, li ne estis en la preĝejo, li estis for ie.”

Svedberg cerbumas. La rakonto de Ghamari ŝajnas sufiĉe kohera. Sed ĉu iu povus konfirmi ĝin, krom la murdita kuzo?

”Sinjoro Ghamari, kie vi estis, kiam vi transdonis la revolveron al via kuzo?”

”Ekster la preĝejo.”

”Ĉu iu alia persono vidis tion?”

”Ne, ne. Neniu.”

”Ĉu vi rakontis al iu pri la revolvero?”

”Ne. Nur mia edzino scias.”

”Ĉu ŝi scias ankaŭ, ke vi donis ĝin al via kuzo?”

”Jes.”

9. Atesto de poeto

Svedberg silente sidas ĉe sia skribtablo, meditante pri la ĵus plenumita pridemandado. Lia rigardo direktiĝas eksteren, trafenestre. Li vidas la flavan konstruaĵon de la fajrobrigado, trans ponto kaj eta placo, kaj li pensas pri la homa kadavro, kiun oni malimplikis el angilreto. Fone, maldekstre, li vidas du turetojn de la katedralo, kaj liaj pensoj ŝvebas pluen, trans la markolon, al Oelanda paroĥa preĝejo, kaj al arbareto, kie kverelo ŝajne finiĝis per la morto de unu aŭ du viroj, kaj per aresto de la tria.

”Liaj fingrospuroj tamen restas nia plej forta indiko. Atesto nur de lia edzino – se ŝi konfirmos lian version – estos iom malforta.” Svedberg cerbumas laŭte al sia kolego.

”Sed ne sufiĉas la kazo por akuzo kaj verdikto. Eĉ ne por plilongigo de la arestado”, konstatas Jankéus.

”Vi eble pravas. Tamen, ni devas demandi ŝin. Krome, eble tiu Rezadir... diable, kiajn nomojn ili havas... tiu, kiu naĝis trans maron al morto kun pikvundo en la brusto...”

”Sajadirad. Reza Sajadirad. Trans maro kaj morto – ĉu tio ne estas ia Bibliajo?”

”Al mi ĝi sonas pli kiel Holivudaĵo”, replikas Svedberg. ”Do, tiu Sajadirad eble havis alian intimumon inter la rifuĝantoj, aŭ almenaŭ iu el ili scias ion plian. Se ni almenaŭ povus konvinki ilin, ke li jam estas mortinta, tre mortinta.”

”Eble vi ripetu la ĉarman ekskurson. Sed mendu pli grandan buson...”

”Jankéus, provu iom kunlabori! Ni supozu, ke la DNA-analizo konfirmos, ke la sango sur la murdloko vere venas de Bexelius kaj Sajadirad. Tiu de Sajadirad troviĝas sube. Do, la murdinto, Ghamari aŭ alia, unue pikmortigis Sajadirad’on en la arbareto, poste forsorĉis la kadavron ĝis en la maron...”

”Forsorĉis? Ĉu nia sorĉistino?”

”Silentu do! Plue li pafis la pastron, kaj fine trenis lian korpon sur la lokon, kie Sajadirad ĵus mortis. Sed kial? Se forigi unu murditon, kial ne la duan?”

”Eble ne mortis la unua surloke. Ankoraŭ mankas nekropsia raporto. Sajadirad pikvundiĝis, perdis sangon, forkuris ĝis la maro, poste la murdisto pafis la pastron. Aŭ – pli bone: La pastro pikis Sajadirad’on, kaj lia kuzo Ghamari lin venĝis pafante la pastron... Nu, eble devus ni atendi diversajn raportojn – pri la DNA-testoj kaj pri la mortokaŭzo de Sajadirad.”

”Jes, vi pravas”, diras Svedberg. ”Tiuj diablaj teknikaj esploroj ĉiam limakas... Bone, ni fosu nian sulkon. Mi faru novan provon en la preĝejo

de Resmo – jam mia dua hejmo. Tiel ofte mi ne vizitis preĝejon de post mia konfirmacio.”

”Bonege por via animo. Dume kontrolos mi kelkajn aliajn atestojn vizitante... nu, ankaŭ Svedaj nomoj povas eskapi... jen! Patrik Eriksson kaj Viola Fransson. Krome vizitos mi pastron Ekström en Stenåsa.”



Patrik Eriksson enlasas policinspektoron Tom Jankéus en sian vestiblon, kaj tie ili restas starante. Ili staras inter tableto, sur kiu telefonaparato kunpuŝiĝas kun stako da ĵurnaloj kaj reklamfolioj, kaj vestrako kun kelkaj jakoj kaj palto. Patrik Eriksson estas junulo maldika, mezalta, kun mallongegaj, cindrokoloraj haroj kaj vizaĝo, kie ankoraŭ restas spuroj de adoleska aknaro.

”Ŝatus mi scii, kion vi faris lastan sabaton, vespere.”

La junulo kuntiras la brovojn.

”Mi estis hejme. Ĉi tie.”

”Ĉu sola?”

”Ne, kun amiko.”

”Nome?”

”Martin Fagerström.”

”Farante kion?”

”Nenion specialan. Ni rigardis videon, aŭskultis muzikon.”

”Ĉu iu el vi iam dum la vespero forlasis la apartamenton?”

”Ne.”

Jankéus ĵetas rigardon trans la junulon, sed vidas nur angulon de ĉambro kun tablo kaj kelkaj seĝoj.

”Je kiu horo Martin venis tien ĉi?”

”Je la oka, proksimume.”

”Kaj kiam li foriris?”

”Nur matene – aŭ eble tagmeze dimanĉe. Do li tranoktis ĉi tie. Li kelkfoje dormas ĉe mi, ĉar tio estas pli proksime al la altlernejo.”

”Sed dimanĉe ne vizitas li lernejon, ĉu?”

”Ne, sed... vespere ni iom bierumis, do li ne povis aŭti.”

”Ĉu vi scias, kion li faris antaŭ ol aperi ĉe vi?”

”Ne, mi ne scias. Mi supozas, ke li venis de hejme.”

”Ĉu ĉeestis iu plua tie ĉi vespere?”

”Ne. Ni estis duope.”



Jankéus haltas antaŭ bruna, ligna domo en Färjestaden sur Oelando. En subtegmenta aŭtoparkejo apud la domo staras blanka *Saab*. La vasta ĝardeno konsistas ĉefe el maldensa pinaro kaj gazonoj punktitaĵ de pinaj strobiloj.

La loĝantino de la domo, Viola Fransson, invitas lin en etan salonon kun helaj, pinlignaj mebloj. Ŝi estas sufiĉe malalta, bela virino, brunhara, pli ol kvardekjara, kun iom frapaj okulvitroj el neonverda plasto.

”Kio okazis?” ŝi demandas maltrankvile.

”Nenio aktuale. Enketas mi pri la morto de pastro Bexelius en Vickleby. Ĉu vi bonvolus rakonti, kion vi faris vespere la lastan sabaton?”

”Kion *mi* faris? Ĉu tio iel rilatas...? Nu, bone, sed ne estas facile tion memori... jes tamen, mi scias. Mi veturigis mian filinon al ŝia teatrogrupo, kaj mi restis tie por spekti la provludadon. Poste mi revenis, tamen sen Filippa’n, ĉar ŝi volis tranokti ĉe amikino. Do mi reiris sola, kaj... post duŝo mi veturis al mia kunulo.”

”Bone. Ĉu povus vi ankaŭ precizigi la horojn? Kiam ekiris vi de hejme unuafoje?”

”Hmm... mi pensu... Efektive, mi miras – pro kio vi demandas min pri ĉio ĉi?”

”Verdire ankaŭ mi ne precize scias, simple kolektas mi diversajn informojn por kunmeti imagon pri la tutaĵo...” umas Jankéus iom embarase.

Viola Fransson alprenas mienon ironian dirante:

”Tio vere estis tre klariga respondo. Bone, ni kredeble ekiris je la sesa kaj duono, ĉar la provludado komenciĝis, aŭ pli ĝuste devus komenciĝi, je la sepa. Fakte ĝi iom prokrastiĝis, kaj daŭris ĝis... eble la naŭa. Do, mi revenis hejmen... nu, mi ne memoras, sed kredeble je la naŭa kaj kvarono, eble duono. Aldonu tempon por duŝi min, do mi eble ekiris je la deka.”

”Kie okazis tiu teatra provludo?”

”En gejunula klubejo, en Kalmar.”

”Kaj via kunulo estas...?”

”Lennart Fagerström en Gårdby.”

”Ĉu jam antaŭe vi interkonsentis vesperi ĉe li?”

”Ne, tute ne. Mi planis hejman vesperon kun la filino. Sed ŝi kreskas... Do, ne estis planite!”

”Ĉu vi iris tien trafe-maltrafe, sen antaŭa averto?”

Ŝi ridas:

”Ne, ne. Mi telefonis antaŭe por demandi, ĉu plaĉus al li.”

”Je kiu horo vi telefonis?”

”Nu, unue antaŭ la duŝo, sed tiam li ne respondis. Do mi vokis denove post la duŝo, kaj tiam mi trafis lin. Je kiu horo? Nu... eble iomete antaŭ la deka.”

”Kaj kiel longe vi restis ĉe li?”

Ŝi duafoje ridas:

”Ĉu vi vere estas policisto? Mi restis ĝis dimanĉe matene. Tiam mi veturis por hejmenigi mian filinon. Ĉu vi bezonas ankaŭ tiun horon?”



Survoje orienten Jankéus provas telefoni de sia aŭto al Lennart Fagerström, sed la linio estas okupita. Alvenante antaŭ la flava domo en Gårdby, li vidas la veterinaron pli-malpli puŝi viron proksimume tridekjaran kontraŭ blanka usona aŭtego kaj kvazaŭ per sia akra rigardo igi lin forveturi.

”Ĉu malkontenta kliento?” Jankéus scivolas, kapsignante al la ŝoseo, post kelkaj salutvortoj.

”Malkontenta jes, kliento ne.”

”Aha. Supozis mi, ke temas pri malsana besto.”

”Kiel mi helpu vin?” bruskas sinjoro Fagerström.

Jankéus nebulumas same kiel ĉe Viola Fransson, sed Fagerström same koncizas kiel lastfoje kaj ne foruzas tempon por pridubi la motivon de la polica laboro. Li senprokraste atestas pri la kontakto kun sia amikino sabatvespere.

”Ĉirkaŭ la deka Viola telefonis.”

”Kion faris vi antaŭ ŝia alvoko?”

”Hmm... Mi estis hejme. Ripozis. Ha, jes! Oni vokis min al Sandby. Najbara paroĥo. Bovino naskota. Unu horon, eble, tio daŭris. Ĵus revenis, kiam ŝi vokis.”

”Ĉe kiu troviĝas tiu bovino?”

”Willy Karlsson. En Skarpa Alby. Rande de la stepo.”

Jankéus aŭtas al tiu vilaĝeto kun du aŭ tri bienetoj, kaj en la unua traktoro vidata, li bonŝance renkontas la bienulon Karlsson. Tiu plene konfirmas la rakonton de Fagerström. Je la oka vespere li telefonis al la veterinaro, baldaŭ poste tiu alvenis, kaj je la naŭa kaj duono li foriris, turninte la naskotan bovidon en ĝia patrino sino. Mallonge poste, la bovido vere alvenis sana en la mondon. Ĉu la policisto volas vidi ĝin?

Jankéus rezistas la tenton aldoni al la murdenketo raporton pri inspektado de novnaskita bovido, dankas la bienulon kaj pluiras suden.



La preĝejo de Stenåsa situas proksime de la orienta bordo Oelanda. Trans kampoj kaj paŝtejoj oni jen kaj jen vidas la grizan maron kunfandiĝi kun ĉielo same griza. Koncentrante la rigardon, Jankéus vidas ŝipon, eble survoje norden kun nafto, aŭ suden kun papermaso – li ne povas distingi la

specon de ŝipo. ‘De tie do alvenis tiu aro, kiu provizore nestas en la preĝejo de Resmo’, li pensas, forlasante la vidaĵon kaj paŝante al la pastrejo.

Rondeta blondulino ĉirkaŭ kvardekjara akceptas lin kun maltrankvila rigardo, kaj kondukas lin en la laborĉambron de sia edzo, pastro Jan Ekström. Ankaŭ tiu estas blonda kaj rondeta, kvankam eble jardekon pli aĝa ol sia edzino. Post sinprezento kaj kelkaj enkondukaj kliŝoj, Jankéus ekas:

”Kolektas mi diversajn informojn por kunmeti tutajan bildon pri la morto de pastro Bexelius”, li gurdas la jam eluzitan frazon. La pastro ne kontestas ĝin, do li daŭrigas:

”Kie pasigis vi la lastan sabatvesperon?”

La pastro ĵetas timeman rigardon al la fermita pordo de la ĉambro, kaj respondas ne tro laŭte:

”Hmm. Mi devis viziti paroĥanon dum kelka tempo... sed cetere mi estis hejme.”

”Kiun vi vizitis?”

”Nu... fakte, pli precize ne estis paroĥano, sed kolego... sinjorino Fagerström en Resmo... Ŝi vokis min telefone, ĉar ŝi estis tre maltrankvila pro malsana infano inter la rifuĝantoj. Fakte, antaŭ ol mi alvenis, la infano jam mortis, kaj ne estis facile konsoli ŝin...”

”Kiam iris vi tien, kaj kiam vi revenis?”

”Mi ekiris eble je la sepa kaj duono vespere. Kaj mi revenis... nu, mi pensas, ke iom post la deka.”

”Ĉu via edzino povas konfirmi tiujn horojn?”

La viro montras teruritan mienon.

”La horojn, jes, certe. Sed...” Estiĝas paŭzo. ”Ĉu mi povus peti vin... Laŭdire mi vizitis malsanan paroĥanon... Vi komprenu, en la kamparo la homoj tiel terure klaĉadas...”

Jankéus rezignas konfirmigi la horojn, kiuj ĉiuokaze ne taŭgus kiel alibio por la murdo. Cetere, ne facilas imagi ĉi tiun timemulon murdi kolegon.



Roger Svedberg kaj Fatemeh Mozaffari aŭtas al Resmo. Svedberg unue pripensas, kiel ĉi-foje alfronti la rifuĝantojn, kaj kiujn demandojn fari al ili. Poste li interparolas kun sinjorino Mozaffari.

”Vi sendube delonge vivas en Svedio, ĉu ne?”

”De dek jaroj. Sed mi sentas, kvazaŭ estus pli longa tempo. Okazis tiom en tiu tempo, kaj multaj aferoj ŝanĝiĝis.”

”Pri kiuj aferoj vi pensas?”

”Nu, por mi persone estis pliparte pozitivaj ŝanĝoj. Mi estas filologo, kaj sciencan karieron mi kredeble ne povos fari en Svedio, sed estas interese

ankaŭ labori kiel interpretisto. Tamen psike povas esti peze, kelkfoje. Mi krome iomete instruas. Volonte mi havus pli multe da laboro, tamen dank' al mia edzo mi vivas bone.

”Kion li faras profesie?”

”Li estas inĝeniero en telefoniana kompanio. Sed la ĝeneralaj sociaj ŝanĝoj ne estas tre plaĉaj, kaj kiam ni venis ĉi tien antaŭ dek jaroj, tia dramo estus neimagebla, ŝajnas al mi.”

”Dramo? Vi pensas pri...”

”Miaj samlandanoj en la preĝejo. Ĉu vi komprenas, kiel ili vivadas de pli ol du jaroj? En malliberejoj, praktike, kun infanoj kaj ĉiuj, en Ruslando, en Latvio – kaj nun en tiu Sveda preĝejo! Kaj tiu hospitala historio pri la knabineto, kiu mortis! Nun jam la ĵurnaloj ĉesis skribi pri tio, kaj nenion oni faros, ŝajne.”

”Ĉu ne estis simple malfeliĉa misjuĝo de iu flegistino?”

”Tion mi ne kredas. Estas unu peco de puzlo.”

Svedberg digestas ŝiajn vortojn. Poste li demandas:

”Ĉu vi havas ideon, kiel mi povus veki sufiĉan fidon ĉe ili por respondi miajn demandojn sincere kaj sentime?”

Fatemeh Mozaffari ridetas amare:

”Mi timas, ke tio ne eblas. Kial ili fidu vin?”

Al tio Svedberg ne trovas respondon.



Svedberg dum sia polica kariero pridemandis centojn, eble milojn da homoj. Li scias, ke la valoro de atesto aŭ aserto ne ĉiam korespondas kun la okupo, ofico aŭ pozicio de la pridemandato. Eĉ informo de poeto ŝvebanta en la aero fojfoje povas posedi tre firman prozan valoron.

Ĉi-foje lia preĝeja vizito tamen komenciĝas malbone. Nasrin Ghamari ne ĉeestas. Ŝi foriris de la preĝejo sola iam post tagmezo kaj ankoraŭ ne revenis. Li decidas komenci la demandadon sen ŝi, esperante ke ŝi revenos pli malfrue. Pensante, ke en ĉi tiu kazo necesas iom malortodoksa metodo, li kolektas ĉiujn ok plenkreskajn rifuĝantojn en la preĝeja navo. Ankaŭ pastrino Fagerström ĉeestas. Li klarigas:

”Kiel vi scias, Mehdi Ghamari estas arestita pro suspekto pri murdo. Persone mi tamen dubas, ĉu li kulpas pri tio. Vi povas helpi lin, se vi scias ion. Hodiaŭ ni eksciis, ke ne nur la Sveda pastro, sed ankaŭ Reza Sajadirad estas murdita. Li evidente volis iri al Stokholmo, sed iu malhelpis lin.”

La reagoj en la Irana grupo esprimas nekredemon. Svedberg aldonas:

”Antaŭ kelkaj horoj mi vizitis la kadavrejon kaj vidis la mortan korpon de via samlandano Sajadirad. Ankaŭ nia interpretisto, sinjorino Mozaffari vidis ĝin.”

La interpretistino ĵetas koleran rigardon al li, sed li kalkulas je tio, ke ŝi ĝuste tradukos. Kaj vere estiĝas vigla diskuto inter kelkaj rifuĝantoj kaj sinjorino Mozaffari.

Svedberg jam multfoje plenumis demandadojn helpe de interpretisto. Li sufiĉe bone konas la profesion etikon de interpretistoj, kaj li scias, ke ili ofte heroe batalas kontraŭ ambaŭflankaj provoj "konkeri" ilin por helpi al la demandanto – aŭ al la demandato. Li komprenas la incitan rigardon de sinjorino Mozaffari, sed li opinias, ke la aktuala situacio necesigas escepton de la striktaj reguloj.

Poste li rekomencas la proceduron pridemandi unu post la alia en la sakristio. La rikolto longe same malriĉas kiel marde. Li montras la revolveron; neniu rekonas ĝin. Neniu scias, ĉu Ghamari aŭ Sajadirad posedis armilon. Neniu aŭdis, kiu helpas al Sajadirad atingi Stokholmon.

Sed la antaŭlasta demandato, la poeto kaj doktoro pri aerodinamiko Mohammad Mirzadeh, havas surprizan informon.

"Pri la armilo mi nenion scias, sed Reza estis tia homo, kiu eble bezonis tian. Li paŝis peze sur la tero. Mi multe diskutis kun li, pri literaturo, politiko, arto. Por li estis malfacile levi sin."

"Levi sin?" Svedberg demandas sin, ĉu la traduko vere trafis la ĝustan nuancon.

"Jes, li gluiĝis al la tero. Li kvazaŭ sinkis. Tiu stranga busveturo, ekzemple. Se mi spertus tion, mi verkus poemon. Sed li ne povis tion. Por li tiaj aferoj amasiĝis sur la dorso kaj premis lin, sufokis lin!"

Svedberg sulkigas la frunton. Kial neniam troviĝas normalaj atestantoj? Kial unu mutas obstine, kaj alia babilas tiel nebule, ke ĉiuj informoj vaporiĝas en la aeron? Li provas rekonduki la interparolon sur sian trakon:

"Ĉu vi sciis, ke Reza Sajadirad volis foriri sola de ĉi tie?"

"Jes, certe. Spirite li jam estis for. Spirite ni ĉiuj jam estas for de ĉi tie. Li estis en Stokholmo, ĉe sia parenco."

"Kio? Ĉu li jam vizitis lin?"

"En la spirita mondo li jam vivadis tie. Sed lia karno algluiĝis al ĉi tiu stranga ebena tero."

"Sed ĉu li neniam iel komprenigis, kiel li veturos al Stokholmo?"

"Jes, li menciis ion. Li diris, ke la knabo de la pastrino helpas lin."

"La filo de sinjorino Fagerström?"

"Jes, la filo. Li veturigos Reza'n al Stokholmo per sia aŭto."

Svedberg finas la demandadojn. Nasrin Ghamari ankoraŭ ne revenis. Ekster la preĝejo li staras kun Leena Fagerström kaj Fatemeh Mozaffari. Li pripensas, kiel procedi por ne fuŝi la aferon. Li turnas sin al la pastrino dirante:

”Ĉu vi bonvolus voki mian poŝtelefonon, tuj kiam Nasrin Ghamari revenos?” Li transdonas slipon kun la telefonnumero. Poste li montras al blua *Volvo* apude:

”Pardonu, ĉu tio estas via aŭto?”

”Jes. Mi venis rekte de Mörbylånga, tial mi aŭtis.”

”Kaj ĉu ankaŭ via filo havas propran aŭton?”

”Jes, li havas antikvan *Volvo Duett*. Li bezonas aŭton por veturi al la altlernejo.”

Svedberg memoras la raporton de Jankéus pri lia pridemandado de Martin Fagerström. La knabo parolis pri fiŝado, sed li ne memoras ĉu temis pri fiŝado de la strando aŭ per boato. Li ŝance demandas:

”Ĉu mi ĝuste komprenis, ke vi havas ankaŭ boaton?”

”Ho, nur etan boaton... tute malgrandan. Mi mem neniam uzas ĝin, sed Martin iam iras per ĝi.”

”Kie ĝi kuŝas?”

”En Lilla Frö, ĉe malgranda varfo.”



Denove en la aŭto, Svedberg demandas sinjorinon Mozaffari:

”Ĉu ĝenus vin, se ni irus pli longan vojon?”

”Ne, tio ne gravas.”

De la aŭto Svedberg telefonas al la aŭtoregistro petante, ke oni serĉu je la nomo Martin Fagerström. Neniu trafo rezultas, sed je la patro, Lennart Fagerström, troviĝas tri trafoj – unu blua *Honda Civic*, unu *Toyota* kamioneto, kaj unu vinruĝa *Volvo Duett* el 1967. Tiu marko, *Duett*, estas malnovstila pluruza aŭto de pli-malpli liveraŭta tipo.

Svedberg stiras laŭ pli kaj pli malgrandaj vojoj. Baldaŭ la vojeto finiĝas sakstrate ĉe la maro. Malalta, grua bordo kun herboj, ŝtonoj kaj fukoj transiĝas en malprofundan maron. Transe vidiĝas la same malalta Smolanda bordo, karbe nigra kontraŭ roza vespera ĉielo. Ĉe fragila ligna varfo kuŝas kelkaj boatoj.

Li turnas la aŭton kaj reveturas. Tricent metrojn de la bordo situas deko da simplaj, lignaj somerdomoj. Nenie vidiĝas homo aŭ lumigita fenestro.



Leena Fagerström mikroonde varmigas malnovan picon en sia kuirejo. La rubujo odoraĉas, kaj ŝi elportas ĝin. Pasis horo, de kiam foriris unu policisto, kaj jen aperas la dua. Vidante, ke ĉi-foje temas pri inspektoro Jankéus, ŝi funkciigas la kafaparaton. Poste, senapetite maĉante la tro malmolan

panplaton kun velkintaj ĉampinĵonoj kaj tenaca fromaĝo, ŝi lace aŭskultas la demandojn de preskaŭ same laca policinspektoro:

”Kial nenion diris vi antaŭe pri via sabatvespera gasto?”

Ŝi levas la brovojn, pensas iom, kaj rezigne eldiras kun sia Finnlande melankolia intonacio:

”Pro lia edzino. Laŭdire ŝi estas malsanece ĵaluza.”

”Ĉu senbaze?”

”Ĉu gravas por vi?”

”Eble gravas por la murdenketo.”

La vortĵonglado povus esti akra, sed ambaŭflanke la laca tono senarmigas la replikojn. Ŝajnas al Jankéus, ke ili sonas kvazaŭ maljuna geedza paro, kiu jam de tridek jaroj ripetadas la saman kverelon, sen memori la originan kialon.

”Kiam venis li, kaj kiam li foriris?”

”Eble iom antaŭ la oka. Mi estis en la preĝejo, sed kiam mi iris ĉi tien, li jam alvenis. Poste mi kuris tien-reen inter la pastrejo kaj la preĝejo. Sed kiam mi devis akompani Torkel Wibe al la loko, kie li trovis pastron Bexelius, Jan reveturis hejmen. Mi ne scias, kiu hore. Kredeble iom antaŭ la deka.

”Ĉu Jan Ekström dum la tuta tempo restis en via domo?”

”Jes, certe.”

”Sed vi mem ne estis tie senĉese?”

”Ne, sed mi sufiĉe certas, ke li ne iris aliloken. Kien li iru?”

10. Problemo kun la polico

Vendrede matene la oficeja telefono de Roger Svedberg ne multe ripozas. Unue vokas lin Leena Fagerström por sciigi, ke Nasrin Ghamari ankoraŭ ne revenis, kaj nun kelkaj paroĥanoj organizas serĉadon en la ĉirkaŭaĵo de Resmo.

Due la prokuroro telefonas por ekscii, ĉu aperis pliaj pruvoj aŭ indicoj kontraŭ Mehdi Ghamari. La rezulto de tiu interparolo estas, ke la aresto de Ghamari estas nuligita. Ĉar li estas kontraŭleĝa rifuĝanto, oni tamen ne liberigos lin, sed je konvena okazo transdonos lin al la Enmigrada Administrejo por estonta retransporto al Latvio, de kie li venis en Svedion.

Trie vokas la studento Patrik Eriksson:

”Ĉu vi estas tiu policisto, kiu pridemandis min hieraŭ?”

”Ne, tion faris mia kolego, Tom Jankéus.”

”Aha... ĉu li troviĝas tie?”

”Momente ne. Sed mi estras la enketon, do...”

”Nu, mi legis la ĵurnalon hodiaŭ... pri tiuj murdoj. Tiu nova, la eksterlandano... kaj la antaŭa, tiu pastro... Ĉu ambaŭ okazis lastan sabaton?”

”Ŝajnas tiel.”

”Estas io grava, sed... ĉu mi povas veni al la policejo?”

”Ni povas sendi aŭton por venigi vin.”

”Policaŭton? Ne, mi mem iros. Ĉu mi povas veni nun?”

”Jes, bonvolu!”

Atendante la misteran vizitonton Svedberg komencas tralegi raportojn pri la ĝisnunaj demandadoj, sed interrompas lin ankoraŭ unu telefonvoko – ĉi-foje de la policestro. Tiu ordonas, ke Svedberg partoprenu en gazetara konferenco je la naŭa kaj duono por ”ĵeti ion al la vulturoj”, kiel li esprimas la celon.

”Sed povas esti decida fazo. Ĉu ne eblas prokrasti?” provas Svedberg. Li tamen sentas, ke li eble jam tro ofte ripetis tiun pretekston.

”Male, ni bezonus fari tion jam hieraŭ, sed tiam vi estis nekaptebla. Do, je la naŭa tridek!”



Je la oka kvardek Jankéus aperas en la policejo, kaj Svedberg ricevas buŝan resumon pri la vico da intervjuoj en lia hieraŭa Oelanda odiseado. Svedberg reciproke ekrakontas pri siaj atingoj, precipe tio, ke Martin Fagerström eble estis la veturigonto de Sajadirad.

"Ĉu vere eblas, ke tiu bubo...?" komentas Jankéus.
 Tiam aperas Patrik Eriksson, kaj la du kolegoj akceptas lin avide.
 "Temas pri tiu sabatvespero..."
 "Bonvolu!" ĥoras Svedberg kaj Jankéus.
 "Ĉu vere temas pri tiuj murdoj?"
 "Ŝajnas, ke jes", diras Svedberg.
 "Estas tro diable por kredi... Al mi li diris, ke li interbatalis kun iu eksterlandano. Tial mi devis diri, ke li venis al mi je la oka... Sed murdo...! Mi ne volas esti enmiksita en tia merdo!"
 "Do, je kiu horo venis al vi Martin Fagerström lastsabate?" demandas Jankéus.
 "Malfrue. Iom post la dek-unua, mi pensas."
 "Ĉu li venis per sia *Volvo Duett*?" demandas Svedberg.
 "Jes, kompreneble."
 "Ĉu tiam li petis vin mensogi pri la horo?"
 "Jes. Li diris tion pri interbatalo, kaj ke li riskis problemon kun la polico."
 "Kiel li impresis al vi? Ĉu li kondutis kiel kutime?"
 "Nu... eble li estis pli silentema. Li ne volis rakonti iujn detalojn pri tiu batalo."
 Je tiu momento Svedberg devas hasti al sia gazetara konferenco. Survoje li pensas: 'Problemon kun la polico. Ŝajnas ke li pravis.'



Dum Svedberg ŝvitas antaŭ la ĵurnalistoj, Jankéus preparas sin por daŭrigi la demandadon de Patrik Eriksson. Li rigardas la knabon pensante: 'Problemon kun la polico. Jen la maltroigo de hodiaŭ!'

Per kelkaj demandoj li ekscias, ke Martin Fagerström ĝuste nun devus ĉeesti altlernejan lecionon, kaj ke li – se li entute estas tie – verŝajne aŭtis tien, kiel kutime. Jankéus organizas kelkajn ekspediciojn. La unua tasko estas trovi la aŭton. La policejo de Kalmar situas nur kelkajn paŝojn de la ĉefa altlerneja konstruaĵo. Li mem traserĉadas la ĉirkaŭajn aŭtoparkejojn, sed nenie videblas la vinruĝa antikvaĵo de la suspektato. Jankéus sakras inter la dentoj kaj klavas la telefonan numeron de Patrik Eriksson. Aŭskultante la nerespondatajn signalojn en sia poŝtelefono, li subite ekvidas la knabon, al kiu li provas telefoni, preterpasi piede je centmetra distanco. Ankaŭ li ŝajne paŝis pli-malpli rekte de la policejo al la altlernejo.

Jankéus kuratingas lin, ĝuste antaŭ ol li eniros domon kun la surskribo "*Institucio de mara biologio*", kio iom surprizas lin. Li imagus, ke la knabo lernas maŝinteknikon aŭ komputikon aŭ ion similan. 'Strange',

li pensas. ‘Okupiĝas tiu bubo pri mara vivo, dum mi devas trakti maran morton.’

Patrik Eriksson ne ŝajnas tre surprizita aŭdi, ke la aŭto de Martin ne estas trovita.

”Provu ĉe la trotejo”, li proponas.

”Trotejo?”

”Jes, la eksterurba ĉevalkonkursejo.”



Kiam Jankéus kun kolego alvenas ĉe la ĉevalkurejo, tiu impresas pli-malpli dezerta. Neniu konkurso hodiaŭ okazas. Kelkaj konstrulaboristoj riparas stalon, cetero ĉio impresas senhoma kaj malgaja. La policistoj iom malentuziasme rondiras sen granda espero trovi la serĉaton. Sed ekster duone kaduka budo Jankéus neatendite ekvidas la serĉatan *Volvo Duett* apud granda blanka aŭto, kiu ŝajnas iel konata. Ili malfermas la pordon kaj rigardas en preskaŭ nudan ĉambron kun du homoj: Martin Fagerström kaj la viro, kiu hieraŭ vizitis lian patron.

Ankaŭ ĉi-foje la viro rapide malaperas, sed libervole. Jankéus kaj lia kolego veturigas la knabon al la policejo por pridemandado, kaj poste li taskas al du kolegoj liveri tien ankaŭ la aŭton de Martin Fagerström.

Sed antaŭ ol komenci pridemandi sian suspektaton, Jankéus organizas ankoraŭ ekskurson, ĉi-foje orienten. Post apenaŭ duonhoru li alvenas aŭte kun la teknikisto Åke Gustavsson al la varfo en Lilla Frö, ĉe la okcidenta bordo de Olando. Nun la demando estas, kiu el kvin boatoj estas tiu de Fagerström. Ili reiras al la apudaj dometoj, kaj Fortuno daŭre ridetas al la policistoj: Ĉe unu somerdomo ili trovas maljunulon, kiu fosas sian legombedon.

”La boato de Fagerström? Certe mi scias. Ĝi estas la oranĝa plastboataĉo kun rompita remilo. Strange, ke tiu diablido ankoraŭ ne alfondiĝis!”

”Kiu?”

”La knabaĉo! La filo de tiu stranga pastrino! Li ja veturigas ĝin kiel frenezulo. Eĉ nokte!”

”Ĉu vi lin vidis boati nokte?”

”Nu... ne precize vidis. Sed mi vidis lin alveni per sia aŭtaĉo, kaj poste mi aŭdis la boatmotoron. Mallume kiel fektruo de kamenpurigisto estis... Sed Dio protektas la malsaĝulojn. Li revenis viva kaj preterpafis...”

”Kiam okazis tio?”

”Lastan semajnfino. Tage li ĉiam stiras kiel raliisto. Sed nokte! Kia kreteno!”

”Ĉu memoras vi precize en kiu nokto li venis, kaj la horon?”

”Atendu... Mi televidis... Estis ia fekaĵo... devis esti sabate... La horon? Mi ne scias... preskaŭ je noktomezo, ŝajnas al mi. Rigardu la televidan programon – estis dum la filmo... iu detektiva stultaĵo kun tiu somnambulo... Dalglish, laŭdire li nomiĝas...”

Jankéus kaj Gustavsson reiras al la varfo kaj elserĉas la ĝustan boaton. La teknikisto alportas sian valizeton kaj komencas rampadi sur la fundo de la boato, dum Jankéus sidiĝas sur kuŝanta arbotrunko. Li rigardas al la markolo, kiu hodiaŭ etendiĝas relative kvieta. Malforta brizo de temp’ al tempo susurigas la tremolojn malantaŭ lia dorso kaj forblovas iliajn oranĝkolorajn foliojn. Transakve, en nordokcidento, vidiĝas la konturo de Kalmar – mezepoka kastelo, baroka katedralo kaj iama granda muelejo.

Åke Gustavsson estas preta.

”Neniu sango. Ankaŭ tekstilaĵon mi ne vidis. Cetere pasis kelkaj tagoj de sabate, ĉu ne? Blovis kaj pluvis. Mi kolektis iom da gruzo kaj sablo, sed tio ne multe utilos.”

”Tamen iru ni al la murdloko por preni gruzon ankaŭ de tie, ĉu ne?”

”Se vi volas. Cetere mi unue prenos ankaŭ iomete ĉi tie, de antaŭ la varfo.”

Ili veturas laŭ vojetoj al la ĉefŝoseo. Jankéus gajas:

”Tiu oldulo estas vera kaptajo! ‘Detektiva stultaĵo – somnambulo Dalglish’. Jen la maltroigo de hodiaŭ!”

Ili alvenas en la arbareton ĉe la murdloko, kaj je sia surprizo renkontas amason da homoj tie. Leena Fagerström, kelkaj Iranaj rifuĝantoj, pluraj aliaj homoj, kaj ambulanco! Kio okazis? La pastrino alpaŝas:

”Estas Nasrin Ghamari. Ŝi pendumis sin de pino en la arbareto”, ŝi diras kun malsonora voĉo kaj lacaj okuloj.



Ĉirkaŭ la lunĉa horo Jankéus kaj Gustavsson revenas al la policejo kun gruzo kaj sablo ankaŭ el la murdloko. Tie atendas ilin Svedberg kun kontenta mieno. Åke Gustavsson rekomencas sian rampadon, ĉi-foje en la vinruĝa aŭto, dum Jankéus kaj Svedberg interkonsiliĝas dumlunĉe, pri kiel alfronti la junan suspektaton.

Posttagmeze oni tamen ne multe atingas. Martin Fagerström nenion diras sen advokato, kaj atendante tiun, Svedberg petas formalan areston de la junulo, pro suspekto pri duobla murdo. Dume Jankéus telefone ekscias, ke la posedanto de blanka *Chrysler 300* el 1979 kun la numero GRT 520 nomiĝas Jimmy Sahlgren, kun adreso en Kalmar.

11. Senkulpa

Semajnfine aŭtuna ŝtormo laŭiras la sudorienton de Svedio, kaj precipe ĝi vipas la bordojn ambaŭflanke de la markolo de Kalmar. La ondoj muĝante kaj agreseme lekadas kajojn, strandojn kaj insuletojn, kaj sur la tero pluvaj skualoj atakas la malmultajn homojn, kiuj eksponas sin eksterdome.

Roger Svedberg ne apartenas al tiuj. Li ripozas en sia hejmo post laboriga semajno, konsciante, ke restas ankoraŭ unu fortostreĉo, antaŭ ol li povos fini sian parton de la murdenketo kaj pludoni ĝin al prokuroroj kaj juĝistoj. Li ne dubas, ke oni nun kaptis la kulpulon. Kian punon tiu ricevos, jen afero pri kiu la jaroj instruis al li ne okupiĝi.

Dum Svedberg dediĉas sian semajnfino al ripozado kaj hejmaj taskoj duope kun sia edzino, Jankéus devas mem zorgi pri siaj infanoj. La edzino forveturis jam sabate matene al kurso pri ĥorkantado, kaj li devas mem nutri, ludigi, distri kaj konsoli sian idaron.

Nur vespere li trovas iom da libera tempo. La dekdujara Mårta profundigis en libro pri ĉevaloj, la naŭjara Elis kaptigis de komputila ludo, kaj la sepjara Emma spektas televidon. Inspirite de la maljunulo en Lilla Frö, ilia patro parkumas en sia preferata fotelo kun detektivromano pri komisaro Dalgliesh, "la somnambulo". Laŭ lia sperto, en veraj murdenketoj la plej kutima kazo estas, ke troviĝas neniuj suspektito, neniuj havas motivon, kaj ŝajne neniuj estis en la murdloko je la koncerna horo. En la krimromanoj la malo normalas: deko da personoj, kutime pintoj de la socio, ĉiuj havas motivon, ĉiuj kondutas tre suspektinde, kaj ĉiuj pro diversaj kialoj kunpuŝiĝas en la loko de krimo, tiel ke la murdisto ŝajne devas plenumi sian sangan aferon meze de homamaso. Jankéus cetere tute kontentas pri tio – se la romanoj pli similas la realon, ili kredeble ne distrus lin.



Lunde la teknikisto Åke Gustavsson raportas pri siaj esploroj. La gruzo kaj sablo kolektita en la boato similas tiun de la murdloko – ĝi estas pliparte ruĝa, kalkŝtona eroziaĵo – dum la tero proksime de la varfo en Lilla Frö konsistas ĉefe el humo kaj ŝlimo. Ankaŭ en la vinruĝa aŭto li trovis similan ruĝan kalkŝtonan sablon. Sango troviĝis nek tie, nek en la boato. En la aŭto kuŝis ankaŭ diversaj laboriloj, paro da gumaj botoj, ŝnuro kaj rulaĵo da grandaj nigraj plastsakoj por rubo, sed nenio rekte ligebla al la krimoj.

Alvenis finfine ankaŭ la DNA-analizaj rezultoj. Ili konfirmas la jam delonge faritajn supozojn. La sango de la murdloko venis el Erland Bexelius kaj Reza Sajadirad.

Je la pridemandado de Martin Fagerström, lia advokato Filip Segerståhl jam dekomence klarigas, ke lia kliento estas senkulpa. ‘En nia profesio ni renkontas entute nur senkulpulojn’, Jankéus murmuris duonvoĉe. Dume Svedberg diras:

”Bonvolu rakonti, kiam kaj kie vi renkontiĝis kun Reza Sajadirad sabate la 10an de oktobro.”

La knabo rigardas sian advokaton, kiu kapjesas patrece.

”Li volis, ke mi veturigu lin al Stokholmo. Li petis, ke ni renkontiĝu ne tro proksime de la preĝejo kaj proponis tiun arbareton apud la ŝoseo. Sed...” Li hezitas momenton, kaj poste diras: ”Sed antaŭ ol ni havis tempon ekiri, venis tiu pastro.”

Svedberg kaj Jankéus atendas daŭrigon, sed nenio venas. Svedberg diras:

”Daŭrigu.”

La knabo enspiras kaj denove ekparolas:

”Li tre timis... tio estas la eksterlandano, ne la pastro... kaj li tiris min inter la arbojn por kaŝiĝi. Mi ne scias kial. Ĉiuokaze, la pastro iris al mia aŭto, kaj poste komencis rigardi al nia direkto, sed kie ni staris, estis tute nigre. Tiam la Iranano ekiris kontraŭ la pastro, kaj mi aŭdis pafon. Poste li revenis kontraŭ mi. Mi komprenis, ke li mortigis la pastron, kaj pensis, ke nun estas mia vico. Tial mi kaŝis min malantaŭ arbo. Sed li aŭdis min kaj alproksimiĝis. Mi vidis armilon en lia mano, kaj kiam li estis preskaŭ apude, mi kiris lian manon tiel ke la revolvero ĵetiĝis for. Mi intencis forkuri, sed tiam li alkuris kontraŭ mi. Li atakis min. Mi... refleksi elpoŝigis tranĉilon por protekti min, kaj ĝuste tiam li saltis antaŭen por ataki min, kaj trafis mian tranĉilon. Li ŝanceliĝis kelkajn paŝojn, kaj poste tuj kolapsis. La sango elfluis. Mi panikis, mi ne sciis kion fari.”

Li ĵetas rigardon al Svedberg, kvazaŭ li atendus proteston aŭ demandojn. Sed la du policistoj nur rigardas lin, mute. Li daŭrigas:

”Mi timis, ke oni ne kredus min, se mi dirus, kio okazis. Do mi prenis rubsakon el mia aŭto, kaj enŝovis lin en la sakon. Mi fermis ĝin per ŝnuro kaj levis ĝin en la aŭton. Sed la pastro kuŝis malantaŭ la aŭto, kaj mi devis forŝovi lin. Mi tiris lin inter la arbojn, kie mi ĵus kaŝis min. Poste mi foriris...”

La du policistoj ankoraŭ silentas. Jankéus premas du fingrojn al sia suba lipo, kvazaŭ por kaŝi aŭ forviŝi rideton. Svedberg male mienas malĝoje. La advokato klinas sin al la knabo, kaj sufloras:

”Vi devus klarigi ankaŭ pri la armilo.”

”Jes, mi forgesis”, diras Martin Fagerström. ”Kiam mi reiris el la arbaro mi tretis sur la revolveron. Tiam mi ekhavis la ideon enmanigi ĝin al la pastro.”

Denove li atendas. Dum momento ĉiuj silentas. Poste Svedberg duafoje diras:

”Daŭrigu.”

La junulo rigardas sian advokaton, sed ĉi-foje tiu eĉ ne kapsignas. Tamen li daŭrigas:

”Mi ne volis okupiĝi pri tiu scivolema pastro, sed mi timis, ke oni kulpigos min pri tiu freneza pafo. Poste mi rapidis for. Mi pensis, ke eble iu aŭdis ion kaj alvenos.”

Triafoje Svedberg diras:

”Daŭrigu.”

”Do mi veturis al nia boato, enmetis la sakon, kondukis la boaton kelkan distancon for de la tero, kaj enakvigis la sakon. Poste mi revenis kaj veturis al Kalmar.”

Nun Svedberg trankvile demandas:

”La plastsako kun la kadavro – ĉu ĝi flosis?”

”Ne. Mi enmetis grandajn ŝtonojn. Mi malligis la ŝnuron, enmetis ŝtonojn kaj la tranĉilon, kaj ligis denove. Kredeble ili truis la sakon, tiel ke la korpo eliĝis...”

”Je kiu distanco de pastro Bexelius troviĝis Sajadirad, kiam li pafis lin?”

”Mi ne scias... Eble dek metroj?”

”Kiajn vestaĵojn vi portis?”

”Ordinarajn vestojn. Jakon. Pantonon.”

”Kie ili troviĝas nun?”

”Mi forĵetis ilin.”

”Kial?”

”Ĉar estis sangomakuloj sur ili.”

”Kie?”

”En rubujo en Kalmar.”

”Kiam kaj kie, pli precize?”

”Antaŭ kelkaj tagoj... en la haveno.”

”Ĉu ankaŭ la gantojn?”

”Eee... jes.”

”Kial?”

”Mi ne scias. Eble estis sango sur ili.”

”Sed ĵus vi ne menciis gantojn.”

”Mi forgesis.”

”Kie vi portis la tranĉilon?”

”En la jakpoŝo.”

”Ĉu nuda? Sen ingo?”

”Ne... ĝi estis tia... risorta stileto.”

”Ĉu vi ĉiam portas tranĉilon?”

"Ne."
 "Kial tiufoje?"
 "Mi eble antaŭsentis, ke li minacos min."
 "Kiuj sciis, ke vi veturigis lin al Stokholmo?"
 "Neniu, mi pensas."
 "Vi pensas?"
 "Nu, mi diris al neniu."
 "Ankaŭ ne al Patrik Eriksson?"
 La junulo dum momento ŝanceliĝas, sed poste retransviliĝas:
 "Ne, mi nenion diris."
 Jankéus enĵetas:
 "Sed al Jimmy Sahlgren?"
 Martin mienas surprizite, kaj diras:
 "Kial mi diru al li?"
 "Kian rilaton vi havas al Sahlgren?"
 "Neniun! Mi renkontis lin ĉe la trotkonkursoj, alie nenio!"
 "Ĉu kutimas vi veti?"
 "Jes, kelkfoje."
 "Ĉu vi havas monon por tio?"
 "Mi ne vetas je tiel multe."
 Jankéus paŭzas, kaj Svedberg reprenas la stafetilon:
 "Ĉu Sajadirad atakis vin per la nudaj manoj?"
 "Mi ne vidis. Li saltis al mi."
 "Kiom da mono vi postulis de Sajadirad?"
 Neniu tuja respondo venas, kaj li aldonas: "Por veturigi lin."
 "Mi ne memoras... mi pensas... kvincent..."
 "Kvincent kion?"
 "Eee... kronojn... Ne, dolarojn."
 La advokato alprenas tre neŭtralan mienon.
 "Ĉu Sajadirad akceptis tion?"
 "Jes."
 Svedberg pensas pri la atesto de doktoro Wibe. Li demandas:
 "Ĉu vi diskutis la prezon?"
 "Ne... Ne tre... Ni ne havis tempon."
 "Kiulingve vi interparolis?"
 "Angle."
 "*Too much – I will pay only...* – kion li poste diris?"
 La knabo malfermas sian buŝon, sed nenio elvenas. Li aspektas kiel fiŝo sur tero. La advokato klinas sin al li, kaj diras patrece:
 "Se vi ne memoras precize liajn vortojn, simple diru tion. Ne eblas ĉion memori."
 La malfermita buŝo de Martin eĥas:

”Mi ne memoras.”

”Kion vi faris el la mono de Sajadirad?” pluas Svedberg.

”Nenion. Mi ne prenis monon!”

”Prenis? Ĵus vi diris, ke li akceptis pagi kvincent dolarojn!”

”Jes, sed ne estis tempo por tio.”

”Liaj dolaroj – kie vi tenas ilin?”

”Mi ne havas! Ili eble disfluis en la akvo.”

Svedberg rigardas dum momento al Jankéus, kaj poste ĉesigas la demandadon.



”Nu, kion vi opinias?” Jankéus petas sian kolegon pri lia impresio. Svedberg prijuĝas:

”Nu, tiu advokato ŝajnas sufiĉe talenta. Mi pensas, ke ili elektis tiun version, ĉar ili ne povas scii, kiuj atestoj kaj teknikaj pruvoj troviĝas.”

”Tamen, devus esti sufiĉe facile rompi ilian version”, opinias Jankéus. ”Estas ĝi iomete tro stulta!”

”Eble. Ĉiuokaze ni faru ĉion, kion ni povas. Ni devas tuj fari traserĉon en lia hejmo, kaj prefere ankaŭ ĉe lia amiko – aŭ eble eksamiko – Eriksson. Same ĉe tiuroteja ulo, Sahlgren. Se ni trovos la dolarojn, li devos elpensi ion novan, kion li forgesis mencii. Alie – mi momente ne vidas ion specialan. Eble se ni trovos gantojn kun pulvorestajoj. Sed tio kredeble ne okazos.”

”Bone. Ni ankaŭ demandu tiun eksamikon, kiel Martin estis vestita kiam alvenis li sabate.”

Tiel oni ankaŭ faras. Domtraserĉoj okazas. Patrik Eriksson estas pridemandata. Patro kaj patrino Fagerström estas pridemandataj. Sed la bonŝanco de la lasta vendredo ne ripetigas. Nenio plu rezultas.

Jimmy Sahlgren estas vokita al demandado, kaj li konfirmas la informon de Martin. Ili renkontiĝis ĉe la trotkonkursoj. Ili vetadis iom, sed ne havis komunajn negocojn. La patro de Martin asertas, ke li ne scias, kial Sahlgren serĉis lian filon ĉe li. La kaŭzo, ke li iom bruske forpelis Sahlgren, estis simple lia kutima manko de tempo.

Oni prezentas la sonbendan voĉon de Martin Fagerström al doktoro Wibe, kiu bone rekonas ĝin kiel la voĉon de Martin, sed ne povas diri, ĉu tiun li aŭdis sabatvespere en la arbareto. Kaj lia atesto pri la aŭditaj vortoj jam iĝis iom malpli preciza.

La havena rubujo, pri kiu la knabo indikas, ke li tie ĵetis siajn vestaĵojn, estas preskaŭ malplena.

”Ni resumu nian imagon pri la afero”, diras Svedberg en strategia interkonsiliĝo kun Jankéus. ”Iel Sajadirad interkonsentis kun la knabo pri

veturigo, kontraŭ pago. Iu el ili proponis renkontiĝi ĉe la arbareto. Okazis kverelo pri la pago, kiel Wibe atestis. En tiu kverelo la knabo mortigis la Irananon. Ĉu li planis tion? Li ja kunportis tranĉilon, de tre danĝera speco. Ĉu simple temas pri planita rabmurdo?"

"La loko ja tion supozigas. Se kunportus li la tranĉilon pro timo, kiel li diras, ŝajnus strange proponi tian renkontejon."

"Prave, sed laŭ li la Iranano proponis ĝin. Bone, poste li procedis pri la kadavro proksimume tiel, kiel li mem rakontis. Kaj dum tio li verŝajne trovis la revolveron en lia poŝo."

"Kaj kredeble ankaŭ la monon", aldonas Jankéus.

"Do, li traserĉis la poŝojn de la Iranano, konfiskis la armilon kaj monon. Ni ne scias, ĉu li portis aliajn aferojn, dokumentojn, identigilon ktp. Kaj tiam alvenis la pastro. Ŝajnas iom stranga konduto de maljuna pastro sola enpaŝi en malluman arbaron por esplori ion suspektindan."

"Nu, kiel ni scias, la pastro iris la ĝustan vojon en sekureco... Sed eble rekonis li la filon de sia kolemino, kaj ne povis imagi, ke tiu estas danĝera perfortulo."

"Bone, tio ŝajnas imagebla. Sed ankaŭ eblas, ke li fakte sciis ion, kion ni ne scias. Liaj anonimaj leteroj ja indikas, ke li estis iom scivolema pri siaj proksimumoj. Ĉu neniuj leteroj enhavas ion, kio aludas al la filo de la pastrino?"

"Mi pensas, ke ne", Jankéus respondas. "Se ne kalkuli tiun *Vi servas al Mamono*, direktitan al lia patro."

"Nu, ĉiel ajn, por ne esti malkaŝita, Martin pafis la pastron, ŝovis lian kadavron en la vepron kaj forveturis."

"Donacinte al li la revolveron", kompletigas Jankéus.

Svedberg paŭzas dum momento.

"Poste li veturis al la maro por enĵeti la kadavron de Sajadirad. Sed, diable, kial ne kunporti ankaŭ tiun de la pastro? Plastsakojn li ja havis en la aŭto, da spaco estis sufiĉe."

Jankéus kapjesas, kaj poste replikas:

"Da spaco jes, sed eble ne da tempo. Pafu kutime altiras pli da atento de la ĉirkaŭaĵo ol tranĉila piko. Kaj li eĉ pravis – se komencus li ensakigi la pastron, nia tardema doktoro Wibe stumblus sur lin, kaj eble devus li pafi ankaŭ la doktoron. Baldaŭ lia aŭto plenus de kadavroj ĝisplafone!"

"Krome, li ricevis la ideon aranĝi la morton de la pastro kiel memmortigon. Naivege, efektive, sed li eble jam estis en stato de psika ŝoko. Ankaŭ la maniero enakvigi la kadavron montras iom fuŝan sintenon, se li vere enmetis la tranĉilon kune kun ŝtonoj en la sakon."

Malgraŭ la esperoj de Jankéus, montriĝas malfacile rompi la version de advokato Segerstähl kaj lia kliento. Oni ripetis pridemandadi la suspektaton Martin Fagerström. Li restas je sia versio kaj ĉiufoje prezentas

ĝin pli kaj pli kohere. Svedberg daŭre mienas malgaje, sed Jankéus ne plu bezonas kaŝi subridon.

”Pli bone estus, se ni simple transdonus lin al la prokuroro. Ŝajnas al mi, ke ni jam plenumis nian parton de la ludo”, rezignacias Svedberg.



Sabate la 24an de oktobro pastrino Leena Fagerström entombigas la patrinon kaj filinon Ghamari en la tombejo de Resmo. Ĉeestas ĉiuj rifuĝantoj kaj dudeko da paroĥanoj. Ĉeestas eĉ la patro Ghamari inter du diskrete gardantaj policistoj. La pastrino parolas pri la Bibliaj vortoj: ”Oni donis al ili la urbojn de rifuĝo” kaj ”Li estas rifuĝejo por siaj infanoj”. Poste la du virinoj en la Irana grupo recitas Persan funebroponemon de Hafiz.

Samtempe kiam okazas la entombiga ritaro en la tombejo, la prezidanto de la paroĥa estraro alvenas al la preĝejo, ŝlosas tiun kaj mem ekpostenas sursojle. Kiam la rifuĝantoj revenas post la entombigo, li rifuzas malŝlosi. Al Leena Fagerström nun mankas forto kontraŭstari. Ŝi kondukas la grupon – ses virojn, du virinojn kaj kvar infanojn – al la blanka pastrejo, kaj provizore loĝigas ilin tie.

Dimanĉe matene, je la kvina horo, kvar policaj busetoj kun dek policistoj kaj du oficistoj el la Enmigrada Administrejo haltas antaŭ la pastrejo de Resmo. Oni ĝentile frapetas al la pordo, sed kiam la taŭzita, ĵusvekita mastrino de la domo, en ĉifita negliĝo, malfermas la pordon, oni ne atendas inviton, sed efike forpuŝas ŝin, haste flirtante per ia permesilo, kaj penetras en la domon. La evakuado de la domo okazas preskaŭ senĝene. Kelkaj krioj de infanoj, kelkaj ploratakoj de virinoj, kelkaj ekbataloj de viroj apenaŭ menciindas. La poeto kaj doktoro pri aerodinamiko, Mohammad Mirzadeh, elsaltas tra fenestro en la supra etaĝo, sed li falas sur postenantan policiston kaj mem ne vundiĝas. Al la policisto rompiĝas ripo, sed tio ne malhelpas lin heroe fikstani piedon de doktoro Mirzadeh ĝis helpanto alvenas kaj mankatenas la fuĝontan rifuĝanton.

Fine oni transportas la tutan grupon al ŝlosita rifuĝejo organizita de la Enmigrada Administrejo, de kie ili post ankoraŭ kelkaj semajnoj estos senditaj al Latvio.

En la sama tago, sed pli malfrue, post la diservo, Erland Bexelius estas entombigita en Vickleby. Pastro Sunnanbris celebras la riton parolante pri tekstoj el la Nova Testamento: ”Batalu la bonan batalon de la fido, kaj ektenu la eternan vivon, al kiu vi estas vokita”, kaj ”Estu fidela ĝis morto, kaj mi donos al vi la kronon de vivo.”



Martin Fagerström restas en la arestejo. Lia patrino trapasas religian krizon kaj ricevas provizoran forpermeson de sia ofico. Kaj Svedberg transdonas sian murdenketon al la prokuroro. Novaj krimoj jam vikatendas lian traktadon.

12. Honoro de mortintoj

La akuzisto postulas okjaran malliberigon de Martin Fagerström pro duobla murdo sen antaŭmedito, alternative senintenca kaŭzado de morto al unu persono – Reza Sajadirad. La urba tribunalo trovas nur tiun duan krimon pruvita, kaj kondamnas la akuzaton je dek-okmonata malliberigo.

Lia advokato apelacias, kaj en griza, senneĝa tago fine de januaro, la Apelacia Kortumo en Jönköping traktas la kazon. Ĝi trovas neeble prijuĝi, ĉu la versio de la akuzisto pli certas ol tiu de la akuzato, kaj sekve nuligas la antaŭan verdikton. La sola, kio restas pruvita, estas tio ke la akuzato forigis kaj enakvigis homan kadavron. Kaŭze de tiu ago oni kondamnas lin pro krimo kontraŭ la leĝo pri honoro de mortintoj. La puno estas dumonata malliberigo. Ĉar la periodo de arestado jam superas tiun tempon, Martin Fagerström elpaŝas libera el la Kortumo.

Lia patro veturigas lin al Kalmar. Tie li vizitas la policejon por repreni sian propran aŭton, kaj ekiras per tiu orienten. Sur la Oelanda ponto li alfrontas neĝblovadon el nordoriento, kiu enfermas lian aŭton en blankan vualon. Li devas malrapidiĝi, kaj ankaŭ transponte, sur la ŝoseo suden, la vento kaj neĝblovado vipas furioze de maldekstre. Preskaŭ palpe li aŭtas sekvante la dekstran randon de la vojo, ĝis fine lia malnova, vinruĝa liveraŭto haltas antaŭ la pastrejo de Resmo. Finfine hejme!

Li travagas la malplenan domon. Lia patrino ŝajne delonge ne estis tie. Laŭ lia patro, ŝi momente ripozas ĉe parencoj en Finnlando. Ie-tie kuŝas postlasitaj posedaĵoj de la Iranaj rifuĝantoj. Li lasas ilin kuŝi kie ili kuŝas kaj enfermas sin en sia ĉambro.

Matene la ŝtormo jam pasis. Ellitiĝinte li promenas al la iama ŝtonmino norde de la preĝejo. Li levas kelkajn kalkŝtonojn kaj elserĉas kartonan skatolon. Ĝi estas malseka kaj disfalas en liaj manoj, sed ene kuŝas plasta sako. Li enŝovas manon kaj palpas la monbiletojn en la sako, elprenas unu kaj rigardas ĝin. Ĝia malhela verdo prezentas kontraston al la ĉirkaŭa pejzaĝo nigra kaj blanka. Martin Fagerström enpoŝigas la sakon kaj repaŝas hejmen.

Revenante al la pastrejo de Resmo, li vidas malnovan, blankan *Chrysler* alveturi kaj halti antaŭ la blanka domo. Neniu elaŭtiĝas, sed kiam li alpaŝas la aŭton, flanka glaco estas mallevata, kaj iu eligas manon.



Ĉe sia bofratino Pirkko Grönvall en Sjundeå, vilaĝo en la sudo de Finnlando, pastrino Leena Fagerström klopodas ”kuraci siajn nervojn”, kiel diras ŝia

gastigantino. Pirkko, kiu propradire estas la eksedzino de ŝia frato, penas resanigi ŝin per rustika kampara manĝo kaj amaso da kafo je ĉiuj horoj de la tagnokto. Por digesti la manĝon Leena Fagerström pasigas la tagojn promenante laŭ kamparaj vojetoj. La bofratino traktas ŝin kiel konvaleskanton, sed ŝi sentas sin pli multe kiel rifuĝanto. Rifuĝanto en sia hejmlando, sed for de kio? Ĉu de malsukcesoj en ĉiuj flankoj de la vivo?

”Ne babilu sensencaĵon”, diras Pirkko. ”Vi faris pli da bono ol dudek saĝuloj. Se diversaj viroj ĉion fuŝas, pri tio ne vi kulpas. Nun metu la kafpoton sur la fornon, kaj poste ni hejtos la saŭnon.”



Dum Roger Svedberg trinketas sian antaŭtagmezan kafon, Tom Jankéus recitas al li el loka ĵurnalo:

”Malrespekto al la honoro de mortintoj”, li ekkrias. ”Ha! Jen la maltroigo de hodiaŭ!”

”Tio ne plu estas nia afero”, murmuris Svedberg. ”Ni fosu nian sulkon.” Dume, en lia menso aperas kvazaŭ fantoma vico la imagoj de kelkaj aliaj mortintoj, kaj li demandas sin, kiom da respekto oni montris al la honoro de tiuj.

Glosaro

En la suba listo la leganto trovos interalie kelkajn nepre necesajn neologismojn. La aŭtoro plene konsentas kun vi pri tiuj vortaĵoj, sed kion fari? Pri ili respondecas iu doktoro, kiu preskaŭ sola en ĉi romaneto misuzas ilin. La aŭtoro ne invitis lin, sed eĉ klopodis aranĝi, ke li estu murdita, sed kiel kutime li alvenis tro "tarde". Kion fari pri tia ulo?

PV Plena Vortaro, 1934

PIV Plena Ilustrita Vortaro, 1981

AC André Cherpillod: NePIVaj vortoj, 1988

EV Ebbe Vilborg: Ordbok Svenska-Esperanto, 1992

JL Jouko Lindstedt: Hejma Vortaro, 1999

KM Kraft/Malovec: Vortaro Esperanto-Ĉeĥa, 1995

NPIV Nova Plena Ilustrita Vortaro, 2002

SzK Szerdahelyi-Koutny: Hungara-Esperanta Meza Vortaro, 1996

V Vikipedio

<i>alteklezia</i>	<i>EV</i>	Apartenanta al konservativa tendenco en Luterana eklezio
<i>apercepti</i>	<i>PIV</i>	Ekkonscii ion perceptitan
<i>buso</i>	<i>PIV</i>	Aŭtobuso
<i>despera</i>	<i>AC</i>	Malespera
<i>diocezo</i>	<i>PV, PIV</i>	Eklezia distrikto de episkopo
<i>dolmeno</i>	<i>PIV</i>	Prahistoria tombo el starigitaj ŝtonoj
<i>dosiero</i>	<i>NPIV</i>	Registraĵo konservata sur komputila disko
<i>envulti</i>	<i>PIV</i>	Sorĉi aŭ suferigi per nigra magio
<i>fadi</i>	<i>PIV</i>	Mallaŭtiĝi kaj iom post iom malaperi
<i>faksi</i>	<i>JL NPIV</i>	Telefaksi, telekopii, sendi telefonrete kopion de dokumento
<i>faŭlto</i>	<i>PIV</i>	Terena nivelaŝanĝo pro fendo en la roka grundo
<i>febla</i>	<i>PIV</i>	Malforta
<i>fragila</i>	<i>PIV</i>	Malfortika, rompiĝema
<i>fridujo</i>	<i>PIV</i>	Malvarm-ŝranko
<i>glaco</i>	<i>PV, PIV</i>	Fenestrovitro
<i>hasti</i>	<i>PIV</i>	Rapidigi sin
<i>holdo</i>	<i>PV, PIV</i>	Ŝarĝejo de ŝipo, ŝipkelo
<i>kapitulo</i>	<i>PIV</i>	Eklezia (katedrala) kunveno

<i>kefiro</i>	<i>PIV</i>	Speco de acidigita lakto
<i>kiki</i>	<i>NPIV</i>	Piedbati
<i>kirko</i>	<i>PIV</i>	Kristana preĝejo
<i>koŝmaro</i>	<i>PIV</i>	Inkubsonĝo
<i>kriĉi</i>	<i>PIV</i>	Krii kiel rabobirdo
<i>merdo</i>	<i>PIV</i>	Fekaĵo
<i>morbo</i>	<i>PIV</i>	Malsano
<i>moroza</i>	<i>PIV</i>	Malgajhumora
<i>muslio</i>	<i>NPIV</i>	Miksaĵo el grioj, sekigitaj frukteroj, nuksoj kaj simile
<i>Oelando</i>	<i>EV</i>	Insulo kaj provinco en sudorienta Svedio (Öland)
<i>pado</i>	<i>PIV</i>	Mallarĝa tervojeto
<i>pico</i>	<i>NPIV</i>	Pastoplato kun tomatoj, fromaĝo k.a. bakita en forno
<i>pigra</i>	<i>PIV</i>	Mallaborema, malpenema
<i>pobo</i>	<i>PIV</i>	Malantaŭo de ŝipo aŭ boato
<i>polmo</i>	<i>PIV</i>	Manplato
<i>prompta</i>	<i>PIV</i>	Tuj aganta, senhezita
<i>puzlo</i>	<i>PIV</i>	Bildo kunmetebla el malregule dissegitaj pecoj
<i>sinki</i>	<i>PIV</i>	Malsupreniĝi, malrapide fali
<i>Skanio</i>	<i>AC, EV</i>	la plej suda provinco de Svedio (Skåne)
<i>skanseno</i>	<i>KM, SzK</i>	Vilaĝmuzeo, subĉiela muzeo de popolaj domoj
<i>skualo</i>	<i>PIV</i>	Subita ventpuŝego, ofte kun ekpluvo
<i>Smolando</i>	<i>EV</i>	Provinco en sudorienta Svedio (Småland)
<i>spekti</i>	<i>PIV</i>	Rigardi kaj aŭskulti prezentadon
<i>suicido</i>	<i>PIV</i>	Memmortigo
<i>supeo</i>	<i>PIV</i>	Delikata aŭ festa vespermanĝo
<i>ŝamano</i>	<i>PIV</i>	Ekstaza pastro/sorĉisto/kuracisto en iuj kulturoj
<i>tarda</i>	<i>PIV</i>	Malfrua
<i>tepida</i>	<i>PIV</i>	Duonvarma-duonmalvarma
<i>triktrako</i>	<i>PIV</i>	Dupersona ludo kun diskoj sur tabulo kun triangulaj fakoj
<i>tropeolo</i>	<i>PIV</i>	Flava-oranĝa-ruĝa floro (<i>Tropæolum</i>)
<i>tumulo</i>	<i>PIV</i>	Prahistoria tombo el teramaso
<i>vestiĝo</i>	<i>PIV</i>	Restaĵo de io malaperinta
<i>voduo</i>	<i>V</i>	Afrikdevenaj religiaj ritoj en Ameriko

Sten Johansson

NEĜO KAŜAS NUR...

Krimromaneto

Al-fab-et-o
Skövde, Svedio 2001

Dua reviziita eldono 2014

1. Nigre-blanke

Ŝi ege blankas, kuŝante surdorse inter nigraj arbedoj. Apenaŭ kolora nuanco distingas ŝin de la ĉirkaŭa neĝduno. Nur ĉe la kapo duone kaŝita de neĝo vidiĝas nigra hararo, sed la vizaĝo, eĉ la lipoj, malhavas koloron de vivo. Ŝi portas striktan bluzon, blankan kaj maldikan, kiu montras etajn altaĵojn de mamoj. La subo de ŝia korpo nudas, kaj meze de ŝia palhaŭta, malgrasa subventro kelkaj frostaj neĝflokaj ornamas etan tufon el nigraj pubharoj. La maldikaj kruroj montras dudirekten. Apude en la neĝo videblas ĝinzo kaj orfa ŝuo, ŝueto endoma aŭ somera, kiu impresas same fremde en ĉi tiu neĝamaso, kiel la blanka korpo de virino.

Du knaboj gapas terurite sed fascinite al ŝia vulvo.

”Ĉu ŝi estas morta?” unu demandas.

”Kompreneble! Ŝi frostmortis, aŭ iu mortigis ŝin.”

”Kion fari? Ĉu ni portu ŝin?”

”Ne. Oni ne rajtas tuŝi. Ni telefonu al la polico.”

La unua knabo aspektas, kvazaŭ li ne volonte rezignus tuŝi la obscene eksponitan korpon. Lia amiko, kun plia kompreno pri kio decas kaj licas, tamen venigas lin for de la kaŝita vepro, tretante en ĝisgenue profunda neĝo al strateto antaŭurba. Post kelkaj minutoj ili atingas telefonon kaj povas raporti sian ŝokan trovon al la urba polico.



La vintra klimato de sudorienta Svedio kutime ne tre dramas. La temperaturo plej ofte pendolas ĉirkaŭ la nulo de Celsiusa termometro, kaj la vetero alternas inter nebulo, blovado kaj nebulo kun blovado. De temp' al tempo tamen iu malalta aerpremo super Baltio kaŭzas fortan venton el nordoriento al tiu angulo de la Skandinavia duoninsulo. Tia kutime malvarma vento kolektas amason da humido balaante la Baltan maron, precipe komence de la vintro, kiam la marakvo ankoraŭ tenas temperaturon de kelkaj gradoj plusaj. Venante super la teron, la vento deponas tiun humidon en formo de neĝo. Tiaj neĝoŝtormoj el nordoriento povas foje paralizi la marbordan regionon, dum oni apenaŭ rimarkas ilin kelkdek kilometrojn pli okcidente.

Vendrede la sepan de januaro tia vetersistemo rezultigis neatendite fortan neĝblovadon en la regiono de *Kalmar*, kvieta kaj dormema havenurbo ĉe la Balta maro. Ĉiuj ŝoseoj kaj fervojoj ŝtopiĝis, aviada trafiko nuliĝis, kaj oni fatalisme atendis malintensiĝon aŭ paŭzon en la blovado, por ekhavi okazon sennegigi vojojn kaj stratojn kaj fortransporti la

neĝamasojn. La ŝtormo komenciĝis vendrede tagmeze, kaj por multaj homoj la ĉefa zorgo estis kiel posttagmeze entute reveni hejmen de sia laborejo aŭ lernejo. Jam vespere la polico ricevis lavangon da alvokoj de maltrankviluloj, kies familianoj malfruis hejmen. Sabate la blovado daŭris, kaj nur vespere ĝi kvietiĝis. Tiam komenciĝis ampleksa fosado kaj ŝovelado. Oni dissendis kelkajn patrolojn por serĉi homojn, kiuj ankoraŭ mankis. Polico, soldatoj kaj civiluloj kunlabore serĉis laŭ vojoj, kie neĝdunegoj povus enhavi kaŝitan aŭton.

Dimanĉe vespere la polico kuraĝis resumi, ke plej kredeble neniuj homoj mortis, sed kelkaj suferis de frostvundoj aŭ ĝenerala malvarmiĝo pro tro longa restado eksternome. Tiam venis alvoko de du ekscititaj dekdujaruloj, kiuj trovis en la neĝo mortan virinon duonnudan.



”Do, murdo post seksperforto. Sed kial meze de neĝamaso? Aŭ ĉu tien portis li la kadavron nur poste?” demandas Tom Jankéus, policinspektoro ĉe la urba polico de Kalmar.

”Eble ni atendu la nekropsian raporton antaŭ ol solvi la kazon”, iom seke rimarkigas lia kolego kaj ĉefo, komisaro Roger Svedberg.

”Ĉiam prudenta kiel gufo”, moketas lin la pli juna kolego. ”Se statuso vi tie kun mi, inter ŝiaj nudaj kruroj, vi eble estus malpli indolenta. Estis vera porkaĵo!”

”Nu, jen la metio.”

”Efektive mi facile mem iĝus murdisto, kiam ĵurnala fotografisto alŝovis sian kadavroflaran nazon, kvazaŭ volus li foti ŝian... nu...”

Jankéus ne trovas vorton konvenan por uzi antaŭ la vizaĝo ĉiam serioza de Svedberg. La komisaro ne apartenas al tiuj policistoj, kiuj volonte farĉas sian ĵargonon per frivolaĵoj kaj cinikaĵoj. Kelkaj el la subuloj eĉ nomas lin pruda. Aliflanke, Jankéus mem havas reputacion de strangulo iom tro intelekta. Precipe liaj flankaj komentoj ofte lasas postimpreson ĉe la kolegoj, ke oni eble ne plene komprenis la spritaĵon. Kiam eblas, tiu duopo tamen volonte kunlaboras, kvazaŭ kompletigante unu la alian. Kaj jen venis sur iliajn tablojn nova kazo. Nova murdenketo.

Post alvoko fare de la du knaboj, la polico efektive trovis kadavron de virino kuŝantan en la neĝo, en arbareto norde de la urbo. Jankéus, kiu jam estis surloke, referas la provizoran raporton al Svedberg:

”Bone, do. Aspektas ŝi azia, laŭ mi. Eble el Ĉinio aŭ sudorienta Azio. Aĝo – nu, ne facile diri, tamen juna. Eble dudek kvin. Ŝi ne estis vestita por neĝoŝtormo, se tion diri milde. Maldika bluzo, mamzono, ŝtrumpetoj, punkto, fino. Apude kuŝis ĝinzo, kalsoneto kaj du ŝuetoj, el kiuj unu kun disŝirita rimeno. Ordinaraĵ vestaĵoj, ŝajne aĉetebblaj en ordinara sveda butikoj.

Brakhorloĝo, kiu montris ĝustan horon. Neniu dokumento. Ĝiaj kruroj estis disaj, kaj la vagino impresis al mi...” Jankéus serĉas vorton. Ja li ne estas fakulo, do kion diri? ”...iel mistraktita. Nu, bone, atendu ni la nekropsion, kiel vi diris... Plue apenaŭ io dirindas. Mankis spuroj en la neĝo, krom tiuj de la du knaboj, kaj ili feliĉe haltis je dumetra distanco. Iom da neĝo kovris kapon kaj piedojn, tamen ne multe. Sed estis kvazaŭ neĝamaseto ĉirkaŭ ŝia korpo.”

Svedberg dum momento kontemplas fotografiaĵon faritan surloke. Ĝi impresas kvazaŭ nigre-blanka foto, nur fone oni imagas obtuze malhelverdan koloron de iu pino. Li turnas sin denove al sia kolego:

”Ĉu iu malaperinto, kiu konvenas?”

”Neniu en nia distrikto. Ekhavos ni la tutlandajn informojn baldaŭ.”

”Kaj la preciza loko estas...?” Svedberg stariĝas kaj ekiras al urba mapo sur muro de lia ofica ĉambro.

La kolego akompanas lin legante en sia notlibro.

”Kvarcent kvindek metrojn norde de la strato Pålhogsgatan, kvarcent metrojn de la maro. La plej proksima domo estas *Björktorp*.”

Svedberg alportas liniilon kaj krajonon de la skribtablo, iom mezuras, kaj desegnas krucon sur la mapo. Poste li kontemplas ĝin dum kelka tempo, kaj almetas fingron iom sude de la kruco.

”Jen hospitalo. Kronikulejo, ĉu ne? Eble ŝi laboris tie.”

”Nu, ni esploru. Sed diable, kion faris ŝi duonan kilometron norde de la hospitalo?” demandas Jankéus.

”Laŭ la vesto ŝajnas pli kredinde, ke oni transportis ŝin tien por depono. Sed kio estas *Björktorp*, ĉu ordinara loĝdomo?”

”Tute ne. Ĝi estas edukejo por junaj deliktuloj.”

La mieno de Svedberg eĉ pli mallumiĝas.

”De kiu aĝo?” li demandas.

”Ne scias mi. Tamen sufiĉe aĝaj por fari porkaĵojn, supozeble.”

2. Ĉizu runŝtonon!

En la policejo de Kalmar regas nekutima kvieto. Tiom da policistoj laboregis dum kaj tuj post la neĝoŝtormo, ke nun apenaŭ duono de la normala laborforto deĵoras. La ceteraj ripozas post trapasita streĉa laboro. Jen kaj jen en la koridoroj eĥiĝas sonoranta telefono el iu senhoma ĉambro. Kvankam estas lundo, la etoso pli similas dimanĉon.

La ofica ĉambro de komisaro Roger Svedberg tamen plenas je homoj, kaj tie regas tute alia etoso – io simila al interkonsiliĝo antaŭ grava batalo. Efektive plenigas ĝin nur kvar homoj, sed ili ŝajnas amaso, ĉar la komisaro disponas tute egalan ĉelon kiel ĉiuj aliaj oficistoj en la policejo – krom kompreneble la distrikta poliestro. Svedberg tamen havas privilegion eble nur hazardan – tra lia fenestro vidiĝas ne nur la kontraŭa doma muro, sed krome turoj kaj tegmentoj de la urbocentro. Se lia ĉambro situus unu etaĝon pli alte, eble eĉ la maro jen kaj jen vidiĝus.

Ĉi-momente li tenas foton en la maldekstra mano kaj faskon da tajpitaj paperoj en la dekstra. Li montras la foton al siaj kunlaborantoj. Ĝi prezentas junan virinon kun rigide senvivaj okuloj, nigraj fruntharoj, nigraj maldikaj brovoj, altaj vangostoj, eta nazo, eta ŝajne senkolora buŝo kaj rondeta mentono.

”Bergström! Andersson! Kopiu ĉi tiun kaj iru demandadi en la domoj de Norrliden, ĉu iu rekonas ŝin. Alteco 155 cm, aĝo inter dudek kvar kaj tridek.”

La du nomitaj policistoj prenas la foton kaj foriras. Restas la duopo Jankéus kaj Svedberg.

”Jen la raportoj teknika kaj nekropsia”, pluas tiu lasta, svingante la paperaron.

”Ne laŭtleĝu la tuton”, intervenas Jankéus. ”Tiuj uloj diable vortlaksas. Donu la esencon, mi petas.”

”Bone. Kiel plaĉas al vi. Sed fojfoje oni scias nur poste, kio vere estis la esenco”, sekas Svedberg kaj eklegas jen kaj jen.

”Origino necerta, eble el Filipinoj aŭ Tajlando. Vestaĵoj de sveda marko, kompreneble fabrikitaj en Indonezio, tamen por la okcidenta merkato. Ŝuoj portugaliaj, sed aĉeteblaj en Svedio.”

Li preteras iun tekston, kaj jen rekomencas:

”Strangolita per ia mola materialo ĉirkaŭ la kolo, aŭ eventuale alimaniere sufokita. Markoj sur la kolo neklaraj. Apenaŭ spuroj de batalo, tamen sub kelkaj ungoj troviĝas haŭteroj, supozeble de alia persono. Vestaĵoj nedifektitaj. Nur ŝuo disŝirita. Unu skrapvundo sur la dekstra antaŭbrako kaj du-tri ekimozoj sur la kruroj.”

Li rigardas al Jankéus kaj aldonas kvazaŭ interprete:

”Bluaĵoj, tio estas.”

Jankéus ridetas. Li apenaŭ bezonas tradukon – lia vortaro almenaŭ ne malsuperas tiun de lia ĉefo. Tiu foliumas al posta paĝo. Jankéus restas nekutime silenta.

”Laŭ la stato de histoj kaj organoj la morto okazis inter kvardek kaj kvindek horojn antaŭ la nekropsio, kio signifas inter la deknaŭa horo vendrede vespere kaj la kvina sabate matene.”

”Alivorte – nokte, meze de la neĝoŝtormo”, konkludas Jankéus.

Svedberg senkomente pluas.

”Postmorte la vagino estas penetrita. Neniu spuro de spermo. Materialo por eventuala DNA-testo ĉerpita, sed provizore restas dubinde, ĉu entute okazis koito kunlige kun la mortokazo. Ĉiel ajn, oni bruske premis objekton malmolan kaj malglatan en ŝin. Malbelaj skrapvundoj, sed apenaŭ sango, ĉar nur postmorta lezado. Ĉe la cervika buŝo fibroj de bova ledó.”

Nun la silentemo de Jankéus finiĝas.

”Bova ledó? Ĉu mi misaŭdis?”

”Ne. Bova ledó oni skribis.”

Momento da silento, kaj jen denove Jankéus:

”Mi ne scias kial, sed ial mi ekpensas pri vipo. Tamen ŝi ne havis iajn vipmarkojn surhaŭte, ĉu?”

”Ne, nenio krom la jam dirita. Restas ankoraŭ kelkaj precizigoj pri la vaginaj skrapvundoj, sed mi lasos tion. Stomake duondigestita rizo, porka viando, legomoj, haringo, de manĝo eble horon antaŭ la morto. Stomake kaj sange ankaŭ iomete da alkoholo kaj benzodiazepino, tamen tute ne en danĝera kvanto.”

Li denove levas la rigardon kaj aldonas interprete:

”Tio estas dormigilo aŭ trankviligilo.”

”Nu, la rizo ŝajne konvenas”, komentas Jankéus. ”Sed ĉu kutimas azianoj frandi haringojn?”

”Evidente”, koncizas Svedberg. ”Tamen unu plia afero gravas. Ŝi estis en la dektria aŭ dekkvara semajno de gravedeco.”

”Nu, normale tio devus signifi, ke ŝi mankos al iu”, murmuris Jankéus, eble pensante pri siaj propraj edzino kaj tri infanoj. ”Sed oni ne povas scii. Eble ĝuste tio kaŭzis ŝian morton.”

”Kompreneble oni konservis provon ankaŭ de la feto por estonta DNA-komparo, same kiel la substancon trovitan subunge”, sciigas Svedberg metante la paperaron skribtablen. ”Do, ek al niaj taskoj. Kronikulejo kaj edukejo. Al kiu unue?”

Jankéus levas la ŝultrojn.

La du kolegoj kune ekiras aŭte. La vetero rapide ŝanĝiĝis, kaj la stratoj nun plenas je kota degelaĵo. Ju pli ili proksimiĝas al la norda urborando, des pli da blanka neĝo tamen restas sur kaj apud la stratoj.

Unue ili senvorte vizitas la trovejon, kio necesigas longan promenon tra profunda, malseka neĝo. Surloke nenio plu videblas krom la policaĵ plastbendoj, kiuj ankoraŭ simbole baras la lokon.

”Nu, se hazarde la murdinto perdis sian vizitkarton surloke, ni baldaŭ konos lin”, komentas Jankéus. ”Neĝo kaŝas nur ĝis printempo, laŭdire. Sed ĉe ni oni devus diri ‘nur ĝis la sekva degelvetero’. Diabla kaĉo. Oni apenaŭ plu vidas la neĝamason, en kiu ŝi kuŝis.”

”Nu, ĉiuj neĝdunoj nun ŝrumpas”, indiferentas Svedberg.

Ili ambaŭ silentas dum kelka tempo. Svedberg preparas sin por repaŝi sur la propraj piedsignoj. Tiam Jankéus rigardas lin kun subita tensio.

”Sed ne temis pri neĝduno alblovita de la vento”, li atentigas. ”Ĝi ne havis tian formon. Al mi ĝi pli similis amason, kiun oni kunŝovis intence. Kvazaŭ por kaŝi ŝin.”

”Nu, tio tute eblas.”

”Sed la afero estas, ke ĝi ne kaŝis ŝin. Aŭ maksimume ŝiajn piedojn kaj parton de la kapo. Kaj kiam staris mi ĉi tie dimanĉe vespere, regis ankoraŭ frosta vetero. Ŝia bluzo eĉ estis vera kiraso el glacio.”

”Nu, sendube oni kovris ŝin per neĝo, sed ĝi degelis pro la korpa varmo.”

”Jes! Kaj tio pli-malpli pruvas, ke ŝi venis ĉi tien viva. Oni ne alportis kadavron por deponi ĉi tie!”

Svedberg rigardas sian kolegon penseme. Li preskaŭ nevideble kapjesas kaj diras:

”Bone, tio ŝajnas provizore pravigita supozo.”

Jankéus ridetas. Ja li kutimas je la malvarmeta temperamento de sia ĉefo, tamen li murmuris al si mem, paŝante reen post Svedberg sur iliaj ĵus faritaj piedsignoj:

”Provizore pravigita... Jen la maltroigo de hodiaŭ...”



La nordaj kvartaloj de Kalmar havas aspekton de ordinara sveda urbo moderna. Se oni vidus ilin de supre, oni prenus ilin por arbaro. Pli zorge rigardante, oni eble demandus sin, kial troviĝas tiom da vojoj en tiu pinarbaro, kaj poste oni konkludus, ke la grizaj rektanguloj videblaj jen kaj jen inter la arboj estas tegmentoj de domoj.

En la jena januara tago, la tegmentoj pro neĝo tamen ne grizas, sed blankas, kaj ankaŭ surarbe vidiĝas iom da neĝo, kiu ankoraŭ ne degelis aŭ defalis. Eĉ la stratoj ankoraŭ formas reton el plejparte blankaj linioj.

La kronikuleja vizito de la du murdenketantoj donas nenion. La virino ne laboris tie, nek estas rekonata de la deĵorantaj flegistinoj. La policistoj

rezignas demandi la pacientojn, el kiuj pluraj ne rekonas siajn proprajn parencojn vivantaj.

La estro de la junula edukejo – aŭ bubejo, laŭ la ĵargono de Jankéus – estas viro proksimume kvardekjara kun vizaĝo mordita de eksterdoma laboro, ĉagrenoj aŭ eble alkoholo. Ŝajne li ŝatas nek vizitantojn, nek policistojn. Post iom la du enketantoj ekpensas, ke li ankaŭ ne tre ŝatas siajn junajn edukatojn. La foton de la murdita virino li rigardas maleme kaj rapide decidas, ke ŝi ne konatas al li.

Dum kelka tempo oni iom interparolas pri la loĝantoj de la edukejo. Ili estas de 14- ĝis 17-jaraĝaj, esceptokaze pli junaj, momente nur knaboj, sed fojfoje oni devas akcepti ankaŭ knabinojn, ”kvankam tio kunportas amason da diablaĵoj”, laŭ la estro. La junuloj ĉi tie loĝas kaj lernas. Principe la domo estas ŝlosita, tamen ŝajnas iom nebule, kion tio konkrete signifas.

”Tamen kutimas ili eskapi, ĉu ne?” maldiskretas Jankéus. ”Jam ofte aŭdis mi, ke ni devas kolekti ilin urbocentre kaj reporti al vi, eĉ ripete, kelkfoje.”

La estro evidente ne aprezas tiun atentigon. Li montras al la fenestro de sia oficejo.

”Rigardu mem. Ĉu vi vidas kradon? Ĉi tio estas edukejo, ne malliberejo.”

”La lastan semajnfino, dum la neĝoŝtormo, ĉu forestis iu el viaj idoj?” Jankéus demandas.

”Neniu mankis. Kaj ili ne estas miaj idoj”, acidas la estro.

”Kiel vi rimarkus, se iu nokte forirus kaj revenus?” scivolas Svedberg.

”Ne eblas foriri. La pordoj estas ŝlositaj, kaj unu dungito ĉiam ĉeestas, ankaŭ nokte.”

”Tamen ili foje sukcesas eskapi...”

”Ne senspure kaj nerimarkite. Krome neniu el ili ŝatas neĝon.”

”Bonvolu diri, kiu el la dungitoj deĵoris nokte inter la vendredo kaj sabato.”

La estro stariĝas, rigardas deĵoroskemon surmure kaj raportas:

”Eva Ehnberg. Ŝi estas spertulo. Ŝin oni ne trompas.”

Ili petas pri informoj pri la nunaj loĝantoj, kaj la estro maleme donas tiajn. Momente temas pri sep knaboj, kiuj jen troviĝas pro diversaj krimetoj kaj krimoj, kaj kies gepatroj aŭ zorgantoj ne sukcesas aŭ ne zorgas eduki ilin. Narkotaĵoj, alkoholo, ripetita ŝtelado kaj rabado, perfortado. *Fredrik*, dekkvinjarulo, ŝovis tranĉilon en la ventron de alia junulo. *Semir* bezonus malvenenadon de sia drogdependo, sed neniu kliniko akceptas tiel junan knabon. *Jonatan* ne povis resti en sia familio, ĉar li stultumis kun la duonfratino.

”Stultumis?”

”Jes. Seksa misuzo de infano. Fakte, li mem estas infano, tamen infano kun seksurĝo.”

”Kiuaĝa?”

”La knabo? Hodiaŭ dek ses, sed psike nematura.”

”Kaj la fratino?”

”Mi ne scias. Eble dek du.”

Svedberg kaj Jankéus rondiras en la domo, kie du instruistoj okupiĝas pri la sep knaboj. Neniu el la knaboj rekonas la virinon de ilia foto. Neniu estis eksterdome en la tuta vendredo kaj sabato, pro la veteraĉo. La netrompebla Eva Ehnberg eklaboros nur morgaŭ.

Reveninte en la policejon ili provas resumi, sed troviĝas apenaŭ io resuminda.

”Ni atendu la rezultojn de la demandado en loĝdomoj. Kaj la liston tutlandan de malaperintoj. Ĝi devus jam alveni, ĉu ne?” Svedberg ĵetas rigardon al sia ujo por envenanta poŝto, kaj ekkrias: ”Ha, jen ĝi. Bone, ni traserĉu!”

Ili sidiĝas kune super la listo, kun la kapoj preskaŭ intertuŝe, traserĉante, kribrante.

”Plejparte adoleskuloj, ŝajne...” komentas Jankéus.

”Kaj plejparte denaskaj svedoj”, malkontentas Svedberg. ”Sed jen! Vidu! Hanna Westberg, dekokjara, adoptita el Koreio je aĝo dujara, malaperis jaŭde en Gotenburgo.”

Jankéus montras skeptikan mienon.

”Koreio... Nu, eblus. Tamen dekokjara... La nekropsio diris... ĉu ne dudek kvar ĝis tridek? Nu, bone. Ili ne estas magiistoj, tiuj buĉistoj. Kaj eble ili ne ĉiutage tranĉas koreinojn...”

Svedberg rigardas lin kun mieno preskaŭ nigra pro malaprobo dirante:

”Nu, kompreneble ni tamen kontaktu tiujn homojn. Aŭ pli ĝuste faksu la foton al la Gotenburgaj kolegoj. Tamen, ni finu la liston, ĉu ne? Povas esti aliaj.”

Sed neniu alia malaperinto ŝajnas eĉ proksimume kongrui kun la murditino, kaj oni etendas la manon al la pajlero el Gotenburgo, sendante tien la foton, tamen ne fakse, sed per skanilo kaj retroŝto, laŭ propono de Jankéus.

”Ĉu tiel ĝi vere sekure alvenos rekonebla?”

”Svedberg, Svedberg, vi estas ŝtonepokulo! Ĉizu runŝtonon!”



La tede rutina demandado en loĝdomoj proksime al la loko, kie oni trovis la kadavron, donas unu solan rezulton. Virino tridekjara asertas, ke ŝi tri- aŭ kvarfoje vidis la nekonatan virinon de la foto en la kvartala manĝobutiko. Ŝi

tamen ne rimarkis kiel aŭ de kie ŝi venis butiken, nek kien ŝi foriris de ĝi, nek kion ŝi aĉetis. Ŝi asertas, ke la virino butikumis sola, kaj ke ŝi almenaŭ unufoje portis ĝinzon kaj verdan jakon. Neniu el la dungitoj de la butiko rekonas la virinon de la foto.

”Ne multe, efektive. Tamen, se ŝi vere vidis nian virinon tri- aŭ kvarfoje, tio indikas, ke ŝi ne estis absoluta fremdulo. Ŝi vivis ie proksime aŭ plurfoje vizitis iun loĝanton”, resumas Svedberg.

”Jes, sed nur unu atestanto estas iom ŝancela fundamento. Emas oni juĝi, ke ĉiuj orientanoj aspektas same, ĉu ne?” rebatas Jankéus.

Oni elserĉas en la loĝantara registro ĉiujn junajn virinojn naskitajn en orienta Azio, loĝantajn en la policedistrikto de Kalmar, kiuj akiris svedan civitanecon. Oni trovas tridek kvar, el kiuj la plimulto naskiĝis en Suda Koreio kaj portas svedajn nomojn, do sendube estis adoptitaj kiel infanoj. Poste oni elserĉas iliajn fotojn en la pasporta registro. Montriĝas, ke ĉiuj krom du havas pasporton. Neniu el ili tamen tre similas la mortigitan virinon. En du dubaj kazoj Svedberg eĉ telefonas al la koncerna persono, kaj ĉar ili respondas la telefon Alvokon, oni konkludas, ke ili ne estas murditaj.

La forkurinta Hanna el Gotenburgo troviĝas viva kaj sana ĉe iu viro en Stokholmo, kaj neniu trovas ŝin aparte simila al la kadavra foto el Kalmar. La enketo ne ekas. Mankas fadeno.

Jankéus, kiu de kelka tempo sidadas sur seĝo turnante liniilon tien-reen, nun stariĝas. Li gratas al si la nukon, alĝustigas la okulvitrojn kaj diras:

”Iros mi paroli kun Vivianne.”

”Vivianne?” Svedberg mienas stulte.

”La inspektoro Ljunggren. Ŝi estas saĝulino.”

Svedberg ne volas rekte nei tion, kvankam li ne komprenas, kiel tio rilatas al io ajn. Sed Jankéus jam survojas el la ĉambro, dum la murdenketo ankoraŭ nenien survojas. Svedberg reprenas la nekropsian raporton, kvankam li jam konas ĝin pli-malpli parkere.

Policinspektoro Vivianne Ljunggren ŝajnas iom premita de urĝaj taskoj, tamen ŝi lasas la protokolon, kiun ŝi tralegas, petante ke Jankéus sidiĝu.

”Ni okupiĝas pri tiu murdita virino...”

”Mi scias. Aĉa afero.”

”Nu. Ni ne trovas komencon. Restas ŝi anonima. Neniu konas ŝin. Tamen ni kredas, ke ŝi eble estis lokano. Sed kiel serĉi? Neniu anoncis ŝin malaperinta.”

La inspektorino pensas dum momento.

”Ŝi estis orientano, ĉu?” El Azio?

”Laŭaspekte.”

”Kompreneble, ŝi povas esti sveda civitanino.”

”Nu, ni klopodis esplori tion, sed ne trovis eblan nomon.”

Denove eta pensopaŭzo, kaj poste Vivianne Ljunggren diras:

”Parolu kun la virina azilo!”

”La virina azilo?”

”Jes. Ili konas kelkajn aziajn virinojn kiuj havas malmulte da kontakto kun la sveda socio. Fakte, estus pli bone, se mi parolus kun ili, sed mi momente ne havas tempon.”

”Mi parolos kun Svedberg. Li petu la oldulon, ke ni rajtu prunti vin. Mi revenos.”

La oldulo, tio estas la distrikta poliestro, vere bonvolas ordoni tian aranĝon, kaj baldaŭ Tom Jankéus kaj Vivianne Ljunggren ekiras al adreso en ordinara loĝdomo. Neniu tabulo, neniu insigno, sur la porda leterfendo aperas la nomo *Eva Borg*. ”Tre diskreta azilo”, pensas Jankéus. Li cetere devas atendi ekstere, dum la koleginino eniras en la apartamenton.

La du virinoj salutas unu la alian. Ili estas konatoj kaj ofte okupiĝas pri la samaj kazoj kaj homoj, tamen ofte malsamcele. Dum la policistino kolektas informojn pri krimoj, la azila deĵorantino ĉiam unuavice pensas pri sekureco kaj sekreteco de la klientinoj. Ĉi tien venas virinoj, kiuj timas pri sia vivo kaj sano, kaj pri siaj infanoj. Por ili unuarange gravas vivi en trankvilo, sen perfortoj, ne nepre atesti antaŭ tribunalo pri suferitaj krimoj.

Krome kelkaj el la virinoj venantaj al la azilo mem estas krimuloj. Iliaj krimoj povas vari. Iuj restas senpermeso en Svedio, kaj tiam la tasko de la polico estas trovi ilin kaj forsendi ilin el la lando. Aliaj kidnapis siajn infanojn de ilia patro, timante pri ilia sekureco kaj bonfarto. Tiam la polico devus reporti la infanojn al la patro.

La interparolo do ne estas tute amika kaj fratineca. Vivianne Ljunggren klarigas la aferon, montras la foton kaj emfazas, ke temas pri virino mortigita kaj eble seksperfortita.

Bodil Stenesjö, la azilistino, rigardas la foton kaj rigidiĝas. Ŝi estas fortika virino kun serioza vizaĝo kaj decidaj diroj kaj movoj, kiu ŝajne travivis plej diversajn emociigajn spertojn sen ŝanceliĝi. Sed nun ŝia suba lipo ektremas, ŝi raŭke flustras ”Tiu porko!” kaj poste devas plurfoje graki por klarigi la voĉon.

”Ŝi estas Lily. Ni nomis ŝin Lily, la veran nomon mi momente ne memoras. Ŝi venis el Bankoko antaŭ... nu, eble antaŭ du-tri jaroj, kun tiu... kun sia edzo. Ĉi tien ŝi venis lastan printempon. Tiam la edzo divorcis kaj elĵetis ŝin el la hejmo, kaj vi supozeble jam ĉasis ŝin. Sed post kelkaj semajnoj ŝi reiris al la eksedzo, kaj poste mi ne revidis ŝin.”

”Ĉu vi povas trovi ŝian nomon?”

”Nu, momente ne, sed eble iu el la aliaj scias. Ni ne notas skribe, pro sekureco.”

”Vi diris *tiu porko*. Pri kiu vi pensis?”

”Pri *li* evidente! La edzo! Aŭ ĉu iu alia murdis ŝin?”

La policistino rutine ne respondas demandojn, sed pluas:

”Oni ĝuste enketas pri tio. Sed kiu estas ŝia edzo?”

”Tute ordinara porko, kiu kredeble timas virinojn kaj tial konsumas ilin kiel la frukton de l’ sezono. Ŝi estis lia... eble tria aŭ kvara. Ĉiuj el Tajlando, mi pensas. Post unu aŭ du jaroj, li forĵetas ilin, la polico helpeme forsendas ilin, kaj li povas revojaĝi por trompi la sekvan, laŭvican...”

”Ĉu vi scias lian nomon?”

Bodil Stenesjö pripensas. Post kelka tempo ŝi trovas ion:

”Io kun *Rund...* Ĉu Rundblad? Rundgren, eble. Serĉu ĉe tiaj nomoj. Tiel vi trovos ankaŭ ŝian nomon.”

”Ĉu en Kalmar?”

”Laŭ mia scio, jes.”

Vivianne Ljunggren pripensas, ĉu ankoraŭ io. Ŝi ĝojas, ke la ideo pri la azilo donis tujan trafon. Jes, jen ideo trafas ŝin:

”Ĉu iu alia el tiuj edzinoj, do de la sama viro, vizitis vin?”

”Jes.”

”Ĉu vi povus helpi nin trovi iun el ili?”

”Ne.”

”Tamen temas pri murdenketo, vi scias.”

”Vi eraras. La alia eksedzino – mi renkontis nur unu alian – ankoraŭ vivas. Do ne temas pri murdenketo. Temas pri vivebleco.”

La polica inspektoro pripensas momenton kaj rezignas sian ideon. Eble per la loĝantara registro oni tamen trovos almenaŭ la nomon. Ŝi dankas pro la informoj kaj reiras al Jankéus, kiu poste enaŭte kundividis ŝian rikolton. Li gajniĝas kiel petola bubo.

”Vivianne, estas vi diable mirakla policisto! Kial ni ne ĉiam laboras kun vi?”

”Se mi solvus ĉion al vi, vi iĝus senlaboraj”, respondas samtone la kolegino.



La loĝantara registro enhavas kelkajn *Rundblad* kaj *Rundgren*, sed nur kiam Jankéus pluiras al *Rundqvist* lia serĉado rezultigas ion. *Nils Rundqvist*, divorcinta de *Sirilak Lily Rundqvist* antaŭ unu jaro, tamen ambaŭ aperas kun la sama adreso, Fjärilsvägen 10. La telefonlibro ne konas ilin, do Svedberg kaj Jankéus ekiras al la koncerna strato.

Ili alvenas al vico-seria domo kun dudeko da leterkestoj, dudeko da egalaj kradpordetoj kaj dudeko da minimumaj antaŭgardenetoj. Ĉe numero 10 la nomtabulo anoncas *Karlsson*. La du policistoj tamen sonigas ĉeporde, kaj malfermas virino pala kaj ruĝhara, eble tridekjara, kun bebo sur la kokso.

”Bonan tagon. Polico. Ni serĉas Nils Rundqvist”, salutas Svedberg.
La virino mienas konsternite kaj la infano ekkrias.

”Rundqvist? Li delonge ne plu loĝas ĉi tie”, ŝi krietas por superi la voĉon de sia ido.

”De kiom longe, mi petas?”

”Nu, ni ekloĝis ĉi tie la unuan de majo lastjare”, informas la dommastrino.

”Ĉu vi aĉetis la domon?”

”Jes, nature. Ni aĉetis de tiu Rundqvist.”

”Kaj ĉu vi scias, kie li nun loĝas?”

”Ni ricevis nur adreson de lia laborejo, por plusendi poŝtaĵojn, se venos tiaj. Ŝajnas al mi ke li eble forlasis la urbon.”

”Do, ĉu vi povus doni al ni tiun laboradreson? En kiu loko ĝi estas?”

”Vi ricevos, se mi trovos. Bonvolu enveni en la vestiblon!”

Ŝi elserĉas suĉumon por silentigi la bebon, kiu aĝas eble duonjaron. Endome inter disaj ludiloj kaj ŝuoj alkuras knabeto proksimume trijara kaj haltas por grandokule kontempli la du virojn.

La juna sinjorino Karlsson serĉas en tirkesto de vestibla telefontableto kaj post iom trovas slipon.

”Jen! Societo Anonima Hidraŭltekniko en Oskarshamn. Poŝtkesto 860. Vidu!”

Ŝi montras la slipon, kaj Jankéus kopias ĝin dum Svedberg demandas:

”Ĉu vi devis plusendi multe da leteroj?”

”Tute ne. Komence eble tri-kvar, poste neniu plu. Estas pura ŝanco, ke tiu slipo restas. Ni ne havis tempon ordigi.” Ŝi ĵetas okulon ĉirkaŭ si kvazaŭ serĉante pliajn infanojn, sed eble sufiĉas al ŝi la duopo.

”Ĉu ankaŭ la edzinon vi renkontis?” demandas Jankéus.

”De Rundqvist? Ne, ŝajnis al mi ke li vivas sola. Aŭ eble li divorcis... nu, jes, nun mi memoras...” ŝi ekdiras, sed silentiĝas.

”Kion do?”

La virino embarasiĝas sed fine pluas:

”Nu, estis nura klaĉaĵo. Iu najbaro diris, ke li havis iun inon, kiu forkuris de li, se mi ĝuste memoras. Iu... eta azianino, laŭdire.”

”Kiu najbaro tion rakontis?” Svedberg scivolas.

Ŝi pripensas kelkan tempon.

”Estis Anna Wallén, en numero ses. Sed mi ne plu certas, kion ŝi diris. Eble mi miskomprenis.”

La mieno de la juna virino perfidas, ke ŝi pentas sian transdonon de la klaĉaĵo.

Scivolaj okuloj de trijarulo sekvas la du kolegojn, kiam ili paŝas kelkajn metrojn preter unu leterkesto ĝis numero ses. ”*Jen vivas Patrik,*

Anna, Linnéa kaj Sebastian Wallén” reliefe indikas ceramika nomtabulo sur la pordo.

Hejmas tie la dommastro, viro apenaŭ kvardekjara kun barbeti kaj nigrakadraj okulvitroj. Jankéus, kiu elserĉis la foton de Nils Rundqvist el la pasporta registro, alŝovas ĝin sub la okulojn de la viro.

”Ĉu vi konas ĉi tiun personon?”

Li ekzamenas la etan fotografajon zorge.

”Jes. Li loĝis proksime de ĉi tie antaŭ kelka tempo. Kion li faris?”

”Ĉu vi konas lian nomon?” Svedberg malrespondas la demandon.

”Rundqvist. Nils Rundqvist. Li loĝis en numero dek.”

Nun Jankéus montras la foton de la murdita virino.

”Jes, tio estas lia edzino, ŝajnas. La lasta, mi pensas. Laŭ mia scio. Eble li nun havas alian. Ĉu pro tio vi demandas?”

”Kiam vi vidis tiun virinon lastfoje? Pripensu zorge, mi petas.”

”Nu, antaŭ jaro, proksimume. Li mem restis ĝis printempe, kiam li vendis la domon al tiuj, kiuj nun loĝas tie. Sed ŝi, do la edzino, kredeble malaperis pli frue. Li elĵetis ŝin, kompreneble. Mi supozas ke oni resendis ŝin tien, de kie ŝi venis. Li jam pli frue simile importis alian virinon, kaj poste reekspartis. Nekredeble, ke oni ne haltigas tian trafikon! Precipe ĉi-kvartale, kie vivas... ordinaraj familioj.”

”Ĉu scias vi ŝian nomon?” demandas Jankéus kapsignante al la foto.

La viro pripensas.

”Mi ne memoras ĝin. Mi povos demandi mian edzinon, kiu kelkfoje parolis kun ŝi.”

Oni interkonsentas ke lia edzino telefonu al la policejo kiam ŝi revenos hejmen. La du policistoj forlasas la vico-serian domon kaj reiras policejen.

”Finfine kaptis ni la fadenon kaj komencas haŭli. Ni vidu kia fiŝo alhokiĝos. Ĉu la eksedzo?” spekulativas Jankéus en la aŭto survoje reen. Svedberg nur gruntas nedeĉifreble.

En sia ofica ĉambro Svedberg resumas la ĝisnunan rezulton.

”Do, ni nun scias, kiu ŝi estas. Kiam ni ekscios, kie la eksedzo nuntempe nestas, ni sendube ekscios ankaŭ, ĉu ŝi pluivivis kun li aŭ ne. Ne eblas tion kaŝi dum tiom da tempo. Se ne, ni daŭre devos serĉi, kie ŝi loĝis, kaj kun kiuj homoj ŝi rilatis. Kiel ŝi perlaboris. Hmmm... Ni kontaktu la socialan oficejon. Kaj ni povos esplori, ĉu en iu banko ŝi havis konton. Ili ĉiam uzas la personan identigan numeron. Kaj kompreneble ni vizitu tiun laborejon en Oskarshamn, sed morgaŭ matene, ĉu ne?”

”Bone. Kompreneble”, konsentas Jankéus. ”Tamen sentas mi suspekton, ke ĉi tiu fadeno eble ne longe atingos, sed finiĝos sakstrate.”

Svedberg tamen ne volas diskuti la antaŭentojn de sia pli juna kolego. Li plukonektas sian oficejan telefonon al la poŝtelefono por ne maltrafi iujn informojn, kaj per tio la kolegoj finas sian labortagon.

Surstrate oni ankoraŭ fosas kaj ŝovelas por fortransporti neĝon, kvankam ĉie nun fluegas riveroj el degelaĵo, al kiu iom aldoniĝas leĝera pluvego.

”Kial zorgi?” murmuris Jankéus al si stirante sian *Toyota* inter fosmaŝinoj kaj ŝarĝaŭtoj. ”Ĉio ja tamen baldaŭ forfluos. Kuŝas neĝo nur ĝis degelo.”



Roger Svedberg loĝas kun sia edzino Margareta en eta vico-seria domo ĉe trankvila strateto en suda kvartalo. La du gefiloj jam de kelkaj jaroj forlasis la hejmon kaj eĉ la hejmurbon. Ne malproksime de la domo troviĝas la marbordo, kaj ankaŭ impona renesanca kastelo, la ĉefa turista vidindaĵo de la urbo, situas je komforte piedira distanco.

La jena tago tamen ne logas al pieda promeno. En januaro la vesperoj frue mallumiĝas, kaj cetere Svedberg hodiaŭ ne tre frue hejmenvenas. Li antaŭvidas vespermanĝi kun la edzino kaj enlitiĝi sola, por morgaŭ daŭrigi la murdenketon.

Ĝuste kiam li vespermanĝe surtelerigis terpombulojn kun lardo, kuiritajn de lia edzino, sonoras lia poŝtelefono. Estas Anna Wallén. Malkiel sia edzo, ŝi evidente legis la hodiaŭan lokan ĵurnalon, kiu raportis pri seksperforto kaj murdo al juna virino de azia origino. Kiam la edzo rakontis pri la vizito de policistoj kaj ilia interesiĝo al la eksaj najbaroj, ŝi tuj adiciis unu plus unu ricevante du.

”Ĉu vere Lily estas tiu murdita virino?” ŝi demandas kun trema voĉo.

Svedberg forlasas la tablon kun vespermanĝo, kiu ŝajnas al li malkonvena medio por ĉi tiu interparolo.

”Eble jes”, li nebulas. ”Efektive, mi ŝatus peti vin morgaŭ helpi nin identigi la virinon. Ĉu ni povus venigi vin per aŭto matene? Poste mi volonte krome farus al vi kelkajn demandojn pri viaj najbaroj, do... la iamaj najbaroj, kompreneble, la gesinjoroj Rundqvist.”

Anna Wallén ŝokite konsentas, kaj li povas reveni tablen. Li duonigas terpombulon kaj surmetas vakcinian konfitaĵon. La ronda helgriza peco kun meza farĉo el porka lardo, kaj la intense ruĝa flaketo da konfitaĵo ial ne inspiras lin ekmanĝi. Liaj pensoj forvagas al la morgaŭa vizito en kadavrejo, kien li devos akompani virinon por ke ŝi identigu la korpon de sia eksnajbarino.

”Pardonu min, Margareta”, li fine diras. ”Estis iom plenplena labortago. Mi manĝos poste.”

Kaj ne rigardante la acidan mienon de sia edzino, li iras salonen, malfermas ŝrankon, verŝas iom da viskio en glason, pripensas momenton, pluverŝas ankoraŭ kaj sidiĝas sur la sofon kun plena glaso. Li eltrinkas iom

kaj iras alporti akvon. Tenante la duan buŝplenon da viskio surlange, li pripensas la morgaŭajn taskojn. Unue la kadavrejo, poste al Oskarshamn, kaj post tio eble demandado al la eksedzo. Plue restos intervjui Eva Ehnberg, kiu deĵoris nokte en la edukejo Björkatorp, kaj poste esplori...

La pensoj de Svedberg iom svagiĝas, tamen ne forlasas la murdenketon. Samtempe, en alia parto de la urbo, lia kolego Jankéus en ŝorto kaj T-ĉemizo ludas tablotenison kun sia filo Elis. Li ŝajne facile sekvas sian privatan devizon – *laboreje laboru, hejme hejmu*. Post saŭnado kaj duŝo, laŭtlegado de laŭvica ĉapitro el *Ronja, filino de rabisto* por la filino Emma kaj poste eta vespera sandviĉo kun biero, li eĉ havas forton enrampi sub la litkovrilon de sia edzino Annette, kiu reagis al lia vizito kun surprizita favoro.

En la hejmo de komisaro Svedberg la geedzoj restas ĉiu sub sia propra litkovrilo, kaj ĉiu cerbumas pri propra problemo. Por unu el ili ĝi temas pri la hejma geedza vivo, por la alia pri murdenketo. Iliaj sentoj pri tiuj du malsamaj problemoj tamen iel samas. Ŝajnas al ili, ke io esenca mankas, ke ĉio rutinas sed ne trafas la celon.

3. Ĉefo kun kravato

Roger Svedberg vekigaĝas je la kvina kaj duono kaj ne povas reendormiĝi. Li ellitiĝas, preparas tason da kafo kaj sidiĝas ĉe la kuireja tablo por plani sian tagon. Ekster la fenestro li de fore aŭdas motorbrulon kaj skrapsonojn de la senlaca senneĝigado, kiu sendube daŭris la tutan nokton. "Ĉu jam la trian tagnokton senĉese?" filozofias Svedberg. "Ja ili foruzas la jaran buĝeton en semajno."

Li vidas la ĵurnalportiston alveni kaj lasi la lokan ĵurnalon en la ekstera leterkesto tute simila al tiuj, kiujn li kaj Jankéus hieraŭ preteriris ĉe la najbaroj de Rundqvist. Li stariĝas, volvas sian mantelon provizore ĉirkaŭ la korpon, ŝovas la piedojn en botojn kaj eliras por alporti la ĵurnalon.

'Neĝoŝtorma murdo klarigota. Edzo laciĝis de azianino.' Svedberg ĝemas vidante la titolon unuapaĝan. Li fluglegas jen kaj jen. La artikolo priskribas *'viron kvardekjaran, kiu senĉese aĉetadis al si edzinojn el la plezurkvartalo de Bankoko por poste forĵeti ilin unu post la alia. La polico nun serĉas lin post la murdo al unu el ili.'*

"Merdon! Damnitane putinidan merdon!" Svedberg kunpremas la dentojn kaj flustras al si sakrojn pro malkontento. Kiu kreteno kontaktis la plumknaristojn de la ĵurnalo? Ĉu tiu ŝokita eksnajbarino, kun kiu li telefone parolis hieraŭ dum la aborta vespermanĝo? Li ĝemas kaj malplenigas la kafotason, rigardas la horloĝon kaj decidas eklabori, kvankam je tiu horo nur manpleno da noktaj deĵorantoj troviĝas en la policejo.

En la aŭto survoje laborejen li telefone vekas inspektoron Jankéus el liaj plezuraj sonĝoj kaj koncize klarigas la situacion.

"Ni ekiru tuj al Oskarshamn. Tio estas la plej urĝa tasko. Sed tiu ĵurnalo ja havas filion ankaŭ tie, do eble oni ankaŭ tie legis pri la afero", li diras.

"Bone, mi venos", oscedas Jankéus. "Aŭ pli bone, venu vi ĉi tien survoje norden, kaj mi aliĝos al vi."

Tio ŝajnas bona ideo. Jankéus loĝas en norda kvartalo, kaj Oskarshamn estas urbeto okdek kilometrojn norde de Kalmar. Baldaŭ ili survojas kaj povas konstati, ke ili atingos la kompanion *Hidraŭltekniko* malmulte post la sepa horo. Dum Svedberg stiras, Jankéus turmentas lin laŭtleĝante la ĵurnalan artikolon, kiu plenplenas je fantaziaj spekulativoj, ĉio tamen formulita aŭ kiel rektaj demandoj – *'Ĉu la mezaĝa sveda inĝeniero timis, ke la juna Tajlandanino rivelos pri li kompromitajn informojn?'* – aŭ kiel asertoj, ke la polico suspektas, esploras aŭ ĝenerale demandas sin tion aŭ alion. Jankéus dum la voĉlegado ŝpruce rikanas, kvazaŭ tiaj situacioj por li estus ia bonvena spico en la normala laborenuo. Li eĉ sugestas, ke Svedberg reciproke donante tute misajn informojn en la sekvonta gazetara

konferenco. Svedberg dum la unuhora veturo eldiras proksimume du vortojn. Nur atingante la periferion de Oskarshamn, li telefonas al Anna Wallén por prokrasti la identigon de la kadavro. Li ne diskutas kun ŝi la hodiaŭan ĵurnalon, kaj ankaŭ ŝi ne aktualigas tiun temon.

La firmao situas en sudorienta industria kvartalo, proksime al la maro. Ne estas granda entrepreno. Longa griza laborejo kaj apuda oficeja domo el ruĝaj brikoj. Ili sonorigas oficeje, sed nenio okazas. En la laborejo tamen homoj aktivas. Ili iras tien por demandi, ĉu iu estro ĉeestas.

”Parolu kun Nilsson! Tiu kun la kravato.”

Multaj aferoj ŝanĝiĝas en la socio, tamen en ĉi tiu kompanio ŝajne ankoraŭ validas malnovaj signoj. Ĉefo estas tiu kun kravato.

”Bonan matenon! Polico. Ĉu ĉe vi laboras inĝeniero Nils Rundqvist?”

”Rundqvist? Ne... tio estas, ne plu. Kial?”

”Ĉu vi scias, kie ni trovos lin?” Svedberg rutine malrespondas la demandon de la kravatulo.

”Nu... trovi lin eble iom komplikos... Do, li restas dungita de ni, sed delonge ni pruntas lin al rusa kompanio. En Kaliningrado.”

”*Kaliningrado*? Ĉu li ankaŭ loĝas tie?” Svedberg demandas kun aŭdebla elreviĝo en sia voĉo.

La hidraŭla ĉefo rigardas lin trankvile.

”Mi supozas, ke jes. Mi delonge neniel rilatas al li.”

”Ĉu vi tamen havas adreson al tiu entrepreno?”

”Nu, certe, iaspecan. Estas ia poŝtkesto tie, mi supozas.”

”Kaj ĉu telefonon?”

”Ni vidu. Venu al la oficejo, mi petas.”

Post deko da minutoj ili vere ricevas adreson Kaliningradan, kaj krome ekscias ke la kompanio, *Kal-Kal Gaso*, havas reprezentanton ankaŭ en Kalmar. Iu sinjoro Bengt Sjögren.

”Kiam vi lastfoje vidis Rundqvist?” Svedberg demandas.

La viro pripensas.

”Verŝajne antaŭ jaro, preskaŭ. Li eklaboris tie frue printempe, mi pensas.”

Tiuj du novaj adresoj estas la tuta rikolto de la du policistoj en ilia ekskurso, kaj post duonhoro ili jam resurvojas suden.

”Do, ĉu iros ni kune ankaŭ al Kaliningrado?” petolas Jankéus.

Svedberg unue ne respondas, sed post kelka tempo li rebatas:

”Kion vi esperis? Ĉu ofican vojaĝon al Bankoko?”



La haveno de Kalmar ne kontentigus romantikan ideon pri havena kvartalo. Kelkaj dezertaj kajoj, fervojtrakoj kiuj somere plenas je trudherboj, kaj nun

vintre estas kovritaj de neĝo. Iam ĝi estis vigla loko almenaŭ somere, kiam la turista trafiko al la insulo Oelando okazis per pramoj el ĝiaj havenaj basenoj. Sed nun jam de tridek jaroj ponto transprenis tiun taskon. Kelkaj malnovaj stokejoj tamen ekhavis novan uzon, kaj oni eĉ konstruis pliajn domojn por oficejoj kaj vendejoj. En unu tian Svedberg kaj Jankéus eniras ĉasante informojn pri la murdita virino.

”Ne, li ne laboras por Kal-Kal Gaso, sed por ĤozGaz. Kal-Kal havas nur kvin aŭ ses dungitojn, kaj mi estas la sola en Svedio. Kal-Kal ne estas kompanio, sed konsorcio aŭ projekto komuna de kelkaj kompanioj, el kiuj la plej gravaj estas ĤozGaz, kiu estas privata rusa naftokompanio, kaj BEU, Baltisk Energiutveckling, ĉi tie en Svedio.”

Svedberg kaj Jankéus klopodas sekvi la elokventan klarigadon de Bengt Sjögren, tridekjara viro, kiu akceptis ilin en sia oficejo. Lia ĉambro estas granda sed simple aranĝita, kvazaŭ provizore, kun skribtablo, komputilo, librobreto preskaŭ malplena, du simplaj seĝoj por vizitantoj. Surmure granda mapo pri la Balta maro montras oblikvan linion irantan de Kalmar ĉe la sudorienta bordo de Svedio ĝis Kaliningrado – la iama Prusa urbo *Königsberg*, nun en la Rusia enklavo inter Litovio kaj Pollando.

”Via oficejo ja troviĝas en la domo de Paratus”, Jankéus rimarkigas kun demanda mieno.

”Jes ja, BEU estas posedata plejparte de Paratus. Do, Nils Rundqvist laboras en Kaliningrado, sed bonvolu atendi momenton...” Li klavas numeron sur sia poŝtelefono. ”Vi parolu rekte kun li... post momento... se ni trafos lin... Ne, ŝajne li ne respondas. Do, atendu iomete...” kaj li klavas novan numeron. Ĉi-foje li evidente pli bonŝancas, iu respondas, tamen eble ne Rundqvist, ĉar Sjögren ekparolas ruse kaj pluas pri tio dum sufiĉe longa tempo, ne zorgante pri la malaprobaj mienoj de Svedberg kaj Jankéus. Fine li reenpoŝigas la telefonon.

”Mi bedaŭras, sed vi malbonŝancas”, li fine diras. ”Laŭ la ĉefo de Rundqvist li hodiaŭ ekiris al Kaŭkazo, kie estas la produktataj instalaĵoj de ĤozGaz. Estis iuj problemoj pri la gasduktoj. Kredeble li nun sidas en aviadilo kaj ne kontakteblas. Tamen jen prenu lian telefonnumeron.”

La intervjuo donas malmulte pli. Sjögren konfirmas la pli frue ricevitajn atestojn, ke Rundqvist jam delonge ne troviĝas en Svedio. ”Krom eble por iu mallonga vizito”, li tamen aldonas. Sed li mem ne vidis lin de pli ol duonjaro.

”Bone, ni esploris tiun spuron ĝisfine, ŝajnas”, Svedberg konkludas. ”Provizore ni konsideru ĝin sakstrato. Do, mi provos denove venigi tiun najbarinon al la kadavrejo, kaj poste mi serĉos la virinon kiu deĵoris nokte en la knabedukejo.”



Survoje al la kadavrejo kun Anna Wallén, malalta, brunhara virino en aĝo inter tridek kvin kaj kvardek jaroj, Svedberg klopodas iel diskrete ekscii, ĉu eble ŝi klaĉis al la loka ĵurnalo. Kompreneble li scias, ke laŭ la leĝo pri preslibereco estas strikte malpermesite esplori la fontojn de amaskomunikilaj informoj. Do li simple mencias, ke li iom surpriziĝis legante la artikolon.

”Ankaŭ mi”, asertas la virino. ”Estis terure skribi tiel pri Lily. Oni diris pli-malpli rekte, ke ŝi estis putino, ĉu ne? Sed tio tute ne estas vera. Ŝi eĉ ne venis el malriĉa familio, laŭ tio kion ŝi rakontis al mi. Sed se iu Tajlandanino edziniĝas al eŭropano, ĉiuj homoj ĉi tie tuj supozas, ke li aĉetis ŝin en bordelo. Mi vetas, ke tiuj geedzoj Karlsson en numero dek alvokis la ĵurnalon. Tiu viro timas ĉion, kio aspektas iel alie. Lastaŭtune la komunumo volis loki infanejon trans la apuda strato, kaj tiam ili eĉ faris peticion por protesti. Iliaj propraj infanoj frekventas ian privatan vartejon, kaj tial ili opiniis, ke komunuma infanejo nur ĝenus.”

Alvenante ekster la kadavrejon, la virino plu babilas same manie, kiel Svedberg siaflanke mutas.

”Fakte mi ne tre multe parolis kun ŝi, kaj tute ne kun la edzo”, ŝi diras. ”Ni devis interparoli angle, ĉar ŝi lernis malmulte da sveda. Inter si ili parolis angle. Kaj ŝi ne havis laboron, do malmulte renkontis svedojn. Tamen iufoje, kiam la edzo estis for, ŝi rakontis iom pri si. Mi komprenis, ke al ŝi estis tre grave edziniĝi. Ŝi opiniis, ke ŝi jam maljunas por geedziĝo. Dudeksesjara ŝi estis, kiam ili renkontiĝis. Stranga ideo, ĉu ne?”

Nur enirante en la malvarmon de la kadavrejo ŝi silentiĝas. La deĵoranto eligas tirfakon kun la pala korpo de la murdita virino.

Anna Wallén rigardas la kadavron. Evidente ŝi jam antaŭe certis, ke ŝi revidos la korpon de sia iama najbarino. Malgraŭ tio, ŝi preskaŭ kolapsas pro konvulsia sed senvoĉa ploratako.

Svedberg metas manon sur ŝian ŝultron dirante:

”Bonvolu simple diri, ĉu vi rekonas ŝin.”

Ŝi ade kapjesas, ankoraŭ senvoĉe.

Nur poste, enaŭte survoje al la policejo, ŝi reakiras la voĉon, almenaŭ iom el ĝi.

”Pardonu... mi antaŭe neniam vidis mortan homon... Ĝi impresis kvazaŭ vakspupo de ŝi...”

En la ofica ĉambro de Svedberg li klopodas ekscii ion pri la rilato inter la geedzoj Rundqvist.

”Nu, mi rimarkis nenion strangan. Ili ŝajnis sufiĉe feliĉaj. Nur fine, kiam li jam petis divorcon, ŝi ŝajnis ŝokita. Sed tiam mi interŝanĝis kun ŝi

nur kelkajn vortojn, surstrate. Ŝi diris, ke ŝi devos transloĝiĝi, sed ŝi ne sciis kien. Mi diris al ŝi, ke ŝi povus elserĉi la virinan azilon en la telefonlibro, sed mi ne scias, ĉu ŝi faris tion.”

”Kaj poste, ĉu vi revidis ŝin aŭ eksciis ion pri ŝi?”

”Ne. Nenion. Kaj post unu-du monatoj ankaŭ la edzo ne plu vidiĝis.”

Svedberg disiĝas de Anna Wallén, kiu alportis al lia enketo kelkajn mozaikerojn pri la murdita virino. Sed pri la bazaj demandoj, *kiu kial* mortigis ŝin, ŝajnas al li, ke troviĝas neniu palpebla informo. Li demandas sin, kiam venos la turnopunkto.



”Jes, mi laboris tiun vesperon kaj nokton. Mi eĉ restis duonon de la posta sabato, ĝis la vetero iomete pliboniĝis.”

Parolas *Eva Ehnberg*, dungito en la edukejo *Björktorp*. Ŝi estas tridekjara maldika virino kun longa mezblonda hararo kaj malsolena konduto.

”Mi ŝatus nur ekscii, ĉu ĉiuj junuloj restis en la edukejo tiunokte”, diras Svedberg.

”Ĉiuj finfine ĉeestis nokte, tamen tio daŭris iom.”

”Daŭris?”

”Jes, unu knabo, Jonatan, forestis vespere, kaj ankoraŭ je noktomezo li ne revenis. Mi ne sciis, ĉu voki la policon aŭ ne. Ja estis iom kaosa situacio ĝenerale, pro la neĝo. Mi mem venis horon tro malfrue al mia dejora tempo, kaj la kolego, kiu devus hejmeniri vespere, ne kuraĝis forlasi la domon pro la vetero. Do ni restis du dungitoj ĉi tie, kaj ĝuste kiam ni diskutis eble tamen telefoni al la polico, la knabo revenis.”

”Je kiu horo, mi petas?”

”Eble je almenaŭ duonhoron post noktomezo.”

”Kian klarigon li donis?”

”Nu, li intencis nur renkonti iun amikon, sed laŭdire la vetero malhelpis lin reveni. Jen iom stulta klarigo, fakte, ĉar kiam li finfine revenis, ĝuste regis la plej intensa blovado.”

”Ĉu li nun ĉeestas?”

”Certe. Mi venigos lin.”

Atendante Svedberg rigardas la ĉambreton, kien oni lokis la intervjuojn en Björkorp. Ĝi ŝajnas esti ia kombinita oficejeto kaj ripozejo de la dungitoj. Skribtablo kun pelmelo el paperoj kaj aktaĵoj. Sofo kaj tableto kun uzitaj kafotasoj. Surmure pendas gitaro, aŭtobusa horaro kaj dejora skemo. Tra la fenestro vidiĝas arbaro. La piceoj aspektas malseke kaj triste, laŭ la opinio de Svedberg.

Eva Ehnberg revenas kun Jonatan, petas lin sidiĝi, kaj demandas, ĉu ŝi restu.

”Ne dankon, tio ne necesas”, diras Svedberg.

Kiam la deĵorantino foriris, li silentas kelkan tempon. La knabo aspektas kvazaŭ li kulpus ion teruran sed neniam konfesus tion. Normala mieno de adoleskulo, pensas Svedberg. Liaj manoj fosas enpoŝe, kaj la okuloj esploras la plankon.

Svedberg rigardas la knabon intense, elpoŝigas la foton de Sirilak Lily Rundqvist kaj montras ĝin al li.

”Ĉu vi vidis ĉi tiun personon?”

La knabo rigardas la foton sen videbla interesiĝo.

”Ne.” Li skuas la kapon.

”Kion vi faris nokte inter vendrede kaj sabate?”

Jonatan rigardas lin dum momento kaj poste promeniĝas la rigardon alfenestre.

”Mi... mi estis ĉi tie nokte.”

”Ĉu vere?”

”Jes! Tio estas, mi venis iom malfrue, pro la diabla neĝo!”

”Kion vi faris en la neĝo?”

”Nenion! Mi paŝis de amiko.”

”Kiu amiko?”

”Iu kiu loĝas en Norrliden.”

”Nomon kaj adreson, mi petas.”

Estiĝas paŭzo. Poste la knabo diras:

”Rodrigo. Mi ne memoras la familian nomon. Estas io eksterlanda. Li loĝas ĉe Två Systrars väg 22 B.”

”Kiam vi foriris de Björktorp?”

Li levas la ŝultrojn.

”Vespere. Mi ne scias la horon. Eble la deka.”

”Kaj kie vi renkontis lin?”

”En la ŝtuparejo de lia domo.”

”Kiam vi reiris ĉi tien?”

Refoja ŝultrolevo.

”Ĉu vi renkontis iun alian?” plu demandas Svedberg.

”Ne.”

”Irante tien kaj reen, kiun vojon vi sekvis?”

”Ekzistas nur unu. Unue laŭ nia vojeto ĝis la granda strato, kiu ĉirkaŭas Norrliden. Poste laŭ tiu.”

”Dumvoje, ĉu vi vidis iun homon?”

Jonatan kapneas.

”Ne. Estis neĝoŝtormo, ĉu ne? Oni vidis nenium, krom ĉe la kvartala centro. Nu, tamen, estis iu freneza skianto en la arbaro. Sed alie neniu.”

”Skianto? Kie?”

”Dekstre de nia vojeto.”

”Kiam okazis tio?”

”Mi ne scias. Estis dumvoje reen.”

”Kion vi faris kun via amiko Rodrigo?”

”Nenion. Nur interparolis.”

”Pri kio?”

La ŝultroj de Jonatan ankoraŭfoje leviĝas kaj refalas.

Svedberg dum kelka tempo kontemplas la knabon, kiu laŭdire ”stultumis” kun dekdujara duonfratino. Estas tre malfacile imagi lin brutale murdi plenkreskan virinon. Fizike li sendube kapablus. Sed lia tuta konduto de adoleskulo nematura ŝajnas atesti, ke tio tamen ne eblus.



Norrliden estas la kvartalo plej proksima al la edukejo *Björktorp*, kaj al la loko, kie oni trovis la kadavron de Lily. Ĝi konsistas el kelkaj sakstratoj kiuj finiĝas en grandaj parkejoj, kvartala centro kun butikoj, lernejo kaj kelkaj aliaj servoj, kaj aro da trietaĝaj plurfamiliaj domoj, aranĝitaj en kvaranguloj ĉirkaŭ kortoj kun gazonoj kaj ludiloj. Ĉie abundas arboj – pinoj, piceoj, betuloj, kverkoj, tremoloj, sorpujoj kaj aliaj. En la nuna sezono la nudaj foliarboj ŝajnas nigraj skeletoj, dum la pingloarboj kun sia malhela verdo alportas tonon de malgajo, kvazaŭ la kvartalo estus giganta tombejo. La etoson tamen gajigas infanoj en buntaj kombineoj, kiuj trenas sledetojn sur la degelanta neĝo.

Post iom da serĉado Svedberg trovas la enirejon indikitan de Jonatan. La ŝtuparejo havas naŭ pordojn. Kvar el ili portas svedajn nomojn, du impresas al Svedberg balkanaj, unu turka, unu hispana kaj unu neidentigebla. Li sonigas ĉe la familio *Guzmán*.

”Saluton. Mi estas polickomisaro Roger Svedberg. Ĉu vi havas filon Rodrigo?”

Mezaĝa korpulenta virino gapas al li terurite.

”Kion li faris?”

”Nenion, mi esperas. Ĉu li hejmas?”

”Ne.”

”Kie mi trovos lin?”

”Eble en junula klubo. En kvartala centro.”

Post iom da serĉado Svedberg trovas la indikitan ejon, parolas kun suspektema dungito kaj finfine estas prezentita al la junulo. Rodrigo Guzmán estas malalta knabo kun longaj malhelaj fruntharoj, kiujn li senĉese ĵetas supren per kapmovoj. Liaj okuloj enfokusigas la komisaron kun

atentema intenseco. Li staras inter siaj amikoj ĉe bilardotablo kun bastono enmane.

”Bonvolu diri, kiam vi lastfoje renkontis Jonatan el Björktrorp?”

Li levas la ŝultrojn.

”M’ne scias.”

”Ĉu vi vidis lin la sepan de januaro, dum la neĝoŝtormo?”

Li pripensas.

”Eble.”

”Eble? Je kiu horo?”

”Vespere... s’fiĉe malfrue.”

Li rapide eldiras la vortojn, tamen kun longaj paŭzoj por pensi. Liaj amikoj silente kaj grimace rikanetas. Svedberg venigas lin en apudan ĉambreton, kie neniuj ĝenas.

”Kie vi renkontiĝis?”

”Ĉe mi... tio estas... en mia domo.”

”Kion vi faris?”

”Nenion... nur parolis.”

”Kaj ĉu vi poste akompanis lin?”

”Ne, kial do? Li foriris kaj mi reiris en nian ‘part’menton.”

”Ĉu vi sola iris eksterdomen tiuvespere?”

”Ne... entute ne. Stis diabla veteraĉo, ĉu ne?”

”Je kiu horo vi disiĝis?”

”M’ne scias. Malfrue.”

”Ĉu antaŭ aŭ post noktomezo?”

”Eble post.”

Svedberg emas rezigni. Ne eblas eltiri ion el ĉi tiu bubo, des pli ĉar li mem apenaŭ scias, kion li volas ekscii de li.

”Ĉu vi poste parolis kun Jonatan?”

”M’ne memoras.”

”Kion li diris pri sia reirado tiuvespere? Ĉu io okazis dum ĝi?”

La knabo duonfermas la okulojn kaj aperas sulketo ĉe lia nazradiko.

”Neĝis. Jen kio okazis. Kaj la gardisto en Björktrorp kverelis kiam li eniris. C’tere li diris nenion. Nenion, kion mi memoras.”



En la kvartalo *Malmen* troviĝis iam kelkaj stratetoj kun pli-malpli kadukaj domaĉoj. Grandparte temis pri duetaĝaj lignaj domoj kun stuka fasado, kiu emis jen kaj jen fali suben lasante makulojn el nuda ligno post si. En la 1970-aj jaroj jam gapis jen kaj jen vakaj lokoj de malkonstruitaj domoj, kaj finfine oni forigis la tuton, deportis la restantajn loĝantojn al nova betona kvartalo ĉe la norda periferio de la urbo, kaj konstruis aron da administraj

domegoj surloke de la iama kaduke bunta loĝkvartalo. Inter tiuj oficejaj konstruaĵoj estas ankaŭ la distrikta ĉefpolicejo.

De temp' al tempo iamaj loĝantoj de la stratetoj revenas tien pro diversaj policaferoj, kiel denuncantoj, atestantoj aŭ suspektatoj. Unu iama loĝanto, knabino nomita Vivianne, kiu iam ludis inter la domaĉoj de *Södra Malmgatan*, eĉ revenis tien por labori kiel policinspektorino Ljunggren.

En ŝia ofica ĉambro nun sonoras la telefono. Ekparolas voĉo virina.

"Mi estas Sonja Lehto. Mi de temp' al tempo deĵoras en la virina azilo, sensalajre, kompreneble. Nun mi aŭdis... mi komprenis, ke tiu murdita virino estas Lily..."

"Ĉu vi havas informojn pri ŝi?"

"Nu... mi renkontis ŝin printempe en la azilo. Sed bedaŭrinde ŝi foriris, kaj mi ne plu vidis ŝin tie. Sed iutage mi hazarde renkontis ŝin surstrate. Ŝi ŝajnis en ordo... pli malpli... Ŝi diris, ke ŝi laboras kaj loĝas en la hejmo de iuj svedoj."

"Kiam okazis tio?"

"Nu, antaŭlonge. Somere. Eble en aŭgusto. Tamen mi pensis, ke... Nu, eble tio neniel gravas."

"Povas esti ke jes. Vi agis bone telefonante. Ĉu ŝi menciis nomon aŭ adreson de tiuj svedoj?"

"Ne, tute ne. Estis iuj konatoj de ŝia eksedzo. Verŝajne li aranĝis tion por ŝi."

"Precize kie vi renkontis ŝin?"

"Urbocentre. Sur la placo *Larmtorget*."

"Kaj ĉu vi poste revidis ŝin?"

"Ne. Neniam plu."

Vivianne Ljunggren transdonas la donitajn informojn al la enketanto Svedberg. Li sulkas la frunton.

"Denove tiu eksedzo", li ĝemetas. "Mi ĵus rezignis trovi lin. Eble tamen ni plu ĉasu... Ja estus iel strange, se ŝi laboris kaj loĝis ĉe iuj, kaj ili ne reagas, kiam ŝi malaperas, ĉu ne?"

"Nu, ŝi ja restis ĉi tie kontraŭleĝe post la divorco. Do tiuj homoj eble ne emas malkaŝi, ke ili laborigis kaj loĝigis ŝin", supozas Vivianne Ljunggren.

"Tamen ne estis krimo kaŝi ŝin."

"Sed dungi ŝin sen pagi impostojn kaj asekurojn."

"Nu, tiu renkonto okazis en aŭgusto, ĉu? Antaŭ duonjaro, do. Depost tiam ja fluis multe da akvo sub la pontoj de Kalmar."

Vivianne Ljunggren rigardas la komisararon kun miro. Laŭ ŝi la saletaj Baltmaraj ondoj ne precize fluas, sed eble plaŭdas, subponte samkiel alborde. Kaj ĝuste nun fluas pli da akvo sur la stratoj ol ie ajn aliloke.

4. Nebulo kaj malmoralo

”Pardonu! Kiaj banditoj?”

”Osetaj.”

”Kian diablaĵon signifas tio?”

Roger Svedberg sakretas, kio montras, ke li pli ol kutime frustrigās. La informanto de la Ministrejo pri Eksteraj Aferoj telefone ripetas:

”*Osetaj*. Temas pri ia islama gerilo en tiu respubliko, kien Nils Rundqvist evidente vojaĝis ofice. La informo venas de la polico en Kaliningrado, kiu supozeble havas kontakton kun la loka polico tie. Ni informiĝis de nia ambasado en Moskvo, kaj ili sendos dungiton, se ni akiros pli precizajn informojn.”

”Do, kion ili postulas por liberigi lin? Ĉu monon?”

”Tio ja estas la kutima procedo ĉe preno de ostaĝoj. Sed mi ripetas, ni ne havas detalojn. Ni laboras pri la kazo. Tamen tiuj aferoj ja foje povas daŭri monatojn.”

Roger Svedberg suspiras remetante la telefonan aŭdilon. Tiun eksedzon oni ŝajne neniam atingos pridemandi. Kaj ankoraŭ mankas aliaj konkretaj fadenoj por sekvi en la murdenketo.

Kiam Jankéus ekaŭdas pri la afero, li laŭte rikanas.

”Kidnapita de Osetaj banditoj?! Faras li vere ĉion por eviti nin! Ĉu vi imagus, ke la Kalmar’a polico estas tiel timiga, ke li preferas eĉ tiajn kalaŝnikovajn barbulojn al ni?”

Tagoj pasas, kaj la murdenketo rampas plu. La neĝamasoj iĝas degelaĵo, kaj la degelaĵo iĝas malpuraĵo, kiu restos ĝis printempe, kiam oni forbalaos ĝin kune kun la sablo disŝutita dumvintre por preventi glitadon. La tero brungrizas, la foliarboj nude nigras, la piceoj kaj pinoj malhele kaj melankolie verdas. Demandado en la plej norda kvartalo de la urbo donas nenion pluan spuron. Kiel kutime, la ĵurnalaj artikoloj pri la murdo vekas kelkajn homojn pli-malpli frenezajn aŭ fantaziriĉajn, kaj iliaj atestoj kaj konfesoj iom laborigas la policon. Iu viro konfesas, ke li pafis la murditan virinon, ĉar ŝi disvastigis aidoson inter la sveda junularo. Tute ne ĝenas lin, ke al la kadavro komplete mankas pafovundo. Maljuna virino vidis la murdon propraokule, kaj ŝia priskribo de ĝi estas sufiĉe realisma por laborigi la policon dum pluraj horoj, ĝis oni konstatas, ke ŝi ĉeestis ĉiun okazintan murdon en la distrikto dum la lastaj kvar jaroj, eĉ dum tiuj periodoj, kiujn ŝi pasigis en psikiatria hospitalo cent kvindek kilometrojn for de Kalmar.



Nebulo. Blovado. Eĉ samtempa nebulo kun blovado, kvankam oni rajtus supozi, ke vento dispelus la nebulon. Eble ĝi ja disigas ĝin, sed alvenas novaj nebulaĵoj el la markolo inter Smolando kaj Oelando. Se la vento ne tro siblas, oni tiel ofte aŭdas la nebulsirenon disaŭdigi sian solean ululadon laŭ la bordo, ke finfine ĝi iĝas nedisigebla ero de la vintraj tagoj.

Nebulo regas ankaŭ en la murdenketo. Svedberg kaj Jankéus volonte bonvenigus freŝan venton, kiu almenaŭ iom agitus la nebulon, sed tia ŝajne ne venos.

La deknauan de januaro la urbanoj povas legi ĵurnale, ke la loka polico kaptis rusan spionon. Li vizitis lokajn firmaojn komercajn kaj industriajn, demandante pri iliaj negocaj rilatoj kaj pri iliaj rilatoj al rusaj civitanoj.

”Nuntempe ĉio estas ekonomio”, konstatas Jankéus ĉe la kolega matena kafo. ”En la malnova tempo la spionoj interesiĝis pri militaj aferoj. Nun gravas nur komerco.”

Svedberg aspektas, kvazaŭ li aŭskultus, tamen nenion respondas.

”Kaj se paroli pri rusoj”, pluas Jankéus, ”ankoraŭ forestas nia gasa svedo, ĉu ne? Vaporiĝis li, se tiel diri!”

”Nu, la Eksteraj Aferoj pli-malpli promesis elaĉeti lin printempe”, murmuris Svedberg.

”Printempe? Bone. Kaŝas neĝo nur ĝis printempo. Eĉ en Kaŭkazo. Eble povos li tiam entombigi sian eksedzinon. Ĉar ŝajne neniu alia aperos por fari tion. Se ne la virina azilo...”

Denove li ne sukcesas melki komenton el Svedberg, kiu ŝajne profunde enpensiĝis. Jankéus jam komencas alian konversacian temon, ĉi-foje pri la vintra vetero malvintra, kiam finfine lia ĉefo ekparolas.

”Estis io pri tiu spiono... Ŝajne ni havas komunajn interesojn. Li esploris pri iuj firmaoj... atendu... jen: Balt-Gaz, ĤozGaz, BEU, Paratus. Ĉu vi rekonas? Troviĝas io komuna en ĉi tiuj aferoj. Venu! Ni vizitu denove tiun gasulon... kiel-ajn-li-nomiĝas... kiu telefonis Kaliningraden...”

Bengt Sjögren tamen ne troviĝas en sia oficejo. En la akceptejo de Paratus oni konfirmas, ke iu ruso antaŭ du tagoj vizitis lin, ŝajne sen antaŭa interkonsento. La sama viro demandis ankaŭ dungitojn de Paratus, ĉu ili konas difinitan rusan komerciston, sed neniu ŝajne sciis, pri kiu li parolas.

”Ni petu rendevuon kun tiu spiono”, Svedberg decidas.

La kolego kiu respondecas pri la spionenketo ŝultrolevas.

”Nu, bone, parolu kun li, se vi povas. Li scias neniom da sveda kaj malmulte da angla, sed li babilas kiel foira vendisto. Bonvolu! Cetere la prokuroro ne permesos reteni lin pli ol ĝis morgaŭ. Kaj tio sendube ne gravas. Estas infanaĵo, laŭ mi.”

Boris Malkov, la suspektito pri ekonomia spionado, estas nealta kaj kompakta viro kun rufete blondaj haroj, maldensaj lipharoj kaj barbostopla mentono. Liaj okuloj viglas, sed la vizaĝo cetere montras malgajan kaj rezignacian mienon. Li eĉ volonte rakontas sian historion.

”Nu, jen! Kolego Voloŝenko ne revenas, ne raportas, ne telefonas, ne nenio! Mi flugas Svedion, mi serĉas, mi demandas! Ne trovas Voloŝenkon! Ne konas neniun! Ne scias neniun! Ne nenion neniun! Fu! Malaperas li! Kiel gaso! Kiel mono!”

Svedberg kun peno sukcesas enŝovi demandon:

”Ĉu vi iel rilatas al tiu gasprojekto?”

”Nature! Kal-Kal Gaso! Kaliningrad-Kalmar! Gasdukto! Gaso el Kaŭkazo! Tra Kaliningrado al Skandinavio! Mono el Skandinavio al Kaliningrado! Sed nun neniun dukto, neniun mono, neniun gaso, neniun Voloŝenko!”

”Kaj kion li faris ĉi tie?”

”Monon! Necesas pli da mono! Li devas klarigi al kompanio! Kompanio devas investi! Nepre! Li devas paroli kun...”

”Kiu kompanio?”

”BEU, Paratus, Kal-Kal! Paroli kun Ŝogren, Gojer, direktoroj.”

Svedberg faras provon rekonduki la viziton al la origina celo:

”Ĉu vi konas Nils Rundqvist?”

”Rundqvist? Nature, konas, konas! Sed li ne mono! Li tuboj! Li duktoj! Inĝeniero!”

”Kie li troviĝas?”

”En Kaŭkazo! Problemo de dukto!”

”Ĉu vi scias, kie li estis antaŭ preskaŭ du semajnoj, la sepan de januaro?”

”Sepa januaro? Rundqvist? Li certe en Kaliningrado! Laboras! Li bonega inĝeniero! Multe laboras! Nur laboras, kaj kun virinoj! Li viro! Li specialisto de duktoj, de tuboj!”



”Se ni ne baldaŭ havos ion konkretan, ni devos frostigi la kazon ĝisplue. La ĉefo jam volas doni al mi kelkajn aliajn kazojn, ĉar mi tamen povas fari nenion pri la kazo Lily Rundqvist.”

Svedberg aŭguras abortan murdenketon, dum li kaj Jankéus paŝas sur malseka tero laŭ pado ĝis la murdoloko. Ĉar la neĝo nun tute malaperis, ili faros lastan serĉadon en la loko kaj ĝia plej proksima ĉirkaŭaĵo. Eble por trovi vizitkarton de la murdinto, al kiu Jankéus jam unufoje sopiris.

Sed nenio interesa videblas. La plastrubandoj de la polico jam duone forblovis, la tero malsekas sed neniel atestas pri tio, kio antaŭ du semajnoj

okazis en neĝamaso nun malaperinta. Ankaŭ la ĉirkaŭa arbaro aspektas tiel senkulpa, kiel vintraj piceoj kapablas.

”Konfesas mi, ke ĉi-foje ne sufiĉas mia fantazio”, filozofias Jankéus. ”Se ni restu je la supozo, ke ŝi venis viva ĉi tien, do kial? Ĉu li devigis ŝin? Ĉu ŝi estis dormigita? Kial tiel malbone vestita? Ja aŭto apenaŭ povus veturi ĉi tien, eĉ antaŭ la neĝoŝtormo.”

”Ne estas tiel fore de la strato”, kontraŭas Svedberg. ”Eble li mortigis ŝin endome, veturigis ŝin ĝis la stratofino, portis ŝin ĉi tien, malvestis kaj mistraktis ŝian korpon, kaj ŝovis iomete da neĝo sur ŝin. Tiam ŝia korpo ankoraŭ povus degeligi iom da neĝo. Kaj pro la forta blovado la falanta neĝo ne kuŝiĝis sur ŝi, sed flanke de la kadavro. Eble eĉ la vento forblovis de ŝi neĝon. Aŭ eble ŝi sidiĝis enaŭte por iri mallongan distancon de unu varma domo al alia, kaj li mortigis ŝin enaŭte. Tiukaze ŝia vesto ne estus tiel stranga.”

”Tamen okazis tio meze de la neĝoŝtormo.”

”Komence, meze aŭ fine. La nekropsio ne tro precizas.”

”Sed nek meze nek fine de la ŝtormo veturis oni facile laŭ tiu strato, ŝajnas al mi”, atentigas Jankéus.

”Dependas de la aŭto. Tiuj kvarrade pelataj terenaŭtoj pli kaj pli populariĝas, eĉ inter urbanoj”, kontraŭas Svedberg. ”Nu, ne indas plu spekulativi. Ni vere bezonas ion konkretan, alie ŝi iĝos nesolvita kazo.”

Reveninte en la policejon, Svedberg traserĉas la leterujon. Li levas paperon, ĵetas rigardon de ĝi al Jankéus kaj reen al la dokumento.

”Jen faksajo de la Eksteraj Aferoj”, li diras. ”Novaĵoj pri Nils Rundqvist.”

Jankéus rigardas lin kun ironia rideto dirante:

”Kion entreprenis li nun?” Ĉu aliĝis al afganaj talibanoj? Malaperis en gasdukton trans Himalajon?”

”Oni ne plu mencias la banditojn. Li estas arestita de la polico en... iu loko nomita *Vladikavkaz*... pro malmorala konduto.”

Tiu informo dum momento silentigas eĉ inspektoron Jankéus. Post eta paŭzo li tamen remastras sin kaj diras:

”Ne gravas, ĉu malmoralas li en Bankoko aŭ en Vladivostoko, kaj ne gravas ĉu kaptis lin banditoj aŭ polico. Interesas min, ĉu povos ni iel babili kun li.”

Svedberg rerigardas la faksajon.

”Laŭdire oni sendos iun dungiton de la ambasado por klopodi renkonti lin. Ni sendu al ili kelkajn demandojn, kiujn ili bonvolu fari al li.”

Ili sidiĝas kaj komencas pripensi, kion ili ŝatus demandi al tiu fantoma figuro, ilia ĝis nun sola ligo al la murdita virino. Svedberg cerbumas, notas, klopodas sekvi logikan pensfadenon, dum Jankéus enĵetas spontanajn komentojn, bizarajn flanktemojn, pli-malpli simile kiel dum vera

pridemandado. Sed en ĉi tiu kazo mankas la atestanto aŭ suspektito. "Virtuala pridemandado", Jankéus nomas tion. Fine oni faksas la liston al la Ministrejo de Eksteraj Aferoj en Stokholmo, esperante ke ĝi estos plusendita al Moskvo kaj de tie plu sudorienten, al nekonata polickarcero en Kaŭkazo.

Kiam jam pasis du semajnoj de la *neĝoŝtorma murdo*, kiel loka ĵurnalo baptis la kazon, la amaskomunikiloj ne plu mencias ĝin, des pli ĉar nenio nova estas konata pri ĝi. Aliaj dramoj kaj skandaloj postulas sian spacon. Loka grupo de nazioj protestas, ĉar la urbo ne volas permesi al ili lui ejon por festeno. Tio estas grava minaco al la demokratio kaj homaj rajtoj, kiu indignigas la junajn idealistojn naziajn. La urba aŭtobusa kompanio nuligas la plej malfruajn veturojn vendrede vespere, ĉar la junuloj reveturantaj el la urbocentro tro bruas, interbatalas kaj minacas la ŝoforon. Kaj la urbestro rifuzas pagi monpunon pro erara parkado de sia aŭto, opiniante, ke li misparkis enofice, do kvazaŭ komisie de siaj balotantoj. Ĉi tio kaj centoj da aliaj novaĵoj postsekvas la murdon de Sirilak Lily Rundqvist sur la ĵurnalaj paĝoj kaj en la radioelsendoj.

Jaŭde la dudeksepan de januaro la polico de Kalmar ricevas raporton pri interparolo inter ataŝeo de la sveda ambasado en Moskvo kaj la inĝeniero Nils Rundqvist en la policejo de *Vladikavkaz*. Roger Svedberg kaj Tom Jankéus kune profundigas en la du A4-paĝojn.

"Hmm. Ne tre ampleksa materialo, ŝajnas", murmuras Svedberg.

"Ĉu surprize?" demandas Jankéus. "Tamen li donas iujn nomojn, ĉe kiuj ni povos pluesplori."

Svedberg prenas notkajeron por elkribri la plej gravajn informojn de la ataŝea raporto.

"Do. Li ne vidis ŝin, nek parolis kun ŝi, post majo lastjare, kiam li aranĝis por ŝi laboron ĉe iu familio *Höijer* en *Ramsö*. Li ne scias, ĉu ŝi restas tie. Li vizitis Svedion lastfoje en oktobro. La sepan de januaro li estis en *Kaliningrado*. Oni esploris lian pasporton, kies stampoj ŝajnas konfirmi, ke li estis en Rusio."

"Interese", entranĉas Jankéus. "Ĉu tie for oni ankoraŭ stampas la pasportojn?"

"Ni supozu ke jes. Plue, li mencias iun samlandaninon, kun kiu ŝi rilatis. *Bunikorn Nilsson*, kredeble nuntempe en Malmö."

"Oktobro", denove ekparolas Jankéus. "Ĉu hazarde memoras vi, en kiu semajno de gravedeco ŝi estis?"

Svedberg ne memoras tion, sed elserĉas la nekropsian raporton. Post iom li sciigas:

"Dektria aŭ dekkvara."

Jankéus prenas sian poŝkalendaron kaj komencas kalkuli semajnojn.

”Tio signifas la komencon de oktobro. Ĉu ne povus tiu diplomato iom pli precizi? Cetere, kial ni ne petis, ke li prenu sangoteston aŭ almenaŭ forŝiru de li kelkajn harojn? Por DNA-testo!”

Svedberg ne respondas, sed prenas telefonlibron.

”Höijer... ne, ili ne aperas. Tamen tio estas konata nomo, ĉu ne? Ĉu ili ne estas iuj famuloj?”

”Jes ja. Iu familio Höijer iam posedis duonon de la urbo. Hodiaŭ mi ne plu scias. Sed iam renkontis mi instruiston pri historio, kiu faris amatoran esploradon pri tiu dinastio. Certe iuj el ili pludivas, sed ili estas tro diskretaj por aperi en la telefonlibro. Eble temas pri ŝerca blago de tiu bela eksedzo. Provu la amikino!”

”Jes, bone, sed da Nilsson ni havas plurajn paĝojn. Neniu Bunikorn. Kaj se ŝia edzo havas telefonon, li povas esti ĉiu ajn el kelkcento. Ni serĉu en la loĝantara registro.”

Per ĝi ili efektive trovas familion Höijer, geedzojn kaj filon, kun adreso Ramsö. Por trovi Bunikorn Nilsson necesas telefoni al la impostoficejo, kiu trovas ŝin kun adreso en Malmö.

”Kie diable situas tiu Ramsö?” demandas Jankéus.

Svedberg ne scias certe. Denove ili telefonas, ĉi-foje al loka taksia kompanio.

”Ĝi estas insuleto aŭ duoninsulo tuj norde de la urbo. Oni veturas tra Norrliden, kaj poste vojeton dekstren.”

La du kolegoj paŝas ĝis la surmura urba mapo. Post mallonge ili trovas la insuleton, ligitan al la ĉeftero per mallonga ponto. Ne longe for de ĝi, apenaŭ decimetron sur la mapo, troviĝas malsanulejo, la edukejo Björkorp kaj la krajona kruco farita de Svedberg antaŭ apenaŭ du semajnoj, por indiki la neĝamason en kiu kuŝis murdita Sirilak Lily Rundqvist.

5. Filino de butikisto

La unua sento de Roger Svedberg estas malstreĉiĝo. Kvazaŭ ŝarĝo sur lia dorso malaperus. Sendube li jam delonge pli-malpli atendis ion similan, kaj nun li ne plu devos timi tion.

Tamen lia edzino ne parolas pri divorco, nur sciigas, ke ŝi akiros propran loĝejon. ”Ja ni ĉiuokaze nenion plu diras inter ni”, ŝi asertas. Li volas protesti, ĉar tio ja tamen estas troigo, sed ĉu indas? Ne, li rezignas. Kion do li gajnus provante argumenti pri tio? Pli bone akcepti, ke tiel ŝi rigardas la aferon.

Li pripensas, kiel ĉi tio komenciĝis. Ja ili jam antaŭe havis malbonajn periodojn, tamen ankaŭ bonajn. Antaŭ du-tri jaroj, kiam ŝi festis sian kvardek kvinan naskiĝtagon, ili eĉ preskaŭ spertis novan mielmonaton. Tamen li ankaŭ tiam multe laboris. Eble li lastatempe prenas la laboron tro serioze.

Nu, la decido de lia edzino almenaŭ liberigas lin de kulposentoj pro lia ermita konduto. Li ne plu devos senti, ke iu vane atendas lin hejme.

Kaj ĝuste nun li vere ne havas tempon malfeliĉi pro familiaj problemoj. Li do lasas ilin por alia okazo, ĝis post la aktuala enketo. Tiam li pripensu, kial la geedza vivo enkaĉiĝis. Ĉi-matene li unue aranĝas kun la polico de Malmö, ke oni elserĉu sinjorinon *Bunikorn Nilsson* por intervjuo pri ŝia iama amikino *Sirilak*. Tiu tasko ne ŝajnas sufiĉe grava por motivi ke li vojaĝu al Malmö. Anstataŭe li kun Jankéus ekiras al la familio *Höijer* sur la insulo *Ramsö*.

La vojo tien ne estas granda, nek signita per vojmontrilo. Ili unue pro neglekto preteriras ĝin, kaj devas turni la aŭton. Post kelkcent metroj la vojeto transiras ponton ekipitan per dornodrato kaj fortika kradpordo, kiu tamen estas malfermita.

”Ĉu jam vivas ili en prizono?” komentas Jankéus. ”Nu, en ĉiu brusto estas sia gusto.”

Surinsule la vojo kurbiĝas sub altaj pinoj kaj finiĝas per grua korto antaŭ granda brika domo, sur kies muroj nudaj tigoj de iu grimpanta planto formas serpentuman reton. Ili lasas la aŭton antaŭ la ĉefpordo kaj sonorigas. Daŭras iom da tempo ĝis virino pli ol mezaĝa malfermas. Ŝi havas zorge frizitan, duonlongan hararon brunan, ŝajnas diskrete ŝminkita kaj portas helflavan bluzon kaj kvadratan ĵupon.

”Polico. Ĉu sinjorino Andrea Höijer?” Svedberg koncizas.

La sinjorino invitas ilin enveni en salonon kun ledaj foteloj. Du grandaj hundoj alpaŝas sed retiriĝas je mallonga ordono de la mastrino.

”Mi bedaŭras la ĝenon, sed ni bezonas iom da informoj pri *Sirilak Lily Rundqvist*, kiun vi ja konas”, komencas Svedberg.

SinJORino Höijer rigardas lin sen rekona mieno.

”Pardonu? Pri kiu?”

”Pri sinJORino Rundqvist, la Tajlanda virino, kiu vivis kaj laboris ĉe vi.” Svedberg ĵetas rigardon al Jankéus, kiu elpoŝigas la foton de la murdita virino kaj montras ĝin al la sinJORino.

Ŝi apenaŭ rigardas la foton sed kapneas kaj trankvile diras:

”Mi bedaŭras, sinJORoj. Mi ne scias pri kiu vi parolas.”

”Parolas ni pri ĉi tiu virino”, diras Jankéus. ”Bonvolu rigardi.”

Nun ŝi vere ekzamenas la foton, eĉ zorge. Ŝi tamen ŝajnas ne rekoni la virinon. Daŭre ŝi kapneas.

”Ne, mi ne konas ŝin.”

”Ĉu vi neniam vidis ŝin?”

”Ne. Mi bedaŭras.”

Svedberg ĵetas rondrigardon al la salono. Tra malfermita pordo vidiĝas alia ĉambro kun fajrejo, seĝoj kaj tablo kovrita de peza tuko.

”Bonvolu diri, sinJORino, ĉu vi havas dungiton por helpi prizorgi la domon?”

”En la lastaj jaroj ne. Kial do? Pri kio temas, efektive?”

”Kiel mi diris, ni kolektas informojn pri ĉi tiu virino. Ĉu vi konas Nils Rundqvist?”

Ŝi pripensas momenton, sed refoje kapneas.

”Mi pensas ke ne.”

El sia jaka poŝo Jankéus elfosas duan foton, tiun de la inĝeniero Rundqvist, kaj etendas ĝin.

”Ne, mi ne rekonas lin.”

”Ĉu via edzo hejmas?”

”Ne.”

”Kie ni trovos lin?”

”Eble en lia oficejo. Sed li estas tre okupita.”

”Kie troviĝas lia oficejo?”

Nun sinJORino Höijer unuafoje montras mienon de surpriziĝo.

”En la kompania sidejo, evidente.”

”Bone. Kiu kompanio?”

Ŝi ironie paŭtas respondante kun tro emfaza prononco, kvazaŭ parolante al infano:

”PAS, *Paratus Anonima Societo*. Oficejo ĉe la strato *Skeppsbron*. Sed vi kredeble bezonus paroli kun lia sekretariino por ricevi tempon de rendevuo.”

Ili forlasas la domon sen granda bedaŭro. Enaŭte Jankéus diras:

”Nun sendube ege amuziĝus tiu fuĝanta inĝeniero, se li aŭdus la intervjuon. Bela ŝerco, li dirus al si. Ĉu tamen ni mendu aŭdiencon ĉe ŝia edzo?”

Svedberg pli-malpli mutas dum la veturado reen al la urbocentro, dum Jankéus faras kelkajn vanajn provojn gajigi lin per ironiaj komentoj pri la sinjorino kiu neniun konis. Baldaŭ ili venas al la oficejo de Paratus en la haveno, kie ili antaŭ du semajnoj intervjuis Bengt Sjögren.

”Kion efektive faras tiu kompanio?” murmuris Svedberg. ”Pri kio ĝi okupiĝas?”

”Kredeble ĉefe pri mono”, supozas Jankéus. ”Scias mi nur, ke ĝi posedas partojn de pluraj grandaj kompanioj industriaj kaj aliaj. Ne nur en Svedio, kompreneble. Ĉu ili ne aĉetis bankon en Germanio antaŭ kelka tempo? Aŭ ĉu ĵurnalon en Estonio? Nu, mi ne memoras.”

Ili supreniras lifte al la kvina etaĝo kaj akceptejo kun perspektivo al la haveno, la markolo kaj la bordo de Olando.

”La direktoro hodiaŭ estas en Londono, kaj morgaŭ li iros al Stokholmo. Postmorgaŭ antaŭtagmeze ne eblas... Eble postmorgaŭ vespere li venos, sed mi dubas ĉu li tiam povos disponigi tempon...” La sekretariino rutine volas nenion promesi, sed studinte la polican identigilon de komisaro Svedberg, ŝi iom malpli firme rifuzas. ”Bone, mi anoncos vin por jaŭde je la kvina horo, tamen vi ne tro kalkulu je tio, ĉar intertempe povos okazi io urĝa...”

En havena kafejo ĉe preskaŭ dezerta kajo la du kolegoj diskutas la pluan murdenketon. Svedberg denove pesimisme esprimas timon, ke oni entute nenion trovos.

”Mi faris liston de kvin jam punitaj sekskrimuloj, kiuj liberas kaj loĝas enurbe. Ĉiel ajn ni povus pridemandi ilin”, li malentuziasmas. ”La problemo estas, ke ni havas neniun spuron, neniun veran suspekton.”

”Nu, povus ni simple viziti ilin hejme flirtigante la foton de Lily”, leĝeras Jankéus. ”Eble se ni surmetos uniformojn, iu el ili ektimos kaj spontane konfesos.”

Svedberg nenion respondas.

”Tamen plej kredeble ili nur montros senkulpan vizaĝon kaj asertos, ke dum la tuta neĝoŝtormo ili kuŝadis sur la sofo masturbante sin en soleco”, pluas Jankéus. ”Kaj tio signifos, ke daŭre tretados ni sur la elira punkto.”

Ankoraŭ lia ĉefo mutas.

”Nu, atendante nian jaŭdan intervjuon kun la direktora moŝto”, Jankéus plu monologas, ”mi vizitos tiun instruiston, kiu scias ĉion pri la familio Höijer. Eble konas li ian heredan perversaĵon, kiu manifestiĝas kiel seksmurdo en neĝo.”



”Do, ĉu temas pri la blankaj aŭ nigraj?”

”Ĉu ili estas ankaŭ nigruloj?” konsterniĝas Jankéus.

”Troviĝas du branĉoj de la familio; unu iam posedis sukerfarejon kaj muelejon – ili estas nomataj la blanka branĉo, kaj la alia posedis Ruslandan nafton – do jen la nigra branĉo.” Ĉke Jönsson, instruisto pri historio en la urba gimnazio, prelegetas al Jankéus.

”Nu, li nomiĝas Valter kaj loĝas sur insulo Ramsö.”

”Ha, jen! Temas pri la nigraj. Do, Valter Höijer estas la direktoro de Paratus, interalie. Li estas filo de Valdemar Höijer, kiu famiĝis pro sukcesa komercado kun Germanio dum la milito. Valter edziĝis al iu filino de feruzino, se tiel diri, Andrea De Geer. Tiu virino ŝajnas forta kaj efika persono, kaj tion li supozeble bezonis. Ili havas filon, kiu okupas ian honoran postenon en Paratus, kaj filinon kiu studas ion – mi pensas artan historion aŭ arkeologion – en Växjö. Valter estas estrarano de pluraj kompanioj parte aŭ tute posedataj de Paratus. Li estas rotariano, kolektanto de minga porcelano kaj operamanto. Lia patro ja siatempe estis ankaŭ politikisto, kaj la avo kaj praaŭo iam estis urbestroj, sed tiun intereson li ŝajne ne heredis. La edzino ne profesias sed tre aktivas en reprezentado kun sia edzo. Ŝi estas energia kaj sportema, golfo, skiado, teniso kaj mi pensas ankaŭ velado, tamen ne kun la edzo. La filino Astrid verŝajne ne plu loĝas ĉe ili, almenaŭ ne dum studsemestroj. La filo – Georg, mi pensas – tamen restas ĉe Panjo kaj Paĉjo, kvankam li sendube aĝas pli ol dudek kvin. Li ne ŝajnas tre talenta, almenaŭ ne profesie. Ankaŭ li velas, cetere, eĉ konkure, mi kredas.”

Jankéus primeditas la ricevitaĵajn informojn, tamen ne plu sciante, kiel ili rilatas al la murdenketo, kiu neniam ekas. Li diras:

”Supozeble vi ne scias, ĉu la familio kutimas havi dungitojn en la hejmo? Mastrumistinojn, eble?”

”Hmm. Nu, tiel intime mi ne konas ilin... Pli frue, certe. Eble vartistinon por la gefiloj, kiam ili estis infanoj. Nun mi ne scias. Tamen ŝajne iu maljunulo venas prizorgi la ĝardenon kaj domon. Iaspeca heredita servisto, eble. Troviĝas ia pordista dometo apude, sed mi dubas ĉu iu nun loĝas tie.”



Ĵaŭde antaŭtagmeze la duan de februaro inspektorino Boel Bäck ĉe la polico de Malmö telefonas al Roger Svedberg. Ŝia raŭketa voĉo kun mola Skania akĉento memorigas al li la edzinon, kies voĉon li de du tagoj ne aŭdis.

”Mi interparolis kun tiu Tajlanda virino, Bunikorn, laŭ via peto. Ŝi estis ege ŝokita aŭdi pri la morto de sia amikino. Ni havis longan interparolon, kaj mi ĵus ricevis la tajpaĵon de la sonbendo. Do mi sendu ĝin tuj, ĉu ne? Ĉu fakte?”

”Jes, mi petas. Fakse aŭ rete”, Svedberg respondas, memorante la kliŝajn moketojn de Jankéus, ke li ŝtonepokas. ”Ĉu laŭ vi ĝi donis ion konkretan?”

”Nu... vi vidos. Eble ne pri la murdo. Sed ŝi multe rakontis pri la amikino.”

La atendoj de Svedberg do ne estas grandegaj, kiam alvenas la fakŝaĵo. Li alportas tason da kafo al sia skribtablo kaj eklegas.

Bunikorn Nilsson venis al Svedio antaŭ ses jaroj li legas post kelkaj enkondukaj formalajoj. Antaŭ du jaroj kaj duono ŝi kaj la edzo, kiu estas svedo, pasigis tri semajnojn de la libertempo en ŝia hejmlando, kaj tiam ŝi ekkonis Sirilak kaj ŝian estontan edzon el Svedio.

Sirilak venis el familio de etkomercistoj en Bankoko. Ŝi studis unu jaron en universitato, sed devis ĉesigi la studojn, ĉar la patro ne plu volis pagi ilin. Ŝi laboris en la butikoj de la familio vendante interalie memoraĵojn al turistoj. La gepatroj iom malpaciencaj, ĉar ŝi ankoraŭ ne havis fianĉon. Kiam la svedo Nils – Bunikorn ne memoras la familian nomon – vizitis la butikon, eĉ plurfoje, kaj amindumis ŝin, ŝi opiniis, ke ŝi estas bonŝanca. Ŝi trovis lin tre simpatia, kaj baldaŭ li ŝatigis al ŝi. La gepatroj malĝojis, ĉar ŝi forlasos Tajlandon, tamen ili ĝojis pro ŝia edziniĝo. Ankaŭ laŭ Bunikorn ŝia edzo estis tre simpatia persono.

Kiam Sirilak ekloĝis kun li en Svedio, ŝi sufiĉe ofte interparolis telefone kun Bunikorn, kaj du-trifoje ili renkontiĝis. Lastfoje tio okazis en februaro antaŭ unu jaro, sed telefone ili kontaktis ankoraŭ somere kaj aŭtune.

Preskaŭ tuj Sirilak tamen komencis plendi pri sia edzo. Li kondukis tute alie en Svedio ol en Tajlando. Tie li estis ĝentila, kompleza kaj respektoplena al ŝiaj moroj kaj kutimoj, kaj ankaŭ al la Tajlanda kulturo. En Svedio li rikanis pri ĉio tia. Li traktis ŝin malestime en ĉiutagaj situacioj, inter aliaj homoj, kaj ankaŭ en ilia intima vivo. Bunikorn memoras aparte, ke Sirilak iufoje ege ŝokiĝis, kiam li venigis kun si hejmen prostituitan virinon kaj volis pasigi la nokton kun ŝi kaj la edzino samtempe. Sirilak tiam enfermis sin banĉambre kaj elvenis nur matene, kiam la alia virino foriris.

Krome, kvankam li ne estis riĉulo, ŝi ne rajtis labori ekster la hejmo. Ŝi rimarkis, ke la svedaj edzinoj laboras profesie, kaj plurfoje proponis establi butiketon pri ekzotaj varoj. Ja ŝi estis filino de butikisto. Sed la edzo tre bruske malpermesis tion. Ankaŭ studi ŝi ne rajtis, kaj ŝi apenaŭ sciis iom da sveda lingvo. Kaj kvankam Sirilak tre sopiris je infano, la edzo absolute rifuzis iĝi patro.

Kelkfoje li eĉ batis ŝin, kiam li estis ebria, tamen ne tiel ke ŝi vere vundiĝis. Ŝi pli suferis pro lia moka kaj malestima traktado. Malgraŭ tio, ŝi ege malfeliĉiĝis ekscianta, ke li petis kaj ricevos divorcon. Kaj poste, kiam

ŝi eksciis de Bunikorn, ke oni verŝajne forsendos ŝin el Svedio, ŝi tute malesperis, kaj Bunikorn serioze timis pri ŝi.

Tamen ŝajnis, ke ŝi iom trankviliĝis, kaj post kelka tempo ŝi ekloĝis kaj eklaboris ĉe iu riĉa familio. Ŝi kelkfoje telefonis al Bunikorn, sed ne donis adreson aŭ telefonnumeron. Ŝi ŝajnis ne tre feliĉa, tamen ankaŭ ne malfeliĉa. Bunikorn komprenis, ke ŝi vivas sen restadpermeso, kaj ŝi diras, ke tio sendube povas roni la nervojn de ĉiu ajn.

La lasta interparolo okazis malfrue aŭtune, eble en la komenco de novembro. Tiam Sirilak ŝajnis sufiĉe nerva kaj distrigema. Bunikorn demandis, ĉu ili ne povus renkontiĝi, sed tio ŝajne ne eblis. Poste ŝi nenion pli aŭdis, ĝis la polico de Malmö kontaktis ŝin. Ŝi kaj ŝia sveda edzo volis proponi, ke Sirilak vizitu ilin je la jarfinaj festotagoj, sed ĉar ŝi ne plu telefonis, ili neniam havis okazon fari tion.

Bunikorn ne povas imagi, ke Sirilak havis iun malamikon. Ŝi timis neniun krom la polico, diras Bunikorn. Laŭ ŝia scio ŝi ne plu havis kontakton kun la eksedzo.

Bunikorn plurfoje dum la interparolo silente sed spasme ekploras. Ŝi aperas sincere afliktita de la informo pri la murdo.

6. Enketo ferma

La policejo de Kalmar havas kafeterion, kie la dungitoj povas lunĉi aŭ kafumi, se ili ne preferas manĝi kolbasbultkon enaŭte survoje inter du taskoj aŭ en sia ofica ĉambro trinketi tason da kafo el aŭtomato. La ejo estas hela kaj sufiĉe vasta, kun vicoj da tabloj el pina ligno, kun same ligna panelo surmure kaj kun lampoj, kiuj eble estis avangardaj kiam oni konstruis la domon antaŭ dudek kvin jaroj.

Hodiaŭ Svedberg kaj Jankéus sukcesis kunordigi sian posttagmezan kafon. Kompreneble ili ne babilas pri privataĵoj. Sendube ili tre embarasiĝus, se Jankéus rakontus ion pri la ĝojoj kaj ĝenoj eduki tri gefilojn, aŭ se Svedberg konfidus al sia kolego ion pri sia paneanta geedzeco. Kiel la plej multaj el siaj kolegoj, ili pritraktas metiajn aferojn. Ĉi-foje temas pri preparoj al pridemandado de direktoro Höijer.

Jankéus tamen laŭ sia kutimo komencas en neatendita direkto:

”Ĉefo, ĉu memoras vi tiun spionon?”

”Certe. Ĉu li ankoraŭ restas?”

”Ne, ne. Oni lasis lin. Sed ekhavis mi la ideon klavi la nomon de tiu, kiun li ĉasis, Volosenko aŭ Voloŝenko, en nia registro. Kaj montriĝis, ke li vere malaperis!”

”Bone. Kaj?”

”Do, malaperis li ĉi tie, en Kalmar. De hotelo Regina. Li luis hotelĉambron tie la kvinan de januaro, sed malaperis sen pagi la fakturon.”

”Domaĝe. Sed tio ne estas nia problemo.”

”Eble tamen. Ŝajnas al mi ke io strangas. Unue: postlasis li pasporton kaj aviadilan bileton. La aĵoj nun troviĝas ĉe ni. Valizo, kelkaj vestaĵoj, rusa libro, ŝajne krimromano, uzita flugbileto el la 5a de januaro Kaliningrado-Ríga-Stokholmo-Kalmar, kaj neuzita bileto reen por la 8a de januaro.”

”Hmm. Sed al kio rilatas tio?”

”Atendu. Ĉu memoras vi, ke la tielnomata spiono balbutis iujn nomojn? Sonis kiel Šogren kaj Gojer. Nu, dorsflanke de la uzita flugbileto estas manskribitaj tri nomoj. Unue Bengt Sjögren kaj Valter Höijer. La tria skribitas ruslitere, sed per helpo de Snežana en la kafeteria kuirejo mi eksciis, ke ĝi tekstas Valerij Ŝigajev. Apud ĉiu nomo aperas telefonnumero. Kaj almenaŭ pri Sjögren kaj Höijer temas ne pri la telefonoj oficejaj, sed pri la hejmaj.”

”Nu, sendube do temas pri tiu gaso, ĉu ne? La kompanioj evidente interrilatas.”

”Bone, tamen telefone serĉis mi Sjögren, kaj eksciis, ke li ne plu restas. Kal-Kal Gaso nuligis sian unupersonan oficejon en Kalmar. Oni ne scias,

kien li iris. Laŭdire tiu rusa ĤozGaz bankrotis. Kaj ĉi tiu mistera Voloŝenko vaporiĝis sen pasporto kaj flugbileto.”

”Kara Tom, mi ne dubas, ke okazas strangaj aferoj en la gasa mondo. Gaso, mono, homoj, kompanioj malaperas. Kiam iu faros al la Kalmar’a polico denuncon pri krimo, nia estro destinis iun por esplori ĝin. Espereble ne min, ĉar mi jam havas murdenketon por prizorgi. Kaj same havas vi, se mi ne eraras.”

”Tamen estas io suspektinda pri tiu Høijer! Homoj malaperas ĉirkaŭ li!”

”Nia murditino ne malaperis. Male, ŝi aperis.”

”Ni tamen devus demandi la direktoron pri tiu Voloŝenko, ĉu ne?”

”Bone do, kial ne?”

”Kaj tial mi kopiis lian pasportan foton, interalie.”



Direktoro Valter Høijer ŝajnas esti ie inter sia sesdeka kaj sepdeka jaro, kaj tiuj jaroj donis al li altan frunton, etan korpulentecon kaj palan, sulketan vizaĝohaŭton. Li havas grizete blondajn harojn mallonge tonditajn, fortikan nazon kaj diketajn lipojn. Lia vizaĝo aperas pli-malpli preta enviciĝi inter la kvin-ses portretoj de aplombaj viroj maljunaj kaj mezaĝaj sur muro de lia ofica ĉambro.

Ili sidiĝas sur foteloj en angulo de la ĉambro. Svedberg prezentas la kaŭzon de la interparolo.

”Ni enketas pri virino nomita Sirilak Lily Rundqvist kun la jena aspekto. Laŭdire ŝi laboris kaj loĝis en via hejmo.”

Li rigardas al Jankéus, kiu en kutima maniero elpoŝigas kaj montras la foton. La direktoro rigardas ĝin kaj respondas kun iel foresta mieno:

”Ne... mi ne rekonas ŝin.”

”Ĉu lastatempe vi havis dungiton en via hejmo?”

Li ŝajnas pripensi sekundon kaj diras kun eta skuo de la kapo:

”Ne. Ni ne havis. Krom iu maljuna viro, kiu venas dufoje semajne zorgi pri eksteraj aferoj. Ĝardenaj laboroj, neĝoŝovelado de vojoj, tondado de gazonoj ktp. Li estas pensiulo, sed de jardekoj servis nin, do estas pli-malpli sociala afero, ke li havu sian taskon.”

”Lian nomon kaj adreson, mi petas”, Jankéus entranĉas.

La direktoro ŝajnas surprizita.

”Kiel li rilatas al... la afero?”

”Neniel. Sed ni bezonas ĉiajn informojn.”

”Bone. *Gunnar Borgström*, sed la adreson mi ne konas parkere. Ie sur *Ängö*, mi pensas.”

Svedberg reprenas la fadenon:

"Ĉu vi konas la inĝenieron Nils Rundqvist?"
 Denove sekundo da pripenso, kaj poste respondo senemocia:
 "Jes, li laboris por mi. Sed nun li verŝajne estas eksterlande."
 "Ĉu vi konis lian eksan edzinon?"
 "Ne, tute ne. Tiel proksime mi ne konas lin."
 "Kiam vi lastfoje havis kontakton kun li?"
 "Ne eblas memori precize. Eble antaŭ jaro."
 "Sinjoro Rundqvist asertas, ke lia eksedzino dum kelka tempo laboris kaj loĝis en via hejmo. Ĉu prave?"
 La pridemandato sulkas la frunton dum lia rigardo saltas inter Svedberg kaj Jankéus. Kvazaŭ lace li ripetas:
 "Ne, ne. Mi ne konas ŝin. Devas esti ia miskompreno."
 "Ĉu vi rekonas ĉi tiun personon?" Jankéus elpoŝigas duan foton.
 Höjjer esploras ĝin kaj pripensas. La rigardo denove iom forestas, kiam li respondas:
 "Jes, mi pensas ke li estas dungito de rusa kompanio, kun kiu ni rilatis."
 "Nome?"
 "ĤozGaz. Estas unu el la partneroj de komuna gasdukta projekto."
 "Mi celis la nomon de la persono."
 "Nu... Vol... eble Voloski."
 "Kiam vi laste rilatis al li?" Jankéus plu scivolas.
 "Antaŭ kelkaj semajnoj, kiam li venis ĉi tien por intertraktoj."
 "Ĉu li vizitis vian hejmon?"
 "Ne, tute ne. Nur la oficejon."
 "Kaj kien li poste iris?"
 "Reen al Ruslando, mi supozas."
 Svedberg kaj Jankéus interŝanĝas rigardojn, kvazaŭ scivolante, ĉu la alia scias kion plu demandi. La direktoro eluzas la okazon por iom rektigi la dorson, sidante sur la fotelo, rigardi sian brakhorloĝon kaj diri:
 "Pardonu min, mi estas sufiĉe okupita, do... se mi ne plu povas helpi al vi..."
 Li stariĝas, devigante ankaŭ la policistojn ekstari, sed Jankéus ankoraŭ ne elĉerpis ĉion el siaj poŝoj. Li unue demandas:
 "Kiu estas Valerij Ŝigajev?"
 Höjjer mienas malkontente, sed estas neklare, ĉu pro la nomo, aŭ pro la plia demando.
 "Mi bedaŭras. Tio estas al mi nekonata nomo", li diras, iom post iom proksimiĝante al la elirejo.
 Tiam Jankéus elpoŝigas kopion de la flugbileto de Voloŝenko.
 "Bonvolu rigardi. Kion vi opinias pri tio?"

Höijer rigardas la tri nomojn skribitajn surbilete. Pli-malpli ŝovante la du policistojn eksteren tra la pordo per sia korpo, li diras:

”Sjögren laboris por Kal-Kal.”

”Kie li nun troviĝas?”

”Eble en Ruslando. Nun vi devas pardoni min...”

La aŭdienco finiĝis.



Posttagmeze en la sekva tago la murdenketo pri Sirilak Lily Rundqvist estas fermita pro manko de indikoj kaj rezultoj. La distrikta policestro en sia ofica ĉambro aŭskultas resumon pri la ĝisnunaj atingoj, kaj poste informas komisaroon Svedberg kaj inspektoron Jankéus pri sia decido.

”Vi faris kion vi povis. Ni bezonas vin por aliaj taskoj.”

Svedberg silentas. Li pli-malpli atendis tion, tamen pli multe antaŭ kelkaj tagoj ol ĝuste hodiaŭ. Sed Jankéus ne silente glutas la decidon.

”Restas tamen pluraj aferoj por esplori! Hieraŭ eĉ aperis du novaj nomoj, kiujn ni serĉu. Kaj se nur iam renkontos ni la eksedzon persone, povos aperi io nova...”

La policestro mienas senpacience.

”Nenio diskutebla. La enketo fermitas.”

Survoje reen de la estro, Jankéus diras al Svedberg:

”Estas li rotariano, ĉu ne? Nia oldulo. Ankaŭ tiu direktoro Höijer estas tia, se kredi mian historiiston. Ĉu ne kutimas ili kunveni vendrede lunĉe? Do, ekzemple hodiaŭ?”

Svedberg amare ridetas. Malkiel sia kolego, li ne tre emas je konspiraj teorioj. Tamen, ŝajnas ne tute maleble, ke dumlunĉe la direktoro efektive menciis al sia rotaria samideano ion pri embaraso pro altrudiĝemaj policistoj. Kaj poste la policestro – kompreneble tute sendepende – konsideris la kazon kaj trovis, ke la murdenketo ne solveblas.

7. Serĉado de enrompŝtelisto

Ĉiujare okazas en Svedio proksimume cent okdek murdoj, el kiu sepdeko neniam solviĝas. Al tiu dua grupo nun aldoniĝas murdo kun eventuala seksperforto al virino Tajlanda, kiu restadis senpermeso en Svedio. Komisaro Roger Svedberg ricevas novajn taskojn, el kiuj la plej grava estas kolekti atestojn pri junula bando, kiu vespere kutimas rabi poŝtelefonojn de aliaj gejunuloj. Inspektoro Tom Jankéus siaflanke devas spuri konatan enrompŝteliston, kiu jam la kvaran fojon elrompis kaj eskapis el malliberejo. Jankéus do havas okazon ripeti sian kliŝan "manko de tempo ne mankas".

La ŝtelisto estas loĝanto de apuda urbeto *Nybro*, kiam li okaze ne troviĝas en malliberejo, kaj li kutime rilatas plej multe al la loka krimula mondo tie. Tamen, serĉante lin Jankéus ial venas al domo ĉe la strato *Sparregatan*, sur la insulo *Ängö* en centra urboparto de Kalmar. Li sonigas ĉe pordo markita "Borgström". Maljuna sed fortika viro malfermas, Jankéus montras sian polican identigilon kaj estas enlasita.

Li montras la foton de Lily. La viro kapneas.

"Ne, mi ne rekonas."

Same okazas pri la fotoj de Nils Rundqvist kaj Sergej Voloŝenko.

"Laboras vi ĉe direktoro Höijer, ĉu ne?"

"Jes, prave. Ĉiusemajne, marde kaj ĵaŭde. Ankaŭ alifoje, se bezonate."

"Ĉu ili kutime havis ankaŭ mastrumistinojn?"

Gunnar Borgström kunpremas la lipojn, kapneas kaj eldiras:

"Ne. Tion mi ne vidis."

"Ĉu laboris vi tie la sepan de januaro?"

"Atendu... la sepan... kiu tago de la semajno tio estis?"

"Vendredo. Estis dum la granda neĝoŝtormo."

"Ne. Vendrede ne. Nur marde kaj ĵaŭde."

"Ĉu la ŝtormo ne kaŭzis al vi ekstran laboron tie?"

"Jes, vere, ili alvokis min por ŝoveli neĝon, tamen nur sabate posttagmeze."

Post sia vizito al la maljuna Borgström, Jankéus efektive ekiras kontraŭ la urbeto de la ŝtelisto. Ial li tamen ne haltas tie, sed veturas plu centon da kilometroj okcidenten, al *Växjö*, la ĉefurbo de najbara gubernio. Eble li ricevis ian indikon aŭ simple intuas, ke tie li trovos ion interesan pri sia enrompŝtelisto. En Växjö li iras suden al studenta kvartalo kaj loĝdomo, kie li vizitas junan studentinon, *Astrid Höijer*.

"Enketas mi pri la morto de Lily Rundqvist", li diras enirante ŝian minimuman vestiblon. Ŝajnas al li, ke ŝi intense palpebrumas, sed neniu komento aŭdiĝas.

”Eksciis ni, ke ŝi loĝis kaj laboris en via gepatra hejmo, kaj mi ŝatus scii, kiam vi lastfoje vidis ŝin”, li pluas veninte en la ĉambron, kie ŝi sidigas surliten kaj li sur seĝon.

”Ŝi...” komencas la juna virino, kaj ŝajne ne scias kiel daŭrigi. Post momento ŝi reprovos: ”Mi vidis ŝin je Novjaro, proksimume.” Ŝi tre mallaŭte parolas. Ŝia haŭto palas sub kaŝtane bruna hararo mallonga. La manojn ŝi tenas kune en la sino, kaj la okuloj fikse direktiĝas al Jankéus.

Jankéus rigardas ĉirkaŭ si. Inter la mebloj de la ĉambro – skribtablo, lito, tableto, seĝo, libroŝranko – ĝi plenplenas je libroj, vestoj, ŝranketoj, kestoj, faldita ekstra lito, vestpendigilo, gazeto-rako, kusenoj. Surmure estas alpinglitaj aro da reproduktaĵoj de pli-malpli famaj pentraĵoj. Jankéus kredas rekoni bildojn de *Chagall*, *Chirico*, *Kahlo*, *Dardel*. Kvankam ŝtopita kaj iom senorda, la ĉambro tamen plaĉas al li.

Ankoraŭfoje li elpoŝigas la foton de la murditino kaj etendas ĝin al Astrid Höjjer.

”Ĉu povas vi konfirmi, kiu estas ĉi tiu virino?”

”Jes. Estas ŝi. Estas Lily.”

”Kiun taskon ŝi havis ĉe viaj gepatroj?”

”Ion kaj ĉion. Kuir. Purigi. Helpi endome.”

”Ĉu ŝi ankaŭ loĝis tie?”

”Jes, ŝi disponis ĉambron.”

”Kiam eklaboris ŝi tie?”

”Printempe aŭ frusomere lastjare.”

”Kaj kiel okazis, kiam ŝi malaperis?”

Ŝi pripensas.

”Mi ne bone scias. Ŝajne ŝi tutsimple forvojaĝis nenion dirinte.”

”Precize kiam?”

”Mi ne povas diri. Iam post Novjaro.”

”Ĉu tiam restadis vi ĉi tie aŭ en Kalmar?”

”Mi estis tie, ĉe la gepatroj. Sed mi scias nenion pri Lily.”

Jankéus iom cerbumas kaj poste demandas kun ŝajne leĝera tono:

”Supozeble vi poste aŭdis pri la murdo?”

”Jes.” Ŝi paŭzas kaj aldonas: ”Mi timis, ke eble temas pri ŝi.”

”Tamen ne kontaktis vi la policon.”

”Mi scias nenion pri la afero.”

Jankéus rigardas ŝin kvazaŭ pese dum momento, kaj poste pluas:

”Bone. Ĉu laŭ vi ŝi havis malamikojn?”

”Mi tute ne imagas. Mi ne konis ŝin aŭ sciis, kiel ŝi vivas.”

”Ĉu entute ŝi havis interrilatojn ekster la domo de viaj gepatroj?”

La juna virino pripensas, malfermas la buŝon, refermas ĝin, kaj post paŭzeto fine diras:

”Supozeble jes, sed mi nenion scias pri tio.”

”Viaj gepatroj ne volis rakonti pri Lily. Kial, laŭ vi?”

Nun ŝia rigardo unuafoje lasas la okulojn de Jankéus kaj vagas al la fenestro, trans kiu vidiĝas kelkaj pinoj kaj la kontraŭa domfasado. Sed preskaŭ tuj ŝi rigardas lin denove.

”Mi ne konas iliajn aferojn. Sed mi divenis, ke Lily ne havis permeson resti en Svedio. Tamen ne estas krimo loĝigi tian personon.”

”Pravas vi. Ĉi-kaze la krimo estas alia. Ĉu Lily renkontadis viron?”

”Mi ne scias.”

”Ĉu ŝia eksedzo iam venis al la domo de viaj gepatroj?”

”Ŝia eksedzo? Mi pensas ke ne. Sed demandu ilin.”

Jankéus elpoŝigas duan foton, tiun de Nils Rundqvist.

”Ĉu rekonas vi ĉi tiun personon?”

Ŝi rigardas, kapneas kaj eldiras mallongan ”Ne”.

Jankéus rigardas la filinon de direktoro Höijer, la viro kiu eble influis fermi la murdenketon. Ĉu la patro imagas, ke lia filino eble influos remalfermi ĝin?

”Ĉu scias vi, ke ŝi gravedis?”

Astrid Höijer montras tre apartan mienon aŭdante la demandon de Jankéus. Sed kion signifas tiu mieno? Ne facilas scii.

”Ne, tute ne!”

”Kiu, laŭ vi, povus esti la patro?”

”Mi ne imagas. Mi ne scias, kiun ŝi renkontis.”

”Kiel interrilatis ŝi kun viaj familianoj?”

”Bone, mi pensas. Neniu problemo.”

”Kaj kun vi?”

”Ankaŭ bone. Sed mi tre malmulte renkontis ŝin. Preskaŭ neniam ni interparolis. Mi tie pasigas nur feriojn kaj kelkajn semajnfinojn.”

Triafoje Jankéus elpoŝigas foton, tiun de Voloŝenko.

”Kiu estas ĉi tiu persono?”

Ŝi rigardas la foton sen montri signon de rekono, kaj poste kapneas.

”Mi ne scias.”

”Se mi aldonas, ke li eble negocis kun via patro, direktoro Höijer?”

”Vi devus demandi mian patron pri tio. Mi vere ne scias.”



La aŭtado de Växjö reen al Kalmar daŭras pli ol horon, kaj revenante en la policejon Jankéus tuj iras al Roger Svedberg. Tiu vere troviĝas en sia ofica ĉambro, sed diras senprokraste, antaŭ ol Jankéus eĉ havas okazon malfermi la buŝon:

”Mi ne rajtas paroli kun vi. Vi tuj iru al la policestro.”

”Sed aŭdu – mi nun havas ateston, ke la murdita Lily vere troviĝis en...”

Svedberg interrompas lin:

”Mi havas tute eksplicitan ordonon ne paroli kun vi sed sendi vin al la estro. Do bonvolu iri tien.” Li metas la manon sur la brakon de Jankéus, aldonante duonvoĉe: ”Vi povos telefoni al mi hejme, vespere. Private.”

Jankéus pli-malpli kuras al la policestra ĉambro, sed tie oni ne enlasas lin. Tridek kvin minutojn li devas atendi, ĝis fine la estro bonvolas akcepti lin. Enĉambre Jankéus tuj ekparolas, rakontante pri sia nova eltrovo. La poliestro tamen ne respondas, sed ŝovas al li dokumenton. Ĝi estas decido pri senprokrasta suspendo de policinspektoro Tom Jankéus el lia ofico pro suspektita misuzo de publika ofico. Du semajnojn li estos plene suspendita sen salajro, poste li rajtos reveni en laboron, tamen ne en sia esplora ofico, sed kiel stratpatrolanto.



Unuafoje en sia kariero Tom Jankéus havas okazon peti helpon de sia sindikato. La loka polica sindikatestro Bengt Jansson estas ankaŭ grupestro en la polica sekcio pri publika ordo, kio impresas al Jankéus iom strange.

”Nu, ŝajnas tute klare, ke la distrikta poliestro neglektis la regulon pri informado. Li devus unue informi la sindikaton, antaŭ ol efektiviĝi sian decidon”, diras Jansson.

”Ĉu do rajtos mi reveni en mian oficon?” demandas Jankéus esperplene.

”Ne, ne. Certe ne. Sed la polico eble devos pagi rekompencan.”

”Rekompencan? Ĉu vi scias, kiom mi povos ricevi?” interesiĝas Jankéus.

”Vi miskomprenis. Temus pri rekompenco al la sindikato, kompreneble. La regulo pri informado celas informadon al la sindikato.”

”Sed kiun rajton havas mi?”

”Nu, se li suspendus vin pro falsa akuzo, ja povus okazi, ke oni devus rekompenci ankaŭ vin. Sed tiel ne ŝajnas. Se mi ĝuste komprenis, vi entreprenis privatan enketon en pagitaj laborhoroj. Estu kontenta, se vi ne perdos la laboron tute.”

”Diable, ĉu pro tio pagis mi la kotizon dum ĉiuj jaroj?” Jankéus ekkrias kun nekutime kolera mieno. Ja li ĉiam kutimas ĉion rigardi kun leĝera ironio, tamen, kiam temas pri la propra vivo kaj laboro, ne eblas tiel facilanime rilati al misoj kaj fuŝoj.

La sindikatestro Bengt Jansson tamen ne incitiĝas. Eble li opinias, ke tio ne valoras la penon, ĉar ne temas pri lia haŭto. Li ekstaras, montrante ke nenio plu traktindas, dirante:

”La sindikato havas neniun motivon defendi fuŝojn kaj misuzon de la laborhoroj. Por ni gravas, ke la publiko havu plenan konfidon je la unuopaj policistoj.”

Jankéus forlasas la sindikatan oficoĉambron. Li miras pro la sinteno de la sindikatestro. ”Imagu, se tro forte batus mi iun arestiton”, li duonvoĉe murmuris al si. ”Tiam sendube konsentus ĉiuj, ke nenio okazis. La poliestro same kiel la sindikatestro.”



Ĉe la tria nomo sur la bileto de Voloŝenko, la ciril-litera *Valerij Ŝigajev*, estis skribita Stokholma telefonnumero. Jankéus pripensas, ĉu fari kvarcentkilometran vojaĝon ĉefurben en sia nepetita libertempo. Tamen, konsiderante ke ĝi estas ankaŭ nepagita, li decidas kontentiĝi per telefona alvoko.

La voĉo de Ŝigajev estas alta, juneca, vigla. Li parolas pli-malpli flue la svedan lingvon, sed kun iom nekutima emfazo kaj energio.

”Voloŝenko? Nu, bone, mi nek unufoje vidis lin, sed ni estas kun li en sama branĉo, tamen ĉe malsamaj kompanioj! Li iam vokis min telefone, petante rendevuon, tamen ĝis nun ne venis.”

”Kiam li telefonis al vi?”

”Nu, antaŭ monato, eble. Atendu, jen mi notis almanake... momenton... minuteton nur... jen! Kvinan de januaro!”

”Kaj pri kio volis li intertrakti?”

”Nu, tiam mi atendis ian proponon je kunlaboro, ĉar mi antaŭvidis, ke lia kompanio eble havos financajn problemojn. Efektive mi pravis, ĉu ne? Ja intertempe ĤozGaz bankrotis! Necesas profesieco en ĉi tiu branĉo!”

”Ĉu konas vi ankaŭ Nils Höijer?”

”Eeh... ne, tio ne sonas konate... Kiu estas li?”

”Direktoro de Paratus.”

”Paratus? Aha, mi komprenas. Ne, ni ne rilatis kun ili. Bedaŭrinde ili preferis nian konkuranton. Bone, nun ili eble pentos tion. Krom se tuta afero estis planita iliaflanke. Mi ne scias, kian atuton ili tenas enmanike!”



Dumtage Svedberg laboras pri siaj poŝtelefonaj ŝtelistoj, kaj Jankéus ripozas meditante pri la murdenketo, en kiu nenio grava aperis ĝis post la momento, kiam oni fermis ĝin. Vespere li tiom okupiĝas pri siaj infanoj, ke ili fine petas lin fojfoje lasi ilin en paco. Tiam li telefonas al Svedberg, kiu vagadas tien-reen tra sia malplena domo, kaj rakontas al li pri la lastaj atestoj.

”Nu, mi povas nenion fari. Por rekomenci la enketon, necesus io tute nova, kaj ĝi devus veni nek de vi, nek de mi.”

”Kion opinias vi pri oficiala serĉado de tiu Voloŝenko? Internacie, eble?”

”Iu devus peti tion. Ni ne povas iniciati serĉon. Se li mankas al iu, tiu anoncu lian malaperon.”

”Ĉu ne eblus serĉi lin pro la murdo?”

”Ne. La kazo estas finita, kaj krome ni havas neniun konkretan ligon inter li kaj la murdo.”

Ankaŭ Jankéus eklaboras, sed nun patrolante aŭte laŭ la urbaj stratoj, duope kun la kolego Staffan Lennartsson, kies ĉefa intereso en la vivo estas aŭtoj kaj futbalo. Krom tio li ŝatas plenumi palpesplorojn de junulinoj, kiujn li suspektas pri droguzado. Se neniuj drogulinaj videblas, li klopodas distri la kolegon per rakontoj el sia geĉvivo kun kunvivantino, kiu laŭdire faras ĉion por li. Jankéus enuas. Jam post semajno li ĝismorte enuas.

Okmil kilometrojn sudoriente, en Bankoko, butikista paro, kiu antaŭ du jaroj forsendis sian filinon al edzina vivo en Eŭropo, ricevas ŝian kadavron por tradicia sepulto. La sveda socio, kiu akceptis edzinon sed rifuzis ĝksedzinon, nun finfine senigas sin de ŝia korpo. En Bankoko oni portas ĝin al templa kremaciejo en la apudrivera kvartalo, en procesio kun la gepatroj kaj gefratoj, aliaj parencoj, amikoj kaj ok preĝantaj monaĥoj, por lasta ceremonio kun preĝado kaj ĉantado fare de la monaĥoj. Fine la funebrantoj ekbruligas ŝtiparon, kaj la pala virina korpo trovita en norda neĝamaso jen per fajro transformiĝas en cindrojn.



En suda Svedio la vintraj tagoj ankoraŭ mallongas. La tagiĝo venas malfrue, kvazaŭ rampe, dum la vespera krepusko tro fruas. Tamen nun en februaro ĉiu laŭvica tago pli longas ol la antaŭa je kvar minutoj. Ne multe, sed en semajno tio faras duonhoron. Oni jam povas espereti, ke eble la vintra grizo kaj nebulo cedos al iaspeca printempo. Tamen, la homoj ĉe la Baltmara bordo ne atendas baldaŭan varmon kaj verdiĝon. Ankoraŭ longe restos vintro. Ankoraŭ ĝi povus pune surprizataki per neĝo aŭ frosto, se oni tro facilanime malkaŝus sian sopiron je printempo.

La murdenketo pri Lily jam de semajnoj estas fermita kaj enarkivigita. Jankéus patrolas la stratojn kaj Svedberg okupiĝas pri ŝteloj, raboj kaj seksperforto. Nu... pri la solvo de tiuj krimoj, kompreneble! Neniu nova murdo postulas lian atenton. La smolandanoj kutime ne ĉiusemajne mortigas unu la alian.

Iutage en la fino de februaro al Svedberg venas vizitanto. Li staras en la policejo, trans la skribtablo, alta, zorge razita kaj frizita, kun malhelaj

haroj, en hela, iomete ĉifita kompleto, disradiante leĝeran odoron de vira parfumo. Io pri lia vizaĝo ŝajnas iel konata.

”Mia nomo estas Rundqvist, Nils Rundqvist. Oni aludis, ne tre volonte, fakte, ke vi esploris la morton de mia eksedzino Lily. Ŝajnas al mi, ke mi eble povus iel kunhelpi pri tio. Se vi ne jam solvis la aferon, kompreneble...”

Svedberg rigardas lin. Jen do la longe serĉita eksedzo. Li, kiu vaporigis kiel gaso. Kaptiĝis de banditoj kaj polico. Malmorale kondukis en Kaŭkazo. La gasinĝeniero. Virinimportanto. Porko, se uzi la esprimon de la virina azilistino.

Svedberg pripensas. Li prenas slipon, skribas ion sur ĝi, kaj stariĝas.

”Estas plezuro renkonti vin, sed mi bedaŭrinde ne plu okupiĝas pri tiu afero. Efektive neniun tion faras. La enketo estas fermita senrezulte. Se vi volas fari ian oficialan denuncon aŭ anoncon, mi devas direkti vin al la akceptejo en nia teretaĝo. Alie...” Kaj je tiuj vortoj li enmanigas la slipon al la vizitanto.

Nils Rundqvist rigardas la slipon. Sur ĝi aperas telefonnumero kaj la nomo *Tom Jankéus*. Li kapsalutas la komisaron kaj forlasas la policejon de Kalmar.

Restas Svedberg, cerbumante. Ĉu li tro malvarme forsendis la longe serĉitan eksedzon? Tamen, la enketo estas fermita, ĉu li tion ŝatas aŭ ne. Ja li ne plenumas ĉi metion pro ia amatora interesiĝo, nek pro pasio je justeco. Panogajna dungiĝo ĝi estas. Li klopodas kontentiĝi per tia rezonado, tamen sub tiuj pensoj ronĝas lian konsciencon la sento, ke ĉi-kaze io okazis mise. La enketo tro frue fermiĝis. Sed li ne trovas la bonan rimedon por postuli ĝian rekomencon.

8. Bileto al Svedio

Tom Jankéus ne scias kion pensi pri la viro, kiu sidas sur lia salona sofo. La infanoj, almenaŭ la du malgrandaj, Elis kaj Emma, gvatas la vizitanton de trans la kuireja pordo. La edzino verŝas kafon, dum la gasto okulkaresas ŝin de piedoj ĝis verto, precipe la mezajn partojn. Jankéus pripensas ĉu prezenti konjakon kun la kafo, sed decidas ne fari tion.

”Ĉu ŝia amikino en Malmö, la alia Tajlandanino, nenion sciis?” demandas Nils Rundqvist. ”Laŭ mi ili babilis senfine en sia lingvo, ĉiun duan semajnon. Ŝi certe diris pli multe al tiu virino ol al mi.”

Jankéus hezitas kion rakonti pri la enketaj rezultoj. Li ne fidas la helpemon de la eksedzo. Kial li finfine alvenis proponi siajn servojn, se ne por deturni la suspektojn for de li mem? Jankéus prezentas parton de la malmultaj rezultoj, kiujn oni atingis. La plej gravan atingon, ke Lily vere loĝis kaj laboris ĉe la familio Höijer, nun ripete konfirmas ŝia eksedzo.

”Mi devis ion aranĝi por ŝi. Ŝi ploraĉis kaj rifuzis reiri en Tajlandon. Kretene! Tie ŝi vivus multe pli bone ol ĉi tie. Almenaŭ ŝi vivus! Sed ŝi unue kaŝiĝis, kaj poste revenis por ĝeni min. Nu, mi parolis kun Valter Höijer. Iam mi faris al li servojn, kaj krome mi scias sufiĉe multe pri liaj negocoj en Rusio, do li havis bonan motivon fari al mi komplezon. Sed mi volas scii, kio okazis al Lily. Ŝi estis prudulino, tamen mi ne povas digesti, ke iu tutsimple murdis ŝin. Se mi trovos la ulon, kiu tion faris, li spertos ion alian...”

Jankéus decidas mencii la malaperon de Voloŝenko, kiu ŝajne okazis samtempe kun la malapero de Lily el la hejmo de Höijer.

”Sergej Voloŝenko?! Ĉi tie, kun Höijer! Mi vere ŝatus scii, pri kio ili babilis. Li konas la aferojn de Paratus en Rusio eĉ pli bone ol mi. Mi vetas, ke li minacis riveli ion, por gajni ion aŭ persvadi Höijer pri io. Jes ja, kompreneble! ĤozGaz estis en akuta financa krizo. Li certe alvenis por akiri plian kapitalon.”

Kiam Jankéus mencias la konkuranton Ŝigajev, Rundqvist tuj rikanas:

”Nu, tiun vulpon mi ne kredus eĉ se li ĵurus je sia patrino! Certe li kuiris ian kaĉon kun Voloŝenko. Vi vidu, nun kiam ĤozGaz estas for, certe la ŝakaloj interbatalos pri la kadavro!”

Jankéus rimarkigas, ke oni ankoraŭ ne atingis pridemandi la filon Höijer, kaj ke nun ŝajnas malfacile efektiviĝi tion. Rundqvist paŭzas.

”Mi dubas, ĉu tio indas. Mi neniam vere komprenis, ĉu tiu ulo havas normalan prudenton, aŭ ĉu li debilas. Sed eble mi povus elserĉi lin en la oficejo de Paratus, se li efektive frekventas ĝin. Fakte, mi pli emus iri Stokholmen, por iom prispioni tiun Ŝigajev kaj eltrovi, ĉu Voloŝenko troviĝas tie.”

Ili interkonsentas, ke Rundqvist vizitu la filon, Georg Höijer, kaj poste iru al Stokholmo. Li raportos al Jankéus kiam li ekscios ion interesan.

Jankéus jam de kelka tempo kovas demandon, kaj nun eldiras ĝin:

”Vi vizitis Svedion en oktobro, ĉu ne? En kiu dato, pli precize, okazis tiu vojaĝo?”

Rundqvist pripensas kaj respondas:

”La dudekan mi ekiris ĉi tien, kaj mi revenis post semajno al Kaliningrado. Kial do?”

”Nu, nenio grava...”

”Nenio grava?! Ĉu io okazis, kion vi ne diris? Diable, ĉu ni kunlaboru aŭ ne?”

Jankéus vane klopodas trankviligi la gaston, kiu nun eĉ ne plu rigardas lian edzinon kiam ŝi alportas plian kafon. Li elpoŝigas sian pasporton, malfermas kaj etendas ĝin al Jankéus.

”Bonvolu rigardi. Troviĝas stampoj de ĉiu eniro kaj eliro trans la rusan ŝtatlimon. Atendu...” Li foliumas inter amaso da diverskoloraj stampoj. ”Jen! Tiuj du devas esti!”

Jankéus embarasite ĵetas rigardon al iuj stampoj, kies literojn li ne scias legi, kaj kies datoj aperas tiel malklare, ke li ne komprenas kial Rundqvist elektis ĝuste tiujn kiel la oktobrajn. Li klopodas forlasi la temon, sed Rundqvist ne volas tion.

”Prefere diru, kio okazis! Kiel mi povu eltrovi ion novan, ne konante la historion?”

Fine Jankéus devas rakonti pri la gravedeco de Lily, kiu ekis en la komenco de oktobro, se kredi la nekropsiiston.

”Graveda? Lily? La fuŝulino! Al ŝi oni devis pli-malpli enbuŝigi la pilolojn! En oktobro, ĉu? Do, la murdinto ne povas esti Voloŝenko! Se li ne faris pli fruan viziton, kaj mi dubas pri tio.”

Jankéus klopodas klarigi, ke ne troviĝas nepra interrilato inter la gravedeco kaj la murdo, sed por Rundqvist la afero estas klara: trovu tiun, kiu gravedigis ŝin, kaj jen troviĝas la murdinto.



Oni frapas al la pordo ĉe la ofica ĉambro de Svedberg, sed antaŭ ol li havas tempon respondi, la pordo malfermiĝas kaj enkuras Nils Rundqvist. Li energie paŝas ĝis la skribtablo kaj lasas fali sur ĝin tri plastsaketojn.

”Bonvolu! Jen materialo por viaj DNA-testoj aŭ similaj diabloĵoj”, li diras. Levante unu saketon li pluas: ”Jen kombilo de la filo, Georg Höijer, sendube kun haroj kaj haŭtoskvamoj. Kaj en ĉi tiu kuŝas cigarstumpo de la patro, Valter Höijer. Mi ne scias, ĉu li sufiĉe riĉe salivumas por viaj bezonoj. Kaj jen...” – li levas la trian saketon, en kiu vidiĝas botoleto kun io malhela

– ”jen sango el mia propra koro, por ke vi ne plu suspektu min! Ĉu ankoraŭ de alia ulo vi bezonas materialon?”

Svedberg suspiras kaj mienas, kvazaŭ li preferus ŝovi la saketojn reen en la brakojn de la vizitanto.

”Ĉu vi lernis tiujn policajn metodojn en Kaŭkazo aŭ en Tajlando? Ĉe ni ili bedaŭrinde ne utilas, krom se oni denuncos vin pro ŝtelo de kombilo. Tiokaze ĝi povus servi kiel pruvaĵo. Alie mi ne povas uzi iujn anonimajn objektojn, laŭdire kaptitajn fare de privatulo disde aliaj privatuloj. Reprenu ilin, mi petas!”

Sed Rundqvist jam survojas al la pordo. Li ĵetas kelkajn vortojn dorsen:

”Nu, faru laŭplaĉe. Mi iros Stokholmen por prigrvati tiun vulpon Ŝigajev. Mi suspektas, ke via Voloŝenko eble konspiras kun li.”



Sur eta altaĵo en Krafslösa, nordokcidente de Kalmar, troviĝas gruzejo, kie oni ĉerpas materialon por diversaj konstrulaboroj. Vintre ĝi kutime dezertas. Fine de februaro privatulo pro neklara motivo – eble por ŝteli gruzon – troviĝas en ĝi, kiam ĉe unu flanko gruzo glitfalas malkaŝante kadavron de viro.

Ĉar homoj kutime ne entombigas sin mem sub tavolo da gruzo, tuj aperas suspekto pri krimo. La polico alvenas, etendas siajn kutimajn plastbendojn, fotografas, klopodas trovi spurojn ĉirkaŭ la loko, kie la kadavro kredeble kuŝis antaŭ la glitfalo. Oni portas la kadavron al hospitalo por nekropsio, kaj la polico asignas al la kazo respondecan esploranton. Ĉar la esplora sekcio de la urba polico ne tre ampleksas, kaj momente mankas unu el ĝiaj dungitoj, ne estas tre mirige, ke oni taskas al komisaro Roger Svedberg okupiĝi pri la gruzeja kadavro.

Kvankam la mortinto ne tute freŝas, post mallonge oni konstatas, ke li estas la malaperinta *Sergej Andrejeviĉ Voloŝenko*. La dato kaj kaŭzo de morto pli nebulas. La nekropsianto taksas, ke la kadavro kuŝis en la gruzejo kelkajn semajnojn. Ĝi havas kontuzon sur la flanko de la kapo, tamen tiu ne estis mortiga. Ankaŭ ne troviĝas spuroj de apopleksio. La pulmoj enhavas nur tion, por kio pulmoj ekzistas, do aeron. Fine oni konkludas, ke la viro ŝajne mortis pro frostiĝo. Ĉar la nekropsia raporto iom enigmas al li, Svedberg telefonas al doktoro Wallberg.

”Ĉu eblas, ke oni bate paralizis lin kaj poste deponis lin en la gruzejo, kie li poste frostmortis?”

”Jes, tio eblas. Se jes, tio devis okazi sufiĉe rapide, ĉar la bato ne estis fortega. Kaj vi serĉu meteo-raportojn pri intensa frostado, ĉar la histoj montras spuron de tia.”

”Intensa frostado, ĉu? Kiom da gradoj?”

”Ne facilas diri, tamen mi divenus je pli ol minus dek – eble dek kvin. La ĉeloj krevigis la ĉelmembranojn sufiĉe amase. Tio ne rezultas ĉe ordinara malaltiĝo de la korpa varmo.”

”Hmm. Ĉu entute ni ĉi-jare havis tian veteron? Nu, mi esploru.”

Post kelkaj horoj li ricevas liston kun ĉiuj temperaturoj mezuritaj kvarfoje tage ĉe la flughaveno de Kalmar ekde la unua de decembro. Li okulserĉas en ĝi, kaj baldaŭ konstatas, ke la sola severa frosto ĝis nun tiuvintre okazis en la 26a ĝis 28a de decembro – minus dek unu ĝis dek kvar gradoj.

Svedberg telefonas al Jankéus. Li tiel al kutimiĝis diskutadi enigmojn kaj ŝajnajn paradoksojn kun li, ke nun ŝajnas kvazaŭ li ne plu povus sola analizi problemon. Sed Jankéus duope kun Staffan Lennartsson persekutas aŭtoŝtelinton kaj ne povas konsili en murdenketo. Svedberg devas sola pensi ĝis vespere.

Kiel eblas, ke oni mortigis Voloŝenkon en decembro, se li alvenis aviadile la 5an de januaro kaj ekloĝis en hotelo Regina? Bone, nun li havas kaŭzon oficiale pridemandi la filon Höijer. Poste li eventuale faru duan provon pri la direktoro kaj direktoredzino.



Georg Höijer akceptas la komisararon en sia oficejo. Laŭ nomtabulo ĉe la pordo li titoliĝas *financa direktoro*. Konsiderante la menciojn de pluraj homoj, Svedberg atendis trovi ian flegman dandon duonstultan. Jen li nun trovas sin antaŭ juna altulo brunhara kun mieno melankolia kaj okuloj ekzamenaj. Li serioze salutas kaj petas la komisararon sidiĝi montrante etan maltrankvilon. ”Se li estas stultulo”, pensas Svedberg, ”li lernis zorge kaŝi tion.”

Li komencas montrante la foton de Voloŝenko. Höijer rigardas ĝin kaj rapide ekparolas:

”Li estas rusa negocisto de kompanio kun kiu ni kunlaboris. Li vizitis nin en la komenco de ĉi tiu jaro kun iom neklara celo. Ŝajne lia tasko estis persvadi nin al plia financa subteno, sed mia patro, la direktoro de Paratus, komprenigis al li ke tio ne realiĝos.”

”Kie vi renkontis lin?”

”Mi mem ne interparolis kun li, sed mi vidis kaj aŭdis lin ĉi tie, en la oficejo.”

”Ĉu ankaŭ hejme?”

Al la demando de Svedberg venas respondo post nur momenta hezito:

”Jes, efektive, li vizitis nin iuvespere.”

”En kiu tago, mi petas?”

”Mi ne memoras la daton precize. Eble la kvinan aŭ sesan de januaro, proksimume.”

”Kiel li venis tien?”

”Al nia domo? Mi ne scias. Supozeble taksie.”

”Kaj kiel li foriris?”

”Supozeble same, taksie. Vi demandu mian patron. Mi nur konstatis matene, ke li ne restas.”

”Kaj ĉu tiam restis Lily, la mastrumistino?” tujas Svedberg.

Lia vizaĝo ektremas kvazaŭ pro subhauta spasma, kaj li diras kun voĉo jam pli raŭka ol ĵus:

”Ne. Ŝi malaperis samtempe.”

Svedberg pripensas dum momento kaj poste diras sen troa emfazo:

”Matene do vi konstatis, ke la rusa gasto ne restas, kaj ke Lily malaperis. Kiu tago de la semajno estis, tiumatene?”

”Estis sabato”, respondas Georg Höijer.

”Ĉu vi surpriziĝis pro la malaperoj?”

”La malaperoj... nu, mi ne surpriziĝis, ke la gasto estas for...”

”Sed Lily?”

”Jes, mi ne atendis tion.”

”Ĉu iu en la familio konis klarigon?”

”Nu, neniu sciis, sed oni supozis, ke ŝi akompanis la ruson.”

”Oni? Kiu estis *oni*? Svedberg scivolas.

”Ĉefe miaj gepatroj.”

”Kaj kion pensis vi?”

”Mi ne sciis, kial ŝi foriris.”

”Kial vi faris neniun anoncon al la polico?”

”Vi devus demandi mian patron pri tio.”

”Mi nun demandas vin!”

”Mi... mi ne suspektis krimon...”

”Ĉu vi legas ĵurnalojn? Aŭskultas radion? Spektas televidon?”

”Jes, jes, jes. Mi scias. Mi ŝokiĝis. Mi ne sciis kion fari.”

”Ĉu mi rajtas konkludi el tio, ke vi tuj komprenis, ke la murdita virino estas Lily?”

”Mi ne povis scii, sed mi suspektis tion.”

”Kiu mortigis ŝin?” Svedberg demandas rapide kaj kun emfazo.

Georg Höijer rigardas lin surprizite, palpebrumante.

”Mi ne scias!”

”Kiam vi vidis ŝin lastfoje, precize?”

”Vespere, do vendrede vespere.”

”Je kiu horo?”

”Eble je la oka, je la vespermanĝo.”

”Ĉu ŝi manĝis kun vi?”

”Ne, ne...” Minimuma ironia rideto dum sekundo vidiĝas surlipe de Georg Höijer. ”Ŝi ĉiam manĝas... do, manĝadis kuireje, kvankam la samajn pladojn kiel ni.”

Svedberg observas lin kelkajn sekundojn kaj poste demandas:

”Ĉu vi scias, ke ŝi estis graveda?”

La reago estas tuja. Lia rigardo, kiu ĵus ekvagus ĉirkaŭe en la ĉambro, resaltas al la vizaĝo de Svedberg. Refoje spasmeto trakuras liajn trajtojn.

”Ĉu graveda? Lily? Kiel vi scias?”

Svedberg ignoras la demandon, kiu unuafoje eble najbaras al stulteco, kaj plu demandas:

”Ĉu vi havis amrilaton kun Lily?”

La vizaĝo de Georg Höijer trankviliĝas. Liaj okuloj denove ekvagas, ĉifoje fenestren. Li metas manon al la buŝo, kvazaŭ por malhelpi, ke io eskapu malvole. Li provas ion diri, sed la voĉo perdiĝis. Nur duafoje li voĉas:

”Iaspecan, jes.”



Svedberg sendas la pasportan foton de Voloŝenko al du lokaj taksiaj kompanioj kun demando, ĉu iu veturigas tiun viron la 7an aŭ 8an de januaro, en la granda neĝoŝtormo. Baldaŭ telefonas al li taksiŝoforo, dirante, ke li memoras tian veturigon. Svedberg renkontiĝas kun li en lia aŭto ekster la policejo.

”Mi preskaŭ certas, ke tiun viron mi veturigas vespere, komence de la ŝtormo. Li estis eksterlandano, kaj montris la adreson per slipo. Li volis iri al iu privata insuleto, Ramsö, en la norda periferio de la urbo. Fakte mi eĉ ne atingis ĝis tiu insulo, ĉar surponte tien la neĝo jam ŝtopis la vojon. Estis eble la sesa horo vespere. Mi lasis lin tie kaj devis retroiri kelkcent metrojn ĝis mi povis turni la aŭton. Mi memoras tion bonege, ĉar mi timis fiksiĝi en tiu neĝamaso. Sed li ne plendis, li ŝajne trovis tion normala. Do li pagis kaj brave marŝis plu trans la ponton, en neĝo ĝisgenua.”



Ankaŭ ĉi-vespere Jankéus havas gaston, sed tiu ne same intime okulumas al lia edzino, kiel faris Nils Rundqvist. Tamen temas pri malofta gasto – kiel tipaj svedoj la du kolegoj Svedberg kaj Jankéus ne kutimas interrilati en siaj liberaj horoj. Sed nun la kondiĉoj estas apartaj, pro la tro frue fermita murdenketo pri Lily, kaj pro la suspendiĝo de Jankéus.

Ili diskutas la atingitajn rezultojn en ambaŭ enketoj. Ŝajnas evidente, ke troviĝas ligo inter ili, kvankam restas nebule, el kio konsistas tiu ligo. La

komuna punkto ĉiuokaze estas la hejmo de direktoro Höijer, en la vespero aŭ nokto de la 7a de januaro, dum la neĝoŝtormo. Kio efektive okazis tiam?

”Devus vi priserĉi la domon de Höijer”, diras Jankéus. ”Ja nun estas klare, ke ŝi nestis tie. Do devas resti aĵoj. Kaj necesus konfronti la gepatrojn kun la atestoj de la gefiloj.”

”Sed la dato ankoraŭ restas mistera. Kaj mi respondecas nur pri la kazo Voloŝenko, kaj por dompriserĉo necesas konkreta suspekto. Ĉu oni mortigis lin en la domo kaj poste deponis gruzejen?”

”Tute eble. Kaj la mastrumistino iĝis atestanto kaj devis esti silentigita.”

”Sed kial entute mortigi la ruson?” demandas Svedberg.

”Aludis Rundqvist, ke Voloŝenko sciis detalojn pri la agado de Höijer en Rusio. Eble io estis sufiĉe tikla por motivi murdon”, supozas Jankéus.

”Bone. La ĉeno ŝajnas sufiĉe kohera por meriti esploron. Eble nia doktoro troigas pri tiu severa frostoj. Do mi faru pliajn pridemandadojn. Se tio ne sufiĉas, mi parolu kun la prokuroro por akiri permeson de dompriserĉo.”

La diskutado de la du policistoj tamen ne restas strikte ĉe tiuj profesiaj temoj. Jankéus dum la lastaj tagoj komencis serioze dubi, ĉu li restu en la polico. Lia edzino enmiksiĝas kun diversaj ideoj kaj instigoj. Kial ne iĝi instruisto? Li povus eĉ preventi, ke junuloj iĝu krimuloj, anstataŭ persekuti ilin post farita krimo.

Svedberg siaflanke konstatas, kiom mankas al li normalaj sociaj interrilatoj. Lia edzino ja asertis, ke ili neniom interparolas, tamen nun kiam ŝi forlasis lin, tiu nenio ege mankas al li, kvankam antaŭe li ne atendus tion.

La diskuto ĉe kafe kaj konjako ondas de labortaskoj al privataĵoj kaj reen al la profesiaj temoj. Ili sidas kuireje, ĉar la salono estas okupita de infanoj televidantaj. De temp’ al tempo iu el la juna generacio Jankéus okaze aperas kuireje por serĉi ĉipsojn, kolaon aŭ iun alian vivnecesaĵon. Ankaŭ Annette, la edzino, fojfoje alvenas, interŝanĝas kelkajn vortojn kun sia edzo aŭ la gasto, kaj reiras en la salonon aŭ al propraj okupoj. La du kolegoj dividas la restantan gluton da konjako. Irante hejmen Svedberg sentas amaran bedaŭron, ke familia vivo, kiel tiu de lia kolego, por li mem apartenas al la pasinteco.



Malgraŭ malfrua vespero, Svedberg ekagas frue la sekvan matenon. Kun la inspektoro Hans Andersson, vortavara cerbumulo, kun kiu li antaŭe ne ofte kunlaboris, li alvenas ĉe la grandan domon sur Ramsö. La sinjorino malfermas en negliĝo. La direktoro ĵus stariĝis de la matenmanĝa tablo.

”Mi bedaŭras, sinjoroj”, li diras, ”sed taksio post kvin minutoj veturigis min al la flughaveno.”

Svedberg ne palpebrumas, nek ŝanĝas mienon aŭ laŭtigas la voĉon. Li eĉ preskaŭ mallaŭtigas ĝin, tamen elparolas malrapide kaj tre klare:

”Mi bedaŭras, sinjoro Höijer, sed vi povas malmendi ilin. La taksion kaj la aviadilon. Hodiaŭ vi havos pli gravan taskon. Vi helpas la policon klarigi murdon.”

”Kion vi imagas? Vi ne rajtas malhelpi miajn taskojn!”

Svedberg ne respondas, nur levas sian polican identigilon. Valter Höijer paŭtas. Eksterdome aŭdiĝas la sono de alvenanta aŭto. Svedberg diras:

”Vi povos malmendi la taksion enirante en la policaŭton. La pridemandado hodiaŭ okazos en la policejo.”



Oni sidas en la oficeja ĉambro de Svedberg. Li ŝaltas sonkasedilon, apude lia kolego Andersson sidas kun notkajero kaj krajono, kaj li mem dum kelka tempo klinas sin malantaŭen, pensas kaj silente ekzamenas direktoron Höijer. Tiu sidas trans la skribtablo kun sia teko surgenue, sendube enhavanta gravajn negocajn dokumentojn, kiuj hodiaŭ mankos en iu estrarkunveno, aŭ eble distran legaĵon por la intencita flugvojaĝo. Lia mieno estas klare malaproba, tamen li ne plu plendas pri la polica perturbo de lia tagordo.

”Sinjoro, bonvolu diri kiuhore la sepan de januaro Sergej Voloŝenko alvenis en vian hejmon.”

”Mi ne komprenas vin. Ĉu mi ne jam diris, ke li vizitis nur la oficejon?”

”Ni havas pruvojn, ke li venis ĝis Ramsö”, asertas Svedberg. ”Bonvolu respondi la demandon.”

La direktoro rigardas de Svedberg al Andersson kaj reen. Li ŝajnas pripensi kelkan tempon, tamen poste nur ripetas:

”Devas esti miskompreno. Mi okaze interparolis kun tiu viro en la sidejo de Paratus, sed alie mi scias nenion pri li.”

”Per kio li minacis vin?”

”Minacis? Kial li minacu?”

”Ni scias, ke li venis ĉi tien por konvinki vin investi plian monon en la gasprojekto. Kiujn persvadilojn li havis?”

”Vi fantazias. Ni intertraktis pri komuna projekto, efektive, sed tute ne temis pri plia investado.”

Svedberg ne rapidas. Li scias, ke troa hasto nur faciligas la sintenon de Höijer. Li pripensas la nekropsian raporton pri Voloŝenko klopodante imagi, kiel povus okazi la morto de la rusa negocisto.

”Kion rezultigis tiuj intertraktoj? Ĉu ion pozitivan?” li leĝere demandas.

”Efektive ne. Bedaŭrinde la konsideroj estis tro temporabaj, kaj ni perdis la oportunon.”

”Kiun oportunon?”

Valter Höijer iom rektigas la dorson.

”Mia familio havas tradiciojn kaj spertojn en la kampo de nafto kaj aliaj energiofontoj. Mi volis eluzi niajn rusajn kontaktojn por plievoluigi tion, sed... Nun ni perdis tiun kontakton kaj devos serĉi novan. Iufoje necesas agi senprokraste aŭ tute ne.”

Svedberg scivolos, ĉu li efektive parolas pri negocoj, aŭ pri io alia. Tamen li nun decidas transiri al la alia kazo, tiu de Lily, kiu ankoraŭ restas oficiale fermita kazo.

”Ni krome nun scias kun certeco, ke la eksedzino de via konato Nils Rundqvist efektive servis vian familion dum pli ol duonjaro. Kial vi neis tion dum nia antaŭa interparolo?”

Valter Höijer kuntiras la brovojn.

”Ĉu ankoraŭ tiu afero restas aktuala?” li miras. ”Kiel ĝi rilatas al la gaskompaniaj demandoj? Pardonu min, komisaro, sed pri kio vi efektive enketas?”

Svedberg klarigas kun ŝajne senlima pacienco:

”Mi enketas pri murdo. Laŭ atesto de pluraj personoj, interalie de ambaŭ viaj gefiloj, ŝajnas esti ia rilato inter la vizito de Voloŝenko en via hejmo kaj la malapero de Sirilak Lily Rundqvist el ĝi. Do, mi ripetas, kial vi ŝajnis ne koni ŝin?”

La direktoro dum unu-du sekundoj pripensas kaj poste ekparolas:

”Bone. La embaraso estis, ke ŝi eksplicite petis nin neniam mencii al iu, ke ŝi laboras ĉe ni. Ni dungis ŝin dum certa periodo kiel komplezon al inĝeniero Rundqvist, sed mi ne intencis, ke tio daŭru tre longe.”

”Ĝis kiu dato vi interkonsentis pri dungo?”

”Nu, tio ne estis formale fiksita... Ni esperis, ke ŝi trovu alian eliron, aŭ eble revenu al sia lando.”

”Kaj kiam vi laste vidis ŝin?”

”Mi ne memoras la precizan daton. Ŝi forlasis nin komence de januaro.”

”Kiel ŝi forlasis vin?”

”Fakte, vi devus konsulti mian edzinon pri tio. Mi malmulte rilatis al la mastrumistino”, Höijer diras en tono kun grajno da malestimo.

”Ĉu vi povus rakonti, kiujn aliajn rilatojn ŝi havis en via familio?”
Svedberg leĝeras.

Höijer saltetas.

”Kion vi celas?” li bruskas.

”Mi scivolas, kiel ŝi rilatis al la ceteraj familianoj” Svedberg milde klarigas.

”Bone. Tute bone. Neniu problemo, ŝi estis tre agrabla kaj servema persono.”

Svedberg cerbumas. Ĉu temis nur pri servemo? Li pluas:

”Ĉu ŝi bone rilatis al via edzino?”

”Jes, laŭ mia scio ne estis problemo.”

”Kaj la filino?”

”Astrid ne plu loĝas ĉe ni, sed dum ŝiaj vizitoj mi ne rimarkis problemon.”

”Kaj kun la filo. Ĉu tie estis problemoj?”

”Ne, ne laŭ mia scio.”

”Kiel plaĉis al vi la rilato inter via filo kaj Lily?”

”Rilato? Mi ne komprenas vin. Estis neniu problemo. Ŝi plenumis siajn taskojn ĉe ni. Nenio plua.”

Svedberg denove cerbumas. Ne indas rapidi. Li sentas, ke paŝon post paŝo la afero nun pluiras, kvankam foje ĝi ŝajnas treti surloke. Li venigas kun si la kolegon Hans Andersson en la koridoron, instrukcias al li daŭrigi la pridemandadon ripetante ankoraŭfoje proksimume la samajn demandojn, se necese eĉ triafoje. Dume Svedberg ekrapidas por mallonga ekskurso.

Policaŭto rapidas norden tra la urbo. Post semajnoj da degelo, nebulo kaj vento, la vetero ŝajnas nun ŝanĝiĝi. Estas eta nuanco de frosto en la aero. Odoras je neĝo, kaj kiam Svedberg kaj lia veturiganto atingas la insulon Ramsö, efektive etaj, molaj neĝflokaj maldense kaj gracie ekfalas inter la malhelverdaj pinoj.

Andrea Höijer restas endome kaj faras nek demandojn nek protestojn, kiam Svedberg petas ŝin akompani lin policejen. La veturado okazas en absoluta silento. Kiam ili alvenas urbocentren, la tero jam aspektas kvazaŭ pudrita per sukero aŭ faruno. La malgaja vintra obskuro tuj ekhavas kvazaŭ puntan vualon.

Li paŝas kun la sinjorino ĝis sia ofica ĉambro. Enirante li kapsalutas al sia kolego kaj diras:

”Dankon, Andersson. Mi supozas ke vi jam eksciis sufiĉe. Direktoro Höijer, dankon pro via helpemo. Se vi volos ion aldoni, ne hezitu telefoni al mi. Bonvolu, jen mia karto!”

La du geedzoj interŝanĝas rigardojn elokventajn. Kiam la direktoro forlasas la ĉambron – tro malfrue por sia aviadilo, supozeble – lia edzino prenas lian lokon apud la skribtablo.

Svedberg dum kelka tempo okupiĝas ĉetable. Fluglegas iujn paperojn, zorgas pri nova kasedo en la kasedilo, palpas skribilojn kaj slipojn. Li tion faras ne tiom por nervigi sinjorinon Höijer, kiom por prepari sin mem.

”Sinjorino Höijer”, li fine ekas, ”mi ŝatus komenci paroli pri via iama mastrumistino, Sirilak Lily Rundqvist. Ĝis nun via edzo, via filino kaj via filo rakontis pri ŝia restado en via domo, kaj ankaŭ ŝia eksedzo informis nin, ke ŝi laboris kaj loĝis tie. Do mi ne tre bezonas ankaŭ vian konfirmon pri tiu fakto. Ĉefe interesas min, kiel kaj kiam ŝi forlasis ĝin.”

La sinjorino ŝajne trankvile pripensas.

”Mi ne scias precize kiel tio okazis, sed mi ĝojas ke ŝi forlasis ĝin.”

Estiĝas silenta momento. Svedberg atendas, sed neniu plua klarigo venas.

”Vi ĝojas. Interese. Kial?”

”Ŝi ne... konvenis.”

”Ne konvenis? Por kio?”

”Vi sendube komprenas, kion mi volas diri.”

”Efektive ne.”

”Tiu ino ne estis deca persono. Ŝi estis – pardonu min, se mi parolas senkaŝe – ŝi estis ĉiesulino.”

”Vi troviĝas ĉi tie por senkaŝe rakonti, kion vi scias. Do, kiel vi rimarkis tion? Ĉu ŝi prostituis sin ĉi tie, en Kalmar?”

”Tio ne interesas min. Mi ne ŝovas la nazon en fremdan...” Sinjorino Höijer interrompas sin, eble trovante ke metaforo kun *nazo* kaj *vazo* ne estus tre trafa en la kunteksto.

”Bone, ĉu mi do rajtas konkludi, ke regis malbona rilato inter vi kaj via mastrumistino?” Svedberg demandas.

”Tute ne. Mi ĉiam kondutas korekte al dungitoj. Sed mi atendas reciprokan konduton de ili.”

”Kaj ĉu tiel ŝi reciprokis?”

”Neniu povus aserti tion.”

”Do, kion ŝi faris nekorekte?” scivolas Svedberg.

La sinjorino enspiras.

”Tiu ino jam unufoje uzis viron por veni en Svedion kaj vivi bonstatan vivon. Nun ŝia ĉefa celo evidente estis refoje praktiki tiun artifikon. Kaj ŝi ne kontentiĝis per ĉiu ajn. Tute ne.”

”Sed per kiu?”

”Evidente ŝi aspiris grandan predon.”

Svedberg rigardas la sinjorinon, patrino de Georg Höijer. Ĉu ŝi nomas sian filon *predo*? Aŭ ĉu temas pri iu alia?

”Kiel rilatis via edzo al Lily?” li subite demandas.

Ŝi paŭte elsnufas.

”Valter nenion rimarkis. Li ne utilas al multo.”

Svedberg refoje ĵetas al ŝi surprizitan rigardon. Pri kio ŝi efektive parolas? Stranga virino, sendube. Li tamen pluas:

”Kaj kion pensis vi pri la rilato inter Lily kaj via filo?”

Ŝi silentas dum momento kaj poste ekparolas.

”Vi komprenu, ke Georg estas malfortulo. Li neniam bezonis lukti por io. Li neniam lernis defendi sin kaj la sian. Kiam tiu ino elmetis sian logaĵon, li kaptiĝis per la hoko. Kompatinda knabo! Tamen li ne rajtis tiel frivoli. Ja li respondecas ankaŭ al la familio. Do, mi komprenas lin.”

”Vi komprenas kion?”

”Ke li furioziĝis eksciante, ke ŝi eluzis lian naivecon.”

Svedberg klopodas vidi antaŭ si la filon Höijer furioza, sed tio ne prosperas al li.

”Kiam li furiozis?”

”Tio okazis en la neĝostorma vespero, la sepan de januaro. Tiam ŝi rakontis al li. Evidente tion ŝi jam dekomence intencis. Jen ŝia bileto al Svedio, ĉu ne?”

”Bileto al Svedio?”

”Jes, certe! Kaj al riĉeco, laŭ ŝia opinio. Ŝi sukcesis, ĉu ne? Sagace, jes ja. Tamen ne dece.”

”Ŝi sukcesis pri kio?”

”Tion vi sendube jam delonge scias. Ŝi sukcesis gravediĝi, ĉu ne?”

”Ĉu tion ŝi sciigis tiuvespere, la sepan?”

”Jes. Povra Georg iĝis senespera. Mi komprenas lin. Li kriis, ke ŝi detruis lian vivon. Ke ŝi mensogis, dirante ke ŝi prenas pilolon. Kaj li...” Ŝi paŭzas grakante por klarigi la voĉon. ”Li pelis ŝin eksteren, el la domo. Ja estis terure en tiu vetero, tamen mi komprenas lin. Kaj mi konfesas, ke mi eĉ sentis malpeziĝon, kiam ŝi forlasis nian domon. Ja mi ne povis antaŭvidi, ke io terura okazos...”

Svedberg cerbumas. Ŝia rakonto ŝajnas iom melodrama, tamen li ne povas nei, ke ĝi koheras. Efektive povus okazi tiel. Li decidas lasi la kazon de Lily ripozi dum kelka tempo kaj anstataŭe etendas al Andrea Höijer la pasportan foton de Voloŝenko.

”Jen la rusa negocisto Sergej Voloŝenko. Li vizitis nian urbon en la kvina ĝis oka de januaro kaj intertraktis kun via edzo. Ĉu vi memoras lin?”

”Mi ne partoprenas en la negocado de mia edzo.”

”Mi aŭdis la malon, ke vi tre aktivas en reprezentado kun li.”

”Nu... tio estas parte vera. Mi volis diri la jenon: mi ne kutimas viziti lian oficejon.”

”Sed Voloŝenko laŭdire venis al via hejmo. Ni jam havas plurajn atestojn pri tio.”

”Mi ne kredas. Mi ne rekonas lin, neniam aŭdis la nomon, nek vidis tiun vizaĝon, kaj certe ne en nia domo.”

”Ĉirkaŭ la sesa horo vespere, la sepan de januaro, komence de la neĝoŝtormo?”

”Ridinde. Tiam ni estis solaj en la familio. Krom la mastrumistino, kompreneble.”



La enketoj evoluis alie ol Svedberg atendis. La rilato inter Voloŝenko kaj Lily ankoraŭ restas same nebula. Anstataŭe aperis alia fadeno. Ĉu Georg Höijer kulpas – rekte aŭ nerekte – pri la morto de Lily? Li ne trovas tiun ideon tute konvinka. Tamen necesas sekvi ĝin, kaj la unua afero plenumenda estas refoje pridemandi la filon. Do, Svedberg aplikas duafoje la saman trukon, petante Hans Andersson daŭrigi la demandadon. Poste li rapidas al la sidejo de Paratus, sed Georg Höijer ne troviĝas tie. Lia sekretariino ŝajnas en embaraso, ne sciante kiel klarigi lian foreston. Je demando de Svedberg ŝi koncedas, ke eble oni trovas lin en la hejmo.

Do, denove aŭto rapidas norden laŭ la urbaj stratoj. Sur trotuaroj kaj laŭ padoj jam grizetaj piedsignoj sur blanka fono rivelas, kie homoj paŝis en la lasta horo. ”Se nur same facile estus sekvi la spurojn en murdenketado”, revas Svedberg.

Alvenante sur Ramsö atendas lin nova surprizo. Surkorte antaŭ la domo staras aŭto, kiu ŝajnas esti la privata aŭto de Tom Jankéus. Surŝtupare antaŭ la ĉefpordo de la domo efektive staras lia momente suspendita kolego, interparolante kun la inĝeniero Nils Rundqvist.

9. Malmurdi murdinton

Tri viroj, Roger Svedberg, Tom Jankéus kaj Nils Rundqvist, sidas en la aŭto de Jankéus survoje tra la urbo. Ili veturas de Ramsö en la nordo kontraŭ la gubernia hospitalo situanta en suda kvartalo.

”Mi revenis ĉi-matene el Stokholmo”, rakontas Rundqvist al Svedberg, ”kaj tuj rapidis al via kolego aŭ ekskolego por raporti. Fakte mi nenion trovis, precipe ne Voloŝenkon, kio ne tre strangas, se konsideri ke vi tenas lin ĉi tie en iu kadavrejo. Bone, kiam mi sidis en la kuirejo de Jankéus, trinkante la varmegan kafon de lia dolĉa edzino – aŭ ĉu inverse? – sonoris la telefono.”

”Jes”, pluas Jankéus, ”vokis min Astrid Höijer, la filino. Maltrankvilis ŝi, ĉar hieraŭ vespere ŝia frato telefonis al ŝi sonante sufiĉe deprimita, kaj nun hodiaŭ matene ŝi sukcesis kontakti neniun en la familio. Ĉeestis neniuj el ili en la oficejo, kaj hejme neniuj respondis ŝian telefon Alvokon. Do, ŝi unue demandis min, ĉu okazis io, sed tion mi kompreneble ne sciis, estante malkonektita de la enketoj. Poste ŝi petis min iri tien por esplori.”

”Do ni ekiris”, Rundqvist transprenas la stafetilon, ”sed ankaŭ surloke neniuj malfermis aŭ reagis al nia frapado kaj sonigado. Ni poŝtelefonis al tiu eta Astrid, kaj ŝi taskis al ni eniri la domon. Mi devis frakasi fenestrovitron...”

”Nu, mi vidas tion”, Svedberg seke komentas, montrante al lia dekstra mano, kie sango makulas provizoran bandaĝon el poŝtuko.

”Ne, ne”, protestas Rundqvist, ”tio ne estas pro la vitro, sed pro tiuj damnitaj hundoj. Nu, fine mi sukcesis enfermi ilin en ĉambro, por enlasi Jankéus kaj plupaŝi tra la domo.”

”Ja feliĉe mi jam suspenditas, do ne eblas suspendi min”, Jankéus gaje enŝovas.

”Nu, supre, en dormoĉambro, ni trovis tiun kretenon, tamen ne vekeblan. Ni alvokis ambulancon, kiu venis forporti lin. Poste ni refoje parolis telefone kun tiu ĉarma knabineto en Växjö. Tre interesa interparolo, efektive. Kaj ni ĝuste diskutis, ĉu eventuale informi vin pri la tuto, kiam vi aperis kvazaŭ vokite. Do, jen, tio verŝajne estas proksimume ĉio, mi pensas.”

Svedberg meditas dum la veturado tra la urbo. Kiam oni jam alproksimiĝas al la hospitalo, li murmuris, duone al si mem, duone al Rundqvist:

”Mi efektive ĝuste intencis iri al la prokuroro por peti permeson priserĉi la domon sur Ramsö. Sed vi eble faris ankaŭ tion, per la maldekstra mano, ludante kun la hundoj per la dekstra?”

Ili elaŭtiĝas, kaj Rundqvist respondas, glatigante sian ĉifitan veston:

”Ne, por priserĉi la domon mi ne havis tempon. Mi estis okupita malmurdi murdinton.”



La gubernia hospitalo de Kalmar konsistas el aro da konstruaĵoj el ruĝaj brikoj apud pinarbaro en suda parto de la urbo. Elserĉi pacienton en tiu hospitalo montriĝas peniga tasko por iu, kiu ne estas parenco. Svedberg devas plurfoje montri sian polican identigilon por ricevi eĉ la plej nebulan indikon, kien turni sin. Unue trovi la ĝustan klinikon, poste la ĝustan sekcion kaj fine tie akiri informon pri la stato de Georg Höijer.

”Ankoraŭ tro fruas por diri ion ajn”, asertas la sekcia ĉeflegistino post miopa ekzamenado de la identigilo. ”Ne eblas diri ĉu li travivos. Oni ĵus faris gastroevakuon. Revenu vespere, aŭ eĉ pli bone, telefonu.”

”Kaj plej bone, neniam plu ĝenu nin”, rikanas Jankéus duonvoĉe, kiam ŝi lasis ilin koridore kaj reiris al siaj taskoj. ”Cetere, kial *gastroevakuo*? Se tio signifas malplenigon de la stomako, kial ne diri tion?”

Svedberg ridetas. Laŭ lia sperto, la lingvaĵo de Jankéus mem ne ĉiam estas la plej simpla kaj ĉiutageca.

”Mi tamen demandas min”, pluas Jankéus, ”ĉu ne indus lasi iun, ekzemple min ĉi tie.”

”Kial?” scivolas Svedberg.

”Nu, unue por akcepti la fratinon, kiam ŝi alvenos. Ŝi sendube jam survojas, kaj laŭ mia opinio jam temp’ está ke vi pridemandu ŝin. Pensas mi, ke ŝi havos kelkajn tre interesajn informojn por viaj murdenketoj. Kaj krome...” li silentiĝas.

”Krome kio?” malpacienas Svedberg.

”Nu, eble ankaŭ aliaj parencoj alvenos por viziti la malsanulon. Kaj povus esti bone por ilia moralo, se sekura policisto vaĉus ĉi tie...”

”Kion vi aludas?”

”Nenion, nenion. Ne, nenion aludas mi, sed la fratino efektive aludis, ke la frato eble ne proprainciate glutis tiujn dormigilojn...”

”Kion? Ĉu iu glutigus ilin al li?” Svedberg demandas preskaŭ incitite.

”Nu, laŭ Astrid, jam foje okazis tio”, kviete respondas Jankéus.

”Bone do, se vi trovas tion utila, bonvolu resti. Cetere mi tute ne rajtas kunlabori kun vi, kiel konate. Mi iros aranĝi pri dompriserĉo.”

”Tamen... eble vi iom babilu kun Astrid Höijer antaŭ la priserĉo”, sugestas Jankéus. ”Por havi pliajn ideojn, kion serĉi en la serĉado.”



En la policejo Svedberg taskas al Hans Andersson reteni sinjorinon Höijer por pluaj demandoj, dum li mem komencas plani la dompriserĉon. Konsiderante, ke temas pri grandega domo, kie li nur sufiĉe nebule scias kion serĉi, li sendube bezonos aron da helpantoj kaj plurajn horojn. Li tamen decidas atendi eventualajn informojn de Astrid Höijer, kaj do prokrastas la aferon ĝis posttagmeze. Kaj finfine, je la dua horo, venas telefona alvoko de Jankéus, kiu anoncas ke ŝi alvenis kaj konsentas paroli kun li. Do li aŭtas al la hospitalo, kie Nils Rundqvist kaj Astrid Höijer atendas antaŭ la ĉefenirejo.

”Ĉu malbona novaĵo?” li demandas, ekvidante ke ŝi evidente ploris. Ŝia okulŝminko disfluis kaj ŝajne trafis interalie la blankan kolumon de Rundqvist, kiu patreце tenas brakon ĉirkaŭ la ŝultroj de la knabino.

”Ne, ne”, ŝi flustras. ”Oni ankoraŭ ne scias, sed ŝajnas stabile. Troviĝas ŝanco, ke li travivos.”

”Bone”, diras Svedberg, kaj pluas, turnite al Rundqvist: ”Kaj Jankéus restos ĉi tie, ĉu?”

”Jes, li restos”, respondas la inĝeniero. ”Li diris, ke li preferus partopreni en la dompriserĉo, sed li rezignas tion por ne embarasi vin. Kaj mi promesis akompani la fraŭlinon...”

”Mi ne dubas pri tio”, diras Svedberg, ”tamen ne dum la intervjuo, prefere. Ĉu ni povos interparoli en la policejo, kaj poste vi rajtos reveni ĉi tien?”

”Jes. En ordo”, mallaŭtas Astrid Höijer.

Do post dek minutoj ili sidas en lia ofica ĉambro. Koridore vagas Rundqvist, atendante ke li povos akompani ŝin reen al la hospitalo, dum en alia ĉambro Andersson plu turmentas la patrino de Astrid.

”Do, ĉu vi havas ion plian por sciigi? Eble pri la sepa de januaro?” demandas Svedberg.

”Jes. Sed unue mi devas klarigi, ke mia frato kaj patro tre malkonsentis pri la evoluo de nia familia posedo de kapitalo. Oni ĉiam supozas, ke ni tre riĉas, pro la historio de la tielnomata dinastio Höijer. Sed la vero estas, ke nia posedo jam antaŭlonge ŝrumpis pro malbonaj negocoj. Georg tamen estas moderna ekonomiisto, kaj li enkondukis novajn decidojn. Li ekzemple respondecas pri la engaĝiĝo en bankoj. Sed Patro ne favoras tion. Li emas je la tradicia direkto. Tial la rusa nafto kaj gaso interesas lin. Sed li ne estis tre sukcesa. Nun li volis interkonsenti kun tiu Volos... tiu ruso...”

”Voloŝenko.”

”...Jes. Ili intertraktis, kaj Patro invitis lin al nia domo por vespermanĝo kaj fina interkonsento. La intenco estis forlasi la financon mondon kaj transiri al la rusa energia kampo. Sed Georg tre kontraŭis tion.

Laŭ li tio signifus eblan ruiniĝon. Laŭdire ili kverelis en la oficejo, kaj li plu protestis hejme.”

”Sed do Voloŝenko tamen vizitis vin hejme, ĉu?”

”Atendu. Komenciĝis tiu neĝoŝtormo. Oni alvokis la dungiton, iun maljunulon kiu servas la familion de jarcentoj, ŝajnas...”

”Jes, mi aŭdis pri li. Borgström, ĉu ne?”

”Prave. Kaj li alvenis por ŝoveli neĝon de la domo al la ponto. Georg decidis kunhelpi pri tio, kvankam li normale ne zorgas pri tiaj aferoj. La atendata gasto ne venis, oni prokrastis la manĝon. Fine envenis Georg, sufiĉe ekscitita, dirante ke la gasto ne venos. Patro koleris, sed Georg asertis, ke li forpelis Voloŝenkon por savi la familian havaĵon. Ni manĝis en terura etoso, kaj tiam Georg krome sciigis, ke li intencas edziĝi al Lily, la mastrumistino, kaj ke ili havos idon. Patro kompreneble ŝokiĝis kaj rekomencis la kverelon. Imagu, tiu ido estos... estus la sola heredonto, ĉu ne. Ĉar mi... Nu... Sed Patrino nur paliĝis kaj nenion diris. Post la manĝo ŝi proponis al Georg tason da teo kun rumo por trankviliĝi, kaj tion li faris ĝis tiu grado ke li endormiĝis sur sofo. Post ankoraŭ iom da tempo Lily venis kurante el la kuirejo vokante, ke oni volas veneni ŝin. Ŝi serĉis Georg'on, kaj spertante ke ne eblas veki lin, ŝi iĝis tute histeria kaj kuris eksteren, el la domo, en la neĝon. Mi kompreneble maltrankviliĝis, ĉar ŝi estis tute ne vestita por tia terura vetero. Sed Patrino estis tute trankvila. Ŝi vestis sin zorge kaj eldomiĝis dirante, ke ne necesas maltrankvili. Ŝi zorgos pri Lily. Kaj mi...” La voĉo de la virino rompiĝas. Ŝi reprovas flustre: ”Mi lasis ŝin iri.”

Svedberg rigardas ŝin penseme, kaj diras:

”Do, via patrino iris skie, ĉu ne?”

La juna virino rigardas lin grandokule kaj kapjesas plurfoje.

”Ĉu vi hazarde scias, kie kutime troviĝas ŝiaj skioj?”

”En la dometo transkorte, la eksa pordista loĝejo.”

Svedberg silentas kelkan tempon kaj poste demandas:

”Kion vi manĝis tiuvespere?”

La juna virino rigardas lin surprizite.

”Kion ni manĝis? Mi ne memoras... Eble tamen... jes, bakitan porkan fileon, mi pensas. Kial?”

”Ĉu kun terpomoj?”

”Ne... kun rizo, verŝajne”, diras Astrid Höijer kun konfuzita mieno.



Svedberg ricevas sian rajtigilon pri la dompriserĉo kaj kolektas grupon konsistantan el la inspektoroj Hans Andersson kaj Vivianne Ljunggren, al

kiuj aldoniĝas la teknikisto Åke Gustavsson. Kaj jen oni ekiras kun la mastrino de la esplorota domo, Andrea Höijer.

Sur la insulo Ramsö sinjorino Höijer enlasas la tutan aron da policistoj en sian domon preskaŭ sen ŝanĝi mienon. Svedberg sendas Hans Andersson kaj Vivianne Ljunggren en la grandan loĝdomon, dum li mem kaj la teknikisto eniras la pordistan dometon. Ili baldaŭ trovas la unuan aferon de intereso – kvar neĝoŝovelilojn apogitajn al muro en la vestiblo. Svedberg metas ilin en sakojn kaj portas al la policaŭto. Plue ili trovas skiojn, skibastonojn kaj skiŝuojn, tamen nur slalomajn, per kiuj ne eblus skii sur ebena grundo. Ili traserĉas la tutan domon, sed ne trovas tiajn, kiajn ili ĉesas. La domo evidente ne estas konstante loĝata, sed en unu ĉambro troviĝas simpla lito kun littukoj kaj kovrilo.

Kuireje, dekstre de la vestiblo, staras enorma eksmoda frostigujo. Ĝi ampleksas unu kaj duonan metron laŭ longo, kaj eble okdek centimetrojn laŭ larĝo kaj profundo. Svedberg singarde levas la kovrilon, sed la ujo tute malplenas. Ĝi eĉ ne estas ŝaltita, sed kiam li premas la ŝaltilon, eklumas kontrollampeto kaj la granda kesto ekzumas kaj ekvibras. Li denove malŝaltas.

”Jen rigardu, Åke!” li atentigas la teknikiston. ”Ĉu vi povus serĉi fingrospurojn sur ĉi tiu? Kaj ankaŭ ene, ĝi estas malplena, sed eble kun iom da bonŝanco vi trovus ian restantan substancon en la anguloj.”

La teknikisto ne demandas, kia substanco povus resti de kio en la kestego, sed alportas siajn ilojn kaj eklaboras, dum Svedberg transiras al la granda domo por plu serĉi la mankantajn skiojn kaj demandi, kiujn spurojn la kolegoj trovis de Lily Rundqvist. Ambaŭ tiuj taskoj montriĝas vanaj. Skioj ne troveblas, kaj se iam troviĝis aĵoj de la mastrumistino, oni zorge forpurigis ilin. La sinjorino akompanata de siaj du hundoj sekvas ilian serĉadon sen unu vorto.

Oni finas la laboron. Survoje reen Svedberg prenas la vojon tra la insulo Ängö. Li sonigas ĉe adreso indikita de Jankéus, ĉe la strato Sparregatan. Malfermas aĝa viro kun malbonvola mieno. Svedberg petas lin veni kun li en la policejon por atesti. La viro, Gunnar Borgström, tamen ne emas kuniri. Svedberg klarigas, ke temas pri enketo pri du murdoj, kaj ke lia atesto gravas.

”Mi scias nenion. Se vi volas demandi, faru tion ĉi tie. Mi ne iros al policejo”, obstinas la viro.

Svedberg akceptas kaj sidiĝas ĉe kuireja klaptablo. La mastro de la domo restas staranta ĉe la lavotablo kun spita mieno, kvazaŭ ne indus sidiĝi pro tia infanaĵo.

”Do, unue mi ŝatus scii iom pri via neĝoŝovelado en la sepa de januaro”, Svedberg ekas.

”Mi ne ŝovelas laŭ kalendaro. Ĉu vi pensas, ke mi estas oficisto kun almanako?” bruskas sinjoro Borgström. ”Se neĝas, mi ŝovelas, se degelas, mi lasas degeli.”

Jen devizo, kiu sendube plaĉus al Jankéus, pensas Svedberg. Subite ege mankas al li la kutima kolego. Tiu havas siajn kapricojn, sed ofte li povas faciligi pridemandadon ĝuste per siaj neatenditaj turnoj de la afero. Svedberg sentas sin gluiĝi al la tero, li kvazaŭ fosas sian sulkon rekte kaj diligente, sed kio rezultas? Nu, li deskuas la melankoliajn pensojn kaj rekomencas.

”Temas pri la vendreda vespero, kiam komenciĝis la granda neĝoŝtormo. Oni vokis vin al Ramsö, kaj vi iris tien por ŝoveli la vojon de la domo ĝis la ponto.”

”Vi eraras pri tago. Tio okazis *post* la ŝtormo, sabate.”

”Aliaj homoj asertas, ke vendrede. Kaj vi ne restis sola tie, ŝajnas.”

Gunnar Borgström mutas.

”Kiu venis ŝoveli kun vi?”

”Neniu krom mi ŝovelas tie, kaj mi faris tion sabate. Vendrede ne eblis alveni tien, nek foriri de tie.”

”Kiel vi scias?”

”Mi sidis tie, kie vi nun sidas, la tutan vesperon. La neĝo vipis la fenestron. Estas vere, ke ili telefonis, sed mi ne iris tien. Se ili diras ke jes, do ili mensogas.”

Svedberg rigardas la kuirejon. Ĝi estas eksmoda kuirejo en malnova, preskaŭ kaduka domo, tamen ŝajne modernigita antaŭ kelkaj jaroj. La forno kaj fridujo aspektas novaj. Anstataŭ malnova fenestro oni metis novan kun tri vitroj en metalkadro. Sed la mebloj estas malnovaj, uzitaj de jardekoj. Klaptablo, seĝoj kun lignolata dorsaĵo. En angulo ĉe la pordo staras skioj kun skibastonoj.

”Ĉu vi skias?” Svedberg preskaŭ reflekse demandas.

”Skias? Certe ne!”

”Vi tamen havas skiojn.”

”Ha! Tiujn mi donacos al mia nepo.”

”Ĉu vi aĉetis ilin?”

”Ne, ne. Estas iuj uzitaj, kiujn sinjorino Höijer petis min porti al la rubejo.”

Svedberg rezignas venigi kun si la maljunulon policejen; estas jam sufiĉe malfacile persvadi lin permesi al la policisto forporti la skiojn kaj skibastonojn. Unu horon pli malfrue li veturas norden al Ramsö. Ŝajnas al li, ke li hodiaŭ iradis kvazaŭ navedo tien kaj reen. Nun devas esti jam la kvina veturo, ĉifoje kun arestordono pro murdo enpoŝe. Sinjorino Höijer apenaŭ reagis, kiam li prezentas ĝin al ŝi. Li devas atendi duonhoron dum ŝi telefonas al sia advokato, vestas kaj ŝminkas sin kvazaŭ ironie ne al arestejo

sed al festeno de direktoroj kaj kompaniaj estraranoj. Kiam ili veturas kontraŭ la arestejo, la februara vespero jam mallumiĝis, kaj la lumjetiloj de la aŭto sendas radiojn antaŭen, en kiuj petolas kaj dancas falantaj neĝoflokoj.

10. Veki suspektojn

La devizo de Jankéus – *laboreje laboru, hejme hejmu* – delonge perdis sian validecon. Nun jam la trian vesperon oni okazigas neformalan kunvenon en lia kuirejo. Lia edzino Annette laciĝis regali ilin per kafo; nun la mastro de la domo devas propramane kuiru kafon kaj verŝi konjakon al Svedberg, Rundqvist kaj si mem.

Rundqvist distras ilin per siaj hodiaŭaj aventuroj kun Astrid Höijer.

”Imagu, kia logobirdo! Ĝuste kiam mi sidis duope kun ŝi en restoracio, kun vino, viando kaj virino, jen surprizo, envenas iaspeca ino, kiun ŝi prezentas kiel sian fianĉinon! Kaj kia virino! Nu, sufiĉe alloga, svelta, alta, tamen kun haroj nigritaj kaj hirtaj kiel de erinaco! Kaj kun gestoj kaj paroloj kvazaŭ de viro... Nu, mi ne antaŭjuĝas, do mi mendis vinon ankaŭ por ŝi. Ja povus esti interese... Kvankam lastfoje kun duopo ne estis tre amuza sekvo, en Kaŭkazo. Sed kiel mi sciu, ke unu el ili estas filino de la Vladikavkaza poliestro? Nu, bone, jen mi do regalis ankaŭ la fianĉinon, Judith laŭnome, kaj finfine kiam mi pagas la kalkulon, tiu fianĉino elpoŝigas sian monujon, tian grandan, viran biletojn, kaj postulas ke ŝi pagu por si kaj Astrid. Kia humiligo!”

Jankéus ŝajne amuziĝas pro la rakontofluo de Nils Rundqvist, sed Svedberg ne povas ĉesi pensi pri la virino, kiun tiu viro trenis al ĉi norda lando, sendube kun promesoj pri dumviva feliĉo kaj bonstato, sed kiu trovis sian finon en neĝamaso, strangolita de alia virino tro klasaroga por iĝi ŝia bopatrino.

”Nu, bone”, Jankéus interrompas lian pensofluan. ”Morgaŭ ekscios ni, ĉu la knabo vivos, tiel ke vi povos aresti lin. Kiel reagis la patrino je la aresto?”

”Neniel”, respondas Svedberg. ”La sola fojo ĝis nun, kiam mi vidis ŝin montri emociojn, estis kiam ŝi parolis pri la eblo, ke ŝi povintus havi nepon naskitan de tajlandano.”

Jankéus faras grimaceton dirante:

”Tamen malfacilas imagi, ke virino faris tiun abomenan krimon. Ĉu ne tutsimple la fratino protektas la fraton, kulpigante la patrinon? Eĉ se vere la patrino strangolus Lily’n, ĉu efektive kapablus ŝi poste tiel mistrakti ŝin? Per skibastono?”

”Kiel ni sciu, kion kapablas homo?” tuj rebatas Svedberg. ”Ŝi sendube faris tion por ŝajnigi seksperforton, kaj tiel eviti suspektojn. Kaj eble krome pro ia enfermita furiozo, ĝuste pro tiu desupra aroganteco, kiun mi ĵus aludis. Pro tio ke servistino el Azio kaptis ŝian dorlotitan filon.”

”Do, ŝi volis ŝajnigi perversaĵon seksan, sed efektive temas pri perverso klasa”, komentas Jankéus. ”Sed ĉu vere povas virino tiel trakti alian virinon?”

”Vi havas romantikan imagon pri la inoj, kara amiko”, entranĉas nun spertulo pri la temo, Nils Rundqvist. ”Kaj kial ne, kun tia edzino?” Li ĵetas malsatan rigardon al la pordo, kvazaŭ serĉante ion allogan sur kio ripozigi la okulojn. Sed nenion trovinte, li pluas: ”Kredu min, sinjoro, troviĝas neniu diferenco inter viroj kaj virinoj!”

Jankéus nevole devas rideti. Se lia edzino dirus la samon, li ne surpriziĝus. Sed tiu aserto de tiu homo neeviteble impresas ridige. Li tamen reserioziĝas pensante pri la plua evoluo de la murdenketo, kiun li ne rajtos partopreni. Almenaŭ oficiale ne.

”Eble aranĝu vi familian arestejon por la tuta bando”, proponas Jankéus. ”Tamen restas la problemo pri la olda servisto, ĉu ne? Ĉu li kunŝovelis kaj kunmurdis aŭ ne?”

”Nu, eble ni atendu la teknikajn raportojn kaj DNA-testojn antaŭ ol definitive konkludi la kazon”, diras Svedberg seke.

”Ĉiam prudenta kiel gufo”, murmuris Jankéus kaj trinketas sian konjakon.



La sekva tago estas ĵaŭdo. Hospitale Svedberg ekscias, ke Georg Höijer travivos, sed ke ankoraŭ daŭros ĝis oni rajtos paroli kun li. Do, la ĵaŭdon kaj vendredon li pasigas per aldonaj demandadoj kaj zorgado pri la materialo de la dompriserĉo. Vendrede vespere li povas resumi la ĝisnunajn rezultojn.

SinJORINO Andrea Höijer ankoraŭ en la arestejo ripetas la version, kiun ŝi donis policeje. Ankaŭ Valter Höijer restas ĉe siaj antaŭe donitaj informoj. Neniu el ili vidis Voloŝenkon sur Ramsö, nek invitis lin tien aŭ atendis, ke li venu. Kaj neniu el ili alvokis Gunnar Borgström por ŝoveli neĝon, nek vendrede nek sabate. Kaj kompreneble ili ne utiligis la neĝon vendrede nokte por skiado.

Astrid Höijer ripetas sian version, aldonante, ke laŭ ŝia memoro la patro telefone alvokis Borgström, ĉar li timis ke al Voloŝenko estos malfacile atingi la domon. Pro la dramaj okazaĵoj endome dum la vespero, ŝi tamen ne memoras, ĉu Borgström restis aŭ foriris vendrede vespere. Li tamen havas sian tranoktejon en la pordista domo, do ŝi supozas, ke li eble dormis tie.

Ankaŭ Gunnar Borgström mem ripetas sian version. Oni telefonis al li vendrede posttagmeze, sed li iris tien nur sabate, kiam la ŝtormo malintensiĝis, en sia normala maniero, per aŭtobuso kaj piede, kaj revenis hejmen vespere.

La teknikaj esploroj alportas abundan materialon. Sur la tenilo de unu el la skibastonoj, kiuj cetere havas manrimenojn el bova led, troviĝis ia organika substanco esplorota mikroskope kaj DNA-teste. Ĉke Gustavsson efektive trovis etajn restaĵojn, kredeble de sango, en la frostigujo. Ankaŭ sur unu el la neĝoŝoveliloj troviĝis sango kaj haŭtrestaĵoj. Sed fingrospuroj nenie troviĝis.

”Oni ne kutimas ŝoveli neĝon sengante”, li komentas. ”Tamen estas bonŝance, ke regis degela vetero ekde tiu tago. Alie sendube restus malmulto sur tiu fosilo.”

Do troviĝas ampleksa materialo, kiun oni sendas por DNA-testoj ĉe la Ŝtata Kriminalteknika Laboratorio en Linköping, kun kutima peto pri urĝa traktado.

Lunde matene Svedberg sidas sur metala seĝo ĉe la hospitala lito de Georg Höijer. La juna viro duone sidiĝas enlite kaj deklaras, ke li povas interparoli. Ĉar la ĉefflegistino donis al Svedberg nur dek minutojn, li sentas certan premon de tempomanko, kaj tuj ekas, rezignante sian normalan ĝentilecon:

”Kial vi glutis dormigilojn?”

La viro evidente ne atendis tiel maldelikatan demandon. Li serĉas vortojn kaj fine balbutas:

”Nu... mi ne plu trovis... ĉio ŝajnis al mi tro... tro peza... post ĉio...”

Ĉu tio signifas, ke li efektive mem glutigis al si la dormigilon, aŭ ke li protektas iun? Svedberg ne insistas. Kio vere gravas, tio estas la demandoj pri Voloŝenko kaj la eventuala neĝoŝovelado de Georg Höijer kaj Gunnar Borgström. Li tamen decidas unue trakti la parton pri Lily.

”Kio okazis vespermanĝe vendrede la sepan de januaro?”

”Nu...” iom hezite komencas la junulo. ”Estis... estis iom da kverelado.”

”Inter kiuj?”

”Ĉefe inter mi kaj mia patro.”

”Pri?”

”Nu... Unue pri komercaj aferoj.”

”Pli precize!”

”Mia patro volis pli aktive partopreni en iuj rusaj evoluprojektoj, kiujn mi trovas tro riskaj, kaj eksiĝi de aliaj investoj, kiujn mi enkondukis.”

”Kaj poste, kio okazis?”

”Do... mia patrino diris ion malestiman pri Lily... kaj tiam mi diris, ke mi intencas edziĝi al ŝi. Do, estis kverelo ankaŭ pri tio.”

”Kaj poste?”

”Poste... mi estis sufiĉe ekscitita kaj laca... estis jam malfrue, kaj mi prenis ion ripozigan kaj endormiĝis.”

”Vi endormiĝis. Kie?”

”Nu... fakte sur sofo, antaŭ la fajro.”

”Kaj kiam vi vekigis?”

”Nur matene.”

”Kio okazis antaŭ la vespermanĝo?” Svedberg rapidas plu.

La junulo trinketas akvon el glaso, kiu staras sur la litotablo.

”Mia patro anoncis, ke ni havos gaston.”

”Kiun?”

”Iun rusan negociston, Voloŝenko, kun kiu ni jam parolis en la oficejo. Sed nun Patro intencis efektive interkonsenti kun li. Nu, mi ne ŝatis tion, kiel dirite. Laŭ mi tio endanĝerigas la familian kapitalon.”

”Do, kion vi faris?”

”Nu... eksterdome nia dungito ĝuste alvenis por forigi iom da neĝo. Mi eliris...”

”Kiu alvokis la dungiton?” interrompas Svedberg.

”Mi ne scias. Supozeble mia patro.”

”Pluen, mi petas.”

”Mi eliris surkorten kaj iom parolis kun li. Verŝajne mi klarigis, ke alvenos gasto, kiu tamen ne estas bonvena. Ke li eble trompe akiros nian havaĵon. Mi ne memoras precize miajn vortojn. Ĉiuokaze Gunnar, kiu servis nian familion jam longe antaŭ mia naskiĝo, ŝajne komprenis ke tiu Voloŝenko estas potenciala minaco. Li levis la ŝovelilon de la neĝo dirante ‘Kial do ebenigi al li la vojon? Pli bone fortimigi lin.’ Nu... Mi ridetis kaj diris, ke estus feliĉe, se li sukcesus pri tio. Poste mi eniris denove en la domon.”

”Kaj kio poste?” demandas Svedberg rigardante sian brakhorloĝon.

”Nu, efektive la gasto neniam venis”, diras la junulo enlite. ”Do mi diris ion pri tio, ke Gunnar supozeble forpelis lin. Tio estis la komenco de nia kverelo, efektive.”

Svedberg zorgeme pripensas, dum en okulangulo li vidas la ĉefflegistinon alveni por forpeli lin, tamen ne per neĝoŝovelilo, sed per mezurilo de sangopremo.

”Antaŭe vi asertis, ke Voloŝenko ja alvenis kaj pasigis la vesperon kun la familio”, li diras ekstarante.

”Nu, mi ne volis veki suspektojn...” la junulo lace diras kaj denove kuŝiĝas surlite. ”Suspektojn kontraŭ kiu?” duonvoĉe grumbblas Svedberg dum la flegistino per profesia firmeco puŝas lin tra la pordo.



La lastaj tagoj de februaro alportas froston, eble ne tre severan, tamen pli intensan ol oni ĝis nun spertis ĉi-jare. Sur golfetoj de la Balta maro

kuraĝuloj ekprovas sketi sur la nova vitre glata glacio. Homoj elserĉas siajn plej varmajn vestojn kaj en tiuj promenadoj iel rigide, kvazaŭ pingvenoj. Kiam la urbanoj renkontiĝas eksterdome kaj haltas por babili, ilia spirado kreas blankajn nubetojn similajn al parolujoj de bildstrio.

Atendante respondojn pri la DNA-testoj, la prokuroro plilongigas la areston de Andrea Höijer. Svedberg hezitas, ĉu aresti la filon pro murdo de Voloŝenko, sed li preferas atendi la teknikajn raportojn.

La unuan de marto li vekigas matene kun sento, ke io ŝanĝiĝis. Li kuŝas momenton senmova, sola enlito, sola en sia domo, kiu lastatempe ŝajnis al li silenta kiel tombo. Aŭdiĝas susurado de eksterdome. Pluvas. Lia dormoĉambra fenestro estas malfermita je ventuma fendo, kaj tra tiu nokte penetris pluvo, kreante lageton sur la planko. Li fermas la fenestron kaj viŝas. La eksterfenestra termometro montras plus ok gradojn, kaj ĉio grizas. La maldika neĝotavolo, kiu jam kelkajn tagojn vualis la grundon, tute malaperis. Pluvakvo kolektiĝas en flakoj, kiuj pro la grunda frosto ne sorbiĝas en la teron, sed disvastiĝas kaj inundas ĉion. Li forŝiras folion de sia surmura almanako kaj ekvidas la nomon de nova monato – marto. Marto! Kial tiu nomo tiel similas je *morto*? Li skuas sin kiel malseka hundo kaj iras ŝalti la kafaparaton.

Hodiaŭ la kriminalteknika labo retas al li rezultojn de ĉiuj DNA-testoj. Li legas la koncizajn informojn. *Provo 1 identas kun provo 6. Provoj 2 kaj 3 identas kun 5...* Senpacience li konsultas sian liston kun klarigoj, kion signifas tiuj diablaj numeroj. Li ne scias, kio nun surprizus lin, sed vere aperas nenio vere konsterna. Ĉio konfirmas tion, kion li jam scias. Sur la skibastona tenilo troviĝas DNA de Lily. Ke ĝi venas el ŝia vagino, ne mencias la laboratoria raporto, sed lia cerbo ne lasas lin forgesi tion. Sub ŝiaj ungoj oni trovis haŭterojn kun DNA de Andrea Höijer. Plue surrande de la neĝoŝovelilo troviĝas DNA de Sergej Voloŝenko, kaj tia troviĝis ankaŭ en la granda frostigilo. Li ĵetas rigardon al leterujo en angulo de lia ĉambro, kie ankoraŭ restas la plastsaketoj postlasitaj de Rundqvist, Efektive li scivolas, ĉu Georg Höijer kun certeco estis patro de la feto de Lily, sed tiu demando ne rekte rilatas al la kazo, kaj li ne rajtas scivoli pri ĝi.

Svedberg verkas raporton kaj transdonas ĝin al la prokuroro. Ŝajnas klare, ke la materialo sufiĉas por akuzo al Andrea Höijer pro murdo de Lily.

La alia murdo ankoraŭ restas pli nebula. Oni arestas Georg'on Höijer kaj denove pridemandas lin, same kiel lian fratinon, patron kaj la fidelan familian serviston. Sed ĉiu restas ĉe sia versio. Gunnar Borgström ne ŝovelis neĝon en la ŝtormo vendrede, kaj neniam li vidis Voloŝenkon. Valter Höijer neniam alvokis lin ŝoveli, nek vendrede nek sabate, kaj ne invitis Voloŝenkon al la domo. Aliflanke Borgström asertas, ke li ja estis telefone vokita vendrede, sed alveturis nur sabate. Jen la oldula skolo kun variaĵoj. La du gefratoj siaflanke aŭdis aŭ supozis, ke Patro alvokis la serviston

vendrede por ŝoveli neĝon, kaj ke li invitis la ruson. Jen la junula skolo. Ankaŭ en ĝi tamen troviĝas etaj diferencoj. Ekzemple Georg asertas, ke li neniam vidis Voloŝenkon alveni, nur anoncis lian alvenon al Gunnar. Dume, laŭ la memoro de Astrid, li raportis ke li forpelis la ruson. Sed ĉu tiuj diferencoj kredindigas aŭ mal ilian version? La unua versio de Georg, laŭ kiu Voloŝenko efektive partoprenis en la vespermanĝo kaj malaperis nur nokte, eble estas pli grava problemo.

”Hospitale vi diris, ke vi ne volis veki suspekton”, memorigas lin Svedberg. ”Kontraŭ kiu? Kaj pri kio?”

”Nu, mi ja ne scias, kion Gunnar efektive faris. Mi timis, ke li eble faris ion... malprudentan. Mi simple ne volis kaŭzi al li problemon. Mi ne povis imagi, ke temis pri murdo. Mi daŭre ne scias kion kredi. Ŝajnas neeble.”

”Kio?”

”Nu, ke Gunnar mortigis lin. Mi pli emas kredi, ke li nur forpelis lin, kaj poste li trafis en la manojn de iu rabisto.”



En neniuj oficiala dokumento aperas la konsisto de la homgrupo, kiu planis kaj plenumis partojn de la murdenketoj pri Sirilak Lily Rundqvist kaj Sergej Andrejeviĉ Voloŝenko. Temas pri Roger Svedberg, 48-jara polickomisaro, Tom Jankéus, 39-jara suspendita policinspektoro, kaj Nils Rundqvist, 42-jara inĝeniero, specialisto pri gasduktoj kaj grandkvanta konsumanto de virinoj. Tiam laborgrupon ne eblas menciigi en publike alirebla akto.

En kvara kunveno de tiu konspira rondo, tamen ĉi-foje en la dezerta salono de Svedberg, Rundqvist klopodas resumi:

”Laŭ mi ili faris tion kune. La knabo ne estas fortulo, kaj tiu maljunulo Borgström, eĉ se li ŝovelas neĝon brave, tamen jam kadukas. Kaj porti senkonscian homon en la dometon, levi lin en tiun frostigujon, kaj post kelkaj tagoj aŭ mi-ne-scias-kiam elpreni la kadavron kaj transporti ĝin al gruzejo, ĉu vi povas vidi unu el ili plenumi tion? Senviva homo diable pezas, tion mi spertis en... nu, ni lasu tion. Ili certe agis kune kaj nun lerte kulpigas unu la alian. Mi eĉ ne surpriziĝus, se ankaŭ Panjo kunhelpus! Tiu vipurino!”

”Sed la motivo! Kiun motivon havis Borgström?” demandas Jankéus.

”Servi sian mastron! Tio jam eniris lian sangon”, kredas Rundqvist.

”Sed kial neas la patro, ke Voloŝenko kaj Borgström entute venis al Ramsö?”

”Li protektas la serviston. La fratino, tiu eta lesbanino, subtenas la fraton. Eble ankaŭ ŝi praktike kunhelpis. Por tiaj inoj murdi viron signifas

nur mortigi kulon. Imagu, kia familio! Ili defendas sian posedaĵon kiel drako sian trezoron!”

Svedberg aŭskultas ilin sen multe komenti. Li jam anticipas, ke ne estos akuzo pro la murdo de Voloŝenko. Kvankam li emas konsenti kun Rundqvist, ke kuna ago de du homoj estas la plej kredinda, tamen li ne tute certas pri la preciza distribuo de kulpo. Des pli ĉar la bato per ŝovelilo ne estis mortiga, sed la efektiva murdo okazis, kiam oni metis paralizitan homan korpon en frostigujon kaj ŝaltis la kurenton.



Ĉu ekzistas justeco en ĉi tiu mondo? Jen demando, kiu sendube superas la ĉiutagajn konsiderojn de murdenketanta policisto. Ĉiuokaze, Svedberg ĉiam povas transŝovi tiun demandon al aliaj instancoj – unue al la prokuroro, kiu devas prijuĝi ĉu entute indas akuzi iun pro krimo, kaj due al la tribunalo, kiu finfine decidas en la kazo. Tamen, se funde konsideri la aferon, eĉ la juĝistoj ne okupiĝas pri justeco, sed nur pri la distingo inter tio, kio estas pruvita, kaj kio restas nepruvita. Svedberg, kiel multjara enketisto, pli-malpli ĉesis zorgi pri vanaj demandoj de justeco kaj rekompenco pro kulpo. Li okupiĝas pri sia ero en la ĉeno, kaj kontentas, se li povas transdoni ĝin en bona stato al la sekva instanco. Tamen, iufoje ankaŭ li ne povas bari la pensojn pri justeco kaj konsekvenco. Tio okazas precipe en tiaj okazoj, kiam lia strebado kaj laboro montriĝas vana.

Pro manko de pruvoj oni ne plilongigas la areston de Georg Höijer. Post ankoraŭ kelkaj tagoj Svedberg jam rezignas trovi pliajn pruvojn aŭ indicojn. Li transdonas sian materialon al la prokuroro, sed tiu decidas ne komenci proceson. El la alia kazo, la akuzo pro murdo de Sirilak Lily Rundqvist, rezultas kondamna verdikto je dekjara malliberigo de Andrea Höijer. Do, en la murdenketo unue fermita senrezulte, tiu pri virino trovita en neĝamaso, fine tamen sekvas kondamno, dum la kazo de rusa negocisto, kies kompanio urĝe bezonis plian kapitalon, neniam ricevas sian veran punkton kaj finon.

Du semajnojn post la kondamno de Andrea Höijer, Tom Jankéus fine tediĝas de sia stratpatrola tasko. Ĉar li eksciis nenion pri nuligo de lia suspendiĝo, li petas maldungon de la polico. Li intencas sekvi la proponon de lia edzino eklabori kiel instruisto.

Svedberg siaflanke laboras plu pri novaj raboj, drogvendoj, seksperfortoj, murdoj, tamen sen sia ekskolego, kaj li vivas plu en la dezerta domo, daŭre sen sia eksedzino. Nils Rundqvist revenas al Rusio, sed nun jam por alia kompanio, tiu de ”la vulpo Ŝigajev”. Astrid Höijer kaj ŝia fianĉino studas plu en Växjö, dum la patro kaj filo Höijer plu kverelas pri la plej efika maniero konservi kaj espereble kreskigi la familian kapitalon. Ĉar

la patrino kaj edzino forestos dum konsiderinda tempo, ili dungas novan mastrumistinon, ĉi-foje tamen el Pollando.

En Kaliningrado neniŭ parenco de Sergej Voloŝenko anonciĝas por zorgi pri lia entombigo. Ĉar ankaŭ lia kompanio ne plu ekzistas, neniŭ volas akcepti lian kadavron. Do, oni duafoje malfrostigas ĝin, kremacias ĝin kaj disŝutas la cindrojn anonime en tombejo de Kalmar. Neniŭ tomboŝtono memorigas pri li.

Kaj en Bankoko, en butikoj de turistaj memoraĵoj, la butikista paro ĉiam rigardas maltrankvile se fojfoje iu eŭropa turisto tro longe babilas kun Sumrom, dudekjara fratino de la forpasinta Sirilak.

Glosaro

En la suba glosaro aperas ne-PIVaj vortoj (kaj signifoj) aperantaj en ĉi tiu libro, kune kun aro da vortoj troveblaj en PIV aŭ eĉ en Plena Vortaro, kies signifo tamen povas esti ne vaste konata. Ĉe la fontindikoj mi ofte notis nur la plej ”gravan”, do se iu vorto aperas en PIV, mi kutime ne notis krome, ke ĝi troviĝas ankaŭ en aliaj vortaroj. La ĉi-subaj difinoj ne laŭvorte paŭzas la koncernajn vortarojn.

AC André Cherpillod: NePIVaj vortoj, 1988.

EB Esperanta Bildvortaro, 1988.

EDK Erich-Dieter Krause: Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch, 1999.

EV Ebbe Vilborg: Ordbok Svenska-Esperanto, 1992.

JL Jouko Lindstedt: Hejma Vortaro, 1999.

JLG Sam Owen Jansson, Fritz Lindén, Birger Gerdman: Svensk-esperantisk ordbok, 1934.

NPIV Nova Plena Ilustrita Vortaro, 2002.

PIV Plena Ilustrita Vortaro, 1981.

PV Plena Vortaro, 1934.

z Zamenhofa.

aidoso^{EDK NPIV}

akĉento^{NPIV}

Baltio

benzodiazepino^{NPIV}

cerviko^{PV}

ĉipso^{JL NPIV}

DNA

drogo^{EDK NPIV}

dukto^{PIV}

ekimozo^{PV}

faksi^{JL NPIV}

Akirita imun-deficita sindromo

Aparta prononco fremda aŭ dialekta

La Baltaj landoj Estonio, Latvio kaj Litovio

Trankviliga kaj dormiga medikamento

La suba kolo de la utero, kiu malfermiĝas en la vaginon

Terpomtranĉaĵo krispe fritita, manĝata malvarma

(=Desoksiribonuklea acido) Materialo de la kromosomoj, unika de ĉiu individuo, kiu enhavas la genetikan kodon heredatan

Substanco narkota, stimula aŭ halucina

Konduktubo, ofte longdistanca

Bluaĵo, makulo surhaŭte pro kontuzo

Telefaksi, telekopii, sendi tekston aŭ bildon telefonlinie

gastroevakuo
 gubernio ^{PV}
 ĝinzo ^{JL NPIV}
 hidraŭla ^{EDK}
 indolenta
 intui ^{PV}
 kalaŝnikovo
 kasedilo ^{JL NPIV}
 kidnapi ^{EDK NPIV}
 kolao ^{JL NPIV}
 kombineo ^{PIV}

 labo ^{PIV EDK}
 lesba ^{PIV}
 lici ^{PIV}
 minga ^{AC}
 navedo ^{PV EB EDK NPIV}

 Oelando ^{EDK EV JLG}

 olda ^{PIV}
 Oseto ^{NPIV}
 ostaĝo ^{PIV}
 povra ^{PIV}
 predo ^{PIV}
 referi ^{PIV}
 retpoŝto ^{EDK NPIV}
 Rotario ^{PIV}
 rufa ^{PIV}
 runŝtono ^{EV}

 skani ^{EDK NPIV}
 sketi ^{PIV}
 Smolando ^{EDK EV JLG}
 suĉumo ^{JL}
 svaga ^{PIV}
 talibano
 vaĉi ^{PIV}
 vico-seria domo ^{EB EV}

Malplenigo de la stomako
 Administra regiono
 Pantalono el drelika ŝtofo
 Hidraŭlika ^{PIV z}
 Malvigla, inerta, neagema
 Intuicie senti
 Mitraleta de rusa marko
 Aparato por aŭskulti sonkasedojn
 Forkapti (personon)
 Bruna gastrinkaĵo kun ekstrakto el kolanuksoj
 ”Supertuto”, vesto el kombinita jako kaj pantalono
 (Triviale) Laboratorio
 (Pri virino) Samseksama
 Esti permesita
 El la Ĉinia dinastio *Ming* (1368-1644)
 Glitbobeno kondukanta la vefton tien-reen inter la varpoj
 (*Öland*) Insulo kaj provinco en sudorienta Svedio
 Maljuna, malnova
 Ano de Kaŭkaza nacio
 Garantiulo
 Kompatinda; malriĉa
 Ĉasakiraĵo, kaptitaĵo
 Science raportoj
 Elektronika perkomputila komunikado
 Filantropia societo, precipe el altranguloj
 Flavruĝa (pri haroj)
 Starigita ŝtono kun teksto ĉizita per runoj ^{PV}, praskandinavaj literoj
 Sisteme ekzameni surfacon aŭ enhavon
 Glitkuri
 (*Småland*) Provinco en suda Svedio
 Cicoforma suĉilo por trankviligi bebon
 Malpreciza
 Islama fundamentisto en Afganio
 Gardodeĵori
 Domvico dividita en unufamiliaj partoj

Sten Johansson

MEMOR' MORTIGA

Krimromano

*Al-fab-et-o,
Skövde, Svedio 2003*

Dua reviziita eldono 2014

”Vi estas verkisto kaj devas, kiel vi ĵus diris, koni la vortojn, do vi scias ke adjektivoj ne utilas, se ekzemple iu homo mortigas aliulon, oni prefere tiel esprimu la aferon, fidante ke la teruro de la ago mem tiel ŝokas, ke ĝi liberigas nin de la devo nomi ĝin terura”

José Saramago, el *Ensaio sobre a Cegueira*
(Eseo pri la blindeco)

1. Ĝis la kato miaŭos

La kato miaŭos vian morton. Tuj kiam vi enlasos ĝin, vi mortos. Jes ja, putinido, vi merite mortos! Ne gravas, ĉu post minuto aŭ post horo. Mi pretas, kaj mi povas atendi. Nun mi povas atendi kiom ajn longe. Damnita porko! Kiomfoje vi diris al mi, en via supereca tono, ke mi havu paciencon, ke mi trankviliĝu, koncentriĝu? Kvazaŭ tio eblus! Se vi nur scius, putinido... Sed nun vi estus kontenta. Nun ne estas problemo. Preninte ĉi tion, ĉi aferon, mi havas paciencon de ĉi tie ĝis la infero. Kaj koncentriĝon, damne! Mi estas tiel koncentrita, ke vi neniam en la vivo spertis ion proksiman! Kiam finfine vi aŭdos tiun kataĉon miaŭi, kaj venos al la ĝardeno pordeto por enlasi ĝin endomen, mi povos forfiki vian cerbaĉon dekfoje ĝis la kato miaŭos denove. Sed mi ne faros tion. Unu perfekte celita kuglo sufiĉos. Mi jam faris centon da pafoj ekzerce, kaj je ĉi tiu distanco ne eblos fuŝi. Ne eblos maltrafi vian dikan ŝtipkapon. Unu trafo sufiĉos. Eĉ kun sondampilo la pafado eble igos viajn najbarojn demeti siajn koktelajn glasojn kaj rigardi unu la alian super la vespera ĵurnalo. Sed eble ili televidas usonan policfilmon. Tiukaze neniu reagos. Kaj vi tiel saĝe elektis ekloĝi apud arbareto. Jen la sola prudentaĵo, kiun vi faris en via mizera vivaĉo. Bone, kateto, miaŭu plu. Baldaŭ venos la mastro. Baldaŭ li aperos por enlasi vin. Kiom vi miros, kiam li falos dorsen! Ĉu li havos tempon malfermi por enlasi vin? Ne gravas. Mi pafos tra la vitro. Ĉu la kato eniros aŭ ne, tio ne jukas mian haŭton. La kato neniam ĝenis min. Nur vi, damna putinido, faris ĉion por detrui mian vivon. Mi nur bedaŭras, ke mi ne povos torturi vin dum jaroj, kiel vi min! Dum pluraj jaroj, damnitaj fek-jaroj, mi suferis pro vi. Vi meritis la samon, sed diable, ne gravas, sufiĉos ke mi krevigos vian kranion, disblovigos la cerbon... Ŝpruc'! Sur la multekostan tapiŝon, kaj sur la pargeton. Eble la kato povos leki vian cerbon... Hej, kato, kateto! Denove miaŭu! Baldaŭ vi gustumos cerbaĵon... La mastro regalos...

2. Trovi kokranton

La menso de Tom Jankéus estas plena vespujo, kiam li aŭtas hejmen, ellasinte Amanda'n en loko ducent metrojn for de ŝia hejmo. Kiel li sukcesis enmiksiĝi en tian pelmelon el emocioj, kulpo, mensogoj kaj antaŭtimo? Kaj kiel li kapablos agi nature kaj normale antaŭ siaj edzino kaj infanoj post nur kvin minutoj?

Efektive li nek bone konas, nek vere ŝatas sian kolegon Johan Wester. Male al **Jankéus**, kiu ne havas pedagogian ekzamenon kaj sekve akiris nur provizoran dungon, Wester estas jam multjara instruisto kun firma posteno. La sveda, angla kaj germana lingvoj estas liaj temoj, kiujn li instruadas al gejunuloj en la aĝoj de dek tri ĝis dek kvin jaroj.

”Tom, kiel eksa policisto vi sendube scias kiel gvatsekvi krimulojn”, li diras iutage, kiam nur ili restas en la instruista ĉambro.

Jankéus ridetas. Li jam kutimas, ke la ĝeneralaj imagoj pri policlaboro fontas pli ofte en filmoj kaj libroj ol en la realo.

”Ĝuste nun mi memoras neniun solan kazon, kiam mi kaŝe gvatsekvis iun”, li trankvile diras. ”Kutime deziris ni male, ke la homoj rimarku nin.”

”Tamen vi certe facile povus fari tion”, insistas la kolego. ”Cetere estas nenio drama. Sufiĉas nur postsekvi, noti la adreson aŭ eventualan aŭtonumeron. Jen ĉio.”

”Pardonu, sed... postsekvi kiun?” demandas Jankéus, eksupozante, ke kaŝiĝas hoko en la ezoko.

”Nu... ne temas pri krimulo. Entute, nenio drama. Tute simpla afero.” La instruista kolego paŭzas kaj rigardas ĉirkaŭen, kvazaŭ timante ke iu subaŭskultas lin. ”Estas tiel ke... ĉiumarde vespere mia edzino vizitas kurson... aŭ iaspecan kunvenon... Estas grupo de virinoj, kiuj renkontiĝas, laŭdire por verki versaĵojn kaj diskuti siajn amatorajn verketojn. Kredeble temas ĉefe pri normala klaĉkunveno... kaj tio ja ne gravas... sed... iufoje mi hazarde eksciis, ke la grupo *ne* kunvenis, kvankam mia edzino laŭdire partoprenis en la kunestado...”

Li denove paŭzas, kaj Jankéus enŝovas:

”Johan, se vi volas spioni vian edzinon, prefere turnu vin al ia privata detektivo...”

”Fakte mi serĉis tian, sed ŝajne ne ekzistas en nia urbo. Kaj cetere temas pri tute simpla afero. Sufiĉus unu-dufoje posteni kaj postsekvi por vidi, ĉu ŝi efektive iras al tiu grupo aŭ aliloken. Je la sesa vespere ŝi fermas

sian butiketon, vi eble konas ĝin... *Arta Ceramiko*, ĉe la strato Unionsgatan... Kaj de tie ŝi devus piediri al la urba biblioteko. Simple, ĉu ne?"

Jankéus ne plu scias, kio persvadas lin akcepti la taskon, ĉu ia ĝenerala laceco kaj rezignacio, aŭ ĉu eble scivolemo nur duone konscia. Ja li du-trifoje jam vidis la edzinon de sia kolego, kiam ili samtempe eliris el siaj aŭtoj sur la parkejo apud la lernejo, kaj ŝi piediris for, ŝajne sen ia tenera gesto aŭ kiso al la edzo. Li nebule memoras nealtan, brunharan virinon, ne sveltan sed ŝajne moviĝeman. Kredeble ŝi estas iom pli juna ol la edzo, kiu aĝas eble kvardek jarojn.

"Bone, bone, tamen se ŝi foriros aŭte, ne atendu ke mi tuj saltos en taksion kaj ordonos 'sekvu tiun aŭton!' Sur niaj stratoj ne ĉiutage eblas haltigi taksion!"

Do, marde vespere li staras sub ekfolianta tilio en stratangulo, en la printempa vespero tro luma. Vidante la virinon ŝlosi sian butikpordon kaj ekiri, li postsekvas. Efektive ŝia promeno iras ne biblioteken, sed al la eta restoracio *Akropolo* en la urbocentro.

Dum kvaronhoro Jankéus staras surstrate, gvatante je kvindekmetra distanco la invitan pordon de la restoracio. Fine tiu malkomforta pozo tedas lin, kaj li eniras en *Akropolon*. Li ricevas bonan tableton en angulo, de kie li vidas kaj la elirejon, kaj la tablon kie la edzino de lia kolego sidas sola kun glaso da vino.

Jankéus mendas rostostangeton kun salato. Kun ĝi li trinkas mineralan akvon, ĉar li baldaŭ devos aŭti hejmen. Li antaŭvidas nur, ke iu bela donjuano enpaŝos kaj sidiĝos ĉe ŝia tablo, kaj li jam komencas cerbumi, kiel li morgaŭ raportu pri tio al la kokrito.

Surmure pendas plektaĵoj da ajlo – ĉu veraj, ĉu plastaj, ne eblas distingi en la duonlumo – kaj turismaj afiŝoj el Grekio. Juna brunharulino alportas lian viandon kun rideto kaj "Bonan apetiton!" – kun loka akĉento de sudorienta Svedio. Troviĝas entute nur kvar gastoj, dise ĉe tri tabloj. Krom ili, ĉe tableto apud la bufedo sidas maljuna virino trikante, kaj knabineto legante libron, eble sian hejmtaskon. Ĉirkaŭ ili paŝadas infaneto apenaŭ dujara, al kiu la oldulino senĉese ĵetas longajn admonojn en la greka lingvo. Se ne estus pro la norde pala majvespera taglumo eksterfenestre, Jankéus povus imagi, ke li libertempas sur greka insulo, iom ekstersezone.

La edzino de lia kolego ankoraŭ restas sola, kaj fininte sian viandon, Jankéus decidas oferi al ŝia amanto ankoraŭ dek minutojn. Poste li hejmeniros al siaj edzino kaj infanoj kiel normala homo kaj forgesos la tutan stultaĵon. Tiam subite la virino, kiun li sekrete prigratis, staras apud li.

"Pardonu, sed ĉu vi ne estas kolego de mia edzo? Vi estas la eksa policisto, ĉu ne?"

Jankéus rigardas ŝin surprizite. Se li iam kredis je anonima kariero kiel instruisto, forgesante sian iaman laboron, li evidente trompis sin.

”Prave. Bonvolu!” Li montras al la dua seĝo ĉe lia tablo.

Ŝi alportas sian vinon kaj sidiĝas.

”Eble vi atendas iun”, nun ŝi demandas.

”Tute ne. Kaj vi?”

”Ne, ne. Mi nur fuĝis kelkajn horojn, por ĝui la liberecon.”

”Fuĝis? Ĉu vi estas mallibera?” Jankéus demandas, ŝajne leĝere, sed kun eta sulko surfrunte.

Ŝia buŝo diskrete ŝminkita faras amaretan rideton.

”Tio estas speco de ŝerco. Mia edzo estas ŝercemulo. Li kutimas diri, ke ĉiu virino je pli ol dek metroj for de la forno estas fuĝinta edzino. Tio estas amuza ŝerco, laŭ li.”

Jankéus ridetas.

”Nu, kelkfoje aŭdis mi tiun diraĵon, sed mi ne supozus, ke oni tiel diras al la propra edzino.”

”Efektive li ne ŝatas mian laboron. Mi estas ceramikisto. Tio laŭ li ne estas serioza laboro. Sed li diras tion en formo de ŝercoj. Nu, ne gravas... Ĉu vi havas familion?”

Antaŭ ol Jankéus havas tempon pripensi kiel tio okazis, li sidas en vigla interparolo kun la virino, kiun li devus prispioni, rakontas pri sia familia vivo, pri sia iama polica laboro kaj la nuna instruista. Fine, jam malfreue, li veturigas ŝin hejmen.

”Dankon, Tom, mi tre ĝuis la vesperon”, ŝi diras, kiam ili alproksimiĝas al ŝia hejmo. ”Haltu ĉi tie, mi petas. Ne necesas ke li vidu vian aŭton. Kaj ĉu mi rajtas peti vin ne menciigi al li, ke ni renkontiĝis? Oficiale mi partoprenis en ia kunveno.”

Tio tre konvenas al Jankéus, kaj en la sekva tago li sufiĉe facile mensogas, ke li postsekvis la suspektatan edzinon ĝis la biblioteko kaj poste veturis hejmen.

Lia kolego tamen ne kontentas. Li petas Jankéus ankoraŭfoje provi, kaj ankaŭ eniri en la bibliotekon.

”Tamen mi apenaŭ povos maski min kiel amatora verkistino”, rikanetas Jankéus. Li tamen promesas fari duan provon. Kial li akceptas tion, estas al li mem sufiĉe malklare.

Do, post semajno li ripetas la promenon, je cent metroj post Amanda Wester, la ceramikistino. Sed ĉi-foje li preskaŭ tuj sekvas ŝin en la restoracion, kaj demandas, ĉu li rajtas sidi ĉe ŝia tablo. Amanda ridetas, ne tre surprizite, ŝajne.

”Vi evidente ekŝatis la manĝon ĉi tie?” ŝi diras kun moketa tono.

Jankéus rigardas ŝin dum momento, kaj poste rakontas pri sia spiona tasko. Je liaj vortoj ŝi ŝajnas ne surprizita, sed eble iom malgaja. Ŝi kapjesas apenaŭ videble.

”Bedaŭrinde li tre ĵaluzas. Kredeble pro nesufiĉa memestimo. Kaj jam pli frue li provis gardi kaj prigrvati min. Jen kial mi bezonas de temp’ al tempo spiri libere.”

La konversacio estas vigla, sed laŭ enhavo ĝi kvazaŭ iomete lamas. Dum ŝi amare parolas pri sia egocentra kaj suspektema edzo, Tom Jankéus prezentas belan bildon pri sia familia vivo. Ŝajne ŝi preferas aŭdi lin paroli pri siaj infanoj. Li tamen interrompas sin, dirante:

”Pardonu, ĉi tio ja ne povas interesi vin...”

”Kial ne? Ĉar mi mem ne havas infanon? Male, mi tre ŝatas, kiam vi parolas pri ili. Oni facile aŭdas, ke ili gravas al vi, kaj ke vi amas ilin. Mi ĝuas tion.”

Ankaŭ ĉi-foje la vespero iĝas malfrua, kaj Jankéus leĝere ĉirkaŭprenas ŝin, dum ili promenas tra milda printempa vespero ĝis lia aŭto. Enaŭte ŝi petas, ke ili haltu momenton ĉe ŝia butiketo.

”Mi devas kunporti de tie kelkajn varojn, kiujn mi aĉetis dum la lunĉa paŭzo.”

Ili eniras tra malantaŭa pordo. Ŝi lumigas nur minimuman lampeton serĉante sian sakon kun varoj, kaj en la obskuro ili ne povas eviti tuŝeti unu la alian, tuŝeti, plu tuŝi, ĉirkaŭpreni, brakumi, karesi kaj tuŝegi. Hazarde troviĝas apuda sofo, kaj la aferoj iras glate, glite, kvazaŭ tute sen decidoj. Poste ŝi verŝas larmojn ridetante, kaj Jankéus rekomencas pensi, nun ne tiom pri siaj infanoj, kiom pri sia edzino.

Nur survoje al la aŭto li unuafoje kisetas ŝin. ”Stranga vicordo, entute stranga sinsekvo de eventoj”, li distrite pensas.

”Kion vi ĉi-foje raportos al Johan, morgaŭ en la lernejo?” ŝi demandas enaŭte kun eta rido. ”Ĉu ke vi trovis la kokranton?”

Jankéus daŭre maltrankvilas ne tiom pri ŝia edzo, kiom pri sia edzino.

”Nu... ŝajne vi ankaŭ hodiaŭ iris al tiu virina grupo...” li balbutas. Kaj rapide, tro rapide ili atingas la lokon, trans stratangulo de ŝia domo, kie li devas lasi ŝin.

”Ĉu... ni revidos nin?” ŝi demandas kun eta maltrankvilo en la voĉo.

Li ne scias kion respondi. Li ne scias kion voli. Momente li povas pensi nur pri tio, ke post kvin minutoj li devos diri al sia edzino kun laca sed neŭtrala voĉo, ke la laboreja kunveno estis laciga kaj supozeble vana.

”Mi... mi ne scias... sed ĉiuokaze mi kontaktos vin. Mi scias kie trovi vin”, li murmuris. Post rigardo ĉirkaŭen li kisetas rapide ŝian buŝon.



Noktomeze la telefono de polickomisaro Roger Svedberg sonoras kaj pelas lin el la lito. Li ĵus enlitiĝis, sed ankoraŭ ne ekdormis. Kiel li atendis, oni

vokas lin el la policejo. Kiu alia vokus lin ĉi-hore? Kiu alia entute vokus lin je iu ajn horo?

Temas pri murdo, brutala murdo. Virino antaŭ duonhoro vokis la policon raportante, ke ŝi trovis sian edzon murdita, kiam ŝi revenis hejmen. Oni sendas policaŭton por rapide veturigi lin al eta vilao en la norda parto de la urbo. Surplanke en la salono kuŝas kadavro de viro, ŝajne ĵus pafmortigita. Sur seĝo en la kuirejo sidas virino ŝokita kaj eble ne tute sobra. Kaj meze de ĉio nigra kato rondiras miaŭante, kvazaŭ ofendite, ke neniu zorgas pri ĝiaj problemoj.

Svedberg singarde ĉirkaŭiras la kadavron, kiu kuŝas surdorse kun pafovundo meze de la alta frunto. Antaŭ ĝi, en la pordo al ia altano aŭ ĝardeneto, la fenestrovitro havas nete rondan truon. La pordo estas malfermita je fendeto. Videblas neniu spuro de batalo, aŭ entute de alia persono. Sofo, du foteloj, malalta tablo, televidilo, bretaro kun libroj kaj ornamaj vazoj – ĉio ŝajnas en ordo. Nur la tapiŝo iomete ĉifiĝis sub la kuŝanta korpo. Li rezignas eliri eksterdomen, por ne riski detrui ion. Li lasu la eksteron al la teknikistoj, kaj la kadavron al la medicinistoj.

Kuireje, ĉe la virino, staras uniformita policisto, unu el la duopo, kiu alvenis la unuaj ĉi tien. Svedberg sidiĝas ĉetable, kontraŭ ŝi.

”Sinjorino, por ĝajni tempon estus bone, se vi povus tuj respondi kelkajn demandojn”, li ekas. ”Ĉu eblas?”

Ŝi mute kapjesas.

”Ĉu li estas via edzo?”

”Jes.” La demando ŝajne ne surprizas ŝin.

”Lian nomon kaj la vian, mi petas.”

”Johan Wester. Amanda Wester.” La respondo venas kvazaŭ mekanike, dum ŝi rigardas lin per vaka rigardo.

”Kaj kiel okazis la afero?”

Nun unuafoje ŝi montras konfuziĝon.

”Mi ne scias. Mi trovis lin tiel. Mi revenis hejmen, kaj enirante preskaŭ tuj iris en la salonon kaj ekvidis... Kaj... mi tuj telefonis al la polico.”

”Dum kiom da tempo vi estis for?”

”Kelkajn horojn... Aŭ, pli ĝuste, la tutan tagon, ĉar mi iris rekte el la laborejo...”

”Rekte kien?”

”Al... al kunveno... ne... pardonu, mi iris al restoracio.”

”Kun kiu? Kiu restoracio?”

”Mi iris sola. Al *Akropolo*.”

”Ĉu vi imagas, kiu faris tion?” Eta kapmovado klarigas, kvankam tio sendube superfluas, ke ”tion” aludas la murdon.

Ŝi malrapide sed ripete kapneas.

”Tute ne. Mi ne imagas... Ŝajnas... nekompreneble...”

”Ĉu vi scias, je kiu horo via edzo venis hejmen?”

”Ne precize, sed plej kredeble je la... kvina, proksimume. Se li nenion faris survoje hejmen. Mi ne povas diri certe.”

Svedberg pensas momenton. La edzino ŝajnas al li nekutime psike kohera post tia ŝoko, kvankam sufiĉe distrita. Kredeble ŝi trinkis iom da alkoholaĵo, kio sendube utilis al ŝi.

”Ĉu pliaj personoj loĝas ĉi-dome?”

”Ne.”

”Neniu infanoj?” Li ne scias, kial li insistas. Eble ĉar la virino aĝas proksimume tridek kvin jarojn kaj je tiu aĝo devus esti patrino, laŭ lia opinio. Sed ŝi silente kapneas.

”Kiam vi laste parolis kun via edzo?”

”Ĉi-matene. Survoje al niaj laboroj.”

”Ĉu tiam vi rimarkis ion nekutiman?”

”Tute ne.”

”Ĉu iu alia persono povus scii ion plian?”

Ŝi pripensas dum momento. Ŝajne aperas ia brileto en la okuloj. Ĉu pro tio, ke ŝi efektive ekpensas pri iu? Tamen, ŝia buŝo ne agnoskas tion:

”Mi ne povas imagi iun.”

”Ĉu – laŭ via scio – via edzo estis minacata de iu?”

”Ne, tute ne. Li certe dirus al mi, se iu minacus lin.”

Svedberg forlasas ŝin kaj eliras. Ambaŭ najbaraj domoj estas senlumaj. Li elektas unue la maldekstran, sonorigas kaj frapetas ĉe la pordo. Pasas minutoj, sed fine sepdekjarulo en negliĝo timeme gvatas tra avara porda fendeto. Svedberg montras identigilon kaj post iom da negocado rajtas enveni.

Vivas tie du geedzoj, emeritoj. La edzo nenion nekutiman aŭdis aŭ rimarkis ĉi-vespere. Sed la edzino memoras iun sonon, kvazaŭ kraksono el la ellastubo de malnova aŭtaĉo.

”Je kiu horo?”

”Nu... ne estas facile memori... Kredeble dum la kvizo... Ni spektis tiun milionan kvizon en televido... kanalo tria...”

Svedberg notas por poste konsulti la televidan horaron.

Ankaŭ ĉe la aliaj najbaroj, kiuj estas juna familio, oni aŭdis ian sonon. ”Kvazaŭ pafo”, diras la edzo, ruĝhara tridekjarulo.

”Kiam estis tio?”

La geedzoj rigardas unu la alian, kaj interkonsentas pri ”je la naŭa kaj duono, eble deka”.

”Ĉu vi ne esploris, pri kio temas, aŭ vokis iun?”

”Ne, ja estis nur unu sono. Ĝi ne ripetigis, do ni supozis, ke nenio grava okazis...”

‘Interese’, meditas Svedberg forirante. ‘Se oni volas murdi senĝene, do oni pafu nur unu pafon. Kaj tion ŝajne konsciis nia murdinto.’

3. Ne plu kolego

”Bone do. Ni ripetu al ni la bazajn faktojn”, diras la komisaro Roger Svedberg al siaj tri kunlaborantoj, kiuj kolektiĝis en lia ofica ĉambro. ”Temas pri viro kvardekdujara, Johan Wester, instruisto, loĝanto de propra domo ĉe la strato Svalörtsstigen. Inter la deka kaj dekunua horoj, marde vespere, iu mortpafis lin per unu pafilo al la kapo. Evidente oni atendis lin ekster la altana pordo kaj pafis tra la vitro. Neniu piedsigno surtere. Neniu najbaro ion rimarkis, aŭ pli ĝuste – neniu reagis pro la sono. Trovis lin la edzino je la dekunua kaj duono.”

Li eksilentas kaj rigardas unue siajn kolegojn, poste la turojn kaj tegmentojn videblajn ekster lia fenestro, kvazaŭ serĉante pluajn ideojn. Estas merkredo posttagmeze en la mezo de majo. De endome ŝajnas esti belega tago, sed li ĵus envenis kaj ankoraŭ sentas la malvarman marbordan venton kiu penetris ĝisosten.

”La edzino estas relative trankvila. Ŝi povas imagi neniun, kiu povus murdi ŝian edzon”, li aldonas.

Estiĝas paŭzo, kaj poste inspektoro Vivianne Ljunggren ekparolas.

”La lernejestro diris, ke li estis tre respektata kaj skrupula instruisto, ŝatata de ĉiuj. Sed de iu kolego mi eksciis, ke li verŝajne multe vetas en diversaj hazardludoj. Kaj iu alia ŝajne suspektis la lernantojn...”

”Kiun aĝon ili havas?” demandas Benny Hallman, la plej juna el la kvar kolegoj.

”Dek tri ĝis dek kvin. Poste mi parolis kun la patrino de la mortinto, sinjorino Gunvor Wester. Ŝi estis tre ŝokita kaj pli-malpli rekte akuzis sian bofilinon pri la murdo.”

”Cetere... kio pri la armilo?” demandis Hallman. Ĉiuj rigardas la komisararon.

”Neniu armilo trovita. Kompreneble ni devos atendi teknikan raporton, sed oni trovis *kaj* kuglon *kaj* kuglingon, kaj temas pri grandkalibra pafilo, naŭmilimetra. Neniu ludilo.”

Denove la kvaropo silentas dum momento, kaj jen malrapide ekparolas la kvara, inspektoro Hans Andersson.

”Mi demandis en la aliaj domoj ĉe la strato, sed neniu vidis ion, ŝajne. Nek aŭdis. En la arbareto malantaŭ lia domo mi trovis iun grandan piedsignon freŝan. Tamen ĝi povus esti de iu ajn trejnkuranto. Poste mi kontrolis la alibion de la edzino, kaj tie mi trovis ion.” Li montras mienon fieretan, kaj post paŭzeto pluas: ”Oni vere konas ŝin en la restoracio. Ŝajne ŝi ofte venadas tien, kutime sola. Tamen ĝuste hieraŭ ŝi *ne* estis sola, sed kun iu viro!”

Li mienas triumfe, kvazaŭ li jam kaptus la murdinton.

”Bone do”, diras Svedberg sen granda entuziasmo. ”Mi klopodos trovi tiun ulon, tamen min interesas ne tiom la umado de la edzino kun iu viro, kiom la kaŭzo, kial oni murdis ŝian edzon.”

”Atendu iomete”, entranĉas Andersson. ”La kelnerino diris, ke ili foriris kune iom post la deka horo. Laŭ via raporto Wester estis pafita inter la deka kaj dekunua. Kaj la edzino revenis hejmen je la dekunua kaj duono!”

Li nun montras vizaĝon tre memfidan, kvazaŭ la tuta kazo estus jam klara kaj preta por juĝafero. Svedberg rigardas lin per lacaj okuloj. Inspektoro Andersson sendube estas tre talenta kaj efika policisto. Eble tamen iomete naŭva. Kiam li ekhavas iun ideon aŭ supozon, lia kredo kutime estas ege firma. Dum momento Svedberg eksentas etan sopiron je sia iama kolego Tom Jankéus. La vizaĝo de Jankéus neniam brilis de tia memcerta kontento kaj fido kiel tiu de Andersson. Ja estas vere, ke la humuro de Jankéus fojfoje estis iom bizara. Sed Andersson tute malhavas ian ajn humuron. Nu, la kunlaboro kun Jankéus jam estas historio, kaj li neniam plu havos okazon trakti murdenketon kune kun li. Tom Jankéus forlasis sian metion pro malkontento kaj malkonsento kun la poliestro.



”Nu, mi preferus ne diri lian nomon. Ĝi ja neniel rilatas al la murdo.”

”Mi komprenas, sed ni devas kolekti ĉiujn informojn, eĉ se ili ŝajne rilatas al nenio ajn.”

”Tamen... ĉu ne sufiĉas se mi deklaras, ke li estis kun mi dum la tempo kiam... kiam Johan estis pafita...”

”Male, estas necese ke ni parolu kun li.”

”Estas iom embarase... vi eble eĉ konas lin...”

”Ĉu vere? Kiel do?”

Kiam Svedberg forveturas de la domo ĉe Svalörtsstigen, kie li jam duafoje interparolis kun la neatendite trankvila vidvino Amanda Wester, li estas sufiĉe konsternita. Tom Jankéus! Antaŭ nura duonhoro li sopiris je interparolo kun Jankéus pri la murdafero. Sed nun tiu emo rapide fordegelis. Li vere ne deziras pridemandi sian ekskolegon por konfirmi la depozicion de sinjorino Wester. Kion fari? Nu, li ja ne devas nepre mem fari ĉion. Cetere estas jam vespero. Morgaŭ eble li pretos interparoli kun Jankéus. Aŭ taski al iu alia fari tion. Ne al la glatvizaĝa Andersson. Nek al la juna Hallman, kiun Jankéus apenaŭ konis. Sed Vivianne Ljunggren povos tion fari. Ankaŭ ŝi iam kunlaboris kun li. Kaj ŝi ne facile embarasiĝas. Vivianne traktos tiun aferon bone. Dume, Svedberg mem povos serĉi la personon, kiu laŭ Amanda Wester kutimis veti pri ĉevaltrotado kune kun ŝia edzo.

Li parkas sian aŭton en la garaĝon, sed antaŭ ol eniri en la senhoman domon, li faras vesperan promenon ĉirkaŭ la kvartalo. Jam plurfoje li paŝadis tie, pensante ke konvenus posedi hundon, por havi motivon ĉiutage tiel promeni. Sed pro la profesio li apenaŭ povus bone prizorgi beston. Kaj promeni ja eblas ankaŭ sola. La dumtaga vento nun jam ĉesis, tamen la hela vespero estas malvarma. Li paŝas rapide tra herbejo proksime al la maro, pensante pri sia nova murdenketo. Estas io pri la kazo kio maltrankviligas lin. La planita mortigo per unu pafo montras ian kombinon de zorgo kaj pacienco kun aŭdaco kaj riskemo, kaj tiu kombino tute ne plaĉas al li. Laŭ la sperto de Svedberg, la plej multaj murdantoj estas fuŝuloj, kiuj mastras nek siajn emociojn, nek la praktikajn detalojn necesajn por plenumi sian agon kaj eskapi de ĝi. Sed ĉi tiu murdinto sciis elekti ĝustan momenton, ĝustan lokon, paciencas kaj diskrete atendi, sed ankaŭ efike kaj senkompatate ekbati, kaj poste nevidate foriri. Li demandas sin, kia murdanto havas tiujn kapablojn. Certe ne la plej ofta speco, kiu en ebrio kaj furiozo mortigas kundrinkanton. Ankaŭ murdo pro pasio aŭ ĵaluzo ŝajnas al li neprobabla. Se temas pri politika murdo, la cirkonstancoj ne surprizus lin, tamen – ĉu eblas politika murdo ĉi tie, en dormema urbeto, ĉe la Baltmara bordo? Ĝuste nun li ne povas memori eĉ unu solan murdon de tiu speco dum sia longa polica kariero. Kio do restas? Murdo pro mono, kompreneble. Aŭ pro ia enmiksiĝo en aliaj krimoj, kio ofte signifas la samon. Ĉu la vetado? Li devos ekscii pli multe pri ĝi. Laŭ la edzino temis pri tute senkulpa libertempa plezuro. La edzino, kiu pasigis la vesperon kun Tom Jankéus, dum ŝia edzo ricevis kuglon tra la frunto. Tion ŝi almenaŭ asertas, kun trankvileco kaŭzita de kio – ĉu de la psika ŝoko?

Svedberg enpensiĝas ĝis norda najtingalo trile kaj orelŝire kantvekas lin el la cerbumoj. Do, ili jam alvenis! Malgraŭ la marborda friskeco ili jam eknestis en la sorpaj kaj avelaj veproj kaj komencis sian ĉiujaran proklamadon, ke ”jen plej belas mi, jen posedas mi la inojn, jen neniuj rivalulo kuraĝu aŭdigi sian blekaĉon en mia vepro!” Svedberg post nelonge revenas sur straton kaj turnas sin flanken por hejmeniri. Ĉu amo, pasio, rivaleco? Aŭ ĉu mono, ŝuldoj, minacoj? Kiaspecan murdinton li serĉu?



Ĵaŭde matene Vivianne Ljunggren eniras en instruistan paŭzoĉambron en la lernejo de Lindö, la eksa laborejo de la murdito. Preskaŭ tuj ŝi ekvidas sian iaman kolegon. Tom Jankéus ĝenerale plaĉis al ŝi, kaj ŝi konsideris lin talenta kolego apenaŭ dek jarojn pli aĝa. Kvankam ŝi fojfoje kunlaboris kun li, ŝi ne konis lin proksime. Verŝajne neniuj kolego tre intime konis lin, krom eble Svedberg. En aliaj kondiĉoj ŝi tre volonte interparolus kun li, sed nun la cirkonstancoj estas iom embarasaj.

Tamen necesas malmulte klarigi aŭ motivi la intervjuon. Jankéus ŝajne perfekte konscias, kial ŝi okulserĉas lin, kaj li kondukas ŝin en malplenan laborĉambreon.

”Saluton, Vivianne! Ja devus mi telefoni, sed mi sciis ke iu venos hodiaŭ. Avertis min Amanda, la edzino de Johan Wester. Terura afero! Estis ni kolegoj, ĉu ne, tio estas Johan kaj mi, tamen mi scias malmulte pri li. Ne mia homspeco, se tiel diri.”

”Kaj la edzino?”

”Hmmm. Nu... evidente ŝi estas mia speco. Tamen... scias mi preskaŭ nenion ankaŭ pri ŝi. Nur... ke tiuvespere ŝi estis kun mi de la oka ĝis la dekunua horo. Sed... nu, mi scias ke vi ne povos multe influi tion, tamen vi certe komprenas, ke estus ĝene, se mi devus atesti pri tio en juĝejo...”

Lia iama kolegino rigardas lin. Ŝi ĉiam kredis lin fidela edzo kaj amoplena patro de tri idoj. ‘Nu ja’, ŝi pensas, ‘aferoj neatenditaj povas okazi al ĉiu ajn!’

”Je kiu horo vi disiĝis?” ŝi demandas. ”Ĉu vi scias pli precize?”

”Nu, revenis mi hejmen je... kvarono antaŭ noktomezo. Fakte, mi sidis longe en la aŭto... por pripensi... do... supozeble ni disiĝis je la dekunua kaj kvarono. Plus-minus dek minutoj, ni diru.”

”Kaj kie vi disiĝis?”

”Je dudek paŝoj de ŝia hejmo. Trans la stratangulo. Mi veturigis ŝin tien.”

Vivianne Ljunggren pripensas. La informoj de ŝia ekskolego kongruas kun tiuj de la vidvino. Ne mirinde, se ŝi jam avertis lin.

”Ĉu vi vidis iun alian homon kiam vi disiĝis?”

Li rigardas ŝin dum lia suba lipo ŝajnas preta formi ironian rideton.

”Se mi vidus la murdinton forkuri, kredeble mi jam...” li ekrespondas, sed haltigas sin vidante la rigardon de la inspektorino. ”Pardonu min... mi ŝajne forgesas ke ni ne plu estas kolegoj... Ne, mi vidis nenium. Estis dezertaj stratoj.”

”Kiu povas atesti ke vi estis kune?”

Li rigardas ŝin surprize. Kion ŝi imagas? Ĉu atestanton en intima situacio? Sed ĉi-foje li rezistas la emon je ironia respondo.

”Ĝis eble la deka horo la restoracia kelnerino, mi supozas. Poste jam neniu.”

”Kiom longe vi konis ŝin?”

”Mallonge. Renkontiĝis ni en tiu restoracio antaŭ nelonge pro... nura hazardo. Mi rekonis ŝin, ĉar mi iam vidis ŝin kun Johan. Ni interparolis, mi veturigis ŝin kaj... pro nura hazardo... mi ekkonis ŝin.”

Ŝi rigardas lin. Laŭ lia mieno ŝi vidas, ke li ion aludas per tiu esprimo, sed ŝi ne scias kion. Li ja estas simpatia, tamen ŝi sentas certan

malkomforton interparolante kun li. Ne nur pro la tikla situacio. Ne nur ĉar li ne plu estas kolego. Troviĝas io alia, io pli baza. Jankéus ŝajnas al ŝi tipa intelektulo el la meza klaso. Ne multas tiaj inter la policistoj. Kaj ŝi mem ĉiam sentas iom da malcerteco, malkonfido antaŭ tiaj homoj. Ŝi sentas, ke ŝi estas nur knabino el laborista hejmo, kiu ne sufiĉe mastras la komplikajn kodojn kaj signalojn de la pli kulturaj sociaj tavoloj. De tiuj homoj, kiujn ŝia avo ĉiam nomadis "pli bonaj homoj". Kvazaŭ ŝi kaj ŝiaj familianoj estus "malpli bonaj".

Sed kion fari? Evidente Tom Jankéus estas tia, kia li estas. Li ne kulpas pri klasaj diferencoj hereditaj de pasintaj generacioj. Ŝi forpelas la malkomforton kaj pluas:

"Bone do. Mi transiru al la murdito. Kia homo li estis, laŭ vi?"

"Instruisto. Tipa instruisto. Ŝatis mem paroli, ne tre ŝatis aŭskulti. Preferis decidi la regulojn kaj taskojn de aliuloj. Iom teda, tamen senofenda. Kiel dirite, mi ne konis lin intime."

"Ĉu li povus havi malamikojn?"

"Evidente unu, se ne temas pri frenezulo. Sed kiu? Mi ne imagas."

"Kolegojn?"

"Vi volas diri – krom mi? Nu, fojfoje oni iom diskutas kaj malkonsentas en la diligenta kolegaro, tamen ĝis murdi – tio ŝajnas nekredebla."

"Ĉu vi scias ion pri lia ekonomia stato?"

"Nenion. Absolute nenion. Demandu Amandan."

"Ĉu ŝi nenion diris al vi pri tio?"

"Certe ne. Ni pekis nur kontraŭ la sesa ordono. Ni neniam tuŝis tiel intiman sferon kiel monon!"

"En kiaj rondoĵ li movis sin, laŭ vi?"

Jankéus pripensas dum kelka tempo kaj poste murmuris:

"Malfacilas diri. Mi dubas, ĉu renkontadis lin iu kolego ekster la lernejo." Li ankoraŭ pripensas kaj aldonas: "Sed ĉiujn tiajn informojn ja povus doni Amanda."

"Kion ŝi diris al vi pri sia edzo?"

"Nu... ne multe..." Li sulketas la frunton. "Ke li ne aprezis ŝian laboron. Ke li estis ĵaluza."

Inspektorino Vivianne Ljunggren ne demandas, ĉu la murdito havis kaŭzon ĵaluzi. Ŝia ekskolego ŝajnas al ŝi samtempe sincera kaj iom rezervita. Sed eble tion kaŭzas nur la embarasa situacio. Suspekti, ke la iama policisto brutale pafmurdas la edzon de sia amatino ŝajnas al ŝi iom tro drasta. Do supozeble necesas akcepti, ke Jankéus ne povos doni utilajn informojn pri la kazo.

4. Diable kvieta loko

Jen do! Ĉio en ordo, fekulo! Ĉion mi regas. Jen vi povos veni kiam ajn tio plaĉas al vi. Kaj se mi konas vin, ne daŭros longe! Merdo, la ŝancon je tia grasa kapto vi ne longe rezignos. Ĉiumomente vi povos aperi, tie maldekstre, per via fekaŭto, rapide, kun ŝprucanta gruzo sub la radoj, kaj turni ĝin dekstren preskaŭ sen bremsi. Eble vi kluĉos, malŝaltos la motoron kaj lasos la aŭton ruliĝi dek metrojn antaŭen sur la gazonon. Poste vi iros rekte ĝis la enirejo, serĉos la ŝlosilon enpoŝe, malŝlosos kaj eniros. Ne, tamen ne... Ĉi-foje vi ne eniros. Vi serĉos la ŝlosilon, eble trovos ĝin kaj enigis ĝin en la seruron. Sed nenion pluan vi faros. Nenion pluan, putinido! Neniam ajn vi faros ion pluan! Vi jam fekis lastfoje! Vi jam faris sufiĉe kaj tro. Precipe al mi vi jam faris tro da fekaĵoj, kaj ne eblas malfeki tion, vi damnita ŝajnsanktulo. Mi bedaŭras nur ke mi ne povos vidi vin longe suferi. Domaĝe, ke tio ne eblos. Ne, mi devos fari la aferon tuj, rapide, kaj poste vaporigi. Kelkajn paŝojn preter la domo, plu oblikve tra la gazono, inter la betuloj, ĝis la barilo, trans tiun, tra la najbara parcelo de la stokholmanoj, kiuj aperos ĉi tie nur somere, ĝis la apuda strateto. Kaj de tie per mia aŭto, kiun neniuj havos kaŭzon aparte rimarki. Suden, maldekstren, supren laŭ la deklivo, ĝis la ĉefŝoseo, kaj tie jam mi estos centprocente sekura, eĉ veturanta el tute senkulpa direkto, inter centoj da aliaj senkulpuloj.

Do, jen vi povos veni, porka putinido. Mi akceptos vin varme kaj trafte. Kaj eĉ se vi ne longe suferos, domaĝe, aliaj tamen faros tion. Jes ja, je diablo, tuta aro da kretenoj tre suferos pro via malesto. Kelkaj eble ĝojos, tamen havos problemetojn. Aliaj... nu, bone... Ili suferu pro vi. Ankaŭ mi suferis pro vi, porkaĉo! Tro longe jam vi venenis al mi la vivon. Kiomfoje mi vidis vian diable superecan rikanan fekmienon? Sed nun vi baldaŭ faros la lastan grimacon! Baldaŭ vi finpisis!

Estas kviete ĉi tie. Somere jam estos pli da homoj, kaj semajnfine. Sed en printempa labortago ĉi tio estas diable kvieta loko. Kompreneble la pafotruoj aŭdiĝos ĝis la ĉirkaŭaj domoj. Sed neniuj tie hejmas. Mankas aŭtoj, do mankas homoj. Je ducent metroj eble iuj troviĝas, sed eĉ se ili aŭdos ion, ili ne vidos min. Kompreneble, se iu hazarde preterpasus ĝuste tiam, estus ĝeno. Sed kial tio okazus? La sola, kiu venos, estos vi. Venu do! Estu bonvena! Sentu ke vi hejmas ĉi tie! Kantu la himnon, 'jen mi vivis, jen mi volas morti', kiun vi kutimis kanti! Tiel estos, fekulo!

5. Vizito en knabina ĉambro

La murdenketo pri Johan Wester ne avancis. Oni interparolas kun kelkaj viroj, kiuj konis lin kiel sufiĉe entuziasman vetanton en la urba trotejo. Tamen ili ĉiuj asertas, ke Wester vetadis pri negrandaj sumoj kaj certe ne pli ol kiom permesis lia instruista salajro. Pri monŝuldoj neniuj scias ion ajn. Almenaŭ tiel ili asertas, kaj pri la monsumoj iom hezite konfirmas iliajn asertojn la sinjorino deĵoranta en la vet-giĉeto de la trotejo. Ŝi tuj rekonas la murditon laŭ foto kaj karakterizas lin ofta sed prudenta ludanto. Cetere, ankaŭ pri grandaj gajnoj neniuj povas informi.

Do, la laboro sabate iomete stagnas pro manko de ideoj. Tiam venas alarmo el la najbara insulo Olando. Oni trovis kadavron de juna viro apud somerdomo. Li estas pafita tra la kapo. Najbaro kredis rekonu lin, kaj oni baldaŭ povas identigi la duan pafmurditon en duona semajno – li estas juna konstrulaboristo el la urbo, kaj lia nomo estas Daniel Fridell. La somerdometo apartenas al liaj gepatroj, apude staras lia aŭto, kaj sub lia kadavro oni trovas ŝlosilon de la dometo, kiun li ŝajne tenis enmane kiam unu grandkalibra kuglo trafis lian kapon de flanko, iom super la orelo. Proksime al apuda budo por laboriloj kuŝas kuglingo. Post iom da kombado de la ĉirkaŭa tero, oni trovas ankaŭ la kuglon.

Ĉi-foje neniuj aŭdis ion ajn, nek vidis, pro la simpla fakto ke ŝajne troviĝis neniuj en la ĉirkaŭaĵo. Supozeble la murdo okazis vendrede, kiam ĉiuj somerdomoj ĉirkaŭaj estis senhomaj. Sabate tagmeze iuj najbaroj ekscivolis pri la aŭto, kaj kiam ili alproksimiĝis, ili ekvidis la kadavron kuŝantan sur la sojlo. Jen almenaŭ la provizora prijuĝo. Post nekropsio oni povos iomete precizigi la horaron. Ĉiuokaze, ĉi-foje la murdo havis horojn por plenumi sian aferon kaj diskrete malaperi.

La gepatroj de la nova viktimo vivas en apartamento en trankvila sed centra kvartalo. Kiam Svedberg sonorigas, junulo malfermas la pordon kaj enlasas lin.

”Patrino sidas en la salono. Mi demandas ĉu ŝi fortas paroli kun vi”, li diras malaperante. Daŭras iom da tempo dum Svedberg rigardas la vestiblon, sufiĉe dense meblitan per simplaj seĝoj, tableto, ligna benko kaj ŝranko. Surmure fotoj de ridetanta paro kaj seriozaj infanoj. Surplanke teksita tapiŝo.

”Vi povos enveni, sed estus bone se vi ne tro longe restus. Ŝi ricevis ion trankviligan kaj estas laca.”

Sinjorino Fridell vere aspektas laca, eble ĉar ŝi estas neŝminkita kaj iom falta. Kvindekjara, eble iom pli. Vestita en nigra, sufiĉe eleganta robo, kiu certe ne estis aĉetita por funebro. La haroj estas tre malhelaj, krom

kelkaj milimetroj, kiuj grizas. Ŝi ekstaras kaj etendas la manon. Svedberg salutas, petas pardonon pro sia entrudo, kaj ili sidiĝas.

”Vi certe komprenas, sinjorino, ke ni volas gajni tempon por kapti tiun, kiu mortigis vian filon. Ĉu vi havas suspekton, kiu povus tion fari?”

Ŝi ne rigardas lin, sed flanken, al malplena fotelo.

”Ne, ne, ne, mi ne scias”, ŝi diras per rompiĝanta voĉo.

”Ĉu vi scias, kiam via filo iris al la somerdomo?”

”Tute ne! Mi ne vidis lin de pli ol semajno... Li ja ne loĝas ĉi tie. Li havas propran loĝejon.”

”Oni trovis ŝlosilon al la dometo. Ĉu li havis ŝlosilon al ĝi?”

”Jes, jes. Li rajtis uzi la domon. Kiam la knaboj estis junaj, ni pasigis ĉiun someron tie, pli-malpli. Nun mi ne tiel ofte uzas ĝin...”

”Ĉu Daniel ofte iris tien?”

”Nu, eble ne tre ofte. Somere li kelkfoje tranoktis tie. Kaj lastan aŭtunon li kaj lia nova knabino pasigis semajnon...” Ŝi esploras kaj eligas poŝtukon el la roba zono.

Svedberg pripensas. Necesas nun fari nur la plej gravajn demandojn, kaj poste se necese rekomenci alifoje.

”Sinjorino, vi diris, ke vi ne scias kiu povus mortigi vian filon. Sed mi petas vin pripensi ankoraŭfoje, ĉu Daniel havis malamikojn.”

Ŝi silentas kaj ĵetas al li maltrankvilan ekrigardon. Li precizigas:

”Bonvolu ne pensi pri tio, ĉu iu povus murdi. Simple pripensu, kiu povus rigardi lin malamiko.”

”Nu, kompreneble estas tiuj afrikanoj...”

”Ĉu afrikanoj?”

”Jes. Nigruloj. Mi forgesis la nomon. Eble li nomiĝas Omano aŭ Omaro. Fredrik certe scias. Aŭ...” Ŝi refoje esploras. ”Aŭ Jonna... lia fianĉino...”

La poŝtuko plene malsekiĝis, kaj ŝi okulserĉas ion alian por sorbi la larmajn riveretojn. Svedberg provizore rezignas kaj decidas interrompi la aferon.

”La knabo kiu enlasis min, ĉu li estas via dua filo?”

”Jes... jes ja. Jen Fredrik.”

Svedberg dankas, pardonpetas, antaŭanoncas iaman revidon kaj iras serĉi la fraton de la murdito. Li sidas kuireje kun doso da kolao. Fortika junulo eble dudekjara, vestita per ĝinzo kaj T-ĉemizo. Li impresas malĝoja sed koncentrita. Post la sama enkonduko kiel al la patrino, Svedberg ekdemandas:

”Ĉu vi imagas, kiu povus tion fari?”

”Ne, mi ne scias. Sed...”

”Sed kio?”

”Nu, troviĝas ja kelkaj idiotoj kiuj certe volis. Tamen mi ne kredis, ke ili kuraĝas. Sed ŝajne mi eraris...”

”Kiuj volis mortigi lin?”

”Unue tiu Omar. La eksulo de lia kunulino. Ili ja ne ŝatas, se la ino ŝanĝas ulon. Tamen mi dubas, ĉu li kuraĝus. Sed eble li havas onklojn aŭ kuzojn aŭ mi-ne-scias-kiajn helpantojn. Tamen mi pli suspektas la naziojn.”

”La naziojn, ĉu?”

”Jes.”

”Ĉu vi povus precizigi? Kiuj nazioj, kaj kial?”

La junulo rigardas lin dum momento kaj poste diras:

”Vi devus scii, ĉu ne? Tio ja estas via laboro. Danne antaŭe estis nazio. Dum pluraj jaroj. Sed li forlasis ilin. Kaj vi certe scias, ke ili plej malamas tiujn, kiuj forlasis ilin. Tielnomatajn perfidulojn.”

”Ĉu vi povas diri nomon de iu, kiu malamis vian fraton pro tio?”

Denove li pripensas.

”Mi ne konas ilin. Unu el la ĉefuloj estas nomata Kalle. Alia nomiĝas Ronne. Eble Sundberg aŭ io simila. Jes, Ronne Sundberg, mi pensas. La polico devus koni ilin.”

”Kiam vi mem lastfoje vidis vian fraton?”

”Antaŭlonge. Pluraj semajnoj.”

”Kion laŭ via opinio li faris ĉe la somerdomo?”

”Mi havas neniun ideon.”

”Ĉu li ofte iris tien?”

”Mi pensas ke ne. Almenaŭ ĉi-sezone.”

”Ĉu ankaŭ vi havas ŝlosilon tien?”

”Ne. Mi povus prunti de Panjo, sed mi neniam iras tien. Troviĝas nenio farinda tie.”

”Ĉu vi vivas ĉi tie?”

”Ĉe Panjo? Ne, ne. Mi havas propran ejon.”

Svedberg kontemplas la informojn kiujn ĉi malgaja junulo ne tre riĉe ŝutas super lin. Eble li povos doni ankoraŭ pli, tamen la fianĉino ŝajnas momente pli grava.

”Tiu fianĉino...” li komencas, ”ĉu Jonna? Bone, ĉu vi scias, ĉu ŝi estas jam informita? Kaj kie mi trovos ŝin?”

”Ŝi loĝas en iu vilao en Smedby kun la gepatroj, sed mi demandas Panjon. Ŝi havas almenaŭ telefonnumeron.”

Li malaperas dum kelka tempo, kaj Svedberg refoje studas la hejmon. Brila rustimuna lavtablo. Tri kupraj ujoj pendantaj surmure, kiel ornamo. Pinligna manĝotablo, kvar pinlignaj seĝoj kun blukvadrata sidila ŝtofo. Kafaparato kun iom da kafo en vitra kruĉo. Mikroonda forno. Plafona lampo, ankaŭ el pina ligno. Surmure bildo pri revema alko ĉe arbara lageto en sunsubiro.

La junulo revenas kaj transdonas slipon.
"Ŝi jam scias sed kredeble ne hejmas. Oni kondukis ŝin en la hospitalon. Jen la telenumero."
Svedberg prenas la slipon kaj petas:
"Bonvolu krome noti vian numeron, se ni bezonus pliajn informojn."
Fredrik aldonas numeron surslipe, kaj Svedberg pluas:
"Kaj la patron, kie mi trovos lin?"
"La patron? Ĉu la mian? En Saud-Arabio."
"Kio?"
"Ĉu ne Panjo diris? Li laboras tie. Li estas inĝeniero. Revenos en aŭgusto."



En la hejmo de Jonna Larsson en Smedby, antaŭurbo okcidente de la urbo, neniuj respondas la telefon Alvokojn de Svedberg. Li do ekiras al la urba hospitalo. Veturante tra stratoj malplenaj, kiel ĉiam en sabata posttagmezo, li pensas pri la du murdoj. Kiel similaj, kaj kiel malsimilaj! Ja devas esti unu sama murdo. Murdo tre celkonscia, aganta laŭ plano, kun malvarma, preskaŭ intelekta strategio. Tamen, en la unua kazo malfacilas imagi iun kun motivo, dum en la dua konkuras la eblaj murdoj. Afrika rivalulo pri virino, homo el fremda kulturo kun aliaj moroj kaj alia moralo. Kaj aro da politikaj ekstremistoj pretaj sange venĝi kontraŭ renegato. Ĉu li ne diris al si antaŭ kelkaj tagoj, ke la unua murdo similis politikan murdon, se nur eblaj imagi tian ĉi-loke. Povas esti ke li pretervidis la ekziston de politika perforto en la hodiaŭa paca Svedio. Nazioj, ĉu? Sed kiel ili rilatas al la instruisto Johan Wester? Ĉu ankaŭ li estis eksnazio? Ŝajnas ne tre verŝajne. Ĉu male li agadis kontraŭ la nazioj? Neniu menciis ion similan, sed ja povus esti ke jes. Eble li instruis kelkajn konfuzajn junulojn pri la moderna historio, kaj ili ne aprezis lian version? Ne, li ja instruis la svedan lingvon. Kaj germanan. Germanan, ĉu?

La cerbumado de Svedberg estas rompita de lia alveno hospitalen. Li supozas ke temas pri la psikiatria kliniko kaj direktas sin tien por defii la sekretemon de la hospitalaj administrantoj. Li scias pro plurfoja sperto, ke policenketo pri du brutalaj murdoj ne tre imponos al ĉeflegistino, kiu gardas la integrecon de siaj pacientoj.

Unu horon pli malfrue polickomisaro Roger Svedberg jam interparolis kun unu flegistino kaj du kuracistoj, sed la sola rezulto gajnita estas informo, ke Jonna efektive troviĝas en la kliniko, kie ŝi dormas aŭ ripozas, kaj ke vizito de la polico malutilus al ŝia sano kaj do ne estas preskribbla. Antaŭ tia rezisto li rezignas kaj iras hejmen. La vesperon li dediĉas al telefonaj esploroj por laŭeble ekscii la ĝustajn nomojn kaj adresojn de unu somaliano

kaj du svedoj kun opinioj, kiujn ili mem supozeble difinas kiel naciismaj. Sabatvespero tamen ne estas la plej konvena tempo por tiaj esploroj. Finfine lia kolego deĵoranta en la policejo trovas en la loĝantara registro du somalianojn kun la antaŭnomo Omar – el kiuj unu dudekjara kaj unu kvardekjara. Pri la du nazioj li devas rezigni, ĉar la anoj de la loka polico de sekureco aŭ ne respondas telefon Alvokon, aŭ tiel sekretas ke ne eblas trovi ilian telefonnumeron.



”Kiu diris, ke mi rompis kun li? Mi neniam faris tion!”

”Ĉu ne? Sed... ĉu vi ne...” Svedberg konsterniĝas kaj balbutas spasme, dum Jonna Larsson skuas la kapon kaj palpebrumas. Ŝiaj okuloj ruĝas, kaj la longa blonda hararo estas nekombita. Ŝi portas grandegan puloveron, kiu povus enteni du aŭ tri homojn de ŝia grandeco. La kolrandon de la pulovero ŝi tiris antaŭ la mentonon, kaj inter ĉiu frazo ŝi maĉas ĝin. Tiam la dekokjarulino, sidanta surlite en sia hejma ĉambro, ŝajnas ege pli juna.

”Mi ankoraŭ amis lin, sed li diris ke ni devas fini la aferon. Mi pensas ke lia patrino influis lin. Ŝi timis ke li iĝos tro sveda, se li estos kun mi.”

”Kiam via rilato ĉesis?”

”Antaŭ jaro kaj duono, proksimume.”

”Kaj kiam vi renkontis Daniel’on?”

”Printempe... antaŭ preskaŭ unu jaro. Sed ni iĝis...” Ŝi singultas, kaŝas la vizaĝon en la manoj kaj plorsingulte obtuzas inter la fingroj: ”Ni iĝis kunuloj fine de la somero.”

”Ĉu vi poste renkontis Omar’on?”

”Jes, kelkfoje.”

”Kaj kiel li reagis?”

”Normale. Li nenion diris pri Daniel. Li ne diris tre multe, entute. Li estas iom timida.”

”Ĉu laŭ vi iu el liaj familianoj havis opinion pri vi aŭ pri via amrilato?”

”La patrino, mi jam diris. Ŝi neniam montris tion al mi, sed Omar rakontis al mi, ke ŝi preferus ke li ne renkontu min.”

”Bone do. Ĉu vi konis la politikan agadon de Daniel?”

”Kompreneble! Mi ja renkontis lin tie!”

Svedberg surprizite rigardas ŝin. Ĉu tio eblas? Ĉu knabino kun afrika eksamiko povas esti nazio?

”Ĉu inter la nazioj?”

”Eksaj! Mi aktivis kun Omar en antirasisma grupo. Kaj poste ni aranĝis ion en mia lernejo kun la societo kiu helpas eksnaziojn forlasi la iaman movadon. Daniel venis tien por forlasi la naziojn.”

”Kiel reagis liaj iamaj samideanoj pri tio?”

”Kiel kutime! Per minacoj!”

”Kion tio signifas, pli precize?”

Nun ploratako venkas ŝin, kaj li devas paŭzi. La patrino de Jonna staras en la pordo mute rigardante ilin. Nun ŝi iras al sia filino, sidiĝas apude kaj brakumas ŝin.

La ĉambro de la dekokjarulino ŝajnas tipa knabina ĉambro. Surmure portretoj de junaj homoj nekonataj al Svedberg. Granda afiŝo kun bildo de porko en malvasta fako kaj la teksto VIANDO ESTAS MURDO. Librobreto plena je libroj kaj diversaj objektetoj. Skribtablo kun paperoj, kajeroj, skatoletoj, kasedilo kaj du porcelanaj hundetoj. Super ŝia lito surmure okulfrapas papereto agace rozkolora, kun mane skribita poemeto:

*Se la viroj menstruus, ekzistus tampon' kun
aspirino
La akuŝ' estus ĝuo, se naskus la viro, ne virino
Se la patroj mamnutrus, posedi laktejon – jen
ormino!*

Li ĝuste intencas demandi, ĉu ŝi mem verkis tiun version, kiam la patrino de Jonna alparolas lin:

”Mi pensas ke Jonna nun devas ripozi.”

Li ekstaras kaj iras al la pordo. Haltante li tamen demandas:

”Jonna, dankon pro via helpo. Antaŭ ol mi finos, ĉu vi povus doni nomojn de iuj el liaj eksamikoj, kiuj poste minacis lin?”

Ŝi forprenas la manojn de la vizaĝo.

”Mi konas nur tiun kiu ĉiam parolas en iliaj manifestacioj. Kalle Hagerman.”

”Dankon, Jonna. Mi bedaŭras. Estu certa, ke ni faros ĉion ĝis ni trovos la kulpulon.”

En posta interparolo kun la gepatroj de Jonna, la patrino konfirmas ŝiajn vortojn pri la eksamiko Omar:

”Jes, li vere estas timidulo kaj neniam kondukis agreseme aŭ malamike.”

Sed la patro ne konsentas.

”Vi forgesas ke la polico arestis lin! Pro tiu interbatalo!”

”Jes, sed tio ja estis dum manifestacio kontraŭ la nazioj! Kaj ili ne vere arestis lin, sed fortransportis per buso. Kaj ankaŭ Jonna’n. Mi pensas ke tio estis por eviti interbatalon kun la nazioj.”

”Kiam okazis tio?” scivolas Svedberg.

”La dekan de novembro, lastjare. Ne, ne, la antaŭlastan jaron, kompreneble.”

”Do Jonna kaj Omar tiam kune manifestaciis, ĉu?”

”Jes, estis cento da gejunuloj. Ili protestis kontraŭ la nazioj”, klarigas la patrino.

”Kaj ĉu vi scias, ĉu tiam Daniel estis inter la nazioj?” demandas Svedberg.

”Mi pensas ke ne”, ŝi respondas. ”Sed tiam ni ne konis lin.”

”Eble li estis tie”, kontraŭas ŝia edzo. ”Mi neniam komprenis, kiam li efektive forlasis ilin. Eble li faris tion nur kiam li renkontis Jonna’n.”

”Ne, tute ne! ŝi kontraŭas. ”Male, ili renkontiĝis ĉar li forlasis ilin. Vi ja neniam aŭskultas!”

”Kaj vi ĉiam kredas ĉion, kion ĉiuj diras al vi”, refutas li.

Svedberg ĝentile dankas kaj forlasas la familion Larsson.

6. Kiel fekmemori?

La malvarma vento ĉesis. La sunbrilo vekas printempajn florojn en ĉiuj parkoj kaj boskoj. Leontodoj ekinvas la gazonojn kvazaŭ galaksioj el flava stelaro. Vigliĝas vermoj, formikoj, muŝoj, papilioj kaj majskaraboj, sed la birdoj ne havas tempon ĉasi ilin, ĉar unue necesas amori. Poste aperos la idoj, kaj tiam komenciĝos senĉesa manĝokolektado.

La homoj, male, ne vigliĝas pro la suno. En ĉiu parko, sur ĉiu apudmura benko, sur ĉiu balkono kaj altano turnita suden vidiĝas homaj korpoj, palaj kaj senmovaj kiel mortintoj. Ili kolektas energion. Ili estas homaj sunpaneloj. Ili trinkas, sorbas, suĉas la sunradiojn per sia senpigmenta haŭto. Ili nudigas sin tiom, kiom permesas la pudoro, kaj en majo, ĉe la Baltmara bordo, la pudoro ne striktas. Almenaŭ dumtage ne. Vespere eble la hontosento reaperas, ĉar tiam la sunsorbintoj efektive ruĝiĝas. Precipe ruĝiĝas la partoj dumtage nudigitaj.

Roger Svedberg en sia ofica ĉambro ne vere nudigas sin, sed li pendigas sian lanan jakon sur la seĝodorson. Pli ol tiom oni ne postulu de sveda polickomisaro. Per helpo de kolego en la sekcio de sekureco, oni identigis du gvidantojn de la lokaj nazioj, trovis ilin kaj kondukis ilin por pridemandado en la policejo.

Carl Johan Hagerman, nomata Kalle, estas dudekkvinjara viro, alta, maldika, kun malhele blondaj haroj kombitaj malantaŭen. Ĉirkaŭ la buŝo ironie ridetanta kreskas semajnfinaj barbostoploj. Oni trovis lin en lia hejmo lunde tagmeze.

”Ĉu vi bonvolus diri kie vi pasigis la vesperon de la dektria de majo, tio estas la pasintan mardon”, petas Svedberg kun neŭtrala tono, verŝinte al si mem kaj al la junulo po glason da akvo.

”Marde... marde mi estis en Kristianstad.”

”Farante kion?”

”Politikan laboron. Estis kunveno de lokaj patriotoj.”

”Kaj kiam vi revenis al Kalmar?”

”Merkrede matene.”

”Bonvolu nomi kelkajn personojn kiuj povus atesti, ke vi estis tie.”

”Mi bedaŭras. Ili preferas resti anonimaj. Por eviti politikan persekutadon.”

”Kaj vendrede, posttagmeze kaj vespere. Kie vi estis? Tio estis la deksesa de majo.”

Li pripensas kaj elpoŝigas dikan poŝagendon.

”Ha, jes ja! Posttagmeze mi estis en Växjö, same por helpi la lokajn patriotojn. Vespere mia edzino kaj mi vizitis ŝiajn gepatrojn. Estis la naskiĝtago de mia bopatrino.”

”Kion vi faras profesie?”

”Savas Svedion.”

Svedberg ŝatus demandi ĉu tiu profesio estas bone pagata, kaj de kiu, sed tio ja ne rilatas al la murdenketo. La juna savanto estas ege trankvila kaj ŝajne neŝanceblebla.

”Ĉu vi militservis?”

”Bedaŭrinde nur du monatojn.”

”Kial?”

”Oni forpelis min pro politikaj motivoj.”

”Ĉu vi havas armilon?”

”Bedaŭrinde ne.”

”Kiel vi ekkonis Johan’on Wester?”

”Wester, ĉu? Mi bedaŭras... tiu nomo nenion signifas al mi.”

”Kiam vi lastfoje vidis Daniel’on Fridell?”

”Danne Fridell? Nu, lastfoje mi ne scias. Kredeble ni ankoraŭfoje renkontiĝos ie. Sed ĝis nun... verŝajne en iu kunveno... jes, mi parolis en la urba parko, kaj alvenis bando da krimuletoj por ĝeni nian kunvenon. La polico kompreneble pasivis, kiel ĉiam. Tio estis lastjare, en la mortotago de Karlo la dekdva.”

”La dekan de novembro, ĉu?”

”Ho, vi estas edukita persono! Gratulon!”

Ne eblas distingi ironion en la tono de Kalle Hagerman.

”Kiam li ekaktivis en la nazia rondo?” demandas Svedberg.

La juna viro rigardas lin per trankvilaj kaj penetraj okuloj.

”Kial vi uzas moknomon inventitan de niaj malamikoj? Ni estas svedaj patriotoj, naciaj demokratoj.”

”Kiam Daniel Fridell komencis aktivi en tiu rondo?”

”Eble antaŭ kvar aŭ kvin jaroj. Li estis en la periferio eble pli longe.”

”Kaj kiam li forlasis vin?”

”Neniam.”

”Ĉu neniam? Kion tio signifas?”

”Li ne forlasis nin, sed ni eksigis lin. Ni nuligis lian membrecon. Ekzilis lin.”

”Ĉu vere? Kial kaj kiam?”

”Pro lia senrespondeca konduto. Antaŭ unu jaro, pli-malpli.”

”Kia konduto?”

”Ni ne permesas uzadon de drogaĉoj.”

”Kaj ĉu li uzas tiajn?”

”Nun, mi ne scias, sed supozeble. Tiam jes.”

”Kiajn drogojn?”

”Mi tute ne konas tiajn fuŝaĵojn.”

Li rigardas firme, ŝajne sen palpebrumi, en la okulojn de Svedberg, kiu pluas:

”Dum li estis ano de via rondo, kian rolon li plenumis tie?”

Hagerman ironie ridetas.

”Ne pensu ke mi malkaŝos al la polico kiu havas kiun taskon.”

”Ĉu li publike reprezentis la organizon.”

”Ne. Sed li ŝatis debati. Interne kaj ekstere.”

Svedberg cerbumas. Ĉi tiu kazo ŝajnas al li plena je nefiksitaj fadenoj, kaj ju pli li tiras iun fadenon, des pli da novaj nefiksitaj finoj aperas. Li decidas reteni Kalle’n Hagerman dum kelka tempo kaj iras por aranĝi tion. La inspektoro Hans Andersson ĵus zumkantante revenis de sia lunĉa paŭzo kaj povas transpreni la demandadon. Svedberg komisias al Vivianne Ljunggren serĉi la edzinon de Hagerman por kontroli la asertojn de Kalle. Dume, li mem ekokupas sin pri la dua nazio, Ronald Sundberg.

Sundberg estas dudekjara, alta, fortika, eĉ diketa, kun hararo tiel mallonge tondita, ke malfacilas distingi la koloron. Li portas verdan militistan pantalonon kaj nigran T-ĉemizon. Surnuke estas tatuita aglo, kaj sur ambaŭ brakoj ia ornama plektaĵo en vikinga stilo.

”Bonvolu rakonti, kion vi faris vespere en la pasinta mardo.”

”Kiel mi fekmemoru? Kial damne mi estas ĉi tie?”

”Nur por atesti en krimenketo. Bonvolu respondi.”

”Kia diabla fekenketo? Mi faris nenion!”

”Troviĝas neniu akuzo aŭ suspekto kontraŭ vi. Ni nur kolektas informojn.”

”Do lasu min, damne! Kolektu de iu fekalia! Mi scias nenion!”

”Pri kio?”

”Kiel damne mi sciu?”

”Pasintan mardon, Ronald. Kion vi faris vespere?”

”Mardon aŭ merdon, fekegale! Kiel damne mi fekmemoru?”

”Kiel vi konas Johan’on Wester?”

”Fikiĝu! Mi konas feknenujn. Lasu min!”

”Kaj Daniel Fridell. Kion vi pensas pri li?”

”Glutu vomajon! Mi nenion fekpensas!”

Svedberg rigardas Ronald’on Sundberg, kiu sidas peze sur la seĝo, kun pendantaj brakoj kaj rigardo firme fiksita ĉe la rando de la skribtablo antaŭ li. Eĉ ne unufoje li levis la rigardon por renkonti tiun de Svedberg. Li impresas, kvazaŭ li povus eterne sidi tie malrespondante la demandojn, same kiel li sendube jam faradis dum jaroj antaŭ policistoj, instruistoj, eble gepatroj.

”En kiu lernejo vi laste studis?”

”Fikiĝu, damne. Mi ne fekstudis.”

Svedberg decidas interŝanĝi pridemandaton kun sia kolego Andersson. Eble tiu per sia malrapida persistemo povos elgajni ion el ĉi tiu ŝtiposimila junulo.

Dum preskaŭ du pluaj horoj Svedberg konversacias kun Hagerman, kun kelkfojaj interrompoj por interkonsiliĝi kun sia kolego, kiu vane klopodas enrompi tra la fekbariero de Sundberg. Tiam revenas Vivianne Ljunggren, oni lasas la du naziojn kaj kolektiĝas en la ĉambro de Svedberg. Intertempe alvenis ankaŭ kelkaj raportoj – tiu de la dua nekropsio, tiu el la dua murdoloko kaj tiu pri la kugloj. Svedberg unue fluglegas ilin kaj jen kaj jen laŭte citas ion al siaj gekolegoj.

”Eeh... Pafo el minimume kvinmetra distanco... Mortis vendrede inter tagmezo kaj la oka vespere... Ĉu vere ne eblas pli precizi? Aha, tio dependas de la nokta temperaturo... Sed kial ne demandi la meteorologojn pri ĝi? Bone, nu... Tuja morto... Nu, kion do atendi, se oni malfermas breĉon de orelo ĝis orelo?” Li lasas la unuan paperon kaj prenas duan. ”Neniu piedsigno, radspuroj de lia propra aŭto, neniu alia... Fingrospuroj de la mortinto sur la stirilo... Ĉe la apuda sidloko fingrospuroj de nekonato... Bone, ni savu la akvoglasojn de la du nazioj, antaŭ ol iu purigistino forportos ilin... Cetere iliaj fingretoj eble jam troviĝas en la registro... Nu, kio plu? Kuglingo trovita apud budo flanke de la domo... Jes, ni jam scias... Se la mortinto paŝis rekte de la aŭto ĝis la pordo, la pafo povus veni proksimume de la eta budo... Povus, us, us, us... Mi ne scivolas pri us, sed pri is!”

”La pafo eble povus veni de aliloke, se la mortinto turnis la kapon”, komentas Hans Andersson per ŝajne senemocia voĉo.

Svedberg pensas ‘se nun Jankéus restus inter ni, li dirus ion sarkasman pri mortintoj kiuj turnas la kapon’, kaj prenas la trian raporton.

”Jen! Identita armilo! Bone do. Nu, ni jam sciis tion, tamen estas bone *scii*, ke oni scias... Kalibro naŭmilimetra. Kanelita. Povus esti armea pistolo aŭ kio ajn...” Li rigardas la kolegojn kaj diras konklude: ”Do, nenio nova, vere. Vivianne, kion vi eksciis?”

Vivianne Ljunggren iomete levas la ŝultrojn kaj ekparolas en iom bedaŭra tono:

”Nu, la edzino konfirmis, ke ili estis kune vendrede vespere, kaj ankaŭ liajn ekskursojn al Kristianstad kaj Våxjö ŝi konfirmis. Almenaŭ li diris al ŝi, ke li iris tien. De ŝia laborejo mi eĉ sukcesis paroli telefone kun ŝia patrino, kiu same konfirmis. Ekde la sesa ĝis la deka, proksimume, la duopo vendrede gatis ĉe ili.”

”Tamen ja restas multe da tempo antaŭe por iri al Oelando kaj pafmuri la mortinton”, diras Hans Andersson penseme. Lia polica ĵargono

kvazaŭ imitas la raportan prozon, sed la kolegoj kutimas je ĝi kaj ne komentas ĝin.

”Ho, jen ankoraŭ detaletoj”, aldonas Vivianne Ljunggren. ”Sandra Hagerman, la edzino, donis al mi la numeron de ilia benzinkarto. Laŭ ŝi li aĉetis benzinon en Kristianstad, pagante per tiu karto. Se jes, la aĉeto devas esti registrita en la konto, kaj eblas vidi lokon kaj horon.”

”Sed ne la aĉetinton”, komentas Svedberg. ”Se tiu ordema edzino ekzemple mem irus al Kristianstad, la edzo povus dume pafi dek instruistojn. Tamen mankas motivo! Ni havas neniun ligan inter la unua murdo kaj iu ajn suspektito. Do, jam sufiĉas da spekulativoj. Kontrolu la benzinkarton, kaj ni simple laboru plu. Hans, bonvolu esplori ĉu iu el la du nazioj aŭ la somalian iam estis lernantoj de Wester. Vivianne, bonvolu peti helpojn de la narkotaj kolegoj por ekscii ĉu Daniel Fridell estas konata drogulo. Mi mem lasos la glasojn al la teknikistoj, kaj poste mi pridemandos tiun Omar’on. Ĉu necesos interpretisto? Kiom longe li estadis ĉi tie?”

”Mi pensas ke li eble naskiĝis en Svedio”, diras Vivianne Ljunggren. Atendu!”

Ŝi vokas iun telefone, laŭlegas identigan numeron, atendas momenton kaj ŝaltas la telefonon al laŭparola stato. Baldaŭ aŭdiĝas virina voĉo: ”Omar Duale, naskita en Kismanya, Somalio, en 1982, enmigris en Svedion en 1984, sveda civitano de 1995.”

”Nu, mi provu sen interpretisto”, murmuris Svedberg. ”Kondiĉe ke tiu blonda knabineto ne scias la somalian lingvon, li devus paroli svede...”

”Eble ili uzadis nur la korpan lingvon”, ridetas inspektorino Ljunggren.



Trovi Omar’on tamen ne tre facilas. Svedberg dum granda parto de la posttagmezo vagas inter lia hejmo, ia Somalia klubejo kaj la hejmoj de du onkloj. En ĉiu loko malfacilas trovi iun, kun kiu li povas interparoli svede. Fine li trovas la junulon en eta kafejo, kie li sidas babilante kun du samaĝuloj ĉe glaso da kolao. Svedberg preferas ne venigi lin en la policejon, sed en lia hejmo ne troveblas loko trankvila. Do, post iom la policisto kaj la junulo promenas interparolante laŭ la stratoj de norda kvartalo.

”Ĉu vi konas la nomon Daniel Fridell?” Svedberg komencas.

Omar rigardas lin demande kaj poste iom hezite respondas:

”Jes... mi pensas ke jes.”

”Kiel vi konas lin?”

”Mi pensas, ke li estas la kunulo de... de Jonna...”

”Jes. Kiam vi lastfoje vidis lin?”

”Mi ne vere konas lin. Verŝajne mi vidis lin nur du-trifoje. Eble lastfoje en manifestacio kontraŭ rasismo. Antaŭ duonjaro. En la urba parko.”

”Kion vi faris vespere la pasintan mardon?”

”Mardon? Mi ne scias... verŝajne mi estis hejme... aŭ ĉe amiko... televidante...”

”Kiu amiko?”

”Eee... mia kuzo... ne, marde mi eble estis ĉe Ali... Ali Awale... Kial do?”

”Kion vi spektis televide?”

”Mi ne precize memoras. Nenion specifan... Eble marde estis futbalo... Champions League... Juventus...”

”Kaj vendrede, kion vi faris?”

”Nenion... tio estas... vespere mi eble estis hejme... aŭ ĉe amiko... Ne, mi estis hejme, ĉar vendrede mia patro iris al preĝo...”

”Ĉu vi studas aŭ havas laboron?”

”Ne, ne eblas trovi laboron.”

”Kion vi faris dumtage vendrede?”

”Dumtage? La samon... babilis kun amikoj... butikumis...”

”Kiam vi ekkonis Johan’on Wester?”

”Mi ne scias... Kiu li estas?”

”Kaj Jonna’n? Kiam vi unue renkontis ŝin?”

”Kio pri Jonna? Ĉu io okazis al ŝi?” Omar ekhavas maltrankvilan mienon. Post nea respondo de Svedberg, li diras:

”Unuafoje en la lernejo. Mi estis en la naŭa klaso, kaj ŝi en la sepa.”

”En kiu lernejo?”

”Tiu – tiu de Djurängen.” Li faras geston al iuj brikaj konstruaĵoj trans eta kverkaro.

”Tamen ŝi loĝas en Smedby, ĉu ne?”

”Jes, nun. Sed tiam ŝia familio loĝis tie, apude. En la vicoseriaj domoj.”

”Dum kiom da tempo vi estis – kunuloj?”

”Ne longe. Du jarojn. Sed ne tuj. Ne kiam mi restis en la lernejo. Nur poste.”

”Kiel finiĝis la afero?”

Omar suspiras.

”Nu... ĝi finiĝis iom post iom. Estis malfacile... Ŝiaj gepatroj ne ŝatis min, almenaŭ la patro ne... Kaj miaj gepatroj ne ŝatis ŝin... Kaj... estis malfacile, ĉar... mi volas esti certa pri mia kunulino, ĉu ne? Sed pri svedaj knabinoj tio ne eblas... Oni neniam povas esti certa...”

”Ĉu tio okazis pro Daniel?”

”Daniel? Ne, ne. Ni ne konis lin tiam. Li aperis pli malfrue...”

”Kiam do finiĝis via rilato kun Jonna?”

”Je Novjaro. Ne la lasta, kompreneble, sed la antaŭlasta. Ni ne povis interkonsenti kiel festi ĝin, kaj post tio ni disiĝis.” Li sulkas la frunton kaj klarigas paŭze: ”Mi ne volis, ke ŝi trinku alkoholon, ĉar oni ne scias, kio povas okazi.”



Vespere en la policejo Svedberg pli zorge tralegadas la teknikajn raportojn por eble trovi ion, kio ĝis nun ne frapis lin. Sed ĉio impresas konata kaj evidenta. Ĝuste kiam li decidas hejmeniri, Vivianne Ljunggren telefonas.

”Saluton! La kolegoj ne konas Daniel’on, sed mi interparolis kun konata drogvendisto kiu momente liberas. Li kompreneble diris nenion klaregan, sed mi subkomprenis, ke Daniel eble iam aĉetis amfetaminon. Almenaŭ tiel mi interpretis lian umadon.”

”Hm. Interese. Sed ĉu lastatempe aŭ antaŭlonge?”

”Tiel detale mi ne kuraĝas interpreti lin. Sed mi dubas ĉu lia memoro atingas tre foren en la historion. Li ŝajnas mem konsumi sufiĉe da. Fojfoje mi ne certis, ĉu li parolas kun mi aŭ kun iu nevideblulo.”

7. Majpluvon donacu

Merkrede matene. Pasis semajno post la unua murdo, sed pri ĝi aperis apenaŭ unu ideo. Oni dediĉas sin al la dua, esperante ke iel solvante ĝin, oni prilumos ankaŭ la unuan. La fingrospuroj en la aŭto de Daniel Fridell ne venis de iu el la du nazioj. "Mi supozas ke li kutimis veturigi sian amikinson, ĉu ne?" diras Vivianne Ljunggren, kaj tio ŝajnas tre probabla.

Sur la fenestrovitro de la ofica ĉambro akvogutoj palpe frapetas. La sunadorantoj jam malaperis de ĉiuj balkonoj kaj parkoj. Se ne, ili povus ĝui refreŝigan duŝon post la sunbano.

Hans Andersson malfrue eniras en la ĉambron de Svedberg. Li montras ege kontentan mienon, kaj tra la lipoj aŭdiĝas ia zumkanto.

"Pardonon? Ĉu vi diris akvumi?" distrite demandas Svedberg.

"*Majpluvon donacu, nin dense aspergu, la herbojn varmrose akvumu*", kantas Andersson pli klare.

"Hm", recenzas Svedberg lian kanton.

"*Lamentado pri printempo seka kaj malvarma*", klarigas la kantinto. "De Lars Vivallius."

"Mi kredas vin", koncedas Svedberg. "Sed prefere ni iom akvumu la enketon. Hodiaŭ ni profundigu la pridemandadojn. Hans, vi prenu la patrinon de Fridell. Vivianne, vi parolu kun la knabino, tio estas Jonna Larsson. Mi mem iros refoje al la vidvino Wester."

"La gaja vidvino", murmuris Andersson. "Sed ni havas ankoraŭ unu personon, kiun indus pridemandi."

"Tre kredeble. Pri kiu vi pensas?"

"Nu, vi ja taskis al mi esplori, ĉu iu el la junuloj iam estis lernanto de Wester. Tamen ŝajnas ke li instruis neniun el la suspektatoj. Sed mi trovis alian interesan koincidon." Li paŭzas, kvazaŭ por atendi interesitajn demandojn. Ĉiuj tamen mutas, do li pluas:

"La mortinto, tio estas la dua viktimo, antaŭ unu jaro partoprenis en kurso ĉe la urba gimnazio por adoltoj. Pri tre interesa temo: 'Krimo kaj puno'. Kaj kiu prelegis tie? Faris tion Tom Jankéus!"

Ĉiuj rigardas lin konfuzite, kvazaŭ atendante klarigon. Tamen nenio sekvas. Fine Svedberg malpacience diras:

"Bone, sed kiel tio povas rilati al la murdoj?"

"Prefere demandu de min, sed la eksinspektoron Jankéus", respondas Andersson gravmiene.



Amanda Wester ne estas hejme, kaj ŝia butikio estas fermita. Tamen, post ses telefonsignaloj al ŝia butika telefono, ŝi levas la parolilon, kaj post interkonsento kun ŝi, Svedberg povas plaŭde tra akvoflakoj paŝi preter kelkaj domblokoj ĝis ŝia butiketo. Ŝi enlasas lin tra malantaŭa pordo, kun kuspitaj manikoj kaj argilmakula antaŭtuko.

”Mi ĵus finis fajencan vazon. Tio estas la sola afero, kio povas forpeli la pensojn”, ŝi diras. ”Ne, tamen ne forpeli, sed... eble senarmigi ilin.”

Dum ŝi lavas la manojn kaj brakojn, Svedberg staras en la fermita butikio, rigardante eksponitajn objektojn. Jen kunpuŝiĝas vazoj, kruĉoj, teleroj, kolĉenaj ornamaĵoj, nomtabuloj kaj aliaj ceramikaĵoj. Statueto en formo de virina kapo kun blua hararo rigardas al kvar-kvin bovloj, tajlitaj kiel kuŝanta gravedulino. En ĉiu malfermita ventro kuŝas malgranda ceramika bebeto.

”Strangaj, ĉu?” dorse aŭdiĝas la voĉo de la artistino, kies manoj nun estas puraj kaj ruĝaj. ”Des pli, eble, ĉar mi mem ne havas infanon. Anstataŭe mi faras ilin el argilo”, ŝi pale ekridas. ”Sed mi malofte sukcesas vendi tian. Tro makabraj, eble.”

Ili iras sidiĝi sur sofion en malvasta ĉambreto inter la butikio kaj la ateliero. Ŝi glatigas la kovrilon de la sofio kaj forblovigas fruntan harfaŝkon, kiu falis antaŭ la okulojn. Svedberg ne scias kiel komenci.

”Mi laboris dum jaroj kun Tom Jankéus”, li diras kaj preskaŭ same surprizas sin mem kiel la virinon. ”Li estas tre bona esplora policisto.”

”Detektivo, ĉu?” diras Amanda Wester kun ombro de rideto.

Svedberg rigardas ŝin kaj samtempe vidas en si la iaman kolegon. Li plurfoje renkontis ankaŭ la edzinon de Tom Jankéus. Kiel malsimila estas ĉi tiu virino – kvieta, enpenŝiĝema, iel enigma – kompare kun la vigla, babilema Annette Jankéus! Nu, kial do pensi pri tiaj aferoj, kiuj ja tute ne tuŝas lin? Li havas murdenketon por plenumi!

”Via geedzeco daŭris... kiom longe?” li demandas.

”Ses jarojn.”

”Ĉu vi dirus ke vi profunde konis vian edzon?”

Ŝi silentas dum momento. Amara rideto tanĝas la lipojn, rideto kiu ne atingas ĝis la okuloj.

”Ĉu eblas ĝisfunde koni iun?” ŝi kontraŭas.

”Ekzemple, pri junaj nazioj... ĉu via edzo havis ian opinion? Ĉu li havis spertojn renkonti ilin?”

”Nazioj? Mi pensas ke ne.”

”Ĉu ne? Ĉu li nenion opiniis?”

”Certe li ne simpatiis kun tiaj ideoj. Sed kredeble ni neniam parolis pri tio. Kial do?”

”Aŭ pri afrikanoj?”

”Afrikanoj? Kion mi diru pri afrikanoj? Mi tute ne komprenas viajn demandojn...”

”Aŭ pri drogaĉoj?”

”Pardonu... Ĉu vi seriozas? Kion vi scivolas?”

”Sinjorino Wester, iu intence kaj planite murdis vian edzon. Tia murdinto havas motivon. Ĝi povas esti motivo stranga, malsana, tamen ia motivo troviĝas. Por trovi la murdinton, ni serĉas eblan motivon.”

”Jes, sed... ĉu vi suspektas naziojn, afrikanojn kaj drogulojn?”

”Jes! Interalie. Krome mi suspektas personajn malamikojn, insultitojn, heredontojn, kokrantojn, trompitojn. Mi suspektas ĉiujn, kiuj ial povus senti antagonismon al Johan Wester. Jen mia profesio.”

Ŝi frotas la senŝminkajn lipojn per fingro kaj pensas. Poste ŝi seriozmiene kapjesas kaj diras:

”Vi kompreneble pravas. Do, vi suspektas ankaŭ Tom kaj min.”

”Se diri sincere: tamen ne tre. Mi ĉefe volas ke vi komprenu, ke mi bezonas ekscii ion el la vivo de via edzo, kie povus kaŝiĝi tia motivo. Sed ĝis nun mi eksciis nenion. Ĉu troviĝas parencoj, ekzemple? Pli frua edzino aŭ amikino? Kio en lia vivo estas ŝlosilo al la murdo?”

Ŝi rigardas lin silente. Dum tempeto neniu parolas. Poste ŝi denove kapjesas kaj diras:

”Mi komprenas, sed mi povas nenion aldoni. Li havas... troviĝas fratino, kiu vivas en Sundsvall. La patro jam mortis, kaj la adreson de mia bopatrino mi jam donis. Pri eksulinoj mi nenion scias. Cetere... cetere, ĉu vi tute ne konsideras la eblon, ke povus esti eraro, aŭ frenezulo?”

”Ĉi tiu murdanto ŝajnas nek freneza nek erarema. Vi ja scias, ke okazis dua murdo.”

”Sed... ĉu nepre temas pri unu sama?”

Svedberg rigardas ŝin, sulkas la frunton kaj decidas resti je la regularo. Do li ne respondas, kvankam tio apenaŭ plu gravas. Anstataŭe li petas Amanda’n Wester kontakti lin se ŝi rememoros ion. Poste li forlasas la butiketon kaj replongas en la densan majpluvon.



La interparolo de inspektoro Andersson kun Marianne Fridell, la patrino de Daniel, donas malmulte da novaj ideoj. Ŝi emfaze neas, ke la filo iam ajn uzis narkotaĵojn. Pri la nazioj ŝi povas nenion aldoni, ĉar ”Daniel ja delonge forlasis tiun rondon; tio estis nur junula ideo, nenio grava”. Ŝia ĉefa

suspektato restas "la afrikanoj", kaj la motivo laŭ ŝi sendube estas "la familia honoro de tiu nigra junulo".

"Ĉu iu efektive konkrete minacis Daniel'on?" demandas Andersson.

"Mi ne scias, ĉu ili rekte diris ion, sed mi ĉiam nervoziĝas kiam mi vidas nigrulojn en la urbocentro. Kaj ili ĉiam aperas multope! Kial ili estas tiel multaj?"

Andersson demandas ankaŭ pri la lerneja tempo de Daniel. Laŭ la patrino, li bone sukcesis en la studoj, precipe en la gimnazio. La lastjara kurso pri krimo kaj puno estas nekonata al ŝi. La ĉarpentista laboro de Daniel ne tute kontentigas ŝin, ĉar "li devus trovi ion pli bonan, kun lia kapo..."

Ŝi ankaŭ ne komprenas, kion ŝia filo volis fari en la somerdomo en printempa posttagmezo. "Eble li postlasis ion tie", ŝi supozas sed ne povas precizigi, kio tio povus esti, nek kiel la murdinto sciis tion.

Post la vizito ĉe sinjorino Fridell, Hans Andersson pluiras al la konstrukompanio kiu dungis Daniel'on. En la eta oficejo neniu konis lin, do li ankoraŭ pluiras al domo konstruata sur insuleto proksime al la urbocentro. La inĝeniero Arne Rydstedt estis la plej proksima estro de Daniel.

"Li bone laboris, kiam li laboris", koncizas la inĝeniero.

"Ĉu li ofte forestis?"

"Nu... ne tre, tamen tro."

"Kial?"

Rydstedt levas la ŝultrojn.

"Malsanoj, laŭdire."

"Sed efektive temis pri io alia, ĉu?"

"Mi ne diris tion."

"Tamen vi eble suspektis. Ĉu lundaj malsanoj, ekzemple?"

"Povas esti. Ne eblas kontroli. Kiam li laboris, li estis sobra."

"Ĉu temis nur pri alkoholo, aŭ ankoraŭ..." provas Andersson. La polica enketidealo, laŭ kiu oni devas fari demandojn neŭtralajn, ne gvidajn, laŭ lia sperto ofte ne donas sufiĉan rezulton.

"Kiel mi diris, ne eblas kontroli."

"Iuloke oni ja faras testojn per urino."

"Ankaŭ ĉe ni, sed nur post serioza problemo aŭ suspekto. Kun Daniel ne estis tiel."

"Ekzemple lastan vendredon, la 16an, ĉu li laboris?"

La inĝeniero petas lin atendi sekundon kaj iras kvin paŝojn, poste krias al iu persono ne videbla de Hans Andersson:

"Janne! Ĉu Danne Fridell laboris lastan vendredon?"

Obtuze aŭdiĝas trenata respondo:

"Duonon, mi pensas... Li malaperis tagmeze..."

Kiam Arne Rydstedt revenas, li ripetas la vortojn de la nevidebla Janne. Andersson plu demandas:

”Ĉu vi konis lian politikan agadon?”

”Ĉu politikan? Vi celas tiun flirtadon de hokokrucoj? Mi ne nomus tion politiko.”

”Ĉu ĝi iel influis lian laboron?”

”Laŭ mia scio ne. En konstruejo ne facilas alporti tian merdon. Jen duono de la uloj estas komunistoj. Ili ŝtopus al li la buŝon.”



Laŭ la priskribo de Svedberg, Vivianne Ljunggren atendis trovi nematuran dekokjarulinon kun konduto de eĉ pli juna knabino. Sed al ŝi Jonna Larsson impresas tute alia, intensa, plena je energio, klarvida. Estas evidente ke la morto de ŝia koramiko skuis ŝin, tamen ŝi aperas nek tima nek konfuzita, sed ege koncentrita. Post du tagoj hejme ŝi hodiaŭ jam reiris al sia lernejo, gimnazio preskaŭ apud la policejo. Jen la inspektoro trovas ŝin en paŭzo inter la lecionoj.

”Ni povas sidi en eta laborĉambro de la lerneja komitato”, proponas la knabino. ”Mi estas ĝia sekretario kaj havas ŝlosilon tien.”

Do, en sufiĉe kaosa ĉambreto plena je broŝuroj kaj paperoj ili sidiĝas sur du eluzitaj lernejoj. La ĉambro troviĝas keletoĝe, kaj lumigas ĝin ĉefe skribtabla lampo kun rompita kapuĉo. Surmure troviĝas afiŝoj kun mesaĝoj kiel ”La lernejo – nia laborejo”, ”ni estas la spertuloj” kaj ”neniu rajtas subpremi vin”.

”Jonna, por trovi la murdinton ni bezonas pli bone kompreni Daniel’on”, ekas la policistino. ”Li ja estis nazio kaj poste forlasis tiun rondon. Ĉu li vere tute ŝanĝis opiniojn?”

”Jes. Mi pensas ke jes. Tamen li ofte esprimis malsamajn, malkoheraĵajn ideojn. Laŭ mi li tre hezitis pri multaj aferoj, sed li neniam volis montri tion. Li ĉiam volis havi tre klaran, decidan opinion, eĉ se li nenion sciis pri la afero.”

”Kaj ĉu estas vere, ke li partoprenis en manifestacioj kontraŭ la nazioj?”

”Jes, kaj ĝenerale kontraŭ rasismo. Mi ne volis ke li iru tien, sed li absolute ne volis rezigni tion.”

”Kial vi ne volis ke li iru?”

”Mi timis, ke tio eĉ pli provokos la naziojn.”

”Ĉu vi antaŭtimis, ke iu faros ion kontraŭ li?”

”Jes, evidente. Ili ja minacis lin. Almenaŭ Daniel diris, ke ili minacis lin.”

”Kiu minacis?”

”Mi ne vere scias. Verŝajne ne tiu Kalle Hagerman, ĉar li estas inteligenta persono. Sed kelkaj el ili estas veraj... veraj brutoj!”

”Ĉu vi povus imagi, kial Daniel iris al la somerdomo lastan vendredon?”

Dum momento la knabino kaŝas la okulojn permane, poste ŝi levas la kapon kaj rigardas la policistinon respondante:

”Ne, tute ne.”

”Ĉu li ofte iris tien?”

”Mi pensas ke ne.”

”Ĉu eblas ke iu kontaktis lin por renkontiĝi tie?”

”Mi ne scias kiu povus fari tion.”

”Ĉu iu el la nazioj?”

”Tio ŝajnas nekredebla. Sed eble sub ia falsa preteksto...”

”Kiel ekzemple?”

”Mi vere ne scias. Li ja konis ilin, ĉiujn. Ili ne estas multaj. Mi tute ne komprenas.”

Vivianne Ljunggren pripensas kiel trakti la sekvan temon. Eble necesus ia kromvojo. Sed ĉi knabino ne estas stulta, ŝi tuj malkaŝos pri kio oni umas.

”Jonna, ĉu vi bone konis la kutimojn kaj vivmanieron de Daniel?”

”Jes, sufiĉe. Ni pasigis multe da tempo kune. Li ne tre bone interrilatis kun sia familio.”

”Ĉu vi ofte festenis kune?”

”Fojfoje.”

”Ĉu kun alkoholo?”

Jonna kuntiras la brovojn kaj mienas suspekteme respondante:

”Nu... iom. Ne tro multe.”

”Ĉu ankaŭ kun aliaj drogoj?”

”Ne.”

”Ĉu Daniel aliokaze uzis ion alian?”

”Ne. Mi pensas ke ne.”

Vivianne Ljunggren rigardas la vizaĝon de la dekokjarulino. Ne eblas vidi ĉu ŝi ion kaŝas. Aliflanke ne eblas scii, ĉu videblas, se ŝi vere kaŝus ion. Firma respondo povas kaŝi krudan mensogon, dum sincerulo fojfoje balbutas ege nerveze kaj suspektinde. Kaj juna persono ofte havas multajn okazojn ekzerci sin per mensogetoj al gepatroj kaj instruistoj. Honesta mieno nenion garantias.

8. Pli efika dormigilo

Damne! Vi kvazaŭ petas pri ĝi! Teretaĝe vi loĝas, kun fenestroj duflanke, en domo senkela, do de ekstere oni pli-malpli libere vidas en vian hejmon. Kvazaŭ al putino, kiu diskurre invitas ĉiun ajn. Nur via nomo ĉe la pordo. Ankaŭ telefonlibre ĉe via nomo troviĝas neniuj "kaj". Kompreneble ne! Neniu normala viro povus vivi kun tia megero. Kredeble vi ne bezonas tiajn aferojn. Eble vi ĝuas aŭdi pri la suferoj de viaj klientoj, putino! Jes, kompreneble! Vi certe orgasmas kiam vi turmentas ilin per demandoj, demandoj, diablaj demandoj sen fino. Tamen nun estos fino. Vi findemandis, putinaĉo! Se nur la lumo estingiĝos en tiu fenestro oblikve kontraŭa. Poste mi atendos duonhoron. Se la homoj jam dormos, ili ne tuj saltos el la lito pro unusola akra sono. Ili atendos plian sonon. Eble, kiam neniuj pliaj sonoj sekvos, iu scivolema ulo ĝisiros la fenestron por tamen esplori, kio okazis. Sed tiam mi jam estos je ducent metroj for, ĉe mia aŭto. Feliĉe tre proksimas la nacia ŝoseo. Vi vere ekloĝis en konvena loko. Jes, damne, vi vere petas pri ĝi! Vi kvazaŭ preparis ĉion por ricevi mian kuglon rekte en la frunton. La sola afero, kiu nun povus ĝeni mian taskon, estas se tiu diabla lumo ne estingiĝos. Kompreneble mi povus pafi malgraŭ ĝi, tamen mi preferus nur dormantojn ĉirkaŭe. La aliaj lokoj estis pli ŝirmitaj. Jen mi estas meze inter plurfamiliaj domoj. Espereble vi mem tamen ne tro peze dormas. Aŭ ĉu vi estas tia hipokritulo, kiu mem uzas dormigilojn, kvankam vi diras al aliaj, ke tio ne donas normalan dormon. Se jes, vi eble ne aŭdos, kiam mi ĵetos iom da gruzo sur vian kuirejan fenestron. Nu, damne, ne indas nun pensi pri tio. Tiam mi elpensos alian solvon. Ne kredu ke vi eskapos per kelkaj damnitaj dormigiloj. Se necese mi eniros vian apartamenton ĉe la alia flanko. Dangere, sed mi ne timas. Mi ĵuras, ke mi pafos al vi pli efikan dormigilon! Aŭ mi trovos vin en via laborejo. Mi povus ŝajnigi esti kliento, ĉu ne? Surpriza revido! Ne kredu, ke mi estas tia molulo, kiel vi trovis min tiam. Mi jam scias, kion mi bezonas por esti hardita kiel ŝtalo. Nun neniam plu vi ridindigos min. Nun mi montros al vi, kiu el ni estas fortulo, kaj kiu nura kadavro. Glutinte ĉi tion, mi imunas kontraŭ via abrakadabro. Finfine mi scias, kio mankis al mi, kaj tio ne estis vi. Vi ne mankis al mi tiam, kaj vi ne mankos al mi post ĉi tiu renkontiĝo. Vi estas superflua putinaĉo, kaj mi faros servon al la mondo, eliminante vin. Kredu min, sinjorino, mi kraĉus sur vian kadavron, se mi havus tempon. Kaj irante hejmen mi ridos ĉe la stirilo. La tutan vojon suden, ducent kilometrojn, mi ridos! Tamen, ĝis tiam mi pacience atendos. Pli-malpli frue oni estingos tiun damnitajn lumon. Pli-malpli frue mi estingos vian mizeran vivon. Putinaĉo!

9. Elegio al muzo

Ĵaŭde matene Roger Svedberg venas malfrue al la policejo. Dumnokte li cerbumis pri la du murdoj kaj pri la enketado, kiu ĝis nun donis neniun vere gravan rezulton. Li decidis ke oni hodiaŭ priserĉu la loĝejon de Daniel Fridell por eble trovi ian spuron, ian indikon kial li iris al la somerdomo, aŭ kiu logis lin tien.

En la koridoro survoje al sia ĉambro li kunpuŝiĝas kun Hans Andersson, kiu kvazaŭ blinde elpaŝas el sia ĉambro. Anstataŭ pardonpeto li diras:

”Svedberg! Finfine! Ŝajnas ke ni jam havas trian.”

”Trian kion?”

”Murdon, kompreneble. Tamen ne ĉe ni. En Norrköping. Sed ĝi similas. Unu pafado en la kapon. Tra fenestro, de ekstere. Same kiel la unua.”

Dek minutojn poste Svedberg telefone interparolas kun sia kolego Willy Rosenlund en la policejo de Norrköping, 250 kilometrojn norde de Kalmar. Ĉeestas ankaŭ inspektoro Andersson, do necesas ŝalti la laŭtparolilon, kvankam Svedberg abomenas paroli per laŭtparola telefono.

Rosenlund montriĝas parolema kolego, kiu volonte rakontas detalojn pri la afero. Ĝi okazis ne en la urbo Norrköping mem, sed en apuda urbeto Söderköping. La pafito estas virino, Sonja Persson, kaj ŝi ankoraŭ ne mortis sed kuŝas hospitale en komato. La atenco okazis je la unua horo nokte, najbaroj tuj alvokis policon kaj ambulancon, tamen restis neniuj spuro de la pafinto. Oni tamen jam arestis suspektaton, do troviĝas granda ŝanco ke la kazo estos rapide solvita.

”Kiel eblis aresti lin, se restis neniuj spuro?” scivolas Svedberg.

”Li estis jam konata. Temas pri eksamato, rifuzito, kiu ne volis lasi ŝin en paco. Jam dufoje ŝi vokis la policon por fini lian ĝenadon. Malsimpatia ulo. Nomas sin poeto sed estas nur aĉa alkoholulo, se diri la veron.”

”Kaj kiel vi kaptis lin?”

”En lia loĝejo en Norrköping, dormanta en sufiĉe ebria stato. Li neas, kompreneble, sed ni certe moligos lin post iom...”

Svedberg sulkas la frunton, perfingre masaĝas la brovojn kaj paŭzas. Ĉu vere eblas, ke la kolegoj aliloke tiom pli efike laboras ol li mem? Dume Hans Andersson demandas pri la speco de armilo uzita, kaj ili ekscias, ke temas pri unu pafado de naŭmilimetra pafilo. La kuglingo kuŝis malantaŭ arbusto je kelkaj metroj de la kuireja fenestro. Kuglon oni ankoraŭ ne trovis, se ne la kirurgoj per operacio elfosos ĝin enkaŭ.

”Ĉu vi scias, ĉu via suspektito havas iajn kontaktojn kun Kalmar?” demandas Andersson.

”Efektive jes”, sonas la respondo el la laŭtparola telefono. ”Laŭ la loĝantara registro, li naskiĝis tie.”

Nun Svedberg alprenas normalan mienon kaj sciigas mallonge, ke li volas tuj viziti la kolegojn en Norrköping por kunordigi la du enketojn. Rosenlund ŝajnas ne tro entuziasma pri tio, tamen oni interkonsentas pri renkontiĝo post la lunĉa paŭzo.

”Tio ja sonas absolute freneze”, komentas Svedberg post la fino de la telefona interparolo. Poste li silentas. Li preferus iri al Norrköping kun iu alia kolego ol ĝuste Hans Andersson. Refoje aperas en lia memoro la enketoj plenumitaj kunlabore kun Tom Jankéus. Iliaj aŭtadoj tien-reen, babiloj enaŭte, pridemandadoj al diversaj atestantoj kaj suspektatoj. La ironio de Jankéus. Liaj apartaj dirmanieroj. Nu, vanas revadi pri tio. Cetere, kion faras hodiaŭ Vivianne Ljunggren? Ĉu ŝi havas liberan tagon? Li ne memoras ĉu ŝi anoncis tion. Nu, li ne nepre bezonas kunvojaĝanton. Li povos iri sola. Prefere sola ol kun Andersson. Prefere taski al li traserĉi la loĝejon de Daniel Fridell.

Estas bela tago meze de majo. La ŝoseo pli-malpli laŭiras la marbordon, tamen laŭlonge de ĝi oni vidas ĉefe arbaron. Malhelan picearon kaj ĵus ekverdantajn arbaretojn el betuloj, tremoloj, sorpujoj, kverkoj. Post preskaŭ tri horoj Svedberg parkas sian aŭton apud la policejo de Norrköping. Restas duonhoro ĝis la interkonsentita tempo, do li iras por ion manĝeti. Japana restoracio tute apuda ne logas lin, do li plupaŝas ducent metrojn kaj aĉetas pli tradician svedan hamburgeron kun francaj terpomfritoj kuirataj de knabino el Turkio aŭ pli fore, je akompano de usona furormuziko. Post tio li pretas por la tria kazo de unufoja pafado.

Komisaro Rosenlund refoje prezentas la ĝisnunajn rezultojn. Svedberg aŭskultas kun zorgoplena mieno. Poste li siavice resumas la bazajn faktojn pri la du antaŭaj murdoj, dum Rosenlund rigardas lin kun mieno de enuo. Ili tamen interkonsentas kompari la kuglojn, se iam la tria kuglo estos trovita. Jam laŭ la kuglingoj eblos vidi, ĉu temas pri samspeca municio. Sed ĉi teknikajn detalojn oni lasu al la ŝtata krimteknika labo.

La suspektato ŝajnas al Svedberg ne tre interesa. La kvindekjara nenifarulo aŭ poeto Sten Johansson ja naskiĝis en Kalmar, tamen de jardekoj ne plu vivas tie. Malfacilas kompreni kian ligan li povus havi al la murdintoj tie, juna konstrulaboristo kaj mezaĝa instruisto. Cetere malfacilas kompreni kiel li tiel aŭdace kaj fridsange pafis la virinon en apuda urbeto, por poste kaptiĝi dormanta en ebrio. Malfacilas eĉ kompreni kiel li revenis hejmen, ĉar laŭ la esploro li ne posedas aŭton. Eble per ŝtelita aŭto. ‘Aŭ li mendis taksion’, pensas Svedberg, memorante, ke ion similan eble

elbuŝigus Tom Jankéus, se li ĉeestus. Strange. Iam liaj bizaraj komentoj incitis lin, kaj nun ili mankas al li.

Pli interesa ŝajnas al li la viktimo. Ŝi estas la kvardekkvinjara psikologino Sonja Persson, naskita en Malmö, de tri jaroj loĝanta en Söderköping, sed antaŭe dum ses jaroj loĝinta en Kalmar.

”Ĉu kun la poeto?” tuj sciolas Svedberg.

”Tute ne. Mi jam diris, ĉu ne, ke li vivas ĉi tie delonge, dum ŝi alvenis pli juse.”

”Psikologino, do”, plu murmuris Svedberg. ”Kie ŝi laboris... aŭ pli ĝuste laboras?” Li preskaŭ forgesis, ke ĉi lasta pafito ankoraŭ vivas, kvankam en komato.

Rosenlund ne scias parkere respondi, sed post kelka tempo li trovas noton.

”En la urba hospitalo.”

”Ĉu de Söderköping?”

”Ne, de Norrköping. Sed nun ŝi kuŝas en tiu de Linköping.”

Svedberg ne komentas la mankon de fantazio ĉe la urbonomaj finaĵoj de la regiono, sed li notas la faktojn. Dum li cerbumas pri eblaj kunligoj inter la tri pafitoj, iu policisto venas en la ĉambiron por raporti al Rosenlund.

”Iu viro en Söderköping lasis telefonan atestajon. Li aŭdis per radioelsendo pri la murdatenco, kaj tiam li rememoris, ke ĉi-nokte je la unua horo li vidis iun figuron, kiu kuris al aŭto kaj ekforveturis rapide de la strato Talgoxestigen. Laŭ li la aŭto poste turniĝis suden.”

”Figuron, ĉu? Kiaspecan?”

”Li ne povis vidi bone, sed li supozis ke temas pri viro. Pantalono, kapuĉojako. Malhelaj koloroj.”

”Hm. Ne tre precize, ĉu. Kaj la aŭto?”

”Li notis nek markon nek numeron. Estis nenio stranga, nur homo kuranta. Li diris, ke la aŭto eble estis ruĝa, sed laŭ mi tio estas nur diveno.”

Komisaro Rosenlund ŝajnas opinii, ke tiu nova atesto ne tre utilas al la kazo, sed Svedberg ne konsentas. Ĉefe pro ĝentileco li akceptas ĉeesti dum pridemandado de la suspektato Johansson. Tio donas al li okazon aŭskulti deklamadon de ĵus verkita elegio pri la morto de l’ muzo *Erato*, aŭ almenaŭ duonon de ĝi, antaŭ ol Rosenlund ĉesigas la poezian prezentadon. La poemo ĉiuokaze ne restas en la memoro de Svedberg kaj sekve ne estos citata en lia enketraporto. Lian kapon anstataŭe plenigas konsideroj pri ebla rilato inter psikologino, eksnazio kaj instruisto pri la lingvoj sveda, angla kaj germana. Se li trovus tiun rilaton, li certas ke ĝi kondukus lin al la persono, kiu tre sisteme kaj efike decidis, ke ili ne plu rajtas vivi.

Reveturante suden, Svedberg decidas rigardi la murdlokon. La ŝoseo trairas la idilian urbeton Söderköping, kaj li implikiĝas en ĝiaj kurbaj stratetoj inter lignaj dometoj kaj mezepokaj preĝejoj. Tiu labirinta irado

tamen montriĝas tute superflua, ĉar la strato de la murdoloko, kiam li finfine trovas ĝin, situas en moderna kvartalo sude de la malnova urbeto, tute proksime al la ŝoseo kiu kondukas plu suden. Li parkas sian aŭton, verŝajne sur la sama asfalta ebena, kien nokte kuris iu figuro en kapuĉa jako. De ĝi estas cent kvindek metroj ĝis la ĝusta adreso, kie la konataj plastrubandoj policaj indikas, ke jen io terura rompis la ĉiutagan rutinon. Aŭ pli ĝuste la ĉiunoktan. Videblas truo tra fenestrovitro proksime al pordo kun ceramika nomtabulo indikanta la solan nomon *Sonja Persson*. Iel tiu tabuleto impresas al li konata. Ĉu eble mendita kaj aĉetita en Kalmar'a butiketo? Neniu policisto gardas, do li ne povas eniri la loĝejon. Dum minuto li gapas al densa arbusto, kiu supozeble kaŝis la pafonton. La loko estas tute ĉirkaŭita de domoj. La fenestroj de eble dudeko da apartamentoj el kvar direktoj rigardas al Svedberg, kaj do nokte rigardis al la armita krimulo. Ĉu ili rigardis, nenion vidante? Ĉu vere eblas, ke ĉi tie oni nenion vidis, nek je la pafoto, nek antaŭe? Ke poste oni ĉi tie ne povis vidi la pafinton, tio jam pli kredindas, ĉar de lia arbusto estas nur dek paŝoj ĝis pasejo inter la domoj, kaj al tiu malvasta pasejo rigardas neniu fenestro. Evidente oni evitis fari fenestrojn en tiuj muroj por ekskludi tro intiman eblon rigardi en la loĝejojn. Necesas gardi la privatan zonan de la loĝantoj. Sed fronte, apud la enira pordo, oni ne sukcesis gardi ĝin. Nek ilian noktan sekurecon.

Svedberg repaŝas al sia aŭto kaj en du minutoj ree atingas la grandan ŝoseon. 'Kalmar 237 km' anoncas vojtabulo tuj kiam li forlasas la urbeton. Ĉu antaŭ dek kvar horoj iu rigardis la saman tabulon, kun freŝa pulvodoro en la nazo, farinte sian trian unufojan pafon al tri malsamaj homoj – kial? Pro kiu motivo? Kaj ĉu la sama motivo kunligos ankaŭ kvaran personon al la triopo el mortintoj kaj eble mortonto? Ĉu ankoraŭ kvinan? Pri kio temas? Li revenas al la ideo pri politika murdo. Sed ĉu Johan Wester kaj Sonja Persson iel rilatis al naziismo? Ankaŭ murdo pro pasio aŭ ĵaluzo ŝajnas neebla, kun tri tiaj viktimoj. Subite li rememoras la informon de sia kolego Hans Andersson, laŭ kiu Tom Jankéus iam instruis la duan murdinton, Daniel Fridell, pri krimo kaj puno. Li neglektis tiun aferon, same kiel li pli-malpli ignoris la ridindan poeton en la arestejo de Norrköping. Ĉu prave? Ĉu li tro malvaste direktas sian enketadon?

Dum la aŭto ruliĝas plu suden je 95 km en horo, Svedberg plu pensas, ke espereble tamen la nomo Jankéus ne aperos kiel surprizo en ĉi tria kazo. Sed kiu scias? Eble li iam pasigis ankaŭ kun Sonja Persson sekretajn vesperojn. Kion entute eblas scii pri la eksa kolego?



Revenis la printempa varmo, ĉifoje kun plena forto, kvazaŭ somero estus natura afero en la mezo de majo. La siringoj jam plene floras en koloroj de

blanko ĝis intensa bordozo, kaj la padusoj vespere disigas odoron preskaŭ anestezan, kiam Svedberg faras sian vesperan promenon inter polifonia ĥoro de amebriaj najtingaloj. Laste el ĉiuj arboj la fraksenoj nun ekverdiĝas, disigante siajn manosimilajn folibukedojn. Sur kelkaj fraksenaj branĉoj vidiĝas ekfloroj en formo simila al liliputaj kristarboj intense verdaj. Iuloke inter aro da kverkoj li flaras leĝeran odoron de ĵus ekflorintaj majfloroj. Estas jam post la naŭa horo, tamen regas plena taglumo. Svedberg amike kapsalutas kelkajn najbarojn, sed pluraj promenantoj tute ne konatas al li. La subita somera varmo logis multajn urbanojn forlasi siajn nestojn por senti la mildan, varmetan majvesperon kaj sorbi ĝiajn odorojn kaj sonojn.

La varmo kaj la peza padusa parfumo tamen ne sufiĉas por logi la pensojn de Svedberg for de lia aktuala murdenketo. La ekskurso norden ŝajnas al li marki novan etapon, kaj li fidas je sia propra kapablo solvi ĉiujn tri krimojn. Mankas al li nur la ĝusta fino de faden. Kiam li trovos ĝin, eblos plene kaj nete malvolvi ĉion kiel belan fadenbulon. Kiam li nur kaptos la ĝustan fadenfinon...

Malrapide li repaŝas hejmen al sia tro granda soleca domo. Li ŝaltas la televidilon por distriĝi dum vespera horo, sed nenio en la kvar disponeblaj kanaloj konvenas al lia humoro. Du usonaj komediseroj kun malsama temo sed egala falseta paroltono. Refoja dissendo de malnova sveda muzikprogramo. Kaj brita romantika dramo en nobela medio. Nenio kaptas lian intereson, nenio helpas lin ripozi de la murdenketa cerbumado. Li malŝaltas, ekserĉas ion en la librobreto. Fikcion li apenaŭ legas, tiu ŝajnas al li tro senutila. Finfine li trovas historian verkon popularan pri svedaj militoj en la deksepa kaj dekoka jarcentoj. Jen io kun potenco kapti lian atenton. Li ne scias, kial tia legaĵo ŝajnas al li malpli vana. Li ja ne povas fari ion ajn pri la dramoj kaj bataloj pasintaj antaŭ tricent jaroj, kaj estas tre duba, ĉu li lernas ion de ili. Eble ĝuste tio gravas, ke neniuj povas postuli ke li aranĝu kaj solvu la tiamajn konfliktojn. Temas pri realaj homoj kaj veraj eventoj, tamen jam delonge ne utilas komenci murdenketon pri ili. Jen kio efikas al li ripozige.

Dumnokte falas iom da milda pluvo, kaj matene la tuta urbo vaporas pro varmo kaj humido. Svedberg rememoras la zumkantadon de la kolego Andersson antaŭ kelkaj tagoj. Ĉu ne estis io pri milda majpluvo kaj varma matena roso? Li mem ne kutimas zumkanti, nek laboreje, nek hejme, kvankam kelkfoje iu populara rekantaĵo de furorkanto ĝene fiksiĝas en lia kapo. Sed kio nun vere zumas monotone en lia kapo, tio ne estas melodijaj sekvencoj, sed eroj el la murdenketo, pensoj pri la tri unufojaj pafoj. Enpense li remaĉas komentojn, supozojn, demandojn faritajn pri la tri kazoj. Tamen ankoraŭ mankas al li la necesa kunligo inter ili.



”Bone do. La tria pafito, Sonja Persson, restas en komato kaj eble vivos, eble ne. Ĉiukaze ne eblas intervjui ŝin. Proksimaj familianoj ne troviĝas, krom eventuale iu delira poeto, kiun la kolegoj tie suspektas pri la pafo. Sed ni prefere supozu, ke temas pri la sama pafinto en ĉiuj tri kazoj. La simileco ŝajnas ne koincido. Krome, ŝi vivis ĉi tie en Kalmar ĝis antaŭ tri jaroj. Ŝia lasta adreso estis Nygatan 32.”

Svedberg rulas liniilon inter la fingroj parolante. Li sidas ĉe sia skribtablo, rigardas jen siajn kolegojn, jen la turojn kaj tegmentojn kiuj videblas tra lia fenestro. En la proksima fajrobrigadejo du fenestrovitroj reflektas la sunbrilon, kaj ambaŭflanke videblas pecoj da klarblua ĉielo.

La inspektoro Vivianne Ljunggren sidas sur seĝo tenante la kruojn krucite. Sur alia seĝo sidas Benny Hallman, kiu dum kelkaj tagoj devis dediĉi sin al aliaj taskoj, kaj apud li Hans Andersson staras apogante sin almure. Ŝajnas ke la komisaro trovis novan energion por pluigi la murdenketon, kaj li infektas ilin ĉiujn. Aŭ ĉu eble influas ilin la sciigo de Andersson kaj Hallman, ke ili hieraŭ traserĉis la loĝejon de Daniel Fridell? Ja ili trovis nenion, kio tuj ĵetos lumon al la murdo, tamen oni eble trovos, ĉar ili alportis policejen kelkajn skatolojn da leteroj kaj aliaj skribaĵoj, plus la durdiskon de lia persona komputilo. La etoso en la ofica ĉambro iĝas pli pozitiva ol delonge. Inspektoro Andersson eĉ komencas zumkanti ion, sed silentiĝas, kiam Svedberg pluas:

”Do, Hans, vi intervjuu loĝantojn en Nygatan 32, kiuj eventuale memoras ŝin tie. Pri eblaj konfliktoj, rilatoj, amantoj... nu, pri ĉio kio povus iĝi interesa. Vivianne, vi trovu ŝian laborejon, per la impostoficejo, ekzemple, kaj intervjuu kolegojn tie. Ŝi estis... pardonu min, ŝi estas psikologo. Benny, vi sendube havos plenajn manojn pri tiuj paperoj kaj komputaĵoj de Fridell, ĉu ne? Mi mem unue butikumos por trovi nomtabulon.”

Vidante la senkomprenajn rigardojn de siaj tri kolegoj, li aldonas:

”Ceramikan, tio estas. Ĉu ni revidu nin por raporto je la kvara?”

La kvar policistoj disiĝas kaj ekiras ĉiu laŭ sia vojo, espereble tamen al la sama celo, la kapto de persono kiu alpafis triopon da homoj kaj ĝis nun mortigis du el ili.

Estas tago perfekta por antaŭtagmeza promeno. Svedberg paŝas laŭ tilia aleo, tenante la jakon surŝultre. Gejunuloj rapidas alidirekte, survoje al sia gimnazio. Maldikaj knaboj en nigra pantalonego, kiu riskas ĉiumomente fali teren kvazaŭ mise starigita tendo. Knabinoj en bluzeto, kiu lasas la tutan ventron nuda, kaj el kiu la mamoj ŝajnas pretaj ĉiumomente elsalti kvazaŭ du tenispilktoj. Strange, kiom la modo renversiĝis de kiam liaj propraj filoj

estis tiuaĝaj, kvankam pasis nur... nu, kiom do? Li devas pripensi kelkajn sekundojn, por memori kiom ili nun aĝas. Ja pasas tempego inter ĉiu telefona interparolo kun ili. Kaj ankoraŭ ili ŝajne ne emas doni al li nepojn, eĉ apenaŭ bofilinojn.

Li eniras la butiketon ĉe la strato Unionsgatan kaj atendas klientinon, kiu elektas, elektadas inter kelkaj ceramikaj pladoj. Ne gravas, li povas mem rigardi, kaj baldaŭ li retrovas nomtabuleton de tiu speco, kiun li vidis en Söderköping. Ĝi estas ekzemplo, kompreneble, ja necesas aparte mendi tabulon kun la propra nomo. Eble li mem faru tion? Efektive, de kiam lia edzino forlasis lin, unue dum monatoj restis ĉe li la tabulo kun ambaŭ nomoj, poste li formetis ĝin kaj glubende fiksas manskribitan slipon kun nur lia sola nomo. Ja ŝajnas, ke neniam plu iu kroma nomo necesos apud la lia, do kial ne farigi pli belan tabulon?

”Ĉu mi povas helpi vin, komisaro?”

La mola voĉo de Amanda Wester revokas lin al la devoj.

”Nu... mi esperas, ke jes. Antaŭ kelkaj jaroj vi vendis tian tabulon al Sonja Persson, se mi ne eraras. Ĉu vi memoras ŝin?”

La vizaĝo de la ceramikistino montras plenan mankon de emocioj, kaj ŝi levas la ŝultrojn.

”Ne... mi faras du-tri tiajn ĉiusemajne... Sonja... ĉu Persson? Tre ordinara nomo. Ne, mi bedaŭras.”

”Psikologino kvardekjara, proksimume. Devenas el Skanio.”

”Mi bedaŭras, sed tio nenion signifas al mi. Vere, ĉi-sezone mi ne havas tiom da klientoj, sed somere, kiam la turistoj plenigas la urbon... Efektive, ne eblas memori ĉiujn nomojn de tiuj tabuletoj.”

Svedberg konscias, ke la demando estis iom stulta. Ĉefe li volis vidi ŝian mienon, kiam ŝi aŭdis la nomon de la tria pafito. Eble, se troviĝus ia ligo al ŝia edzo... Sed li pli-malpli scias, ke necesas serĉi alispecan ligon inter la tri viktimoj. Ligon inter instruisto, eksnazia konstrulaboristo kaj psikologino.

Forlasinte la butikon, li ekhaltas, rememorante ke li volis mendi nomtabulon. Tamen, ja ne urĝas. Eble li havos pluan okazon viziti la butikon. Li rekomencas sian promenon, laŭ la sama tilia aleo kiel antaŭe, tamen nun en la inversa direkto. Li ne reiras policejen, sed plupaŝas antaŭen ĝis la gimnazio. En la oficejo oni sendube povos informi lin, en kiu salono li trovos sian sekvan pridemandoton.



Posttagmeze je la kvara horo la ofica ĉambro de komisaro Svedberg estas varma kiel saŭno. Svedberg verŝas al si la umdekan glaseton da malvarmeta akvo el ekstera akvoaŭtomato. Preterpasas lin la polica teknikisto Åke

Gustavsson en T-ĉemizo kaj ŝorto. Svedberg iom envias lin pro lia kostumo, tamen li mem estas tro konservativa por imiti lin. Kaj cetere, kion dirus la klientoj, la suspektatoj, la atestantoj, se la polico aperus en tia vesto? Li malbutonas plian butonon de sia ĉemizo kaj kuspas la manikojn.

”Espereble vi hodiaŭ kunrastis pli da informoj ol mi”, li komencas post kelkaj minutoj, kiam la tri gekolegoj alvenis. ”Nek Amanda Wester, nek Jonna Larsson reagis videble je la nomo Sonja Persson. Psikologon ili neniam konis, nek vizitis, eĉ ne nun post la murdoj. Mi iom insistis ĉe la knabino, por ekscii ĉu tamen ne ŝia fianĉo iam havis kontakton kun psikologo. Ŝi asertis ke ne, almenaŭ ne dum la tempo kiam ŝi konis lin. Antaŭe ja eblus, sed li neniam menciis tion, laŭ ŝia informo. Restas ankoraŭ kelkaj personoj, kun kiuj eble indus paroli, sed mi volis atendi viajn rezultojn. Intertempe mi telefone interparolis kun Rosenlund en Norrköping. La stato de la viktimo estas senŝanĝa, kaj oni devis liberigi la poeton, ĉar la prokuroro ne permesis areston. Strange, la kuglon ili ankoraŭ ne trovis. Ili komencis intervui laborejajn kolegojn de Sonja Persson, sed ankoraŭ trovis nenion interesan, laŭdire. Do, li estis iom mishumora, nia kolego.”

Svedberg paŭzas gratante al si la nukon kaj malplenigas la platan akvoglaseton.

”Bone do, kion vi alportas?” Li rigardas la tri gekolegojn, el kiuj la plej juna, inspektoro Hallman, ŝajnas malplej pacienca. ”Benny, ĉu vi ion trovis?”

”Jes, efektive! Mi pensas ke ni trovis tion, kio logis lin al la somerdometo. Sur la durdisko troviĝas du retpoŝtaĵoj de iu martineriksson@hotmail.com, kiu ŝajne ofertas al Fridell iun varon, kiun li nomas ‘A’. Kaj en la dua li proponas renkontiĝi ĝuste en la somerdometo de Fridell vendrede je la tria posttagmeze. Tiu mesaĝo estas sendita jaŭde posttagmeze la 15an de majo. Kompreneble li viŝis la mesaĝojn, sed ni sukcesis rekrei ilin.”

La juna inspektoro mienas fiere. Ŝajnas al li, ke liaj kolegoj rigardas lin preskaŭ admire.

”Ĉu vi diris *Martin Eriksson*?” rapide demandas Svedberg. ”Ĉu eblas trovi lin?”

”Nu, tia retpoŝtujo ne havas veran adreson, kaj laŭ Valter, nia komputa ulo, ambaŭ mesaĝoj estas senditaj per komputilo en la komunuma reto, plej kredeble per publika komputilo en la urba biblioteko. Do, ne eblas scii, kiu efektive sendis ilin. Sed mi serĉis en la loĝantara registro, kaj en Kalmar mi trovis kvar Martin Eriksson, el kiuj unu estas maljunulo kaj tri relative junaj.”

”Kaj kio estas ‘A’?” scivolas Andersson.

”Ia drogo, evidente, sed mi ne havis tempon esplori. Mi proponas, ke ni petu helpon de iu el la drogulĉasaj kolegoj. Eble ili eĉ konas tiun Martin.”

”Tre bone”, diras Svedberg. ”Ĉu vi daŭrigos pri tio? Se ili ne konas lin, ni simple vizitu la triopon, unu post la alia. Bone, ŝajnas ke ni alproksimiĝas, ĉu ne? Kio plu... jes ja, Hans, kion vi trovis?”

Inspекtoro Andersson kiel kutime apogas sin ĉemure. Li nun rektigas la dorson, ekstaras diskurre, elpoŝigas notlibreton kaj eklegas.

”Do, temas pri la domo kie loĝis Sonja Persson ĝis antaŭ tri jaroj. Oni memoras ŝin ĉefe pro la muziko, ŝajne. Loĝas plejparte maljunuloj tie, aŭ almenaŭ tiuj hejmas dumtage, do ilin mi trovis. Ili loĝas tie de jardekoj, ŝajne. Ŝi aŭskultadis operojn ĝis nokte, laŭ pluraj informoj. La najbaroj batadis la tubojn de la radiatoroj por signali al ŝi ‘silentigi la kriojn’, kiel diris iu viro, sed tio nur igis ŝin ‘plilaŭtigi la diablaĵon’, laŭ la sama ulo. Neniu rimarkis amikojn, amantojn aŭ ion ajn interesan. Do, se juĝi laŭ la najbaroj, ni suspektu iun opero-malamanton, tamen ne tiujn en Nygatan 32, ĉar ili estas feliĉaj ke ŝi transloĝiĝis for de tie.”

Li silentas fermante la notlibron kaj refalas kontraŭ la muron.

”Kaj laboreje, ĉu ankaŭ tie oni kontentas?” demandas Svedberg, turnante sin al Vivianne Ljunggren.

”Nu, eble ne... Laŭdire ŝi estis ambicia kaj sperta psikologo, sed ne tre societema. Ŝi laboris en la psikiatria teamo por gejunuloj, ĉe Ståthållaregatan. Ŝi laboris sufiĉe sendepende, do oni ne povis rakonti tre multe pri ŝi kiel kolego. Ankaŭ private oni scias malmulte. Ŝi ne havis edzon, nek konatan fianĉon. Ankaŭ tie oni menciis, ke ŝi ŝatis muzikon, tamen oni ne aparte menciis operon, sed ĥoran kantadon. Iu memoris, ke ŝi kantis en la loka amatora ĥoro ‘Sonoro’. Pri eventualaj amikoj oni ankaŭ nenion sciis, kaj neniun kolegon kutimis renkonti ŝin en liberaj horoj. Jes, ja, oni sciis ke iu alia ekskolegino, psikologino, kutimis ĉiujare vojaĝi suden kun ŝi. Kanariaj Insuloj kaj simile. Sed tiu persono, Eva Lundin, ankaŭ forlasis la urbon, tamen nur antaŭ unu jaro. Oni supozis ke ŝi nun laboras en Stokholmo.”

”Strange, ke nia murdanto ĉiam trafas viktimojn sen amikoj kaj familio”, murmuris Hans Andersson.

”Aŭ kies familio ŝajnas ne vere koni ilin”, replikas Vivianne Ljunggren. ”Aŭ troviĝas en Arabio.”

”Kiajn klientojn havis Sonja Persson?” demandas Svedberg.

”Gejunulojn kun diversaj problemoj. Knabinoj anoreksiaj, infanoj emocie malsatigitaj, knaboj nekapablaj bridi sian agresemon, gejunuloj kun psikaj obsedoj, viktimoj de seksa misuzo, nu... ĉiaj problemuloj.”

Denove Svedberg gratas al si la nukon kaj enmane dispremas la malplenan akvoglaseton.

”Problemuloj, kiuj post kelkaj jaroj eble memoros ŝin... kun danko... aŭ...”

”Ĉu ankaŭ droguloj?” scivolas Benny Hallman.

Lia kolegino okulrenkontas lian rigardon kaj diras:

”Supozeble. Leĝaj aŭ neleĝaj. Efektive, mi petis liston pri ĉiuj ŝiaj klientoj dum ŝiaj lastaj du jaroj tie, por komenci. Oni iom ŝokiĝis pro la peto, kaj kompreneble ne povis tuj doni tion, sed eble se nia ĉefo parolus kun ilia ĉefo, doktoro Leif Seger, la afero irus pli rapide.”

Svedberg kapjesas. Dum momento regas silento en la tro varma ĉambro. Poste li diras:

”Kompreneble ni faru la samon pri Johan Wester. Do, ni akiru liston pri ĉiuj liaj lernantoj dum la sama tempo. Por komenci. Ĉu vi prizorgos ankaŭ tion, Vivianne?”

Ŝi kapjesas.

Svedberg rigardas muŝon kiu zumante flugas tien-reen sub la plafono.

”Kaj pri Daniel Fridell? Ĉu ion korespondan eblas fari?”

”Estus bone havi kompletan liston pri tiuj nazioj...” diras Vivianne Ljunggren kun iom ŝveba voĉo.

”Jes. Kaj pri ĉiuj parencoj kaj amikoj de tiu afrika eksamiko”, aldonas seke Hans Andersson.

”Mi pensas, ke ni havos sufiĉe da zorgoj pri tiuj du listoj”, diras Svedberg, kvazaŭ por bridi iliajn troajn esperojn. ”Eble ni havos plurajn trafojn jam en tiuj. Kaj Benny pluserĉu tiun Martin Eriksson, kaj tuj avertu min, kiam estos tempo pridemandi iun. Cetere, Vivianne, ĉu vi klopodu trovi tiun amikinon... kun kiu ŝi kutimis somerumi? Eble tio daŭris ĝis nun.”

10. Ĝui la vivon

Semajnfino. Strange, kiam li estis pli juna, li ĉiam anticipis la semajnfinojn kun ĝojo kaj sopiro. Nuntempe li preskaŭ timas ilin. Des pli ĉar ĉi-vendrede vespere, forlasante la policejon, li havis fortan senton, ke li staras antaŭ baldaŭa trarompo. Li volus persone ĉeesti *kaj* en la psikiatria teamo, *kaj* en la lernejo, por instigi al rapida kompilado de la du atendataj listoj. Sed sabate tio apenaŭ estus realisma. Ambaŭ laborejoj hodiaŭ estas malplenaj. Instruistoj kaj lernantoj liberas, kaj male al Roger Svedberg, ili supozeble ĝuas sian liberon. Eĉ la psikiatria flegistoj nun liberas. Se iliaj klientoj hodiaŭ bezonas akutan helpon, ili devas turni sin al la hospitalo situanta trans la strato.

Ĉasi drogvendiston oni ja povus fari sabate. Drogvendistoj kredeble ne fermas la butikon semajnfine. Sed li trovas grave utiligi la sciojn de la policistoj, kiuj ĉiutage okupiĝas pri tiu grupo de policaj klientoj. Krome, estus bone vidi la menditajn listojn antaŭ ol agi. Svedberg pripensas, kio povus klarigi la tri pafojn. Se temas pri venĝoj, do pro kio? Eble Daniel Fridell iel trompis iun. Ne pagis monŝuldon, ekzemple. Laŭ lia sperto, tiaj aferoj ofte kaŭzas perforton inter droguloj. Sed io ŝajnas al li malsimetria en la afero. Pro kio la murdinto venĝus kontraŭ la du pli aĝaj viktimoj? Devus esti aferoj okazintaj antaŭlonge. Almenaŭ se temas pri Sonja Persson, kiu forlasis la urbon antaŭ tri jaroj. Do, kial ĝuste nun plenumi tiun venĝon? Ĉu subite io vekis malnovan memoron? Kia memoro povas subite igi homon mortigi du-tri personojn? Kia homo portas tra la vivo memoron tiel mortigan?

Nu, ĉio sendube klariĝos baldaŭ. Li paciencu. Sed per kio li distru sin atendante la lundon?

Subite li memoras ion en la rakonto de Vivianne Ljunggren. Li prenas la telefonon kaj klavas numeron, kiun li ne forgesis, kvankam jam delonge li ne plu havas kaŭzon memori ĝin.

”Ĉe Jankéus!” respondas la konata voĉo de lia eks-kolego.

”Saluton, Tom. Jen Svedberg. Pardonu, sed ĉu ne via edzino kantas en ĥoro?”

”Prave. Kial do? Ĉu okazis io?”

Svedberg ekpensas, ke tiuj vortoj pravas, ke Tom Jankéus ne plu estas policisto. Ĝuste tiel reagis civilulo, kiam vokas la polico. ”Kio okazis?” en maltrankvila tono.

”Ne, ne. Nenio okazis. Ĉu en la ĥoro ‘Sonoro’?”

”Jes ja.”

”Ĉu vi povus demandi ŝin, ĉu ŝi memoras iun Sonja Persson, kiu estis ĥorano antaŭ kelkaj jaroj?”

”Vi prefere mem demandu ŝin, sed ŝi nun butikumas, kaj poste iros kamparen. Ĉu urĝas?”

”Ne, ne. Ne urĝas. Efektive... kredeble ne gravas.”

”Tamen mi petos ŝin telefoni al vi. Kiel statas ĉio, cetera?”

”Bone, bone. Mi pensas ke ni baldaŭ solvos la aferon.”

”Ĉu solvos? Bone. Sed mi celis, kiel statas pri vi!”

”Ankaŭ bone. Ĉio estas bona. Kaj vi?”

”Same. Bonas ĉio.”

Svedberg ŝatus demandi, ĉu lia ekskolego plu renkontas la vidvinon Amanda Wester, sed kio rajtigus lin demandi pri tio? Ĉu ĝi estus demando privata aŭ ofica? Prefere li diskretu. Entute, li trovas nenion plu por diri. Mankas al li la komentoj de Jankéus, kiuj iam estis parto de lia ĉiutageco. Sed li ne scias kion fari pri tiu manko. Li finas la interparolon, kiu apenaŭ komenciĝis, kaj iras promeni.

Meditante li vagas laŭ la marbordo. En apuda fiŝhaveneto aro da viroj laboras pri boatoj kaj barkoj. Tamen ne temas pri laboro de fiŝistoj. Neniu plu ekiras de ĉi haveneto por profesie kapti haringojn aŭ pleŭronektojn. Ĉiuj boatoj ĉi tie estas plezurboatoj. Ĉiuj homoj ĉi tie ĝuas sian liberan semajnfino. Ĉiuj krom Roger Svedberg. Li ne povas ĝui sian liberan semajnfino. Ĉu li ne plu kapablas ĝui la vivon? Li plupaŝas preter eta strando kun banvarfoj kaj ludiloj. Sur la herbejo, en lokoj kie densaj juniperoj baras la venton, homoj sunbanas sin kuŝante sur plejdoj. Surstrande duonnudaj infanoj kuras plaŭdante en la mara akvo. Svedberg frostotremas je la vidaĵo. Kiom nun varmas la akvo? Supozeble apenaŭ pli ol dek aŭ dek du gradojn. Li pluiras laŭ la bordo kaj klopodas ripozi. Kiel oni faras por ripozi?



Finfine tamen finiĝas eĉ la plej teda libera semajnfino. Iĝas lundo, kaj la murdenketado rekomenciĝas. Svedberg refoje urĝas la sekretariojn de lernejo kaj psikiatria polikliniko kiel eble plej rapide kompili listojn de iamaj lernantoj kaj pacientoj. Dume Benny Hallman intervjuas kolegojn el la grupo laboranta pri narkotaj krimoj. Baldaŭ li venas al Svedberg kun interesa sciigo:

”Mi pensas ke ni trovis lin! Ili supozas ke temas pri tiu tridekjarulo en Norrliden. Kaj ‘A’ laŭ ili signifas ‘acidon’, pli precize LSD!”

”Ĉu tiu Martin Eriksson estas konata vendisto de LSD?” demandas Svedberg.

”Nu... eble ne, sed ili trovas kredinde, ke li povus okupiĝi pri ĝi. Laŭdire li injektas ĉion eblan, de kafo ĝis lavlesivo.”

”Kaj ĉu kredindas, ke li murdis? Ĉu konata kiel perfortema?”

”Mi ne scias, sed ĉio eblas pri droguloj.”

Svedberg iom hezitas. La murdoj ne impresas al li faraĵoj de narkotita homa ĉifono. La kombino de zorga plano kaj riskodefio, kiu karakterizas ilin, ne tre akordas kun lia imago pri droguloj. Tamen, nun ĉio ja montras al tiu nekonata retmesaĝinto.

”Bone, ni iru preni lin ĉi tien. Estus bone, se unu el la narkotaj kolegoj povus kunhelpi.”

”Mi petos iun. Prefere Axel Rønnegren, kiu iom konas lin.”

Post duonhoro do tri policistoj veturas al norda kvartalo por trovi la suspektaton. Dumveture la plej juna el ili, inspektoro Hallman, kun ekscita mieno esploras sian armilon, la tradician pistolon de la sveda polico. Svedberg sidas profunde en pensoj, dum inspektoro Rønnegren jen kaj jen elĵetas mallongajn komentojn, kiel ”hm, nekredeble!”, ”hm, damne!” kaj ”hm, kia kanajlo!” Ili alvenas, ekpostenas singarde ekster la apartamenta pordo markita ”Eriksson-Lindh” kaj sonorigas.

Neniu reago.

Rønnegren sonorigas denove, dum Svedberg atendas apude kaj Hallman pretas trans la lifto. Tra la silento ili aŭdetas infanajn krietojn el suba etaĝo. Tuj post la tria sonorigo tamen aŭdiĝas trenataj paŝoj de trans la pordo, la seruro klaktintadas kaj iu malfermas la pordon je fendo. Virino kun pufa vizaĝo, hirta hararo kaj bluaĵoj surkole, vestita en makulita, malstrikta noktoĉemizo, palpebrumas suspekteme al Rønnegren.

”Bonan tagon. Polico”, diras tiu ŝovante piedon en la pordofendon. ”Bonvolu enlasi nin.”

”Kial?” aŭdiĝas ŝia voĉo obtuze kaj ŝvebe.

”Ni volas paroli.”

”Pri kio?”

”Malfermu. Nun”, precizigas la policisto, kaptas la pordorandon ambaŭmane kaj facile malfermegas ĝin. Poste li paŝas antaŭen ŝovante la virinon antaŭ si, kaj post li sekvas Svedberg, dum Hallman restas en sia provizora ŝirmejo.

”Kion vi faras, diable? Mi havas nenion!” raŭkas ŝi. ”Vi ne rajtas...”

”Ĉu Martin hejmas?”

”Kial?” ŝi obstinas.

”Hm, neniun ‘kial’, sed ‘kie’. Venigu lin ĉi tien.”

La virino ŝajnas trankviliĝi, komprenante ke oni serĉas ne ŝin sed ŝian kunvivanton, kaj turnas sin por iri en la loĝejon. Ĝuste tiam aperas viro el interna ĉambro. Li estas nuda, svelta, alta, ne tre muskola, kaj lia haŭto ŝajnas sunbrunigita tutkorpe. Li havas barbostoplojn kaj duonlongajn harojn

malhele blondajn, kaj lia mieno esprimas malkontenton. Li ŝajnas proksimume tridekjara. Kiam li paŝas antaŭen en direkto al la du policistoj, lia vira membro saltas tien-reen kvazaŭ horloĝa pendolo.

”Ĉu vi havas permesilon?” li demandas kun supereca tono.

”Hm, por kio? Vestu vin. Vi iros kun ni”, informas inspektoro Rønnegren.

”Kial?” li daŭrigas la familian tradicion.

”Tion vi ekscios en la policejo. Vestu vin. Tuj.”

La viro turnas sin kaj montras postaĵon same bronzan kiel la fronto. Pasas minuto.

”Rapidu. Ni ne libertempas”, laŭtas Rønnegren cele al la nevidebla interno de la loĝejo. Apude la virino en sakoforma noktoĉemizo restas staranta, sed nun elfiŝas paketon da cigaredoj el mansako pendants sur la dorsapogilo de seĝo, enbuŝigas cigaredon kaj elbruligas ĝin. La du policistoj atendante rigardas ĉirkaŭ si. La apartamento, almenaŭ la parto videbla de la vestiblo, estas sufiĉe bela kaj pura. La meblaro impresas ĉerpita el la meblomagazeno IKEA, kaj surmure videblas bildoj pri iu rokmuzika ensemblo.

Post dua voko la viro reaperas en ĝinzo kaj T-ĉemizo. Li prenas jakon kaj demandas, nun jam en tono pli indifera ol kolera:

”Ĉu mi kunportu dentobrosos?”

”Dependos de vi”, ripostas Rønnegren.



En la policejo oni unue iom atendigas la suspektaton por aranĝi kelkajn aferojn. Listoj ankoraŭ ne alvenis. Svedberg sendas inspektorinon Ljunggren en komision por kompletigi per kelkaj informoj. Li ankaŭ rigardas eltiraĵon el la krimregistro kaj konstatas, ke Martin Eriksson trifoje estas kondamnita de tribunalo, dufoje pro minora narkota krimo, tio estas havado de eta kvanto da malpermesita drogo, kaj unufoje pro ebria kondukado de aŭto. Lastfoje li pasigis du monatojn en malliberejo. Tio tamen okazis antaŭ kvar jaroj. Svedberg serĉas ankaŭ en la loĝantara registro kaj konstatas, ke Eriksson naskiĝis en Karlstad, kie vivas ankoraŭ lia patrino, dum la patro vivas en Stokholmo. Martin estas needziĝinta sed havas infanon, filinon kvinjaran, kiu vivas en apuda urbeto Nybro.

”Ĉu vi deziras kafon?” li komencas la pridemandadon.

”En ordo”, akceptas la suspektato, kaj je kapsigno de Svedberg, Hans Andersson iras por alporti tason.

”Ni havas kaŭzon supozita, ke vi povos doni informojn pri kelkaj krimoj, kiujn ni esploras”, li pluas. ”Ni ja povus intervjui vin en via loĝejo, tamen estas pli oportune ĉi tie. Cetere... per kio vi laboras?”

"Laboras? Kial do?"
 "Nu... ŝajne vi estas libera ĉi-matene?"
 "Ĝis antaŭ kelkaj semajnoj mi laboris en la stokejo de mekana firmao. Sed ili devis malpliigi la dungitojn."
 "Kaj vi havis malbonŝancon, ĉu ne?"
 "Mi estis laste dungita, do mi devis foriri unue."
 "De kiom da tempo vi laboris tie?"
 "Ĉu gravas? De kelkaj monatoj."
 "Kaj kion vi nun faras dumtage? Ĉu vi multe legas?"
 "Legas? Ne, prefere ne."
 "Tamen vi kutimas viziti la urban bibliotekon."
 "Bibliotekon, ĉu? Kio igas vin kredi tian frenezaĵon?"
 Svedberg trankvile kontemplas, kiel fari siajn demandojn. Troviĝas neniu kaŭzo tro rapidi. Eble li escepte provu etan blufon?
 "Nu, oni vidis vin tie kelkfoje en la lasta semajno."
 "Kiu vidis? Tiu devus viziti okulkuraciston."
 "Tamen vi ja estis tie, ĉu ne. Ĉu vi hejme ne havas komputilon?"
 La suspektato montras tre naturan mienon de konsterniĝo.
 "Komputilon, ĉu? Kio sekvos nun? Sed vi pravas, mi ne posedas tian. Nek atombombon aŭ simfoniorkestron."
 "Tamen aŭton vi ja havas, ĉu ne?"
 Eriksson levas la ŝultrojn kaj paŭtas.
 "Ne eblas nomi ĝin aŭto. Kaj mi ne rajtas veturigi ĝin. Necesas kelkaj riparoj, por ke la ŝtata aŭtontrolo aprobu ĝin. Sed mankas mono."
 Refoje Svedberg pripensas kiel plui. Li ne tre certas pri ĉi tiu suspektato. Drogulo, laŭdire, sed lia aspekto kaj teniĝo ne tute konformas kun la kliŝa bildo pri drogulo. Aliflanke, la trifoja pafinto ne povas esti kliŝa drogulo. Kiam li pli funde pensas, troviĝas io en la sinteno de la viro, kiu svage kongruas kun lia imago pri la murdinto. Aŭdaca tamen pacienca, arda tamen malvarma. Sed la hipotezo ja temas pri venĝo kontraŭ instruisto kaj psikologo kun dekkelkjaraj klientoj. Kiel do akordigi tiun ideon kun ĉi tiu tridekjarulo?
 "Kiel vi elserĉis la novan adreson de Sonja Persson?"
 La okuloj de Svedberg fiksas la pridemandaton, kiu ĝuste sorbis buŝplenon da kafo el la taso. Li remetas la tason kaj mienas same senkulpe kiel ĵus:
 "Novan adreson de kiu?"
 "Vi aŭdis."
 "Eeh... Mi ne kaptis la nomon. Eble estus pli facile, se vi povus aludi, pri kio temas la tuta spektaklo."
 "Temas pri via rilato al kelkaj personoj. Ekzemple, mi ŝatus scii, kion faris kontraŭ vi Daniel Fridell."

”Fridell, ĉu? Daniel... Ĉu Danne Fridell, tiu nazio kiu iĝis malnazio?”

”Ĉu vi konas multajn Daniel Fridell? Kion li faris kontraŭ vi?”

”Nenion, laŭ mia memoro. Politiko ne interesas min.”

”Kio do interesas vin?”

”Vivi. Vivi bone kaj agrable. Ĝui la tagojn. Kaj noktojn.”

”Kaj ĉu Fridell malhelpis vin?”

”Tute ne. Mi apenaŭ konas lin. Kial do?”

”Kiel vi renkontis lin?”

”Kiel? Mi ne memoras... Verŝajne en iu festeno, ĉe iu komuna konato.”

”Kaj kion komunan vi havis kun li?”

”Kion komunan? Ne multe, mi supozas. Mi fojfoje babilis kun li. Li estas iom teda, laŭ mi.”

”Ĉu *estas*?”

”Jes. Tro serioza. Tamen, fojfoje ankaŭ li ŝatas ĝui la vivon, mi pensas.”

”Kiel?”

”Kiel? Nu... festeni. Ripozu. Rilaksiĝi.”

”Ĉu vi konas lian fianĉinon?”

”Fianĉinon? Ne... aŭ eble mi scias, kun kiu li umas. Iu lerneja knabineto, mi pensas. Sed ŝian nomon mi ne konas.”

Svedberg gratas al si la nukon. Ŝajnas superflue demandi pri la tria viktimo. La reago sendube estus identa. Li petas sian kolegon alporti pli da kafo, ankaŭ al si mem kaj al Svedberg. Poste li pluas:

”Bonvolu pripensi zorge kion vi faris vespere la 13an de majo, tio estas marde antaŭ du semajnoj.”

Martin Eriksson rigardas lin kun mieno de malŝato, kvazaŭ naŭzus lin pensi pri momento tiel antikva.

”Antaŭ du semajnoj, ĉu? Marde. Pfffu!” Li suspiras. ”Kiel mi memoru? Ĉu okazis io speciala? Mi bedaŭras, sed mi ne scias. Eble mi estis hejme, eble ĉe iu konato, eble eksterdome, eble en trinkejo... Ĉu estis bela vetero?”

”Kaj nokte inter la 21a kaj 22a, tio estas inter merkredo kaj ĵaŭdo lastsemajne. Kien vi aŭtis?”

”Aŭtis? Nenien, certe. Mi ja diris, ke mia kadukaĵo ne rajtas ruliĝi. Kion vi serĉas?”

”Vi tamen ne povas kredigi al mi, ke vi ne memoras, kion vi faris dum kelkaj horoj nokte antaŭ la lasta ĵaŭdo!”

”Dum kelkaj horoj! Dankon pro la komplimento, sed Hanna ne eltenus tion. Mi devus serĉi pli freŝan karnon por umi dum horoj.”

Svedberg rigardas sian mutan kolegon Hans Andersson, kvazaŭ por ĉerpi helpon, sed la inspektoro nenion diras, nur kontrolas la sonbendilon kiu registras la dialogon. Denove atakas Svedberg'on ia sopiro al iamaj pridemandadoj plenumataj kune kun Tom Jankéus. Male al Andersson, tiu ofte povis enĵeti ion surprizan en la rutinon. Iufoje tio helpis superruzi la pridemandatojn, kaj preskaŭ ĉiam tio almenaŭ helpis forpeli la senton, ke ĉio iras laŭ samaj radsulkoj atingante nenien. Nu, ne utilas revii pri tio... Li trinketas kafon, cerbumas, kaj fine prenas du paperojn el stako sur la skribtablo. Dum kelkaj sekundoj li kvazaŭ studas ilian enhavon kaj poste transdonas ilin al Eriksson.

"Jen la mesaĝoj, kiujn vi sendis al Daniel. Ĉu vi jam antaŭe vendis al li tiun varon?"

La pridemandato, refoje kun konsternita mieno, rigardas la unuan paperon, legas ĝin. Poste li levas la rigardon kaj ekkrias:

"Kia diablaĵo estas tio? Kiu skribis tion? Mi ne vendas acidon! Ridinde!"

Svedberg silente rigardas lin. Li atendas. La svelta tridekjarulo montras incititan mienon, kaj pluas:

"Ĉu Danne donis al vi tion? Mi ne sciis, ke li estas tia fekulo! Kredeble li mem skribis tion. Mi ne okupiĝas pri acido. Nek pri komputiloj! Kial li inventis tian stultajon?"

"Martin", diras Svedberg malrapide, "mi esperas ke vi memoras, kion vi faris posttagmeze la 16an de majo, vendrede. Estus bone por vi, se vi pli bone memorus tiun okazon ol la aliajn."

"Vendrede, ĉu? Lastan vendredon... vespere mi festenis kun..."

"Ne la lastan, sed la antaŭlastan vendredon, kaj ne vespere, sed posttagmeze. Ekzemple je la tria horo, kiel tekstas tiu mesaĝo en viaj manoj."

"Mi ne vendas acidon, kaj mi ne skribis tiun leteraĉon! Se li asertas tion, li havas kaŭzon mensogi!"

"Kiel vi scias, Daniel Fridell ne plu mensogas."

"Kial ne?"

Svedberg silentas, dum la vizaĝo de Martin Eriksson iĝas pli kaj pli maltrankvila.

"Pri kio temas?" li ekkrias. "Diru pri kio temas, damne!"

"Ĉu vi ne legas ĵurnalon, spektas televidon?" demandas Svedberg.

"Kompreneble jes! Eble ne ĉiutage... sed fojfoje."

"Do vi devus scii, kio okazis ĉe tiu somerdometo tiutage."

"Ne! Mi ne scias! Kio okazis?"

"Mi kredas vin, ke vi ne liveris al li drogon. Vi liveris..."

"Mi ne estis tie!"

"Kie vi estis?"

”Damne! Mi ne povas memori...”

”Do vi restu ĉi tie kelkan tempon por pripensi. Eble la memorkapablo revenos.”

11. Senpolvigi la pistolojn

Marde matene Svedberg kiel ĉiumatene fluglegas lokan ĵurnalon ĉe sia kuireja tablo, trinkante du tasojn da nigra kafo kaj manĝante rostitan pantranĉaĵon kun marmelado. La varma vetero pluas, kaj li iom kontemplas, ĉu eble transporti sin, la kafon, panon kaj ĵurnalon al la altano por matenmanĝi eksterdome. Tamen li decidas, ke ne indas. Efektive, ekde lia divorco antaŭ jaro kaj duono, la altano preskaŭ ne plu estas uzata. Matene ne indas, vespere ĝi estas tro ombra, kaj semajnfine... nu, semajnfine li ne ŝatas sidi senmova, sed preferas promeni. Li verŝas sian duan tason da kafo kaj turnas paĝon. La ĵurnalo, kiu pro nekonata motivo titoliĝas 'La Barometro', informas siajn legantojn ke la polico lunde kaptis suspektaton pri la du pafmurdoj, sed ke oni devis samtage liberigi lin pro manko de pruvoj. La du murditoj oni priskribas kiel "la 25jarulo" kaj la "40jarulo", kaj la suspektato konsekvence nomiĝas "la 30jarulo". Ne tre fantaziorica titolado, sed kiel enketanta policisto Svedberg tre dankemas pro la diskreteco de la ĵurnalo. La fakto, ke "la 25jarulo" estas eksnazio tamen jam estas multfoje emfazita de la amaskomunikiloj, kaj li demandas sin ĉu vere kredindas la aserto de Martin Eriksson, ke li ne scias kio okazis ĉe Oelanda somerdometo.

La hieraŭa pridemandado ĉiuokaze ne povis rompi la muron de senkulpeco, vera aŭ ŝajnigata, ĉe la suspektato. Svedberg sendis inspektorinon Ljunggren al lia loĝejo por pridemandi lian kunvivantinon, Hanna Lindh, sed ŝiaj nebulaj respondoj ne multe helpis. Ĉe unu punkto ŝi iom pli precizis ol la kunulo: dum la nokto kiam Sonja Persson estis trafita de kuglo li dormis pace en ilia gelito. Pri la aŭto ŝi konfirmis lian diron. Ili ne rajtas veturigi ĝin, krom al riparejo por alĝustigi aron da difektoj. Sed ĉu tio signifas, ke ili vere rezignas veturigi ĝin? Dubinde.

Svedberg kaj Ljunggren poste parolis ankaŭ kun familianoj de la murditoj por ekscii, ĉu Martin Eriksson estas konata al iu el ili, sed la rezulto estis plene negativa. Entute, la matena optimismo iom post iom velkis dum la paso de la lundo, kaj malfrue posttagmeze, liberiginte la suspektaton, eĉ Benny Hallman, kiu alportis la retmesaĝojn, konkludis:

"Nu, ankaŭ mi povus facile akiri tian retroŝtan adreson kiel martin Eriksson@hotmail.com kaj sendi mesaĝojn al iu. Neniu scius kiu efektive faris tion."

Nun, marde matene, Svedberg demandas sin kial oni ne tuj traktis la retmesaĝojn kun tia skeptikemo. La plej aŭdaca supozo, kiun oni rajtas dedukti el ili, nun ŝajnas al li esti, ke iu persono uzis la nomon Martin

Eriksson por trompi Daniel'on Fridell kaj logi lin al lia ekzekutejo. Iu kiu konis ilin ambaŭ, kaj sciis, ke Daniel eble interesiĝus pri oferto de 'A' fare de Martin. Krome, iu kiu konis la retadreson de Daniel.

Subite io trafas lin. Se oni serĉus en la komputilo aliajn, senkulpajn retmesaĝojn, oni eble povus ekscii, kun kiuj adresoj Daniel havis kontakton. Glutante la lastan, jam malvarmetan kafon, li decidis taski al Hallman okupiĝi pri tio. Li mem ankoraŭ sentas sin iomete sur malfirma tero, kiam temas pri komputilaj aferoj.

Antaŭ ol kunfaldi la ĵurnalon kaj ekiri laborejen, li ekvidas leteron de leganto, kiu mencias la du murdojn. Laŭ la verkinto, post preskaŭ du semajnoj "nenio okazis" por kapti la kulpulon, kaj sekve evidentas ke troviĝas tro malmulte da policistoj en la urbo. Dum momento Svedberg demandas sin, kion li povus fari pli efike en la aktuala murdenketo, se li disponus pri dudeko da helpantoj. Eble li estus plene okupita elpensi al ili taskojn. Plue li demandas sin, ĉu vere du semajnoj estas longa tempo. Kompreneble, li spertis pli rapidajn murdenketojn. Iu murdinto iam kuŝis ebriega kun tranĉilo enmane apud sia viktimo, kaj oni malkovris la murdon nur dank' al tio ke policpatrolo volis fortransporti du senkonsciajn drinkulojn de publika loko. Tamen ŝajnas al li, ke pli ofte la enketado treniĝis dum semajnoj kaj monatoj. Kio maltrankviligas lin ne estas la paso de tempo mem, sed la neeblo scii, ĉu la murdinto jam plenumis sian kompletan vicon da unufojaj pafoj, aŭ ĉu sekvos ankoraŭ plua.



Vivianne Ljunggren alportas raporton pri telefona interparolo kun Eva Lundin, la kolego de Sonja Persson, kiu kutimis libertempi kun ŝi. Ŝi estis tre ŝokita aŭdante pri la pafado kontraŭ ŝia kolego, sed ne povis imagi kiu faris ĝin. Pri minacoj kontraŭ Sonja Persson de iamaj klientoj aŭ aliaj ŝi nenion aŭdis. Tamen ŝi ne konsideris tian aferon malebla, ĉar "fojfoje okazas, ke homoj kulpigas la psikiatron pri postaj malfacilaĵoj". Ŝi tamen ne emis precizigi, pri kiaj malfacilaĵoj ŝi pensas. La kontakto inter la du koleginoj ĉesis, kiam Sonja Persson transloĝiĝis de Kalmar, se ne kalkuli unu-du bildkartojn ĉiujare. Eva Lundin ne povis bone klarigi, kial ŝia kolego transloĝiĝis, sed ŝi ne kredis ke temis pri fuĝo de ia minaco. Je la demando, ĉu amafero povus influi, ŝi respondis, ke tio "ne estus laŭ la stilo de Sonja". Ŝi mem, male, antaŭ jaro transloĝiĝis al Stokholma antaŭurbo por kunvivi kun sia nuna edzo.

La raporto de lia kolegino rememorigas al Svedberg, ke li atendas interparolon kun Annette Jankéus, la edzino de lia iama kolego. Li telefonas al ŝia laborejo kaj bonŝance trovas ŝin tie. Kiam li demandas pri Sonja

Persson, ŝia voĉo sonas tre surprizita. Evidente la edzo forgesis mencii al ŝi la aferon.

”Certe mi memoras ŝin! Pri kio temas? Ĉu io okazis al ŝi?”

Svedberg informas ŝin pri la pafo en Söderköping, kaj ŝi reagas kun forta bedaŭro.

”Terure! Mi ne povas imagi... ĉu povas esti ia frenezulo... ia eraro, eble oni ne celis ĝuste ŝin? Ŝi estas tiel silentema, ne altrudas sin, evitas societan vivon... Mi ne komprenas... Ĉu estas la sama pafinto kiel ĉe la murdoj ĉi-urbe?”

”Ni ne scias, sed tio ŝajnas probable. Ĉu vi memoras, ĉu ŝi iam menciis minacon, aŭ montris ke ŝi timas iun? Ekzemple iun klienton aŭ eksan klienton.”

”Ne, certe ne! Ŝi neniam parolis pri sia laboro. Ni kantis, kaj paŭze ŝi parolis ĉefe pri la muziko, aŭ tute ne. Aliaj babiladas pri edzoj, familio, laboro, libertempaj vojaĝoj, sed ŝi ne.”

”Ĉu iu alia konas ŝin pli bone ol vi?”

”Nu... mi ne scias kiu... Ŝi estas iom malsocietema, kiel mi diris. Kaj nun jam pasis du-tri jaroj, ŝajnas al mi, de kiam ŝi forlasis la urbon.”

”Bone do, mi dankas vin. Ne hezitu voki min, se vi rememoros ion. Donu mian saluton al Tom!”

”Certe, certe! Eble vi vizitos nin iufoje?”

”Nu, kial ne? Sed... nun mi ne estas tre agrabla kompanio... Povas pensi nur pri la enketo. Vi ja scias, ĉu ne?”

”Certe! Mi memoras, kia estadis Tom!”



Finfine alvenas unu el la du listoj, kaj post refoja admono, fakte liveriĝas ankaŭ la dua, kaj eblas kompari ilin. Plej ampleksa estas la listo pri lernantoj, al kiuj Johan Wester klopodis instrui svedan, anglan kaj germanan lingvon. Temas pri plurcent junaj personoj dum tri jaroj, personoj kiuj nun aĝas inter 16 kaj 21 jarojn. La dua listo enhavas okdekon da nomoj, en eĉ pli vasta aĝo-intervalo.

Svedberg preparas sin al longa kaj pacienca tralegado kaj komparado de la plurpaĝaj listoj. Li petas helpon de sia tuta skipo, kaj tiam Benny Hallman ekhavas ideon.

”Ni skanu la listojn kaj komparu komputile!”

”Ĉu eblas?”

”Mi pensas ke jes, la listoj ŝajnas sufiĉe klaraj kaj enhavas identigan numeron, ĉu ne? En la administra sekcio oni havas skanilon kaj programon por interpreti. Mi revenos post dek minutoj!”

Kiel kutime ĉe similaj modernaĵoj, Svedberg ne scias ĉu fidi aŭ skeptiki. Anstataŭ li, Hans Andersson esprimas sian dubon:

”Se la komputilo trovos la murdinton, ni ja povos iri fiŝi, ĉu ne? Mi supozas ke troviĝas programo ankaŭ por aresti lin. Policistoj eksmodiĝas, ŝajne.”

Lia skeptikemo ŝajnas motivita, ĉar pasas ne dek minutoj, sed duonhoro, dum kiu la juna kolego ne revenas. Oni iras alporti kafon. Svedberg profundiĝas en siajn notojn pri la ĝisnuna enketo. Ŝajnas al li ke ĝi serpentis antaŭen, jen oni sentis, ke la solvo proksimas, jen ĉio ŝajnis pli enigma ol iam. Denove venas al li la penso, ‘ĉu la triopo kompletas, aŭ ĉu ni atendu kvaran?’

Finfine revenas Hallman kun disketo, kiun li enŝovas en la komputilon de Svedberg.

”Pfuh! Kiom da polvo estas sur via klavaro, Svedberg! Nun atendu iomete...”

”Ni atendas, ni atendas”, komentas Andersson.

Hallman klavas, musas, gratas al si la nukon, tiras al si la maldensajn lipharetojn, kaj plu klavas. La tri kolegoj trinketas kafon. Entute la kompanio ne aspektas kiel streĉe laboranta policista skipo, sed kiel senlaboraj enuantoj, kun escepto de la klavanta kaj murmuranta Hallman.

”Jen! Ne... Jes ja... Ne, diable, tiel mi faru... Ha, jes! Jen do! Kiom ni havos? Ha! Jen kvaropo! Mi trovis kvar numerojn, kiuj aperas ambaŭliste! Ni vidu, kiuj ili estas!”

Denove li serĉas, klavas, kaj prononcas:

”Moa Amanda Lagerström, naskita en okdek sep. Hm... Tio ŝajnas, eble ne tre... Nu, mi serĉu la duan... Jen! Aj! Linnéa Sara Olivia Johansson, naskita en okdek tri. Bone, ne timu, mi daŭrigos... Jen, Aron Fredrik Erik Fridell, naskita en okdek unu, kaj... plue... la lasta estas... Raj... Rajen... Rajendra Patel, naskita en okdek kvar. Do, jen nia kvaropo. Tiu lasta, ĉu li povas esti somaliano?”

”Rajendra sonas pli hinde, laŭ mi”, diras Vivianne Ljunggren. ”Sed ĉu vi diris Fridell?”

”Jes ja, Aron Fredrik Erik Fridell.”

”Fredrik Fridell”, diras Svedberg. ”La frato de Daniel.”



La frato de Daniel Fridell. Ĉu li murdis sian pli aĝan fraton kaj iaman instruiston, kaj provis murdi psikologon, kies kliento li estis? Ja ne povas esti koincido, ke li havas rilaton ne nur al du viktimoj, sed al ĉiuj tri?

”Ĉu ni tuj prenu lin por pridemandado?” demandas Hallman, kiu ŝajne jam forgesis sian antaŭan troviton, la supozita retmesaĝinto kaj drogvendisto.

Svedberg cerbumas. Plaĉus al li unue kolekti pli da materialo. Certe intervjuoj kun sinjorino Marianne Fridell, la patrino de la du fratoj, utilis. Eble eĉ la patro jam revenis de sia inĝenierado en Arabio. Kaj Jonna Larsson sendube povus priskribi sian bildon pri la rilato inter la du fratoj. Krome utilis scii iom pri la vivo de Fredrik. Li memoras lin kiel silenteman, iom bruskmienan junulon, sed tion li interpretis kiel naturan konduton post la tragika sorto de la pli aĝa frato. Ĉu vere eblas, ke tiu knabo, kiu interparolis kun policisto kaj ŝajnis prizorgi sian patrinon, dudek kvar horojn pli frue pafmurdus sian fraton?

Aliflanke maltrankviligas lin la penso, kiu pli kaj pli obsedas lin: ĉu la triopo kompletas? Se li dediĉus ankoraŭ unu-du tagojn al kolektado de pluaj informoj, kaj dume oni trovas kvaran viktimon... Ne, tion li ne rajtas riski.

”Mi demandas min, ĉu niaj listoj sufiĉos por formala aresto”, li demandas al ĉiu kaj neniu.

”Ĉiukaze ni povas venigi lin ĉi tien kaj reteni lin por pridemandado dum iu intervjuas lian patrinon kaj Jonna’n”, proponas inspektoro Ljunggren. ”Tiel ni jam ofte faras, ĉu ne?”

Ŝi pravas. Eĉ sen formala aresto eblas, almenaŭ dum kelkaj horoj, paralele pridemandi la novan suspektaton kaj kelkajn atestantojn. Svedberg konsentas, ke jen la plej prudenta maniero agi en la nuna situacio.

”Ĉu ni havas lian adreson? Kie li laboras?” li murmuris, fosante en stako da paperoj kun tajpitaj raportoj kaj manskribitaj notoj. ”Jen almenaŭ telefonnumero. Bone, ni trovos lin. Mi proponas, ke... mi kaj Benny prenu lin, dum Hans serĉu lian patrinon kaj Vivianne la knabinon. Ĉu ankoraŭ iu serĉindas? Eble Amanda Wester? Nu, ŝi povas iomete atendi.”

”Mi konsilus esti tri policistoj por venigi lin ĉi tien”, diras inspektoro Andersson. ”Se li faris la tri pafajn... Kaj eble ni senpolvigu niajn pistolojn...”

”Nu, mi trovos iun trian helpanton, sed vi prefere iru al la patrino”, kontraŭas Svedberg al li. ”Vi jam renkontis ŝin kaj konas la enketon, do vi scias kion demandi, ĉu ne? Komencu paroli pri Daniel, kaj nur kvazaŭ aldone glitu al la frateto, ĉar alie ŝi eble ektimos kaj mutos. Uzu vian ĉarmon!”

Vivianne Ljunggren ekridas, sed rapide sufokas la ridon kaj transformas ĝin en raŭkan grakadon. Sed Andersson ŝajne ne ofendiĝas. Ili ĉiuj preparas sin por siaj taskoj, kaj ĉi-foje eĉ Svedberg esploras kaj ŝargas sian armilon. Kiam li lastfoje pafis per ĝi, krom ekzerce? Li ne memoras. Pasis jaregoj. Dum la lastaj jaroj oftigis pafdueloj inter policistoj kaj krimuloj. Li supozas, ke kulpas pri tio kreskanta brutaleco de la krimuloj,

tamen li ne trovas pli oftajn pafojn bona respondo al tiu evoluo. Uzi la kapon pli ol la batilon kaj pistolon laŭ li estas pli efika metodo, kaj necesas uzi ĝin kun pacienco, trankvilo kaj malrigideco. Refoje aperas al li iama diraĵo de Tom Jankéus: 'kiam pafilo elingiĝas, prudento elkapiĝas'.

Oni trovas la adreson de Fredrik Fridell kaj ekiras al domo en la kvartalo Oxhagen. Dumveture li demandas sin, kiel sukcesos Hans Andersson ĉe la patrino Fridell. Svedberg preferus mem iri tien; la konversacia lerteco kaj sagaco de Andersson ne imponas al li. Sed li ne povas lasi al iu alia respondeci pri la tasko serĉi kaj venigi la suspektaton policejen. Do, li mallonge informas la trian helpanton pri la plej gravaj faktoj, kaj jen ili staras antaŭ sesetaĝa, masivimpresa domo.

La nomo Fridell aperas jam teretaĝe, kaj ili postenas proksimume kiel ĉe la antaŭa suspektito, tamen ĉi-foje eĉ pli singarde kaj ekscite. Svedberg sonorigas. Oni atendas. Dua sonorigo. Tria. Nu, nenio stranga. Estas labortago, baldaŭ estos tagmezo. Ĉi-hore ordinarnaj homoj troviĝas en sia laborejo, ĉu ne? Oni provizore rezignas, tamen Svedberg postenigas sian kolegon Hallman en la ŝtuparejo por gvati al la apartamenta pordo de Fredrik Fridell. Poste li reiras policejen kaj telefone vokas al Vivianne Ljunggren.

Inspektorino Ljunggren trovas sin jam la duan fojon kun Jonna Larsson en la brikabraka ĉambreto de la lerneja komitato. Kiam ŝia poŝtelefono ekludas "Für Elise", ilia interparolado ankoraŭ ne vere komenciĝis. Do, ne eblas fari kromvojojn, sed necesas tuj demandi, ĉu Jonna konas la laborejon de Fredrik Fridell.

"Jes", ŝi diras, ŝajne sen granda surpriziĝo pro la demando, "se li ne ŝanĝis lastatempe, li sendube restas en tiu paperfabriko... nu, kiel ĝi nomiĝas, iom norde..."

"Ĉu Mönsterås?" proponas Vivianne Ljunggren.

"Ne, pli fore... Aĉ!"

Post interkonsiliĝo telefone Svedberg proponas Emsfors, kaj jen la ĝusta nomo, konfirmas Jonna. Per tiu informo la komisaro kontentiĝas, kaj la lerneja interparolo povas vere eki.

"Do bone", diras Vivianne Ljunggren, "ankaŭ mi volas demandi pri Fredrik, aŭ pli ĝuste pri la rilato inter la du fratoj. Ĉu vi povas priskribi ĝin?"

La knabino pripensas dum momento, dum ŝi mienas en malfacile interpretebla maniero.

"Nuuu..." ŝi trenas la respondon. "Ne tre bona."

"Ĉu turmentas vin paroli pri Daniel?"

Ŝi balancas la kapon kaj iomete elŝovas la suban lipon.

”Iom... Fakte, ili ne plu renkontiĝis. Ja estas kvar jaroj inter ili. Kaj... nu, laŭ Daniel, Fredrik estis tre nematura. Nerve malstabila. ‘La fekuleto’ li kutime nomis lin.”

”Aha. Tamen, kutime la tono inter gefratoj povas esti iom kruda, ĉu ne? Ĉu ili havis iun apartan kaŭzon ne interriliti?”

”Jes, eble. Mi pensas ke eble Fredrik enviis al Danielo pro diversaj aferoj...”

”Enviis? Ĉu pro vi?”

”Pro mi? Ha! Ne... aŭ... Nu, mi neniam pensis pri tio. Fakte mi ne konas lin. Sed estis tiu afero pri la nazioj...”

”Kiu afero?”

”Nu, mi scias nur kion diris Daniel. Laŭ li, Fredrik volis aliĝi al la nazioj, sed Daniel malhelpis tion dum la tempo kiam li estis aktivulo tie. Li diris, ke Fredrik estas tro malstabila por esti akceptita en tiu rondo. Iom strange, fakte, se oni pensas pri kelkaj aliaj inter ili... Sed Fredrik longe havis problemojn en la lernejo kaj kun la patro. Mi pensas ke ilia patrino ne kapablis trakti lin. Daniel diris... li diris, ke Fredrik ofte batis sian patrinon, kiam ili estis pli junaj. Dum kelka tempo li ankaŭ iradis al ia psikiatra kliniko, mi pensas.”

”Ĉu vi pensas, ke Fredrik tre koleris al sia frato?”

”Jes, sendube li koleris, sed ankaŭ admiris, ĉar por Daniel ĉio bone sukcesis... tio estas... Kial vi demandas? Ĉu vi pensas ke Fredrik? Ne! Tio ja ne...”

”Ni simple devas esplori ĉiujn personojn, kiuj iel rilatis al Daniel, kaj konsideri ĉiujn eblojn. Ĉu vi maltrankvilas pro io?”

”Ne, sed estus tiel terure, se lia frato...”

”Ĉu vi pensas, ke povus esti li?”

”Mi ne scias. Ŝajnas neeble, sed... Krome, laŭ Daniel, li estas tia fuŝulo. Li lertas pri nenio kaj estas tre nervoza.”

Vivianne Ljunggren restas dum ankoraŭ kvaronhoro parolante kun Jonna Larsson. Ŝi ekscias, ke la familianoj Fridell ĝenerale ne tre glate rilatis unu al la alia. Ne nur Fredrik, sed ankaŭ Daniel ofte kverelis kun sia patro, kiam tiu estis hejme. Kaj la patrino laŭ la opinio de Jonna provis uzi siajn filojn por militi kontraŭ sia edzo. Ŝi estas virino malkontenta pri ĉio, kiu tamen ne scias kion ŝi deziras, nur ke tio estu io alia ol tio, kion ŝi havas. Pri la lerneja tempo de Fredrik Jonna scias malmulte, krom ke ĝi estis malsukcesa.

Dume Svedberg klopodas telefone kontroli la informon pri la laborejo de Fredrik Fridell. Post kelkfoja plukonektado al alia funkciulo, iu administranto en la fabriko de Emsfors konfirmas, ke li estas dungita tie, sed sekvamomente informas, ke li de tri semajnoj ne laboras pro dorsa malsano. Do, hodiaŭ li tute certe ne troviĝas laboreje.

Post la reveno de inspektoro Ljunggren al la policejo, Svedberg dediĉas horon al skribado de raportoj surbaze de kiuj li esperas konduki la enketon al fino. Revenas ankaŭ Hans Andersson, kaj li raportas pri sia intervjuo kun Marianne Fridell:

”Bone, ni parolis ĉefe pri la lerneja tempo de la du filoj, kiuj ŝajne malsamas kiel nigro kaj blanko. Daniel estis geniulo, laŭ sia patrino, kaj Fredrik kiel etulo ŝajnis talenta, sed dum la lastaj lernejaraj li pli kaj pli malsukcesis, malpacienis, maltrankvilis kaj malĉeestis en la lecionoj. Ŝi aparte menciis lian instruiston pri sveda kaj angla en la oka kaj naŭa jaroj, kiu donis al li la noton ”malaprobata” en ambaŭ studobjektoj. Pro tio li ne povis realigi sian revon, kiu estis trairi la specialan futbalan gimnazion. Ŝajne oni devas regi la svedan kaj anglan por futbali. Nu, anstataŭe li drivadis senokupe dum jaroj. Tamen, lastatempe la patrino trovis, ke li iĝas pli trankvila kaj ne tiel facile incitiĝas, kiel antaŭe. Bone estas ankaŭ, ke li havas propran loĝejon, kaj ke la patro forestas, ĉar li tute ne bone akordas kun sia patro, ŝajne.”

”Ĉu vi parolis ankaŭ pri la psikiatrio?” scivolas Svedberg.

”Bedaŭrinde ne. Tio estas, mi demandis, ĉu li iam bezonis helpojn de psikologo, sed ŝi neis tion.”

”Hm. Ĉu povas esti eraro en ilia listo?”

”Certe ne”, enranĉas Vivianne Ljunggren, ”sed ŝi kompreneble hontas menci tiun.”

”Nu, ĉio sendube klariĝas”, opinias Svedberg, ”sed estus bone, se ni povus konfirmi la supozon, ke li volis venĝi ankaŭ kontraŭ Sonja Persson.”

”Mi supozas, ke ili skribas ĵurnalojn pri la pacientoj, ĉu ne?” proponas la inspektoro. ”Tiuj almenaŭ malkaŝus, pro kio li bezonis helpojn de psikologo.”

”Jes, ni klopodu akiri tiujn. Kaj ni klopodu trovi la knabon, antaŭ ol...” diras Svedberg en iom zorgoplena tono. Ĉu atendi... Ne, mi pensas ke ni havas sufiĉe por formala aresto, krom nur la arestoto. Kun tia decido de la prokuroro, ni rajtos ankaŭ traserĉi lian loĝejon, kio povos esti tre grava. Ekzemple tiuj retmesaĝoj ja devas veni de li... Ej, ja oni parolis pri la urba biblioteko. Nu, ion oni certe trovos ĉe li. Adreslibreton, malnetaĵojn, ion ajn.”

12. Nek pli nek malpli

Kompreneble vi revenos. Se vi jam unufoje estis ĉi tie, vi ne lasos min. Damna dikulo, kiu iam babilis kun Panjo. Mi rekonis vin tra la gvatotruo de la pordo. Ankaŭ defenestre mi vidis vin poste foriri en policaŭto, la dikulo kaj alia porkaĉo. Bone, vi revenu. Mi estas preparita. Vi ne prenos min surprize. Damne, vi entute ne prenos min! Mi nur ŝatus scii, ĉu vi ankaŭ gardas la domon. Ne gravas, mi trairos, putinidoj! Mi estas preparita, same kiel mi preparis min por la tri antaŭaj diabloj. Vi spertos kun kiu vi havas aferon! Mi ne tremas pro vi. Neniam plu mi tremos, damne, neniam plu! Iam ĉiu ajn mizera diablo povis turmenti min, treti sur min, sed nun jam ne plu. Mi scias kion mi bezonas, kaj mi havas ĝin. Mi jam lernis kiom necesas. Du tablojdoj kaj plena glaso. Nek pli nek malpli. Plej perfekte estus gluti tion unu horon antaŭe. Tiel mi faris pri la putinido, kiu detruis al mi plurajn jarojn per sia idiota supereco kaj baris la solan revon, kiun mi havis. Damne, tiam mi volis nur unu aferon, kaj ĝuste tion li malebligis, simple ĉar li estis fuŝulo, senvalorulo, kiu ne povis vidi sian propran mankon, siajn proprajn makulojn. Jen kial li turmentadis min, jen kial li devis finiĝi kun truo tra la kapo. Kaj same mi faris pri Danne, la granda fekaĵo, kiu venenis mian tutan vivon kaj haltigis min, sabotis mian planon iĝi iu kiun oni devas respekti kaj timi. Fekegale, mi tamen iĝis tia, malgraŭ li, sen li, kaj nun mi viŝas la piedojn per li, damne! Du tablojdojn, plenan glason, kaj bam! la kuglon nete tra lia damna dika fekkapo! Kaj la serpentino, tiu kadavro de virinaĉo, kiu trompis min, konspiris por detrui min. Mi estis stulta, mi ne estis vere mi mem. Mi naŭve kredis, ke tiu putinaĉo helpas min, do mi malkaŝis mian deziron iĝi militisto, batalanto. Kaj ŝi ludaĉis sian fian teatraĵon kaj ŝajnigis nur aŭskulti. Poste la falsa serpentino manipulis, tiel ke oni rifuzis min por la militservo. Kretenoj! Sed ankaŭ tiu putino ricevis laŭmerite. Kaj nun mi atendas ke vi revenu. Mi estos preparita. Nun mi ne scias je kiu preciza horo necesos aĝi, sed mi sukcesos ankaŭ ĉi-foje. Mi prenos tion kiom mi bezonas, kaj se necesos, mi havas ankaŭ 'E' por resti veka, ĝis vi iros inferen! Vi revenu, porkoj, mi traktos vin varmege! Mi esperas ke tiu falsa dikulo revenos. Vi ricevos, grasa porkaĉo! Sed ne gravas, kiu venos. Vi ekkonos min, vi ekscios, kun kiu vi havas aferon! Vi ricevos laŭmerite, nek pli, nek malpli. Kaj poste mi trabatos al mi vojon. Mi preparis ankaŭ tion, kaj vi povos nenion fari. Mi rikanos al vi forirante. Neniu fekulo haltigos min!

13. Nova nomtabulo

Plurajn monatojn poste, paŝante nerapide apud Svedberg laŭ la marbordo, tra la eta fiŝhaveno kaj preter la senhoma strando, Tom Jankéus cerbumas, ĉu io fareblus alie. Ĉu li povus plenumi la taskon alie, se li restus policisto? Sed tra la susurado de aŭtuna vento en la arbopintoj, kaj tra la plaŭdado de aŭtunaj marondoj kontraŭ la ŝtonriĉa bordo, li nenion diras pri tiu printempa tago. Kion diri? Vere, troviĝas nenio dirinda pri tiu kazo. Prefere forgesi la tutan aferon kaj okupiĝi pri la nunaj zorgoj. Svedberg ja havas sufiĉe da zorgoj kaj ĉiutagaj problemoj, sed ankaŭ li mem havas zorgojn. Kiel li sukcesis impliki sin en tian vepron el sentoj kaj deziroj, la diablo scias. Nun li venis ĝis punkto, kie li sentas saman kulpon kaj egalan respondecon krom al sia edzino ankaŭ al Amanda. Al sia amatino. Ne plaĉas al li tiu vorto. Ĝi estas vorto el romano, ne el la vivo. Sed por li temas pri la vivo.

Li scias preskaŭ same bone, kvazaŭ li mem ĉeestus, kiel disvolviĝis tiu printempa vespero, la 27a de majo. Roger Svedberg kaj Hans Andersson alvenis kun paspartua ŝlosilo al la loĝejo de Fredrik Fridell, ekster kiu jam postenis Benny Hallman. Laŭ vira tradicio oni ekskludis la inspektoron Vivianne Ljunggren de la operacio. Ankaŭ ĉi-foje oni trifoje sonorigis, kaj poste malfermis per la paspartuo. Svedberg eniris kun permesilo pri traserĉo en la maldekstra mano. La dekstra mano estis kaŝita en la jakso, kie li portis sian armilon. Sed lia dekstra mano ne havis tempon eligi. Sonis pafo, li saltis dorsen kaj falis, sonis dua pafo kaj ankaŭ Andersson falis. Post sekundo da silento aŭdiĝis krio de supre, el la ŝtuparejo, kiam Hallman ordonis al la nevidebla pafinto ĵeti sian armilon teren kaj elveni malrapide kun la manoj super la kapo. Lia krio estis nerespondita.

Hallman alvokis pliajn policistojn kaj ambulancon, sed la granda problemo estis forporti la du pafitojn sen prezenti sin kiel celtabulon al la murdinto. Fine oni enĵetis grenadon kun larmiga gaso, kaj enkuris grupo da tre nervaj policistoj en kaskedoj, gasŝirmilojoj, pafrezistaj veŝtoj kaj ŝildoj. Oni sukcesis eligi la du policistojn, sed pafinton oni ne trovis. Li evidente eskapis, faligante sin unu-du metrojn de sia teretaĝa balkono.

Sekvis furioza persekutado, aŭ pli ĝuste serĉado, ĉar oni perdis la fuĝinton kaj ne sciis kien postsekvi lin. Oni tuj faris tutlandan serĉanoncon kaj eĉ alarmis *Interpol*-on. Post du horoj oni trovis lian forlasitan ruĝan *Ford Fiesta* tuj sude de la urbo. Post tri horoj, iu tute alia aŭto ŝanĝante koridoron sur la Sunda ponto inter Svedio kaj Danio, je 300 kilometroj de Kalmar, koliziis kun apuda ŝarĝaŭto kaj ruliĝis kelkajn turnojn antaŭ ol

kraŝi kontraŭ la flanko apogilo. En ĝi, fiksita kaj sanganta, tamen viva, oni trovis la serĉatan murdinton Fredrik Fridell.

Dume oni transportis la du policistojn al hospitalo. Ĉe Andersson estis trafita la kapo, kaj li mortis antaŭ ol atingi operacian tablon. La pafo al Svedberg trairis lian ventron kaj trafis la spinon. Li tamen vivis.

Ankaŭ la murdinto vivis kaj eĉ rapide resaniĝis kaj post kelkaj semajnoj povis esti transportita de hospitalo al arestejo. Lia tria viktimo, Sonja Persson, plu vivis, aŭ eble nek vivis nek mortis, kiel pakajo en hospitalo. La ĵurnaloj publikigadis artikolojn pri la dramo. Ĉe la entombigo de Hans Andersson liaj familianoj postulis enkondukon de mortopuno en Svedio, kaj bulvarda ĵurnalo tuj enketis ĉe siaj legantoj pri la demando. 85 procentoj el la viroj kaj 55 procentoj el la virinoj subtenis la postulon. Alia bulvarda ĵurnalo publikigis biografion de la murdinto, kie konataj faktaj miksiĝis kun klaĉaĵoj de najbaroj. Eĉ parto de la polica esplormaterialo ŝajne likiĝis al la ĵurnaloj. Ĉio estis kiel kutime. Ĉio, krom tio, ke la murdenketa teamo displitiĝis pro du pafoj.

Vivianne Ljunggren tamen pretigis la enketon kun helpo de Benny Hallman kaj aliaj. Post kelkaj semajnoj ŝi povis ankaŭ renkontiĝi kun Svedberg en la hospitalo kaj diskuti kelkajn detalojn kun li. En la komenco de julio ŝi transdonis la kazon al la prokuroro, kiu sciigis ke li bezonas ankoraŭ du monatojn por prepari la akuzon.

En aŭgusto la tuta serio de murdoj kaj atencoj povus ŝajni forgesita. Sed fine de septembro komenciĝis la juĝa proceso en la urba tribunalo, kaj tiam refoje ĉiuj amaskomunikiloj plenplenis de sensaciaj raportoj pri la murdinto kaj liaj viktimoj. En tribunalejo ne estas permesite fotografi, sed ĉiuvespere en televidaj novaĵelsendoj aŭdiĝis asertoj de atestantoj kaj de la akuzisto.

Nun montriĝis, ke pluraj personoj antaŭvidis la katastrofon jam frue. Domaĝe, ke nur kvar monatoj post la murdo oni ekscias tion! La patrino de Fredrik Fridell kulpigis la lernejon, lia patro la psikiatrion, la ĉefo de la psikiatria polikliniko sian malgrandan buĝeton, la lernejestro opiniis, ke la socialaj servoj devintus helpi. La akuzato mem apenaŭ aŭdiĝis sian voĉon, sed lia advokato prezentis la tro ofte forestantan patron de Fredrik kiel gravan cirkonstancon, kiu devus forpreni parton de la kulpo for de lia kliento. La akuzisto faris brilan apelon kontraŭ la kreskanta uzo de pluraj drogoj inter perfortemaj krimuloj. La kombino de dormigilo kaj alkoholo, kiun Fredrik uzis por kuraĝigi sin kaj seniĝi de ĉiuj bridaj, konatiĝis kiel 'la psikopatiga koktelo'.

Dume, Svedberg rekomencis manĝi kaj trinki propramane kaj proprabuŝe, do ne plu estis nutrata tra ezofaga sondilo. Nun, en ĉi oktobra vespero, li ankoraŭ iom mallerte rulas la radojn de sia rulseĝo apud la promenanta Jankéus. De monato li revenis al sia domo, kie oni faris kelkajn

provizorajn adaptojn atendante decidon, ĉu pli funde adapti al li la domon, aŭ ĉu li ŝanĝu loĝejon. La juĝa proceso kontraŭ Fredrik Fridell daŭras jam de tri semajnoj, sed la verdikto ankoraŭ prokrastiĝos. Kaj poste eble sekvos apelacio. Sed la du ekskolegoj ne multe parolas pri tio. Ili ankaŭ ne diskutas la handikapon de Svedberg, nek la malfidelecon de Jankéus. Ili ne kutimas je tiaj personaj konfidaĵoj. Ne, ili rememoras siajn komunajn enketojn dum jaroj pasintaj. La germanajn turistojn, kiuj trovis sin meze de brutala murdo ĉe la lago Törn. La pastrinon, kiu kaŝis iranajn rifuĝantojn en sia preĝejo. La direktoron, kies mastrumistino kaj negoca partnero malaperis kiel rusa gaso. Kaj multajn aliajn. Ili interkonsentas, ke la iamaj murdoj estis pli interesaj ol la nuntempaj. Ili eĉ ĝuas siajn komunajn memorojn, kvankam plej ofte temas pri memoroj mortigaj.

”Ĉu vi memoras tiun strangan vireton kun la pakmopedo, kiu ĉie kaj ĉiam aperis en la plej suspektinda maniero?” subridas Svedberg.

”Certe. Sed pli mirinda estis tiu islanda sorĉistino, laŭ mi”, kontraŭas Jankéus.

Ili pluiras memorante laŭ la marbordo, dum grizaj ondoj senĉese ruliĝas al la tero.

En iu bela oktobra tago Svedberg faras ekskurson. Unue li promeniĝas sian rulseĝon al la strato Unionsgatan, ĝis la butiketo *Arta Porcelano*. Tamen ne eblas al li eniri. Tri ŝtupoj baras lian vojon antaŭ la butika pordo. Amanda Wester ekvidas lin kaj venas el la butiketo ĝis li, tamen ŝi ne povas levi naŭdekkilograman viron en rulseĝo supren laŭ la tri ŝtupoj. Li devas resti ekster la pordo. Ili interparolas dum momento, li prezentas al ŝi sian deziron kaj ŝi promesas plenumi ĝin post kelkaj tagoj. Pri la murdo ili nenion diras, kaj pri la juĝa proceso ŝi esprimas nur tion, ke ŝi ŝatus se ĝi iam finiĝus.

Poste Svedberg pluiras ĝis sia laborejo. Ankoraŭ ĝi ne estas eksa, sed li intencas peti pensiiĝon. Pri tio tamen decidis neniun en la policejo, sed la granda ŝtata administracio de malsanasekuro. En la policejo li volas nur rakonti al siaj kolegoj, ke li ne intencas reveni. Li preferas, ke ili aŭdu tion el lia buŝo, ol ekvidi ian burokratan cirkuleron aŭ kapti ian klaĉan onidiron en la kafeterio.

La policejo estas moderna publika konstruaĵo, facile alirebla per rulseĝo. Antaŭe li ne konsciis tion, sed nun li konstatas, kiom gravas la manko de ŝtupetoj. Sen helpo li atingas sian etaĝon per la lifto, kaj tuj venante en la koridoron, li estas ĉirkaŭata de kolegoj. Kun ĉiu li devas interŝanĝi kelkajn vortojn, kiuj tamen diskrete aŭ embarase evitas lian novan situacion. Iom post iom li alproksimiĝas al sia eksa ĉambro. Survoje li preterpasas la ĉambron de Vivianne Ljunggren. Ŝi mem ne ĉeestas, ĉar la krimuloj ne ĉesigis sian aktivadon pro tio ke liaj kruroj ĉesis funkcii, sed li notas novan nomtabulon sur ŝia pordo: *Vivianne Ljunggren, komisaro*. “Nu,

kelkfoje oni evidente ne prokrastas la decidojn', li pensas. Sed post sekundo da amaro li devas koncedi, ke ŝi jam delonge meritas esti komisaro. Kaj eĉ se li revenus al sia ofico, tamen ja utilis ke la sekcio havu ankaŭ komisaron kiu kapablas piediri.

La dua ĉambro post tiu de la nova komisaro estas la lia. Li gvasas tra la malfermita pordo. Oni iom ŝovis la meblojn, kaj ĉe lia skribtablo sidas du nekonataj junaj viroj. Ili profundiĝis en intensan klavadon kaj eĉ ne rimarkas lin.

Subite aperas Benny Hallman koridore kun fasko da paperoj enmane.

"Saluton, Svedberg!" li diras. "Ĉu vi jam eklaboros?"

"Ne, ne, ne", protestas Svedberg. "Ne timu, mi ne plu enmiksiĝos."

"Nu, ni vere bezonus vin, sed sendube daŭros iom, ĉu ne?" Li kapgestas al la du novuloj kaj pli mallaŭte komentas: "Tiu venas de la trafika sekcio, sed ili helpas nin dum kelkaj monatoj. Nur provizore. Ja estas pli praktike se ili dume sidas ĉi tie, ĉu ne? Ĉu vi jam kafumis?"

Svedberg iom malelegante turnas la rulseĝon en la koridoro kaj akompanas la inspektoron ĝis la kafeterio. Hallman ŝajnas embarasita de la problemo, ĉu paŝi apud, antaŭ aŭ post Svedberg tra la mallarĝa koridoro. Entute, la vizito en la policejo ne estas granda triumfo. La konstruaĵo malhavas fizikajn barojn, mankas ŝtupoj kaj sojloj. Sed li sentas, ke jam konstruiĝis aliaj baroj, en li mem kaj en la kolegoj. Bone, ke li jam decidis ne reveni. Li rakontas al Hallman pri sia decido, tiu protestas, sed ĉio ŝajnas nur teatraĵo. Ili ambaŭ scias, ke ĉiuj kontentos pri la emeritiĝo de la komisaro.

Post semajno, lunde la 27an de oktobro, jam pasis precize kvin monatoj de la pafoj. La du lastaj pafoj de Fredrik Fridell. Tiu lundo estas la unua tago de la aŭtuno, kiam blanka prujno matene kovras herbon kaj branĉetojn. Dumtage la prujno tamen degelas en milda vento el sudokcidento. Je la sesa vespere, kiam Amanda Wester fermas sian butikon kaj ŝlosas la pordon, aŭto atendas ŝin surstrate. Ŝi paŝas tien trankvile, malfermas la dekstran pordon kaj sidiĝas. Post mallonga kiso, Tom Jankéus stratigas sian aŭton. Ĉi-vespere lia edzino ĥorkantas, dum li havos laborkunvenon. Por tiu kunveno li aĉetis vinon kaj salikokojn, kio povas ŝajni netradicia regalaĵo en lerneja laborkunveno. Plej kredeble estas, ke lia kunveno okazos en dormoĉambro de eta domo en norda kvartalo.

Antaŭ ol stiri la aŭton norden, Jankéus tamen kondukas ĝin al proksima kvartalo kaj haltas antaŭ vicoseria domo ne malproksime de la maro. Ili ambaŭ eliras kaj paŝas ĝis la pordo. Hodiaŭ ekskomisaro Svedberg ricevas vizitantojn. Dum kelka tempo ili konversacias pri la vetero, ĝis Amanda Wester transdonas al li la menditan ceramikan nomtabulon. Antaŭ ol pluiri aŭte, la du gastoj helpas fiksi ĝin sur la eksteran pordon. Poste oni disiĝas. La du kokrantoj forveturas, dum la rulseĝulo, kiu neniam kokros,

nek estos kokrata, mediteme kontemplas sian novan nomtabulon. Ĝi reliefe kaj en diskretaj koloroj prezentas maran bordon kun kelkaj ŝtonoj, ŝaŭmantaj ondoj kaj la nomo *Roger Svedberg*.

FINO

Glosoj

En la suba glosaro aperas ne-PIVaj vortoj (kaj signifoj) aperantaj en ĉi tiu libro, kune kun aro da vortoj troveblaj en PIV, kies signifo tamen povas esti ne vaste konata. Se iu vorto aperas en PIV, mi ne notis krome, ke ĝi troviĝas ankaŭ en aliaj vortaroj. La ĉi-subaj difinoj ne laŭvorte paŭsas la koncernajn vortarojn.

AC André Cherpillod: NePIVaj vortoj, 1988.

EDK Erich-Dieter Krause: Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch, 1999.

EV Ebbe Vilborg: Ordbok Svenska-Esperanto, 1992.

HV Henri Vatré: Neologisma glosaro, 1989.

JL Jouko Lindstedt: Hejma Vortaro, 1999.

JLG Sam Ojen Jansson, Fritz Lindén, Birger Gerdman: Svensk-esperantisk ordbok, 1934.

NPIV Nova Plena Ilustrita Vortaro, 2002.

PIV Plena Ilustrita Vortaro, 1981.

^z Zamenhofa.

‘A’	= ‘acido’ = LSD
abrakadabro ^{HV AC}	galimatio, sensencaĵo
amfetamino ^{NPIV EDK EV}	= alfa-metil-fenil-amino, stimula drogo
anoreksia ^{PIV}	suferanta de mem-malsatigo
brikabrako ^{PIV}	miksaĵo de malnovaj brokantaj objektoj
donjuano ^{PIV}	deloganto de multaj virinoj
doso ^{AC HV}	cilindra ladskatolo, precipe por trinkaĵo aŭ
manĝaĵo	
drogo ^{NPIV EDK}	neleĝa substanco narkota, stimula aŭ halucina
‘E’	= ‘ekstazilo’ = MDMA, stimula kaj haluciniga
drogo	
<i>Erato</i> ^{NPIV}	la muzo de ampoezio
faksi ^{JL NPIV}	telefaksi, telekopii, sendi tekston aŭ bildon
telefonlinie	
gelito	dupersona lito
gvati ^{PIV}	kaŝe, atende observi
ĝinzo ^{AC HV JL NPIV}	pantalono el drelika ŝtofo
hamburgero ^{CM EDK JL NPIV}	hakviandaĵo en panbultko

handikapo	NPIV EDK EV	korpa aŭ mensa obstaklo al normala funkciado
hokokruco	PIV	svastiko, simbolo de naziismo
<i>Interpol</i>		organo de internacia polica kunlaboro
kafeterio	PIV	memserva restoracio
kasedilo	JL NPIV	aparato por aŭdigi sonkasedojn
kokri	PIV	seksumi kun ies edz(in)o
kolao	JL NPIV	bruna gastrinkaĵo kun ekstrakto el kolanuksoj
komato	PIV	profunde senkonscia stato
kvizo	AC EDK EV NPIV	sciokonkurso
labo	PIV EDK	(Triviale) laboratorio
larmiga gaso	EDK EV NPIV	klorenhava gaso kiu iritas okulojn
leĝera	PIV	malpeza, malserioza
LSD	PIV	= lizergatacida dietilamido, haluciniga drogo
majfloro	PIV	konvalo, <i>Convallaria majalis</i> , printempa floreto
blanka		
majskarabo	PIV	melolonto, <i>Melolontha</i> , insekto
mekana	AC EDK EV	mekanika.
merdo	PIV	fekaĵo
mopedo	PIV	malpeza motorbiciklo
muso	EDK NPIV	komputila rulregilo
Oelando	EDK EV JLG	(Öland) insulo kaj provinco en sudorienta Svedio
paspartuo	PIV	ĉefŝlosilo
pelmelo	PIV	mikskonfuzo
poŝtelefono	JL EDK NPIV	portebla sendrata telefono
putino	PIV	prostituitino
retmesaĝo	EDK NPIV	mesaĝo sendata retpoŝte
retpoŝto	EDK NPIV	elektronika perkomputila komunikado
rilaksi	EDK NPIV	malstreĉi korpon kaj psikon
rokmuziko	NPIV	usona muzikstilo
Saud-Arabio	NPIV	lando en okcidenta Azio
sekvenco	PIV	melodiero el kelkaj tonfiguroj
skani	EDK NPIV	sisteme ekzameni surfacon aŭ enhavon
Skanio	AC EDK EV JLG	(Skåne) la plej suda provinco de Svedio
skipo	PIV	grupo kune laboranta
Sundo	PIV z	markolo inter Svedio kaj Danio
sunpanelo		plato por kolekti sunluman energion
svaga	PIV	malpreciza, nebula
T-ĉemizo		simpla senkoluma ĉemizo kun mallongaj manikoj
telenumero		telefona numero

